aventura romano

# Jenő Rejtő Fred la Malpura intervenas

(je la sincera bedaŭro de Jimmy la Ĝisorela)

## U N U A Ĉ A P I T R O

## M I Ŝ A T U S F A R I Ĝ I M O N D F A M A

Mi havas multe da mono, sed malmulte da sagaco!

Ĉiun bonan ideon ĝoje akceptas:

simpatia junulo, kiu perdis sian kuraĝon al la vivo

Respondoj:

Letero n-ro 1:

Mi legis vian anoncon, kaj mi informas vin, ke mi estas honesta trovinto de via perdiĝinta vivĝojo. Ses jarojn mi agadis en Bostono, kiel la ekfunkciigisto de la elektroekzekuta seĝo, kiam foje okazis kurtcirkvito pro mia kaŭĉuka manumo, kaj la kondamnito ne forpasis por eterna dormo pro manko de kurento, aŭ por malbona dormo, neglektinte la kurent-ekfunciigiston, li restis maldorma. Bedaŭrinde ekzekuto ne povas okazi sen viktimo, kaj oni tuj eliminis min el mia trankvila laboro. Estu permesate mencii tiom pri mia kaŭĉuka manumo. Poste kompreneble mi serĉis laboron ĉe la filmistoj, ĉar mi estas faksperta selomajstro. Laŭdire oni bezonas tiulon dum la kaŭboj-scenoj. Tiel mi fariĝis biciklanta kurknabo ĉe Paramount, sed mi edziĝis frue, tiel do nun mi havas florantan, sed apenaŭ lukrantan hortikulturejon en la ŝtato Oklahoma. Mi nomiĝas Sokrato Schwachta aŭ Knapp (laŭ via plaĉo). Mi estas kvardek kvin jara, vidva ekzekutisto, kiu sentas tiel, ke la vivo ankoraŭ konservadas ion por li. Li legis vian gazetanoncon, kaj mi havas la sekvan proponon: Vi povas fariĝi mondfama, se vi adoptos min, kaj vi donacos mian havaĵon al mi, poste vi pilgrimos en Kalikaton piedirante aŭ per tiel nomata trotilo, kiu estas ludilo, ruliĝanta sur siaj radoj, kaj survoje vi

diskonigos tion, ke la konsumado de nekuiritaj manĝaĵoj faras miraklojn! Se tiu idiotaĵo disfamiĝus, oni konus vian nomon en ĉiuj kvar anguloj de la mondo, ĉar vi dirus al la homaro: “Nu jen vidu…” Informu min, ĉe kiu trajno vi atendos kvardek kvin jaran, emeritan ekzekutiston (kiu sentas tiel, ke la vivo ankoraŭ konservadas ion por li), kaj li povas pruvi sepdek du laŭregule faritajn, dokumentitajn ekzekutojn. Mi estas via homo!

Salutas vin:

SOKRATO SCHWACHTA

aŭ KNAPP (laŭ via plaĉo)

Letero n-ro 2:

Sinjoro! Fariĝi mondfama estas ludo infana! Mi inventis la plaĉan infanludon, kies nomo estas “Viaj infanoj murdas ludante” adaptita al bebosonorigo, lud-fervojo, kiu samtempe estas muŝicido. La aparato ekfuncias pro la pezo de du muŝoj, kaj mortfrapas tiujn! Financu min, kaj la homaro menciios mian nomon apud tiu de Edison, kaj Vian nomon apud la mia pro tiu inventaĵo, kiu mortigas du muŝojn, kaj per unu frapo vi fariĝos mondfama…

Letero n-ro 3:

ĈU VI DEZIRAS FARIĜI MONDFAMA? ĈU VI ŜATUS, KE ONI ADMIRUS KAJ ESTIMUS VIN? SE MILIONOJ DA HOMOJ MENCIUS VIAN NOMON?

ĈU VI VOLAS DEDIĉI KONSIDERINDAN MONSUMOJN POR TIU?

LAŬ MI, ĜI ESTAS GRANDA IDIOTAĴO FLANKE DE VI!

Sen ĉiu estimo

B. KNOX

naturamanta, mormona predikatoro, baritonisto de la ĥoro de la societo Mazdaznan

Letero n-ro 4:

VI POVAS FARIĜI MONDFAMA

KONTRAŬ MALMULTE DA REKOMPENCAĴO!

KIO ESTAS LA SEKRETO DE LA SUKCESO?!

Mi studis zorgeme la vivon de Napoleono Tolstoj, Chaplin kaj D. S. Windthorn. Tiuj famaj homoj tial fariĝis senmortaj, ĉar ili uzis Lent-oleon “Bajoka” kontraŭ kalviĝo.

Ĉu vi deziras fariĝi nocio, kiel Rasputin, Beethoven, Shaw, Pasteur kaj D. S. Windthorn?

UZU LENT-OLEON “B A J O K A”! PRODUKTAS ĜIN: inĝeniero D. S. Windthorn, 24 Brooklyn.

Letero n-ro 5:

Se Vi deziras rapide kaj favorpreze fariĝi mondfama, legu mian ĉefverkon:

“K I E L   N I   P O V A S   V I V I   R I Ĉ E,

S U K C E S E

K A J   S A N E.”

Mi atendas vian afablan mendon en la Karitata Hospitalo de Malsanaj Senhejmuloj en Bostono, eĉ mi pretendas helpi vian familihavan homkunulon, kiu estas malsana kvin monatojn!

Altestimate

E. H U B E R T O N

la aŭtoro de la verko

“Kiel ni vivu riĉe, sukcese kaj sane”

P. S. mia alia ĉefverko: “Kariero, forto kaj sano pere de spir-ekzercoj kaj sveda gimnastiko” estas mendebla sub la adreso de tiu sama hospitalo.

Kaj tiel plu! Pli kaj pli adsudaj respondoj, unu estas malpli saĝa, ol la alia. La multe da letero de la respondoj formis monteton, kaj ĉiu estis nura stultaĵo.

– Bedaŭrinde ne estas konvena – diris Tehobaldo Linkoln, kiam li legis ankaŭ la lastan. La leter-amas, duon metron alta, ekmoviĝis antaŭ la brakseĝo, kaj grimpis el sub ĝi enkovrita sekretario.

– Mi konjektis. Oni ne estas tro eltrovemaj, sinjoro Theo – diris la elgrimpito.

Li diris tiel: “sinjoro Theo”, ĉar nek la dungitoj nomis tiun junulon alimaniere, nur laŭ lia baptonomo, restaŭrita gemuta el la ruinoj de lia theobald-a aŭtoritato. Ke oni tamen uzis ankaŭ la titolon sinjoro, ĝi estis ebla nur tial, ĉar iom da respekto, se persone ne al li, sed al liaj milionoj devas esti donita fare de sia ĉirkaŭaĵo.

Ĉar la junulo estis milionulo. Lia individueco konsistis el tri trafe karakterizaj koeficiento, nome: Lentuga vizaĝo, ruĝa hararo kaj profunda antajuĝo al ĉiuspacaj agadoj; do, vane mi volas beligi la aferon, ni konfesu virece: tiu junulo estis eksterordinare maldiligenta.

Cetere oni opiniis lin agrabla junulo. Lia konstante gaja vizaĝo, la supraĵa viv-filozofio, liaj larĝaj ŝultroj, la serenaj, bluaj okuloj faris lin bonguste simpatia, kaj lia aspekto kalkuliĝis favora en tiu kazo, kiaj liaj konatulinoj ludis tion, ke kiu el ili amus Theo-n, se li ne posedus milionojn.

Sed lastatempe li havis fianĉinon, pro subita, akuta, anima vivo, nome Charlotte Dusan, la unuaranga artistino, importita el Francio, kiu vekis tiel grandan artistan interesiĝon en iu eleganta amuzejo de Brodway per sia prezentita agonio, kies titolo estis Mortodanco, ke la ĉampan-konsumo de la distrejo altiĝis minumume tridek procentojn.

Sinjoro Theo naskiĝis, kiel la filo de la ĝenerala direktoro de la Trusto Pacifika Oceano, kaj li klarigis ĝin tiel, ke sufiĉas por lia taga agado, se li fiksas kiel celon de sia vivo, forigi la enuon. Komence nur la forigo de la enuo konduzkis lin al Charlotte Dusan, sed poste liaj sentoj transiris al tute seriozaj kaj pasiaj nokto-diboĉadoj, rilate la artistinon.

– Charlotte! Mi edzinigos vin! – diris la milionulo iun tagon.

Sed la artistino refutinte la facile imageblan respondon, ŝi ekparolis jene:

– Kion komenci kun homo, kiu estas nur milionulo? Ĉu vi pesas tion, ke ĝi estas ĉio?

– Jes – respondis la junulo sincere, ĉar li vere pensis tion.

– Vi eraras! Oni ne diru pri mia edzo, ke li estas monsako. Li havu aŭtoritaton kaj pozicion! Li laboru ion!

– Mi ne povas fari tion – respondis sinjoro Theo. – Kiu havas monon, tiu ne ĝenu alies profesion per laboro..

– Tiam vi tute ne sonĝu pri mi!

Sed la amo de la junulo ne konis malhelpon. Li serĉis ian mezvojon, por ke li havu aŭtoritaton, kaj nek labori estu necesa.

– Sinjoro Theo – demandis sian sekretarion informiĝante iun malgajan vesperon, – kion fari, se iu ne volas labori, li tamen ŝatus motivi certagrade sian konstantan ĉeeston en la mondo?

La sekretario frotis sian firmkarekteran, faltan vizaĝon. Emanuel Thorn estis sekstatura, magra homo, kun flegma kaj dormema voĉo.

– Ekzemple – li proponis aplombe, – fondu societon kun tiu titolo: “Labori ne estas honte, Sed enue!” La societo disvastigus sian programon tage-nokte: Neniu laboru, kies laboro ne estas bezonata, aŭ li devas perlabori la monon ne pro sia vivteno. Se ĝi realiĝos, tiel la mondo komencu evolui rapidege, sekvus beno por la homaro, oni mencius vian nomon kun tiu de Galileo, kiu same laboris nenion laŭ mi, ĉar li povis observi nur pro sia enuo, ke la Tero rondiras.

– Stop! Vi tamen estas la plej utila homo en mia servo! Kiel ajn idiotaĵon vi diras, ia utiligebla ideo venis en mian kapon.

– Jes… – Li kapbalancis, kaj li fermis siajn dormemajn palpebrojn kontente kun mankohavaj, maldensaj, skarlataj okulharoj. – Gravas, ke oni iel fariĝu nemalhavebla. Rezulto estas la valoro de la laboro, ĉar nek la plej valora laboro estas alibio, kaj ĝi ne pravigas la senrezulton. Mi opinias, ke mia diro estis tre bona.

– Ankaŭ min surprizas tio. Eblas, ke vi malvarmumis ie. Mia ideo ĉiuokaze estas unuaranga! Mi fariĝos mondfama. La sola maniero, ke iu vivu bone sen laboro, kaj oni ne kritiku

lin. Neniu esploris, ĉu Edison laboras, kiaj li ne estis inventinta la inkandeskan lampon, la gramofonon kaj aliajn tiaĵojn. Aŭ kiu zorgis pri tio, ĉu Darwin agadas konstante, kiam li opiniis, ke ni havas parencecon kun la simioj laŭ ascenda branĉo? Morgaŭ publikigu anoncon en la ĵurnaloj.

Ĝi ne plaĉis al la sekretario.

– Mi ĉiam luktis kontraŭ tio, ke ĝentlemano rolu antaŭ la vasta publiko. Sed vi estas obstina hoo. Mi do rezignas la lukton kaj aranĝos la aperigon de la anonco.

Ĝi okazis tiel. Sed post la senfrukta rezulto de la stultaj respondleteroj sinjoro Theo decidis kontaktiĝi kun tiu severa patro, kiu jam multe pli longe alproprigis la opinion de Charlotte Dusan, rilate la gravecon de la laboro. La junulo estis preta cedi la multajn persvadojn kaj dungiĝos al la firmao.

– Sinjoro Thorn! Kunligu min kun “Pacicoci”!

Ankaŭ tio karakterizis la individuon de sinjoro Theo, ke la seriozan, grandegan Truston Pacifika Oceano, laŭ lia naturo li nomis mallonge “Pacioci”, kiel oni allogas poniojn per abomenindaj ŝmacadoj.

Li ekfumis cigaron malbonhumore, ĉar montriĝis la antaŭsignoj de la futuro, rilate la malfacilan laboron, kiam li vivos same, kiel nun, sed oni rajte povos riproĉi li ĉiutage.

– La Pacioci, sinjoro Theo! – diris la sekretari kaj trandonis la telefonon.

La junulo laŭ sia kutima, nepripensita maniero vortmuelis en la aŭdilon:

– Mi deziras paroli kun mia paĉjo! Ĉi tie estas Theo!

La interna telefoncentralo miskomprenis lian nomon “Leo”, anstataŭ Theo, kaj oni konektis la pordiston, kiu havis dudek jaran filon sub tia nomo.

– Raspa voĉo kriis al sinjoro Theo:

– Nu atendu, kanajlo! Unu horon mi sidas ĉi tie sen pantalono!

– Kiel ĝi eblas?

– Tiel, ke mi ne havas la pantalonon ĉe mi! Ĉu vi volas, ke mi malvarmumu?!

– Dio gardu! – respondis la milionulo timeme, ĉar li ŝatis siajn homkunulojn.

– Mi jam havas nazkataron!

– Ĉu ne estas tie ia litkovrilo tie, per kiu vi povus kovri vin?

– Saĝulo! Mi ne povas estis en la antaŭhalo, portante litkovrilon!

– Tio certas.

– Se post kvin minutoj mi ankoraŭ sidis tie sen pantalono, tiam mi rompos vian kapon!

– Mi tuj aranĝos la aferon.

– Alo! Farigu subŝtofon sur la malsupran refaldajon, ĉar ĝi disfibriĝos, kiam estos kota vetero. Kaj la gladaĵo estu tia, kiel la eĝo de la razilo, ĉar vi memoros miaj batojn permanajn!

Kiam la pordisto, kiu havis dudek jaran filon, kies nomo estis Leo, frape demitis la aŭdilon, sinjoro Theo sonorigis, kaj

aperis la lakeo Sigorski.

– Tuj portu mian iun pantalonon al Pacioci – diris la milionulo, – sed ties gladado estu tia, kiel la eĝo de la razilo, ĉar la pordisto havos ĝin, kaj se li ne estos kontenta, tiel ni ricevos gravan korpan punon. Kudrigu subŝtofon sur ties refaldaĵo, ĉar ĝi disfibriĝos tiel. Diru al li, ke mi salutas lin, kaj se li bezonas ankaŭ la jakon, li nur telefonu.

Sigorski, la lakeo, iam tavivis fervojan katastrofon, kaj sekve de tio li fariĝis unuokula kaj idiota. Ĝenerale nur lia nefidindeco kaj neakurateco resti la malnova el lia sana periodo.

– Sinjoro Theo – li demandis per malrapida, nazvoĉo, kun levita kapo, – kial disfibriĝas la pantalono. Oni ja trafikas per aŭtomobilo nuntempe.

– Sed la pordisto de Pacioci ne havas aŭton… Vere!.. Nek tio estas en ordo! Eniru kun la pantalono al la firmao de la familio Chrysler, kaj aĉetu sportaŭton por la kompatindulo.

Sinjoro Baruch T. Livingstone, la pordisto tre surpriziĝis, kiam la unuokula kaj idiota Sigorski paŝis en lian niĉon kun pantalono kaj kun kontrakto, pruvanta la aĉeton de la ses-cilindra sportaŭto Chrysler. La kolera patro dume akceptis la konsilon de sinjoro Theo, kaj li sidis ĉe la fenestro, ĉirkaŭvindinte sin per la litkovrilo, en la mano kun la okaza tabuleto de la prezidenta ĉambro NI PETAS SILENTON PRO INTERKONSILIĜO! por ke li batu forte je la kapo sian filon, nomatan Leo, kiam li kvankam malfruiĝinte, tamen kunportas la deziratan vestaĵpecon. Li eĉ imagon ne havis pri tio, ke tiu danĝero ne minacas lin, ĉar lia filo tagmeze dungiĝis matroso, li disipis drinkante la prezon de la plombo, kaj li duonhoron estas survoje kun la pantalono al Havajo, kie la noktoj estas bonodoraj, la virinoj havas fajrajn

okulojn, krome sonas la gitaro, se oni povas kredi ankoraŭ al la tago-tekstverkistoj, kio estas sufiĉe duba.

– Mia mastro mesaĝas – raportis Sigorski, – ke nun jam ne disfibriĝos via pantalono, ĉar li aĉetis pro vi kvin-litran aŭton.

La pordisto miregis, se tiu vorto sufiĉe bone esprimas la eksterordinaran, konsternitan staton inter la miro kaj la sveno.

– Kiu… vi estas? – li balbutaĉis.

Rolando Sigorski. Antaŭ nelonge vi parolis kun mia mastro pri la afero de pantalono.

– Mi ne havas la feliĉon… Eble bonvolu diri pli proksiman, kiu vi estas…?

– Bone. – Li kapjesis malvarme kaj jam recitis: – Mi naskiĝis en Odesa, mi havas pli ol kardek du jarojn, kaj mi venis en Usonon, kiel la iama ĉefĉevalisto de la emerita, greka staciestro Papagalos. Jen estas via pantalono. Prenu ĝin sinjoro.

– Pardonon, sed ĉi tie estas eraro… – li miregis. – Mi neniam parolis kun sinjoro ĉefstaciestro…

– Li ne pretis tion, kiel ofendon. Almenaŭ li ne menciis tion al mi. La oldulo estis malparolema homo. Jen estas ankaŭ la kontrakro. La glado de la pantalono estas speciale akra.

– Ĉu vi certas pri tio, ke vi ne eraras?

– Mi mem gladis ĝin. Sed se vi deziras, mi ankoraŭfoje glados ĝin, ĉar mia mastro ŝatus eviti viajn antaŭvidigitajn insultojn. Prenu ĝin, sinjoro!

La pordisto staris vertiĝante. Sigorski ankorŭ diris al li, kian telefonnumeron li voku, se le bezonus ankaŭ jakon, kaj li foriris.

Baruch T. Livingstone staris buŝmalferme tie, en iu mano kun la patalono, en la alia la kontrakto, sur liaj piedoj la falinta litkovrilo, kaj li aspektis tiel en la aperaĵsimila, sed modere ornama pozo, kiel la verko de ia eksterordinare moderna pentristo.

Sed tiam aperis dika homo, la ĉefo de la personaro.

– Mi prezentas al vi la novan pordiston, Livingstone – li diris gemute por ne inciti la malsanulon. – Vi forgesas pri tio, ke iu devas stari ankaŭ antaŭ la banko. Vi povas transpreni tuj vian salajron.

– Mi ne povas tuj transpreni ĝin. Nur duavice.

Unuavice li surprenis la pantalonon. La pantalono konsciante sian fizikan veron leĝere kaj unuanime disŝiriĝis.

Sinjoro Theo forgesis pri tio, ke la pordisto pro sia sida laboro estis fortika viro. Tiel do

Baruch T. Livingstone povis fari nenion alian, li ĉirkaŭvindis sian trunkon per la litkovrilo, kaj la nova prdisto rigardis lin mire, kiam lia antaŭulo sidas en grandegan aŭton, starantan antaŭ la konstruaĵo, kaj li forveturegas.

– Vidu, Marved – diris la direktoro de la personaro, – diligentaj homoj tiel disiĝas de la entrepreno post kelkaj jaroj.

La nova pordisto ne povis, kiel kompreni tion. Ĉu sen pantalono aŭ per aŭto? Aŭ cerbmalsane?

Sed tio jam ne apartenas al la temo de nia romano. La epizodo havas nur tian signifon, se la pantalono ne aperas en la logika vico de la okazaĵoj, tiam sinjoro Theo informus sian patron pri sia intenco, kaj kiel karaktera homo, li retirus ĝin neniam plu. Sed tiel li prokrastis la erare konektitan interparoladon kaj iris en sian dormoĉambron por kiŝiĝi iomete.

Sed per tio li jam ekiris per raketorapideco de sia vivo, neretireble kaj difinitive sur vojo plena de zigzagaj kurbiĝoj, inter konsternaj aventuroj kaj frenezaĵoj.

Li decidis iri dormi je la 10-a kaj 45 minutoj, kaj je la 11-a kaj 20 minutoj li jam matenmanĝis bonguste kun tiu delonge polviĝanta mortinto, kiu fariĝis kaŭzanto de ĉiu malbono.

## D U A Ĉ A P I T R O

Hazarde li renkontis la mortinton en sia dormoĉambro, el tiu okazo, ke li ekatentis pri la ronkadon de la forpasinta sinjoro, kaj rigardinte sub la liton, li vidis la karmemorulon ripozi en paco, profundiĝinte en stertoran dormon.

– Alo, Kio ĝi estas?… Tuj elvenu el sub la lito!

La kadavro eklevis sian ŝultron, kvazaŭ li ne ŝatus, ke oni troigas ĉiun bagatelon tel, kaj li murmuris kun moka trankviligo:

– Mi petas, mi petas… Kial vi estas tiel ekscitita?…

Li elgrinpis, sed dume per siaj aperintaj ŝultroj reversis lampon kun malhelruĝa kloŝo, poste li malfermis la fenetron, li etendis sian dekstran mandorson super la straton, kvazaŭ preterkure li benus la piedirantojn, poste li acerbe ekparolis jene:

– Pluvas… Interese, ke en San-Francisko puvas ĉiun verndredon. Ĝi povas esti pro la fabrikoj. Kioma horo estas?

La ruĝa milionulo tuj eksidis en fotelon por ĝui tiun historion en plena komforto kun sia plej larĝa rikano. Li kolektis tiajn homojn. Li sentis tiel, ke tiom da idiotaĵo okazas ĉiutaga en tiu ĉi mondo, kaj tre malofte doniĝas eĉ unu, kiu estus amuza, ke ni devas esti dankema pro tiaĵo.

– Kiu vi estas?

– Egon Small, negocisto pri polvosuĉiloj kaj fervojbiletoj. Krome mi jam mortis plurajn jarojn, kio cetere ne ekskludas tion, ke vi donu al mi cigaredon.

– Mi ne havas cigaredon. Ĉu vi deziras cigaron?

– Ne. Alportigu cigaredon. Ne estas kutime doni al la gasto ion ultimanece.

– Sed ĉu vi pardonas tion, ke mi kuraĝis veni en vian dormoĉambron?

– Mi ne prenas tion, kiel ofendon, sed kio estis tiel urĝe al vi, ke vi veku min? Ni vivas ne en tiaj tempoj, ke inteligentulon kiun ajn veku, kiam la koncernulo dormas… Ĉu vi havas brandon?

– En la domo mi havas ruĝan vinon Oporto.

– Estas karakterize… – li murmuris kun amara, subtaksa mokemo. – Milionulo… Nnu! – Li ne finis tion, kaj mansvingis, kvazaŭ la ĝentileco malhelpus lin por esprimis sian malestiman opinion. Li levis parfumujon de sur la tablo kaj aspergis sian vizaĝon.

– Mi tuj alportigos brandon – kriis sinjoro Theo entuziasme. – Kaj ankaŭ cigaredojn! Ekde nun vi estas mia amiko!

– Hm… Ĉu vi permesas, ke tiuokaze mi ŝatus ekkoni viajn familiajn cirkonstancojn? – Kaj kun oficiala severo, kvazaŭ li estus rekte el la tombo reviviĝinta registrilo, li demandis akuze: – Kiel nomiĝis via patro?

– Walter Linkoln.

– Ĉu li havas ian komunan al la mortinta Abrahamo?

– Tion, ke ni ĉiuj venos ripozi sur lia brusto.

– Mi pensi pri la fama ŝtatestro, kiun iu mortpafis aŭ mortpikis en la loĝio de teatro.

– Ni estas senkulpaj! Miaj prauloj ne nur ne la prezidanton, sed nek la prezon de la enirbileto mortpikis, en neniu teatro, ĉar ili ne ŝatis tiun amuziĝon.

– Bela familio ĝi estas – li grumblis kaj gustumis pudigsimilan ion, sed li elkraĉis tion, ĉar ĝi pruviĝis harŝmiraĵo. – Mi manĝus volonte ion malvarman kolbasaĵon, sed mi atentigas vin, se vi respondos tion, ke vi havas nur varman, porkan kotleton en la domo, senhezite mi tuj insultos vin.

– Kial vi pensas, ke mi havas la devon dorloti vin?

– Ĉar mi legis ankaŭ tion en la anonco, ke vi havas tre multe da mono. Cetere mi komencas dubi tion, ĉar vi konstente promesas aĉeti alkoholaĵojn kaj tabakaĵojn, ke poste vi vole forgesu tiujn.

Kaj li malaperis en la ŝranko ĝistrunke.

– Ĉu vi ne venus kun mi ien por tagmanĝi? – demandis sinjoro Theo ĉiam pli gaje. – Kiam vi matenmanĝis?

– Ne pli ol du tagojn.

– La ĉemizoj estas du bretojn malpli supre…

– Mi povas akoraŭ kliniĝadi… – li murmuris pli kaj pli nervoze, kiam li elektadis inter la ĉemizoj de la milionuloj, kaj ĉiujn superfluajn piĵamojn li simple ĵetis sur la plankon. – Vi havas nur misgustajn havaĵojn. Kiel vi povas porti ruĝan kravaton?

– Ĉu vi vizitis min nur tial, ke vi parolu kun mi pri la sinjora modo?

– Mi legis vian anoncon. Mi pensis antaŭi ĉiun, se mi alvenos persone anstataŭ letero, krome ĝi estas ekonomia, ĉar mi ne devas afranki min per kontanta mono.

Li ĉirkaŭligis sian pantalonon per konvena rimenzono, la ceterajn ĵetis sur la plankon kaj reglatigis siajn hirtajn, blankajn harojn.

– Nu, ĉu vi venos aŭ ne? – li demandis malpacience.

– Se vi volas antaŭi ĉiun – demandis sinjoro Theo en la aŭto, – vi certe havas unuarangan ideon.

– Kompreneble. Vi estos la dua Stanley?! Nu?!

– Vi malesperigas min. Nek pri la unua mi aŭdis.

– La sindeteno de viaj prauloj de la teatra arto perfektiĝis tiel, ke vi ne povas legi, kaj tial vi estas neklera.

– Se vi daŭrigos tiel, eblas, ke mi batos vin post la manĝado.

– Nek tio estos antaŭ mi pruvaĵo de via klereco. Tiom pri Stanley: li serĉis Livingson-on per admirinda plenumaĵo, la grandan esploriston, kiu malaperis ĉe la regiono de Kongo.

– Tamen mi memoras la kazon. Daŭrigu!

– Ankaŭ vi povas trovi malaperintan, faman scienculon. Ĝuste antaŭ du jaroj la mond-gazetaro publikiigis, ke la fama esploristo de la insularo de Pacifika oceano, Gustavo Bahr, la membro de la Angla Reĝa Geografia Societo, ktp. Lastfoje oni menciis lian nomon sur manĝokarto de kanibala tribo kun ia acideta garnaĵo, de tiam lia malaperis.

– Mi pensas, ke mi sekvas bonan spuron, laŭ la menukarto…

– Ne daŭrigu! – mansigne silentigis lin Egon Small. – Vi forgesas, ke en malmultekostaj restoracioj oni ofte skribas nomon de eminantaj pladoj sur la menukarton, kvankam ili ne kuiris tiun grandsinjoran en tubo bakitan aĵon kun paneroj, frititaj en butero.

– Ĉu laŭ via opinio Gustavo Bahr vivas, ĉar efektive oni ne pladis lin bakitan en tubo kun paneroj, trititaj en butero?

– Nek tio estas verŝajna, ke oni estus pladintaj lin rostite kun kukurb-salato aŭ gratenite per paneroj, kun ĉi-jara terpomoj, fritite en sia propra graso kaj kun verda petroselo – respondis la mortinta, kaj li rigardis en la malproksimon kun staranga, dormema, milda riteto, dume li glutegis. – Ĉar neniu el la kuirejaj receptoj estas tia, ke li povintus resti vivanta. Kvankam li vivas. Sur la insulo Tsiui. Antaŭ la Kabo Farrere. Norde de la Fiĝioj. Tie ankaŭ vi povas trovi lin.

– Tio interesas min – respondis Theo vigle. – Ĉu vi estas certa pri tio, ke Gustavo Bahr troviĝas sur la insulo Tsiui?

– Kial mi ne estus certa pri tio? Gustavo Bahr tute ne troviĝas sur kiu ajn insulo.

– Kie do mi trovos lin?

– Ĉi tie, en San Franciko!

– Kiel?!

– Imagu, ke Stanley kiom da peno povintus ŝpari, se Livingsone estas kun li jam dum la ekveturo, kiel manpakaĵo, inter la aĵoj de la karavano. Nekredeble, ke oni ankoraŭ ne uzis tiun simplan metodon. Vi estos la unua… Atentu la direktilradon!

Sinjoro Theo enpensiĝis. Se Gustavo Bhar vere vivas ĉi tie, tiel ili solvis la patentaĵon de la artefarita mondfamo, liveritan hejmen.

– Kaj kie estas ĉi-momente Gustavo Bahr?

– Ĉu nun?… – Li pensadis. – Kiu tago estas hodiaŭ?

– Vendredo.

– Nu en ordo. Gustavo Bahr sidas apud vi en la aŭto, li estas malsata kaj enuas… He! Vi surveturos la trotuaron…

## T R I A Ĉ A P I T R O

– Vidu, sinjoro – diris Mr. Theo, kiam ili fine sidis ĉe primetita tablo kaj atendis la kelneron. – Vi grimpis sub mian liton: mi diris nenion, vi diris malĝentilaĵojn al mi: mi englutis tion, vi serĉadis en mia ŝranko: mi rezignis tion, vi dubis pri mia honesto, sed tiel, kvazaŭ ĝi estus granda honoro por mi: mi lasis tion. En ordo! Sed nun mi avertas vin je la sekvaj aferoj: Mi donas mian honorvorton, ke mi deprenos mian ĉemizon de sur vi, mi ne pagos vian matenmanĝon, kaj mi portos vin al la policejo pro rompoŝtelo, se vi ne respondos tiun nekredeblan kaj enigman insolecon: kial vi demandis: "kiu tago estas hodiaŭ?" antaŭ ol vi estus dirinta, ke via nomo estas Gustavo Bahr? Kion vi dirintus, se hodiaŭ estus vendredo aŭ mardo?! Bone pripensu, sinjoro, vian respondon, ĉar okaze de nesufiĉa respondo, mi senhaŭtigos vian kapon, kiel la indianoj, vian skalpon mi fiksos al mia rimenzono, kiun vi portas ĉirkaŭ via trunko, kaj mi foriros.

La mortinto neŝanceliĝante akcepti la emocieruptiĝon

– Mi ne timas mian kaphaŭton – li diris trankvile. – Se mi estis iel rostita en tubo, mi povos vivi sen mia frizaĵo. Pro vi gastamo aŭdu mian informon. – Li fermis siajn okulojn por momento, kvazaŭ li farus resuman retrospekton al la objekto de sia direndo, poste li komencis mallaŭte: – Mi estas agento sub la nomo de Egon Small. Kontrau miaj akiritaj mendoj oni sendas mian tut-semajnan tantiemon merkrede al mia hejmo, ĉar mi vojaĝas la ceterajn tagojn de la semajno. La vera geografo neniam povas ĉesigi difinitive la vojaĝadon. Kaj mi povas diri, ke la vojlinioj, iritaj kun polvosuĉiloj estas fonto de interesaj malkovroj, surprizaj spertoj, kie mi ne malhavas la danĝeron, elprovadoj, kaj ofte mi renkontiĝis kun sovaĝuloj, aŭ kio estas malpli ofta: eĉ milduloj troviĝas en la kruela, malnova tribo de la aĉetatnoj. Se evidentiĝos,

ke mi estas Gustavo Bahr, tiel finiĝos mia serena, trankvila vivo. Kio okazos, se ni ne interkonsentos, kaj mi devas fuĝi de antaŭ via atendebla maldiskreteco? Jam nek ĉe mia firmao, nek en mia loĝejo mi povas iri plu. Do, se estas mardo aŭ sabato, kaj mia tantiemo ankoraŭ atendeblas, tiel mi pripensas eĉ dufoje, ĉu mi diru mian nomon al iu? Ĉar estas merkredo, kaj oni jam certe sendis la monon, mi povas prezentiĝi sen risko, kaj mi povas ankaŭ fuĝi, se necese. Se nun vi ne pardonpetos, tiel kompreneble estu malbenita sepfoje.

– Mi komprenas, ke vi pravas. Bonvulu pardoni min, kaj rakontu, kion vi pensas? Unue kompreneble konsumu vian hieraŭan matenmanĝon, kaj nur poste vi komencu tion.

– Prave. Poste mi komencos manĝi mian hodiaŭan matenmanĝon.

Ĝi okazis tiel. Li konsumis sian matenmanĝoj aktualan el la antaŭan tagon kaj la restintan el la hodiaŭa tago, eĉ, ĉar neniu scias, kio okazos morgaŭ, la manĝis ankaŭ la sekvonttagan matenmanĝon. Fininte tion, li fermis siajn okulojn, kiel grandaj magiistoj de la paganaj tempoj, kiam ili enprofundiĝas en si, antaŭ ol deklari sian aŭguron en la ĉeesto de la tribanoj.

– Mi komencis mian admirindan karieron per malpli gandaj, plie botanikaj, ol per malkovaraj vojaĝoj. Mia unua provado direktiĝis por malkovri la Sundan Poluson kun societo. Trovinte tiun lokon, mi revenis. Mi tute ne pensis pri longdistancaj ekspedicioj, sed tramo da itinero de la sorto sufiĉas al tio, se ĝi volas surtreti min. Ĝi estas malgaja stato de faktoj! Mi esploris la flaŭron de la insularo, veturante per mia malgranda ŝipo, kiam neatendita uragano kaptis nin antaŭ Manilo. La vivo de la mondvojaĝanta scienculo estas en la mano de Dio. Tiel okazis, ke mia fato plenumiĝis. Ĉe la

klifoj de Manilo dum tritaga pereiga tempesto… Mi edziĝis! Jes!.. Post la alveno mi devis ekiri por fari mian plej teruran ekspedicion: Dum faleganta pluvo en rikiŝo mi serĉis ĉambron en Manilo! Ni lasu la dramajn detalojn! Mi ne priskribas la unuarangajn hotelojn de la urbo, en kiuj laŭ la modelo de la tromultiĝinta loĝantaro de Japanio aŭ Koreio, vivantaj sur riveroj, ili jam povis proponi nur sian banĉambron, kie maltrankvila duŝtubo krutis kun Damokla ŝmacado super la kapo de la dormanto en la bankuvo. Mi povus paroli malpli kara, malpli plenŝtopitaj hoteloj, en kiuj, kiel la aŭtarkiaj nomando, vivantaj sur la stepoj de Azio, ĉiu kunporta sian kuŝejon kaj kontaĝan malsanon… sed ĝi ne estas grava fenomeno. Ni daŭrigu tie, kiam mi sidis lace en mia rikiso nokte je la unua horo, en pluvego, kiun la kulio, kun malsuprenpremita timono ekvilibris alte kaj krute super sia kapo, ĉar li tiel volis ŝirmi sin kontraŭ la pluvo, kaj kvankam mi minimume estus esperinta tion por ĝi, ke poste, li ferminte min kiel pluvombrelon, li starigos min ripozi en ties sekigilon. Sed tiam mi ankoraŭ estis juna kaj rezoluta, kiel mia kolego Kolumbo, pri kiu eble ankoraŭ vi legis. Li serĉis la hindan traveturejon kaj malkovris Amerikon pro nepardonebla eraro, ĉar tiu terpartego troviĝis inter du kontinentoj. Ne la pan-envio parolas el mi, kiam mi konstatas tion, sed mia principo estas, ke la rezulto ne povas savi mistrafon. Konsiderinte la kernon de la afero: mi havis nur unu elekton; tranokti iel. La rikiso veturigis min per rapida galopo en noktan amuzejon. Dum mia scienula kariero la unuan fojon mi estis inter la tiel nomata kvinahora popolaĉo, kunvenanta en lokaloj. La virinoj kun siaj bruaj braceletoj, pro la batal-koloroj de la abunda ŝminkado tute ĝis ilia cigaredoj memorigas la scienculon pri Egipto, de kie devenas, kiel estas konate, la modo de la lakitaj piedungoj, krome la Dek Plagoj. La unuan fojon mi atentis ilian dancadon, al kio ili uzas nek lancon, nek adzon pro ia nekomprenebla kaŭzo. Poste mi jam volis nenion alian, ol tiu certa Kolumbo, tiutempe: mi serĉis trairejon de la pergeto

ĝis la vestogardejo. Sed tiam inter mi kaj la pargeto venis renkonte al mi virino, kiel iama Amerika al mia bonŝanca kolego! Mia edzino malkovris min! Tiam ŝi estis ankoraŭ nekonata kaj enigma por mi, kiel la iama Aŭstralio, en ĝia epoko Terra Incognita, antaŭ ol kapitano Coock malkovris ĝin, kiel certe ankaŭ vi scias.

– Mi ne scias pri tio, sed se vi asertas, ke tiu policista oficiro malkaŝis ŝian sinjorinan moŝton, tiam ĝi certe estas tiel.

– Mi pensis Aŭstalion, sinjoro! Do sufiĉas tio, ke knabino staris antaŭ mi, svelta, kiel la Fajrolando, emigma, kiel la Irana Altebenejo, kaj tiel flirtema, ke tia al ĝi simila geografia nocio apenaŭ ekzistas.

– Mi ne bezonas, ke vi klarigu la flitemon de ŝia sinjorina moŝto per pitoreskaj vojaĝpriskriboj…

– Mi ne faros tion. Laŭ malnnovaj alkoholistoj geografo kun bona fizika stato ne povas trinki pli ol unu botelon da ĉampano. Escepte eble Marko Polo-n, kiu certagrade estis ĉarlatano, aŭ Cecil Rhodes-on, kiu plie kalkuliĝas diplomato. Tiel do estas kompreneble, se la pia ŝipo de mia vivo proksimiĝis kun malcerta ondado, al la milde ondanta balanciĝo, vindita en streĉan silkon, en kies fono latentis la fato. Ĉar tiu virino estis tia, kiel Afriko; abunde pitoreska, enigma, ekzotika, varmega… kaj ŝi povsciis kisi!..

– Pardonon, ke mi interrompis vin, sed mi ne estas sperta pri la geografio: kiel povscias Afriko kisi?

– Via malaltnivela ŝercado estas multel pli triviala, ol ke vi povus ofendi min per tio. Mi do daŭrigas trankvile. Mi konatiĝis tiun vesperon kun la koralrifo de mia kariero. Imagu rifon, en senmanika vesperfesta robo, kun mirindaj, bluaj okuloj, kaj ŝi estis tia…

– Mi scias: ŝi estis tia, kiel la Fajrolando, ŝi kisis sovaĝe, kiel Afriko, ŝi ondadis, kie la Irana Altebenejo, kaj ŝi brakumis, kiel Supra Mongolio. Daŭrigu plu!

– Via malgracia konduto nun ne ofendas min. Ni interkonatiĝis, kaj mi trinkis alian botelon da ĉampano, kiu eble nocus ankaŭ al Pizarro aŭ Cortez, kvankam ili unuavice estis konkerantoj. Ĉu ĝi estas vera aŭ ne?… nun jam neniu scias tion, sed oni asertas, kaj aŭdigante entuziasman henon, aŭrore mi mem kuris kun la rikiŝo de mia edzino ĝis la hotelo. Eĉ hodiaŭ mi ne komprenas, tamen dika, maljuna koloniulo descendis kontente kaj donis al mi kvindek cendojn. La musono firiozis ankoraŭ du tutajn tagojn, kaj mi pluajn ok jarojn, ĉar mi edzinigis tiun virinon ne pli ol dudek kvar horoj. Mi pensas, ke mi sukcesis komprenigi al vi, kia estas koralrifo. Kvankam mi esperas, ke vi sciis tion.

– Rilate la rifojn, mi sciis nur pri subakva ŝtipo.

– Egalas. Se vi volas, mi trafis en la mezon de koralrifo, se vi volas sur la rendon de pereo: gravas, ke ĝi estis rifo, enigma, submara praformacio… sed kiel ŝi povis kisi!

– Ne emfazu tion. Mi rimarkis, ke la koralrifo kisas tiel, kiel Afriko, ĝi estas svelta, kiel la Fajrolando, kaj ĝenerale, ŝia sinjorina moŝto estas filtrema, kiel la pli signifaj geografiaj nocioj. Nun mi ŝatus scii la kernon de la multe da parolo. Vi ne estas sufiĉe konciza.

– Mi respondas al vi, eĉ se mi estas konciza. Klare kaj simple, sen tio, ke mi perdus la fadenon de la parolo. Dum la keriero de geografo ĝenerale signifas decidan prosperon, kiam li edziĝas. Tiam okazas longa, grava, eble multjara vojaĝo, kiam nenia ĝangalo povas esti sufiĉe profunda, malluma, fora kaj danĝera. Rilate mian geedzecon, ĉi-konsidere ĝi estis ideala. Ĉar mia edzino pasie buŝharmonikas. Estimata

sinjoro! Mi aŭdis hurli la berber-leonon, serĉantan sian predon, kaj mi ĉeestis en Bombajo, kiam rabiiĝinta elefanto trumpetis per sia lasta elspiro. Tiuj voĉoj nun jam estas miaj intimaj memoroj, se mi pensas pri la buŝharmonikado de mia edzino. La harmonikado kaŭzis, ke mi decidis malkovri la ĝangalo de Amazono, kaj estas mirinde, ke eĉ hodiaŭ troviĝas tie nekonata regiono. Foje mi vojaĝis pro tiu harmonikado al la lago Rudolfo en Mez-Afriko. Alifoje mi ŝlosis min en la banĉambron kaj malfermis la akvokranojn… Fine sur la insulo Tsiui, antaŭ ol revojaĝi, mi sentis: sufiĉe! La glaso superpleniĝis! Kial iri hejmen el inter la kanibaloj? Mi povas resti ĉi tie en paco, trankvile. Okazis tiel. Mi dormis kaj vivis bonege. Kaj mi grasiĝis. To kaŭzis mian pereon. La kanibaloj komencis rigardadi min kun pudora rideto. Ili portis al mi donacojn kaj frandaĵojn. Mi konjektis, ke ili grasigas min por la festoj, kaj ili sendas invitilojn al siajn provincaj parencoj, apelaciante min. Iun antaŭtagmezon la tribestro diris, petante mian pardonon en ĝena embaraso, ke vespere ili preparos min por manĝi, kaj ili volonte plenumas mian lastan deziron: se mi volas lardite; se mi volas peklante ili surtabligos, sed se tio plaĉas al mi, trapikite, ili diris, ĉar la krueleco ne karakterizas la tribon. Ili ja sekrete ŝatintus la geografon lardite, nur pro komplezo ili proponis al li elekton. Tamen ili ne manĝis lin…

– Ne diru!

– Malmulto mankis al tio. Bonŝance ŝipo albordiĝis posttagmeze, kaj kelkaj matrosoj trovis ofenda tiun ideon, ke oni farĉu ilin budeno, al kolbasaĵo el diversaj viandoj. Unue okazis disputo, poste manbatado, kaj mi sukcesis fuĝi kun la buden-kandidatoj, sed mi kunportis de sur iu malnova menukarto la nomon de usona agento Egon Small. Mi estis tiu, kiu informis la vastan publikon, ke la kanibaloj formanĝis Gustavon Bahr-on el la vico de la vivuloj. Ĝi estas la historio.

Nun via estas la vico prepari la ekspedicion kun konvena propagando, kiu serĉos, trovos kaj reveturigos lin.

– Se la afero statas tiel, diru, kial vi iros hejmen denove? Ĉu ne estis bone ĉi tie en San- Francisko?

Li kapbalancis malgaje.

– Estis bonege… Sed tiu virino ne lasas min paca eĉ ĉi tie.

– Ĉu vi volas kredigi al mi, ke aŭdiĝas ĉi tien el Londono, kiam ŝia sinjorina moŝto buŝharmonikas?

– Ĉu vi scias, kio estas rehejmeniro?

– Jes. Kiam geografoj kun malboniĝinta animstato ne diskonigas sian morton, sed ili honeste hejmenveturas al sia familio.

– Mi ne diskutas. Gravas, ke mia edzino fariĝis spiritisto aŭdinte, ke mi mortis, kaj de tiam ŝi alvokas min dum ĉiu seanso el la transa mondo. Ĉu estas io en la spiritismo, aŭ ne, mi ne povas decidi tion. Ĝi certas: ĉiun nokton mi sonĝas tion, ke mi vekiĝas hejme en mia loĝejo, kaj mi estas kun mia edzino. Kaj ni harmonikas. Dum mia sonĝo ŝi instruis min pri tio. Mi do prefere iras hejmen, mi dormas en mia loĝejo, kaj mi sonĝas tion, ke mi vekiĝas en San-Francisko, ĉar mi sentas min bone ĉi tie. Bedaŭrinde, sinjoro, se virino volas molesti sian edzon, ŝi venkas eĉ la morton. Tio estas la instruo por mi. Trovu min koste de eraro, vagadoj kaj luktoj, laŭ ties malorda maniero.

– Kaj kiel decas vin trovi?

– Ĝi ne estas simpla. Vi devos prezenti la pruvaĵojn. La pragmatisto devas klarigi, la historion kun scienca fono. Se vi ne trovos min laŭ ĝia ordo kaj maniero, tiam oni priridos

kaj senmaskigos vin. Tiurilate mi ne signifas avantaĝon, se mi estas kaŝiĝinta sur via ŝipo.

– Kiel vi imagas la esploron?

– Mi enloĝiĝos al vi kaj kaŝiĝos en via loĝejo. Poste sekvos la gazetara kampanjo: kio okazis al Gustavo Bahr? Fine venos vi, kaj vi organizos ekspedicion. Ek! Zorgema efektivigo. Vi faros mezuradojn, komparante tiujn kun la indikoj, pridemandante la indiĝenojn, penterante en la internon de la insulo Tsiusi, kaj vi trovos min en la mezo de la sovaĝejo. Estus bone, se vi trejnus kun mi la grandan momenton el la vivhistorio de Stanley. Ekzemple oni suspektigis lin per trompo, kvankam estis mirinde, kion li faris. Ni devas agi per pli puraj manoj, ĉar temas pri trompo.

– Do, kiel okazis tiu seceno?

– Kiam Stanley ekvidis Livingstone-on, ekparolis jen: “Se mi ne eraras, vi estas sinjoro Livingstone!” Mi devas diri Gustavo Bahr-on en mia kazo. Mi etenłЀos mian manon, kaj mi respondos: “Jes…” Tiam vi ripetos la varmegajn vortojn de Stanley: “Mi dankas Dion, ke mi renkontis vin…”

– Ĝi estos tre bela – ĝemis sinjoro Theo. – Krome estos bezonata iu, kiu sufloros.

– Ĝi meritasĠla penon! Ni iros sur la ŝipon dum la ovacio de la indiĝenoj, inter la sparilo de viaj akompanantoj, kaj vi reveturigos la tute sovaĝiĝintan esploriston al lia edzino.

– Vi absolute ne aspektas sovaĝiĝinta.

– Nun ne. Sed rigardu min, kiam vi revenigos min al mia edzino.

Kaj jam pro la nura penso li vere aspektis multe pli sovaĝiĝinta.

## KVARA ĈAPITRO

Sufiĉis kelkaj, mallongaj novaĵetoj, kaj la mondo fabriĝis. Ĉu vere?! Kio okazis efektive al Gustvo Bhar? Estas bone, ke vi mencias tion… Nun malaperis valida homo el la inventaro, kaj neniu mencias tion, al neniu li mankas! Ĝi estas senekzempla!

La koro de la popolamaso ekbatis! Iu vivas mizere sur la malproksima oceano! En la najbara loĝejo blankhariĝas pianagordisto, kaj neniu zorgas pri li. Sed ĉiu kore bedaŭras esploriston, malaperintan sur insulo de la Pacifika oceano, sed ĉiun kolerigis la neglektemo de la respondaj faktoroj, kaj la plimulto de la civitanoj senti tiel, ke ili fariĝis parenco de la perdiĝinta, eminenta scienculo. La civitanoj ŝatas parenciĝi kun eminentaj homoj. Kompreneble estus ridinde diri tion, ke oni sendu kelkajn dolarojn por tiu scienculo al la malproksima, nekonata insulo.

– Kaj tio gravas. Ĉu vi komprenas?

Vi povus sendi dek dolarajon al la najbara pianagordisto, vi do trovos la manieron, kiel diskrediti tiun amasiĝantan mizeron! La vestaĵoj de la edzino, la cigaredado de la infanoj, la facilanimeco de la pianagordisto (antaŭ 26 jaroj li aĉetis kvarbrakan, arĝentan kandelabron por sia avino) estas la kaŭzoj de la problemo. Ni estu sinceraj: vi ne kuraĝas bedaŭri la pianagordiston, ĉar vi povas helpi lin per kelkaj aferoj. La homa kompato estas tute inversa, rilate ekskurson. Ju pli malproksime situas en spaco la objekto de la kompato, des pli rapide kaj komforte atingas lin la koro de la komprenemaj homkunuloj.

Kaj ili rapide parolas pri alia temo. Magranda tragedio, proksima malriĉeco, ĝi do estas ĝena. Tial trovas tiel grandan eĥon ĉiu granadega maljustaĵo. Grandegajn

maljustaĵojn oni ne povas helpi per etaj donacaĵoj, kaj ĝi pliigas la sekurec-senton de la bedaŭrantaj homoj. La publika afero estas ĉies ŝatata privata afero. Sed fine la problemon de homo, kies edzino aĉetas verdajn pizojn, kiam ĝia kilogramo kostas tiom kaj tiom da mono, oni ne eblas pufigi ĝin publika afero. Kaj se ni jam temas pri tio, kial portas ŝia filino konstante novajn, silkajn ŝtrumpojn? Kial ŝi ne kolektas tiun monon?… Vidu, tiaj homoj, kiel Gustavo Bahr, fumas kvin cendajn cigarojn… Mia bofratino diris, kiu konas bone kelkajn famajn scienculojn, ĉar li havas libropruntejon. Tiajn homojn, kiel Antono la Agordisto kaj lia familion, oni ne povas helpi… Ĉu vi vidis, ke la malgranda knabo portas ŝiriĝintajn ŝtrumpojn? Jen tio!.. Ĉiu povas esti malriĉa, sed estu permesate, oni tamen ne devas iradi ĉifone! Oni ne devas fariĝi tio! Mia kuzo ofte estas kun ministrejaj homoj, ĉar li vizitas altrangan societon, kaj li diras, ke Gustavo Bahr ĉiam estis bonorda kaj pura, kvazaŭ li nun elvenus el skatolo. Dio mia, ni nur trovu la kompatindulon! Ĉu vi scias, ke mi kaj mia edzon ne dormis dum la tuta nokto?!

Kaj oni bedaŭras lin, kaj eble oni kolektos monon por li, se li troviĝos, oni suspektigos lin kaj klaĉados pri li.

– Sed momente Gustavo Bahr povas esti konstanta temo de la ĵurnaloj. La ĉefredaktoro ĵus rapidis vespermanĝi, kaj Guss, la politika rubrikestro baras lian vojo ekscitite! Unu kaj duono da kolumnoj estas malplena, kaj tuj estos redaktofino!

– Mi ne komprenas vin, Guss! – diris la ĉefredaktoro. – Skribu unu kaj duonon da kolumnoj pri tiu sinjora moŝto, kiu malapeis ĉe la kanibaloj!.. Terure, ke tiel mondfaman pentroartiston… nu esploriston! Kiu zorgas pri li!.. Do, ĝi estas majesta afero de la homaro, kaj kial ni ne ricevas informojn pri li?… Liaj malesperiĝintaj infanoj ploras pro li… Vi, senpova ulaĉo! Skribu, ke la infanoj de lia frato ploras, aŭ

la infanoj de la najbaro, sed la infana ploro estas benonata, ĉar ĝi valoras nenion sen tio! Aŭ komencu la artikolon jene: “Gaston Bohrer! Ĉu ekzistas iu, kiu ne konas tiun nomon?!”… Ĉu vi ne nomiĝas tiel?… Vi jam tro sufiĉas al mi, Guss! La unuan de la sekva monato vi povas foriri! Vi scias nenion, kaj vi ĉiam nur saĝumadas!

Nu poste sekvas la beletristoj. Ili estas malicmaj, facile meditemaj kaj paraleligas. Ĉiam kaj kun ĉio! Ekzemple la publicista ĉefverko “Marĝene de kakaoskandalo” tekstas jene:

“La scienculo mortas en la regno de kakao, kaj la advokato, kiu elspezas dek milojn da mono por virinoj, li koruptas kakaofakulon… Iu mortas, la alia ankoraŭ vivas, pro la kakao. Kiel stranga bildo ĝi estas: Karaktero de du homoj, kaj inter ili estas la kakao, tiu simpla produktaĵo, kion ĉiu kuiras por si laŭ propra maniero. Iu por la homoj, la alia por la virinoj. De gustibus non est disputandum…”

(-blg-)

La alia meditas pri la kazo de ekzekutita, revolvera bankrabisto.

“La scienculo portas sian kolon al la kanibaloj, kaj la rabisto portis lian kanibalan koron al la civilizacio… Iu malaperis, sed la koro batadis en li por la kulturo! La alia estas cinika, li iras en la mano kun cigaredo al la ekzekuto. Ankaŭ ĉi tiu estas koro, ankaŭ tiu estas koro. Konsideru fine la faktorojn: Eppur si muove! Tamen ni devus serĉesplori tion!” (Justinianus.)

La eseisto de la Scienca Instituto moke pledis en la dimanĉa suplamento: “Ĉu oni ne povas fari defendon kontraŭ la disvastiĝanta kolportaĵ-literaturo? Oni eldonu por la vastaj popoltavoloj malmultekoste la verkojn de Gustavo Bahr,

aventurplenajn por ĉiu: “Sekstanto tra la imaginaroj de la lumjaroj kaj sektoroj laŭ la rilatoj de la kosma sistemo kaj oceanobiologio, en la diferenciala integralsistemo.” Ĝi adiaŭas al la vivo de ĉiuspecaj kaŭboj- kaj aventur-romanoj! Kaj ĝi havus utilan popoledukan afikon.”

L pli altan gradon de la populareco signifas, kiam la mondfama verkisto komencas skribi biografian romanon, kaj jam estas pli granda paŝo al la populareco la menukarto:

Marinita ŝafidkapo kun kreno laŭ la maniero de Gustavo Bahr.

Sed la vera, la nepagebla, la plenumiĝinta populareco estas: Ŝlagro! La unua fokstrota ŝlagro!

Ĝi estas la supro!

Venas la girloj!

“The twenty Gustav Bahr Melody Sisters In the Bask.”

Kaj ili kantas la konatan ŝlagron, en kiu bela indiĝena knabino ĉiam ĝemas jene:

Adiaŭ, eta Gustav’ Bahr,

Adiaŭ bela ĝangal-roman’

Disiĝi doloras!

Tamen ĝi devas!

Ĉar mi ne amas vin sen mustard’!”

Kaj sekvas danco.

Nu jen! Nun jam alvenis la tempo por Theo! Li atendis tion!

Kaj povas naskiĝis la mondsensacio sur la titolpaĝo de matena ĵurnalo:

L A  F I L O  D E  L A  D I R E K T O R O  D E  L A  T R U S T O  P A C I F I K A  O C E A N O, F A M E  K O N A T A  P R I  L A  S C I E N C A M O, D E C I D I S  T R O V I  G U S T A V O  B A H R – O N, L A L I V I N G S T O N E – O N  D E  Ĉ I  T I U  E P O K O!

La tuta mondo konsternite rigardas tiun heroan kaj majestan entreprenon, plenan de danĝeroj. – (La plej bona estas la mildaodora razkremo “Brazol”! Pudro Brazol! Silkaj ŝtrumpoj Brazol) -

En la radio oni faras prelegon pri la celoj de la fama esploristo, pri la insulro, pri la modernaj instrumentoj, pri la oceanŝipoj, pri la duonsovaĝaj panteroj kaj ĝenerale pri la financaj institucioj. Je la 4-a horo kaj 30 minutoj ni dissendas gramofon-muzikon. – (Manĝu ĉiumatene grajnoj Pauker. Ĝi estas aĉetebla ankaŭ en dek dekagramaj paketoj!) -

Sur la sablo de la strando kuŝas malplenaj boteloj, kaj ties etikedo anoncas:

S U N U M O L E O  G U S T A V O  B A H R!

Kaj la megafonoj disaŭdigas laŭte la kanibal-fokstroton.

Jen estas la homo!

Tiel fariĝas el malaperinta vojaĝisto moda fokstroto, kaj el lia nomo sunumoleo-reklamo, en la polvo de la strando.

Jen sablo!

Nu sed, ĝis la ekspedico atingos ekvojaĝi! Ke ĝi ne havu alian taskon, ol penetri en la nekonatan lokon, venki la

mortajn danĝerojn, vagadi en tempesto, frosto, varmego. Tiuj estas nuraj infanaĵoj, rilate la prepariĝon! La maljunaj polusesplorantoj rakontas, se la eterna glacio ŝajnis neeltenebla, la konstanta nokto, la frostoŝvelaĵoj kaj aliaj nemalhaveblaj suferegoj, iu rememoris la prepariĝon de la ekveturo, kaj tiam ili estas iom trankvilaj, ĉar ili sentis tiel, ke ilia sorto relative tamen estas nun pli eltenebla.

Koncerne la planon de sinjoro Theo unuavice la elekto de la malmultenombraj, unuarangaj fakuloj ŝajnis problema. Pro tio estis superflue maltrankvili. Aŭdinte la unuan informon, lia patro telefonis, ke li submetas la nevon de sia amiko al lia atento.

– Ĉu li jam partoprenis ekspecidion?

– Ne. Ĝuste tial li ŝatus kunveturi. Vi certe utiligos lin.

– Kio estas lia profesio?

– Li estas unuaranga art-oraĵisto. Tiulon vi ĉiam povas utiligi. Pasintjare li gajnis premion en Ĉikago per orumita vizitkartujo. Vi ne havos multe da problemo pri li, vi nur devas zorge trakti lin, ĉar li estas melankolia.

La ĉefredaktoro de la plej granda ĵurnalo, kiu direktis la tutan gazetarkampanjon, nepre persistis ĉe tio, ke ili kunveturigu lian kuzon, kiu estas publike respektakta matĉjuĝisto, kaj oni ne povas scii, por kio li estos utila en la ekspecidio?

La ĉefredaktoro pravis. Vere neniu sciis, kiel utiligi tiun homon en la ekspedicio? Sekvan tagon telefonis la patro de lia iama fianĉino:

– Sinjoro Theo, mi petas bagatelon, kion vi ne rifuzos.

– Bonvolu diri.

– Ba, promesu la sekvajn: se vi trovos Gustavon Bahr, jen tio estu viaj unuaj vortoj al la granda scienculo: “Mi mesaĝas al la inteligenta homaro: Ĉie estas agrable, sed la plej bona estas la pneŭmatiko Horchman kaj kaĉuka tubo, tie same aĉeteblas unuaranga globlagro!”

– Tio estas absurdaĵo…

– Ĝi estas pruvita fakto! Iam provu tiun pneŭmatikon kaj tubon, samtie globlagron! Mi ne pensas, ke vi malakceptus tiun neniaĵon, post la okazintaj aferoj, ke Ellen tiel malofte rifuzis kion ajn de vi.

Ĉar sinjoro Theo rifuzis la peton, la patro de lia iama fianĉino ne plu salutis lin kaj divastigis malbelajn klaĉojn pri li. La domprizorgisto demandis modeste, ĉu li kunveturigus lian filon, kiun ankaŭ Dio kreis por ekspedicio. Li estas akvoduktmuntisto, sed li estas sperta iomete ankaŭ pri la rafinado de verniso. La domprizorgisto efektivigis, ke la akvoduktmuntisto iris kun ili.

Iom post iom disvastiĝis en la ĉirkaŭaĵo, ke la milionulo estas ŝtonkora, pozema, kaj li faras tiel grandan troan bruon el tiu ekspedicio, kvazaŭ li estus malkovrinta Kolumbon. Nu, kio okazos, se li kunveturigus la bopatron de la familia kuracisto? Li kantas tre bele, kaj anatomon oni ĉiam povas utiligi.

Oni parolis pri tiu anatomo kiel pri lerta, eta vojaĝnecesujo.

Sed la milionulo havis la plej multe da problono pri Gustavo Bahr. Jam estis preta la grandega, komfota ŝranko, en kiu ili kunportos la perdiĝintan scienculon, kaj Gustavo Bahr enloĝiĝis por alklimatiĝi, kiel la pontkonstruisto, kiun oni alkutimigas al la aerprem-diferenco en kasono super la akvo.

– Kiu direktas la ekspedicion?

– Kompreneble – respondis la fama scienculo, – la koncernulo ne povas esti kiu ajn. Vi devas trovi Gustavo Bahr-on!

– Kiun vi opinias la plej bona geografo?

– Ĉu vi ofende demandas tion?

– Mi komprenas tiel, ne konsiderante vin.

– Nu do… – Li enpensiĝis. – Bedaŭrinde mi ne konas similan al mi el la vivantoj. Antaŭlonge Magellan, Diaz, aŭ Schweinfurt… Sed nun, bedaŭrinde, ni devas kontentiĝi per tiu orgojla Nobel-premioto sinjoro Arturo Maxbell.

– Bonege! Mi aŭdis, ke li estas genia homo!

– Jes. Li pentras belege. Mi havis diskuton kun li, ni korespondis duon jaron. Ĉar la sorto savis min de la persona renkontiĝo. Sur la mapo, laŭ mi, du gradojn oriente erare signalis la insulon Tsiuit. Mi pruvis, ke ridinda stultaĵo ĝi estas, kion li faris.

– Ĉu vi ankoraŭ ne vidis unu la alian?

– Ne. Mi apenaŭ kredas, ke li havas agrablan aspekton.

– Atentu!

La scienculo malaperis rapide en la ŝranko.

Telegramo.

Je via silenta konsento, kiel vi akceptis mian leteron, mi informas vin, ke mi alvenos per la trajno vespere. Kvardek kvin jara emerita ekzekutisto, kiu sentas tiel, ke la vivo ankoraŭ konservas ion por li.

Sokrato Schwachta aŭ Knap (laŭ via plaĉo).”

Li disŝiris ĝin kolere. Li havis milionojn da laboro! Peticioj, petskribaĵoj, invitoj, gazetaro kaj Gustavo Bahr, kaj denove Gustavo Bahr, kiu de tago al tago konstatis konsternite, kiel nekredeble granda estas la diferenco inter la admirinda palaco de nabobo kaj lia ŝranko, elektita por lia restadejo.

Poste komenciĝis la densa serio de la surprizige groteskaj kaj seninterligaj, koŝmaraj eventoj. La virino komencis tion: Charlotte Dusan, kiu en alia pluludo dancis la fajran fin-konvulsion, kies titolo estis Mortodanco.

Ŝi venis!

Ŝi venis, kiel furio, kun rozkoloraj, strangole kurbiĝantaj ungegoj, kun hirtaj, serpentumaj bukloj, en Meduza, kavadratita, printempa kostumo.

– Ĉu vi volas ridindigi min? Tuj nuligu la ekspedicion!

– Mi ja faras ĝin pro vi!

– Ne faru reklamon pro mi!

Sveno, kuracisto, ŝriko, sinjoro Theo sendas sandviĉojn al la raportistoj, atendantaj en la ŝtuparejo, la forkuregante Charlotte Dusan promesas sensacian senmaskigojn pro sinjoro Theo, kiuj taŭgos organizi bojkoton kontraŭ la populareco de la ekspedicio.

La tagmezaj ĵurnaloj publikis per kriegantaj literoj la novaĵon, ke la Trusto Pacifika Oceano disponigas sian plej belan, luksan ŝipon Stanley Up To Date al la ekspedicio. La homaro staris ravite antaŭ tiu grandega solidareco, sen politika kaj mondkoncepta en treuga dei kuntenas etuloj kaj granduloj, proksimuloj kaj malproksimuloj, eŭropanoj,

kolorhaŭtuloj kaj senkorolhaŭtuloj. Por unu perdiĝinta scienculo! Ĉi tie ne estas politiko, Wall Street kaj reklamo, ĝi estas krude mem la grandioza fakto: La homo por la homo! “Man for man!” – (Antaŭ enlitiĝo, dum vekiĝo kaj dormo estas la plej bona la matura okcident-hindia ŝafkazeo!)

Poste por dek dolaroj la buĉisto, portanta antaŭtukon kaj korbon, provis forlasi sian loĝejon tra la dense starantaj riportistoj. En la pordego li denove fariĝas sinjoro Theo. Je lia malbonŝanco. Grandega aŭto Chrysler haltas antaŭ la pordego, kaj en malhelruĝa jupo, dum laŭta ovacio de la homamaso garnd-liphara, nervoza maharaĝo descendas, eklevante sian pajloĉapelon.

– Estu kore salutata. Mia nomo estas Baruch T. Livingstone, la ekspordisto de la Trusto Pacifika Oceano.

Kaj li transdonis ŝiriĝintan pantalonon.

– Kion vi deziras? – demandis Theo, esperante, ke li vekiĝas.

– Mi eksciis vian nomon el la kontrakto. Vi atendigis min pere de telefono, kvankam mi ne estus atendinta mian filon, kiu forportis mian pantalonon! Oni maldungis pro tio, kaj… Infanoj, forportu vin, ĉar mi venigos policiston!

– Ne daŭrigu! Mi proponas al vi kvindek dolarojn.

– Neniam! Mia filo agitis mian cerbon. Mi sendis lin al la najbara artplombisto, kaj Dio scias, kial, li vojaĝis al malproksima indulo, kvankam en San-Francisko tre altnivele estas la tajlor-industrio. Mi komprenis lin. Ankaŭ mi ĉiam deziris surmariĝi, nur mia laboro retenis min. Mi estas libera! Mi vendos la aŭton, mi edzinigos al iu mian edzinon, kaj eble malfrue, sed ne malfruiĝinte, mi surmariĝos, kaj vi devas zorgi pri mi…

– Sinjoro, mia lasta propono estas cent dolaroj.

– Vi deziras trovi la spurojn de manĝita esploristo! Jen mi estas! Ekspedicio sen pordisto nun jam ne estas la vera! Se vi rifuzos mian peton, en la futuro mi portos plu tiun litkovrilon, kio estos intenca propagando kontraŭ vi!

– Cent kvindek! Se vi ne akceptos ĝin, mi batfaligos vin, kaj la homamaso frapiĝos super vi.

Li ne akceptis tion. Sinjoro Theo batfaligis lin, kaj la homamaso ĝiskalkulis la sterniton en deklamĥoro. La pordisto kuŝis ĝis la eldiro de la numero naŭ, sed jam ĉe la numero sep li povintus leviĝi.

Tiun tagon oni ankoraŭ dufoje batfaligis lin, kaj foje Sigorski elbatis lian denton per riportisto.

Sed ĉio estis vana.

La ĉefprogremero de la strato ripetiĝis plurfoje. Venis la aŭto Chrysler, kaj descendis la maharaĝo. La infanoj jam nomis lin "oĉjo dancistino" kaj ci-diris lin, eĉ ili donis bombonon al li. Oni devis fari ion, ĉar la situacio iĝis ĉiam pli skandala. Kiam je la naŭa horo vespere la pordisto aperis sur la vid-al-vida skafaldo en la alto de la ĉambro de sinjoro Theo, svingante litokovrilon en sia mano, la milionulo fleksis sin cedante. Li veturigos lin kun la ekspedicio, lia kajuto estos inter tiuj de la anatomo kaj la futbaljuĝisto, iom pli malproksime la oraĵisto, ĉar tiu estas melankolia, kaj li bezonas trankvilon.

Je la deka horo vespere eksplodis la paniko!

Alvenis telegramo, en kiu sinjorino Gustavo Bahr deklaras, ke ŝi volas altigi la solenecon de la ekspedicio kun sia

ĉeesto, ŝi volas vidi sian edzon vive aŭ deklaritan mortinta, ŝi alvenos per la plej baldaŭa ŝipo.

Gustavo Bahr diris, ke tiuokaze ili ne kalkulu lian partoprenon.

– La publika opinio ne toleras – argumentis Theo, – rifuzi vian vidvinon.

– Sinjoro! Eblas, ke vi pravas – respondis Gustavo Bahr, kiu nun jam tiel dirite restadis konstante ne la grandega, blua kasono, provizita per vestohokoj. Sed sur tiuj vestohokoj pendis viandaĵoj. – Sed se mi aŭdos la virinon buŝharmoniki, tiam via ekspedicio neniam trovos min, ĉar simple mi ne elvenos el la kajuto. Vi povas esti certa pri tio, ke neniu povas serĉi Livingstone-on en la vestoŝranko de Stanley.

– Kion fari?

– Ekveturu unu semajnon pli frue! Apelaciu la proksimiĝantan malsekan sezonon. Sed ĝi estus seka, apelaciu tion. Ĝi ests malnova, bona preteksto en mia metio.

Tiel do ĉiu ŝanĝiĝis subite: ekveturo unu semajnon pli frue. La karmemora edzo fuĝas de antaŭ sia edzino.

Kaj ili ankoraŭ ne havas unu utiligeblan homon.

Nu, tiam venis la utiligebla. Ĝi estis la vera mokincito!

Vasiĉ la unuokule blinda, rusa matroso alvenis vizite. Li estis tra magra, ege larĝ-makzela, hoknaza, ĵoke-aspekta homo kun flamruĝa hararo, sur lia mankanta unuokulo kun plastro. Sigorski malfermis la pordon, kaj tia brand-nabulo ondruliĝis en la antaŭĉambron, ke la idiota lakeo ekŝanceliĝis, kvazaŭ pikpuŝo estus trafinta lin.

– Kion vi deziras?

– Mi ŝatus paroli kun via mastro inter kvar okuloj.

– Vi deziras neeblon. Se li havas gaston, li sendas min el la ĉambro, kaj vi du havas resume nur tri okulojn, sed, se li venigos la sekretarion, tiam la saldo de la okuloj jam estos kvin.

La magra ruĝharulo singultis, kaj li forigis per milda gesto la ŝerceman lakeon, kiu tiam falis en la paravanon, elbatinte la dratretan mortermuron, li alvenis en la kuirejon. Poste Vasiĉ kolektis sian kuraĝon kaj malfermis la pordon de la salono dignoplene. Sed la pordo malfermiĝis eksteren. Kiel li povintus scii tion? Sed la du aloj tuj rompiĝis, kaj sinjoro Theo elkuregis kun revolvero el la dormoĉambro.

– Kion vi volas:

– Egalas. Ĝi nur ne estus dolĉa. Mi ne ŝatas la likvoron. Mi nomiĝas Vasiĉ, mi estis ferdekestro sur la balenŝipo Ebria Baleno, sed nun mi ne havas laboron. La kapitano, brutala bruto, elbatis mian unu okulon.

– Vi estas tre malforta al la marista vivo.

– Bedaŭrinde, ĝi estas vera… Precipe nun, pasiginte duonjarojn en prizono, ĉar la furiozema ulaĉo, ricevinte du vangofrapojn, mortis.

– Kion do vi deziras?

– Se vi havus cepon en la domo, mi tre dankus ĝin. Ĉar alvenis la tempo de la lunĉo.

Sinjoro Theo divenis, ke tiu ruĝhara homo malgraŭ lia erarige malbona easpekto, estas skulptita el tre malmola

ligno.

– Ĉu vi jam havas iun – demandis la unuokululo, – kiu estas sperta pri tia ekspedicio?

– Profesoro Maxbell, mi opinias, ke li entreprenas tion.

– Li estus unuaranga. Tamen estus bezonata iu, kiu estas sperta pri tia ekspedicio.

– Mi dungis bonegan kapitanon. Roberto Watson.

– Hm… Mi ankoraŭ ne aŭdis pri li. Tamen li povas estis bonega ŝipisto. Kvankam ĝi ne verŝajnas…

– Ĉu vi povus proponi taŭgajn homoj?

– Mi ja povus. Jen estas ekzemple hazarde Jimmy la Ĝisorela en San-Francisko…

– Kiu?

– La ruĝharulo ridetis erarige, kaj li volis apogiĝi senĝene al la muro per sia manplato, sed li deŝiris la kurtenon de la fenestro, kaj ĝi falis kune kun la kuprostango sur unu kaj duon metron altan, japanan vazon.

– Diablo vidis tian loĝejon, similan al infanludo… – li murmuris malbonhumore surper la ruinoj. – Nu vidu, mi ne sicas pri tiu Watson, sed oni konas Jimmy la Ĝisorelan de Kaburbo ĝis Honduraso, kaj tio tute ne estas grnda ĝojo por li.

– Ĉu li estas matroso?

– Jes. Krome reganto. Foje li anstataŭigis la reĝon de la Insularo Feliĉo sur la trono, dum la reganto vivis monduman vivon. Krimulmondan vivon.

– Damne!.. Vi ŝercas! Ĉu li vere estas tia matroso, kiu direktis regnon?

– Jimmy la Ĝisorela foje kun mi direktis la skunon “Ekveturo”! el javo ĝis Ŝanghajo. Estas pli facile direkti insularon, ĉar kiu sidas sur la trono, tiun ne sekvas kvindek financistoj per motorboato… Pardonon, sed mi laciĝĝis.

Li altiris malatan seĝon kaj eksidis, sed tiam evidentiĝis, ke ĝi estas tableto, kaj valoraj oraj kaj arĝentaj cigaredujopj disruliĝis el inter la ruinoj.

– He! Diablo vidis tiaĵon!.. Ĉu vi aranĝis la regnon de nanoj ĉi tie?

Sinjoro Theo, kvankam suferigis la multe da prepariĝo, li ridetis gemute. Jen!

– Mi dungos vin kiel ferdekestron, kaj vespere telefonu, kie vi povas prezenti al mi Jimmy la Ĝisorelan. Laŭeble ne ĉi tie, ĉar nun jam ni damaĝu tion, kio ankoraŭ restis el la meblaro… Efektive kion signifas, esti ferdekestro?

– Li estas tia sur la ŝipo, kiel ministro…

– Nu bone… – ridis sinjoro Theo. – Mi dungas vin, kiel senfaka ministro

Sed li eraris pri tio. En la ŝtuparejo evidentiĝis, ke Vasiĉ havas eĉ fakonm ĉar li eltiris grandegan, oran cigaredujon el sia poŝo kaj rigardadis ĝin, kiel spertulo pri arto…

La pordisto de Pacioci telefonvokis sinjoron Theo je la kvar kaj duono posttagmeze:

– Sinjoro, prokrastu la ekveturon. Ĵaŭde mi havas bileton por filmprezentado.

– Bone!

Li demetis la aŭdilon frapante, kaj tiam Sigorski raportis, ke ducent migraj birdoj atendas antaŭ la pordego. La ornitoligia instituto petis lin plenumi la sciencan mision, kaj li libere flugigu la birdoj laŭ difinita vicordo. Li ankoraŭ arde diskutis kun la akompanato de la sendaĵo, kiam la fileto de la dimprizorgisto ekkompatis la ducent migrajn birdojn, li malfermis la kaĝon, kaj ili ĉirkaŭaĵo pleniĝiis per grandega kriĉado, pepado, rompiĝis la ordo, ĉion kovris la flugbirdoj, kaj la polico blokis la straton.

Tiel statis la aferoj je la sesa horo posttagmeze, kiam venis la amatora matrosĥoro, portante torĉojn, kaj ili kantis longe.

L A  L E T E R O  D E  J I M M Y  L A  Ĝ I S O R E L A

A L  L A  R E Ĝ O  D E  L A  I N S U L A R O  F E L I Ĉ O,

A L  L A  A R K I D U K O  S T. A N T O N I O,

I.

Al nia

Altestimat reganto Sant Antonio la I-a

ALMIRA

Duonetaĝo, tronhalo

Kara mia Reĝa moŝto! Krome ŝia reĝina moŝto, kaj ame estimata, imperiestra avino de via reĝa moŝto, kiun mi amas samtiel, kiel mian propran patrinon, sed la kompatindulino jam de longe mortis, sed tio estas granda mensogo, ke nur pro la ĉagreno pro mi, kvankam mi povas fieri ankaŭ pri mia ade estimata patro.

Mi tre dankas vin, ĉar vi ne permesi enkarcerigi vian ekskolegon pro polica, skriba sciigo, kiu alvenis el Honkongo, kaj vi pagis kaŭcion por mi. De tiam mi rajtas forvojaĝi. Oni lasis min libera. Mi dankas tion al vi kun alta estimo.

Laŭ via interesiĝo, reĝa moŝto, mi havas la feliĉo skribi pli ofte kaj sincere, ĉar vi ŝatas tiujn. Mi do informas vin, ke mi ĝoje plenumos vian deziron. Ĉar via reĝa moŝto intervenis en la afero de mia liberigo ĉe la policejo, mia malnova konato, la inspektoro diris ĝentile:

– Nun ĉi-foje vi povas foriri, sed se vi estos arestita denove, vi sidos en la karcero, ĝis vi verdiĝos.

Li ĉiam promesas tion, sed mi neniam ci-diras lin, ĉar li estas maljuna detektivo. Poste mi iris en la havenon, ĉar mi ŝatas la marbordon, kvankam oni ĉiam interbatadas tie, kaj iu ĵetis la deponejestron tiel al lia fraĉjo, ke tiu falis en la kontoron de la rodpolicejo, kvankam dimanĉe la pordo estas fermita tie. Mi do tuj fuĝis. Tiel mi alvenis en la pitoreskan San-Franciskon, kiu estas grava urbo. Tie mi vizitis miajn malnovajn negocpartnerojn, kiuj ĉiu-somere aranĝas liberaeran loĝejon apud la fervoja taluso.

Ekprotektinte min, ni liveis la tabakaĵon el la doko en la urbon, kaj kuglo frotvundis nur mian brakon, sed oni pafis Pfeffer la Enŝteliĝintan je la pulmo. Sed ne ekzistas negoco sen risko. Kaj tio estas malbona, ĉar kiam ni plenumis la negocon, tuj komenciĝis la kubo-ludo. Nek mi sciis, ke unu plumb estas en mia kubo, kiu direktas ĝin. Ni ne estas en la kubo, kaj oni povas trompi nin, kiam ni aĉetas ĝin. Tial mi redonis la monon al neniu, sed ili ĉiam klarigadas, kaj la polico alvenis per du aŭtomobiloj, sed ankaŭ la fajroestingistoj, ĉar oni ne trafis min per la petrol-lampo, kiu

kaŭzis fajron. Vane, tiu popolaĉo povas nur diskuti. Kaj ankaŭ la ambulancistoj alvenis per du aŭtomobiloj.

Sed mi scias, ke mia griza, ĉiutaga vivo ne tro interesas vian reĝan moŝton. Sed okazis ekscita evento. Via reĝa moŝto certre memoras tion, kiam vi vagis tra la mondo en mia persono, kaj mi inkognite, kiel reĝo, regis anstataŭ vi, kio signifis mallongan benon sur la insularo Feliĉo. Vi memoras pri ni komuna amiko, pri Tendenulo la Fervora, kiu samtempe estas Trebiĉ la Vera, kaj li havis tiun feliĉon, ke li vendis vian reĝan moŝton sklavo por kvin dolaroj. Via reĝa moŝto fuĝis, kaj li devis redoni la monon. Nun Tendenulo la Fervora mesaĝas denove, ke via reĝa moŝto redonu tiujn kvin dolarojn, ĉar li havas nenion por pagi. Tendenulo la Fervora vivtenas sin per prospera velŝipo, kiu surgrundiĝis. Ĝi nun estas lia kaŝejo, kaj li facile evitas la policon. Nur la plej necesa komforto estas tie: Botelo da brando. Por kelkaj homoj ĝi estas komforta tiel. Sed gravas gardisto, kiu certigas, ke surprizo ne okazu al la proksimiĝantaj policistoj. Tiu homo estas la reklamo de la firmao. Antaŭlonge li estis pentristo, sed li grave vundiĝis dum la granda miliot, kiam li fuĝis el la prizono. La kuglo penetris lian kapon tiel, ke ĝi difektis la centron de liaj dorm-muskoloj. La kuracisto diris, ke la cerbopafo estas danĝera. Tiuj sentroj neniam povas dormi, nek dum la legado de la plej noblaj romanoj. Li estas tiel kripla. Ankaŭ la pentristo estas tia: li povas nek dormi, nek fariĝi honesta. Nun li estas grava rolulo por gardi, ĉar la estimataj enestantoj petas la neglekton de la polico. Kaj li ne dormas, kiam li gardostaras ekstere. Ĉar tia kuglo trafis lian cerbo-centron, ke li ne plu povas dormi, estis sobra, lavi sin. Sed la kuglo ne trafis lian interbatad-centron. Mi vidis tion el lia dekstramana bato, sed mi konstatis el maldekstraman bato, ke li ankoraŭ povas sveni. Tiu lia centro estas unuaranga.

Tie mi aŭdis pri negoco, ke granda kontrabando de armiloj okazas al Insuloj, oni denove finacas la ribelon de la indiĝenoj. Sed mi ne praktikas tiun negocon. Kvankam ĝi nun estas granda modo, ĉar la pirato Quebra ŝatus ribelon sur ĉiu insulo.

Tiel mi venis en la laborejon de Tendenulo la Fervora, kion surbordigis la alta tajdo. Iu skribis sur ĝin per grandaj literoj:

G R A N D – H O T E L O

A L   L A   M A L D O R M A

P E N T R I S T O

Por konatoj estas malpermesite eniri!

Tie mi renkontis la Ruĝharan Vasiĉ-on, kiu havas nur unu okulon, sed mi diras multon, ĉar ĝi estis tiel ŝveliĝinta. Li estas terure maldika knabo, sed tio estas nur ŝajno, ĉar foje en Delhio ni vangofrapadis hindan sport-klubon travojaĝante. Li rakontis, ke li dungiĝis al la ekspedicio, kio signifas tion, ke ni devas malkovri iun poluson. Kvankam mi pensas, ke el tiuj ekzistan ne pli ol du. Sed gravas, ke la salajro estas bona. Tiel ni venis en iun pistoreskan drinkejon de Oakland, kiu havas respekton, kaj ĝi nomiĝas: “VIVU LA ENŜTELIĜANTO!” Tio estas skribita sub ĝi: “Kiu volas fariĝi Forta Ĉi tie, tiu havos la sorton de fero.” Oni komprenu sub tio, ke li estos batata, dum li estas varma. Ĝi ne estas senenhava surskribo.

Terure multaj homoj estis ĉi tie, kaj iu kaptis min en la tumulto, ke eble mi ne interpuŝiĝadu. Ni ne preferas la longajn dialogojn, forte vangofrapinte lin, mi aldonis pacige, ke la drinekejo ne estas lia. Li tre surprizis min per svinga hokbato, pro kio mi kuntrenegis sur la sportklubon kaj tablosocieton “Gemutaj Matrosoj” sur la straton.

Kia mi revenis, formiĝis granda rondo, kaj mi alparolis la ulon, se li havas proksimulon en libera stato, li diru, ke mi informu ilin. Li komencis diri ian ŝerceman, sed kion faras la hazardo, tuj vangorapinte lin, mi kaptis lian kolon en mian kubutfleksen kaj ĵetis lin al la verŝ-stablon. Li estis neĉiutaga knabo, ĉar li abrute eksaltis tiel, kaj li piedbatis min je la stomako, ke mi denove troviĝis sur la strato, kie ĵus senpolvigis sin la sportklubo kaj tablosocieto "Gemutaj Matrosoj" kaj nun ili povis komenci tion denove.

Mi preferas dum sporto la fortan trejnadon, kaj mi daŭrigis ĝoje. Elble li estis ia komencanto, ĉar poste mi sternigis lin kvarfoje (se memoras via reĝa moŝto pri mia sinjora maldekstramana bato.) Tamen li estis tre persista knabo, ĉar poste li vangofrapis min, ke mi denove povis esti kune kun la sportklubo de la Gemutaj Matrosoj, kvankam ili jam enuis min. Mi reiris facile, ĉar la pordo jam ne malhelpis min. Bedaŭrinde nur la breto estis renversita, ĉar la Ruĝhara Vasiĉ subite venas kaj kuregas, ke mi ĉesu tion.

"Vi, idioto!" li kriegis. "Li estas sinjoro Theo, kiu organizas la ekspedicion."

Tia malfeliĉo. Ĝuste tiun mian novan mastron mi punas korpe. Li estas rikananta, larĝŝultra ulo, kaj li diras, ke oni lasu lin interbatadi, kion neniu faris.

"Domaĝe", mi diris, "ĉar mi volonte estus dungiĝinta al la ekspedicio."

"Nu kaj?" li diras, kaj dume li estis tute lentuga. "Vi tre plaĉas al mi, kaj diru, kio vi volas esti?"

Ĉar mi elektis la rangon, al kio apartenos ankaŭ uniformo, mi volis tiel, ke oni organizu min, kiel fregatĉefleŭtenanton, sed li pripensas tion. Kaj li faris tiel. Tamen li volis interbatadi plu, sed mi diras:

“Mi ne batas mian mastron, ĉar mi neniun povas vangofrapi sen konvinkiĝo.” Via reĝa moŝto scias plej bone, ke du aferoj ekzistas en la mondo, kio ne estas ŝerco. Iu estas mia dekstramana rekta bato, pro kio la ulo vidas verdan koloron, la alia estas mia dekstramana bato, kio estas la sama en violkoloro. Tia estas la vangofrapo, per kio mi restis alta estimano de via reĝam moŝto, krome tiu de ekscelencino de ŝia sinjorina moŝto, kaj kun aparta altestimata honoro mi salutas vian imperiestran avinon, kies manon kisas la tre amata eksreĝo de la insularo Feliĉo, flegante la memoron de la prospero de mia regado.

Sincere Via:

Don St. Ĝisorela di James

Del Jerseycity il placo Foirhalo, n-ro 7.

## K V I N A Ĉ A P I T R O

– Ĉu iu serĉas min? – demandis sinjoro Theo, kiel li alvenis hejmen.

– La ekzekutisto serĉis vin!

– Atentu! Kiel vi parolas kun mi?!

– Sinjoro Theo, mi vere bedaŭras, kaj mi volonte raportus, ke Berndar Shaw serĉis vin, aŭ ĝoje dirus la novaĵon, kaj Diana Durbin estis ĉi tie, la situacio tamen estas tio, ke nur la ekzekutisto serĉis vin.

– …Kia ekzekutisto serĉis min, kaj pro kia afero?

– Leĝe mortiganta ekzekutisto serĉis vin, kaj mi esperas, ke pro privata afero. Nek nia admirinda epoko atingis tion, ke la ekzekutisto venu oficiale al la hejmo de riĉuloj por ekzekuti. Li kunportis nek elektroekzekutan seĝon, nur valizon, en kiu povus esti maksimume nur portebla, elektra tabureto, sed tian, mi scias tiel, oni ne produktas.

– Sinjoro Thorn mem estas la ekzekutisto! Li pedante disfendadas niajn vortoj! Kiam serĉis min tiu homo?

– Ĉirkaŭ je la dekunua horo. De tiam li sidas ĉi tie kaj atendas vin.

Sinjoro Theo rapidis en la halon, kaj la gasto vere sidis tie.

Lia alta frunto memorigis pri filozofo, lia firmkaraktera vizaĝo pri ĉefdetektivo sur la titolpaĝo de kolportaĵ-romajoj, lia aroganteco pri sesaranga, provinca aktoro, liaj akrakoloraj vestoj pri riĉegaj viandaĵ-faristoj, alvenintaj de malproksime.

– Sinjoro, mi nomiĝas Sokrato Schwachta aŭ Knapp, laŭ via plaĉo. Mi estas je via dispono.

– Ĉu vi estas tiu, kiu konstante telegrafas? Kion vi volas de mi? Mi ne vokis vin!

– Sed vi silente akceptis mian leteron, kaj mi vendis pro vi mian florĝardenon, mi rezignis mian pension favore al mia malriĉa parenco, kaj mi farigis protokolon pri ĉio ĉi.

– Tuj iru en la inferon, ĉar mi elĵetos vin!

– Well… Mi vidos tion!

Kaj li foriris. Sed trankvilon ne estis eĉ por momento!

Gustavo Bahr bezonis kapaŭdilon, por ke li ĝuu silente la radioprogramon. Ducent dolarojn da monpuno, ĉar la Ruĝhara Vasiĉ batis magistratan kuraciston en la ŝtuparejo, kiel surteriĝinta Zeuso aperis persone Sir Arturo Maxbell, kun siaj tondra, basa voĉo kaj respektinda aspekto. Liaj matuŝelaĥe bruna, falta vizaĝo, neĝe blanka kaprobarbo, severe paŭtaj lipoj, griza cilindara ĉapelo, zorgeme vindita, bruna pluvombrelo, kolombkolora, tre strikta kaj mallonga jako, enormaj galoŝoj, grandegaj cikoniopaŝoj kun atakema eleano ofte emfazis lian konsiderindan aŭtoritaton en la scienco de la geografio.

Li bone orientis sin en la polusa regiono, kaj li jam atingis de la lago Ĉad ĝis la akvofaloj de Zambezo, ne vojerarinte, sen kompaso, tra sovaĝejoj, nur laŭ siaj geografiaj konoj! Sed ĉi-momente li blasfemis, ĉar spite al la klarigo de tri policistoj kaj unu etkomercisto, li vagadas en San-Francisko ekde mateno, ĝis li trovis tiun mizerant straton n-ro 45. Kvankam li havis ankaŭ kompason. Kiam la dommastro etendis sian manon, li tretropaŝis.

– Konservu viajn bacilojn!

– Sinjoro, bonvolu sidiĝi – diris Mr. Theo iom konsternite post tiu prezentiĝo.

– Kiam ni ekveturos? – demandis Maxbell anstataŭ respondo kaj ĉirkaŭrigardis iom malŝate, ĉar eble li estus atendinta, ke la vaporŝipo tuj restadu en la ĉambro.

– Unuavice disponu, se vi havas ian specialan deziron, rilate la ekipaĵon?

– Nepre! Ne forgesu kunporti multe de sekaj pastoj. Oni tute ne povas aĉeti sekajn pastoj survoje.

– Kiajn instrumentojn vi bezonas? – demandis sinjoro Theo ĉiam pli nervoze.

– Ŝu-kornon. Tion vi havu, sinjoro, mi proponas, ĉar mi lasis Amundsen-on ĉe Spitzberg-oj, kiam miaj ŝuoj krevis. Mi estas vera scienculo, mi mem kuiras mian teon, kaj mi portas galoŝon. Cetere mi kunportas ĉiun insturmenton, mi ne uzas tiajn instrumentojn, kies fabrikadon ne mi mem kontrolis. La scienco nur tiam estas scienco, se ĝi estas neerarema! Mi ŝatus, se vi notus bone tion.

Ĉiufoje, kiam li aprecis la signifon de la scienco, lia vizaĝo fiksiĝis kun neniiga severeco al la aŭskultantoj, kaj li altenlevis sian mirinde superdimesiigitan montrofingron rifuze kaj averte, dume li suprentiris siajn borovojn tiel, ke liaj okuloj elstariĝis el la vastiĝintaj kavoj.

Sinjoro Theo volis respondi ion, sed Maxbell mansvingis leĝere.

– Min ne interesas tio, kion aliuloj diras. La aserton de vivanta homo mi neniam konsideras ekzakta. Mi ekparolas

kun neniu antaŭ lia kvindeka dareveno de lia morto. Per tio mi opinias, ke ni priparolis la plej necesajn. La ceterajn konfidu al mi, ĉar mi kun fermitaj okuloj, sen instrumento, eĉ sur nekonata kontinento mi povas facile orientiĝi. Bonan tagon.

Kaj li foriris.

Kiam poste sinjoro Theo eniris en la dormoĉambron, li renkontiĝis kun profesoro Maxbell, kiu antaŭ nelonge alvenis el la direkto de la banĉambro kaj blasfemis kolere.

– Ĉu ne estas lakeo ĉi tie por montri la pordon de la antaŭĉambro?! Dek minutojn mi vagadas en la loĝejo, ne trovante la elirejon!

Maxbell kaŭzis ankoraŭ multe da problemo tiun tagon.

Ĉirkaŭ noktomeze, kiam la pordisto de la urba buĉejo konvinkis lin, ke li ne loĝas tie, li tamen prenis taksion kaj diris al la ŝoforo la nomon de la hotelo: Metropolo! Ĝi estas multekosta, sed certa maniero. Diablo vidis tiaĵon! La pordisto donas sian honorvorton, la sekretario ĵuras je la vivo de siaj edzino kaj infano, ke la scienculo ne loĝas ĉi tie. Nu, sed post ĉirkaŭ-telefonado evidentiĝas, ke la loĝejo de la eminenta esploristo estas en la hotelo Kontinental'. Tiel baldaŭ li atingas celon. Li eniras en sian ĉambron, sed li trovas tie junan virinon, havantan ununuran bandaĝon ĉirkaŭ sia maleolo, kiun li tuj forsendas, kaj la rigoran, malpermesan simbolon de sia pluvombrelo li etendas antaŭen en sia morala severo, kvazaŭ kerubo.

Okazos granda skandalo!

La edzo de la sveninta virino alvenas rapide en la mano kun ĉambro-sportilo ekspandro kaj fervore batadas la profesoron. La pordisto poste kalarigas, ke sinjoro Arturo Maxbell loĝas

en la najbara ĉambro, sed ne ĉi tie, sed unu etaĝon pli supre. Multaj homoj kunagis akompani supren la scienculon korpe kaj anime taŭzitan.

Hotelgrumo levis la kompason, falintan el lia poŝo, kaj oni gardis ĝin en la kontoro.

Vespere aperis la advokato de la familio ĉe sinjoro Theo.

– Mia iu kolego kontaktiĝis kun mi hodiaŭ, ĉar vi silente akceptis la proponon de ia ekzekutisto. Mi avertas vin, ke ĝi estas danĝera afero. Vi devos pagi. Kial vi respondis nek leteron, nek telegramon? Interkonsentu!

– Ĉu mi do rezingu mian havaĵon, cetere ĝi kostos mono?! – furiozis Theo.

– Diru tion, ke vi tamen silente akceptis lian proponon, sed ne tiel, kiel li imagis. Vi kunveturigos lin por la eksplorvojaĝo, ke ankaŭ tio faru interesa la ekspedicion, kaj vi pagos honorarion al li.

– Sinjoro! Nun estas en la ekspedicio pordisto, ekuzekutisto, oraĵisto, duonidiota lakeo, monokla vagabondo, muntisto kaj mi, krome mi scias ĉiujn modernajn ŝlagrojn. Posttagmeze mi kontraktigos rajd-akrobaton aŭ dresiston de kanarioj, kaj morgaŭ ni ekveturos! Haho! Ĉu vi ne venos?!

– Sinceredire mi pensadis pri tio – respondis la advokato, – sed mi prokrastis ĝin al la sekva sezono. Mi proponas tion, ke vi ne dicidiĝu la aferon inter Shwachta!

– En ordo! Ni kunveturigos la ekzekutiston, kaj akiru de ie kondamniton, tiam okazos ankaŭ sekcado dumvoje! – Kaj li frapfermis la pordon tiel forte, ke ĝi knalis.

Posttagmeze la ekzekutisto informis lin, ke laŭeble li petas kajuton al sudo, kaj li ŝatus, se li plenumus la ordonojn de la sekureco, ĉar li aĉetis konvenan manlibron, kaj el tio li kontrolos la laŭregulan ekipaĵon.

Sinjoro Theo ne spitis. Li tuj telefonis en la intereso de la kajuto al sudo, kaj ankaŭ li akiris manlibron, kaj Watson, la nove akirita kapitano zorgis pri la mebligo de la kajuto laŭ la manlibro.

## S E S A Ĉ A P I T R O

La preparoj finiĝis! La gazetaro post glorhimno komencis atakon. La ĵurnalo Saturdayures Post venenis la aeron. La redakcio volis altrudi sian lastatempe aperintan karikaturiston kaj korespondan reporteron, A. Winter al la ekspedicio. La geologo demisiis. La meteorologo malsaniĝis, la vetero pruviĝis malfavora pro la bakteriologo. Ili ankoraŭ ne havis stiriston, kaj ankaŭ la kuracisto, krome la radiisto mankis.

La oraĵisto, la pordisto, la muntisto, la fubaljuĝisto kun sia edzino kaj la anatomo, havanta belan voĉon formis la firman bazon de la partoprenantoj de la ekspedicio. Ni devas kompreni la nervostaton de sinjoro Theo, kiam al ĉio ĉi la ĵurnalo Pictures Post proponis sian lastatempe aperintan reporteron, kiu faras karikaturojn. (Oni ne povas scii, por kio li estas utila dum la ekspedicio.)

– Mi ne kunveturigos ĵurnaliston! Bonvolu diri al tiu A. Winter, ke la sola fakulo estas, sinjoro Arturo Maxbell, kiu proponis al mi ekskluzive nur sekajn pastojn kaj ŝu-kornojn.

Ridinde! Li ne estas freneza alpreni flarulon, kiu eble malkaŝos la tutan aferon.

– Mi diros tion al A Winter – respondis la ĉefredaktoro gal-amare, – mi opinias, ke vi ricevos decan respondon antaŭ la publiko.

Li frapis la telefonaŭdilon kolere. Sekvan tagon li ricevis la respondon. A. Winter skribis du kolumnan, karikaturan raportaĵon. Li publikis al la legantoj, ke juna milionulo, ekveturonta kun kargo de ŝu-kornoj kaj sekaj pastoj ne akceptas la faktojn. La insulo Tsiui estas proksime, kaj Sambi-Sumbi, kie Gustavo Bahr serĉis la postsignojn de

Tulango-anoj, ĝi troviĝas malproksime. Jen la demando, ĉu la celo estas reklam-ĉasado aŭ la trovo de la profesoro?

Krome sekvis kelkaj bone sukcesintaj karikaturoj. La unua tekstis jene: “SINJORO THEO KOLUMBO, FININTE SIAN TEMPESTAN VOJAĜON, EKRIPOZA SUR LA BORDO DE AMERIKO.”

Sinjoro Theo estas videbla sur la bildo en smokingo, sterniĝinte sur la ŝtupo de la havenkajo, kaj li ekdormis. Poste sinjoro Theo sur la Alpoj. Lia gutforma elefanto duone estas tretirila aŭto, sed samtempe ankaŭ trimotora aviadilo. La Alpojn, kiom eblis, la patro de sinjoro Theo forportigis kun siaj laboristoj ties duonon, ke ĝi apenaŭ estas pli alta ol la proksimaj ondliniaj montetoj, kaj sinjoro Theo facile fiksas la fiere filtrantan ŝu-kornon, ornamitan per usonaj koloroj. Fine la reportero mencias, ke oni faras seriozajn pritraktadojn kun Chaplin, kiu estas la plej taŭga por la ĉefrolo de la filmo, kiun oni faros pri la ekspedicio, kaj laŭstile al la lentuga sinjoro Theo Stanley, oni filmos ĝin post ne longe, kies titolo estos “LA MELEAGRA OVO DE KOLUMBO”..

Sinjoro Theo plej volonte estus rezigninta la ekspedicion, ĉar tiam li povis bati tiun A. Winter-on trankvilanime. Li nervoze prirespondigis Gustavon Bahr, alklimatiĝantan en la ŝranko.

– Ĉu vi opinias ebla – li demandis la scienculon, – ke vi estas en Sambi-Sumbi?

– Fine ja nenio estas malebla ĉi tie. Sed trovi min en Sambi-Sumbi, ĝi estus granda surprizo ankaŭ por mi.

– Sed kiel disvastiĝis tiu informo pri vi?!

– Ankaŭ mi legis en la ĵurnaloj, ke onidire Gustavo Bahr aperas ankaŭ tie kaj ĉi tie. la kontrabandisto facile povas misuzis mian nomon. Malgraŭ ĉio ĉi, se vi akceptos mian

opinion, serĉu min en Tsiui, kaj vi vidos, ke vi havos sukceson.

– Ĉu la ŝranko konvenos al vi? Vi ne ofte povas forlasi ĝin por iradi sur la ŝipo. Mi esperas, ke ĝi estas komforta?

Ĝi estas sufiĉe komforta ŝranko. Sed mi bezonus ankaŭ loĝĉambron, provizitan per bretoj, vestohokoj por miaj vestoj kaj tolaĵoj.

– Mi entreprenus ĉiun malkomforton anstataŭ vi, se vi farus la organizadon nur unu tagon… Sed tiun A. Winter-on, kiam ni revenos, mi vangofrapos ĝis li displitiĝos.

– Sinjoro A. Winter estas ĉi tie – rapotis Sigorski, kaj la lentuga junulo paliĝis.

…Sinjoro A. Winter atendis en la alia ĉambro pie. Eĉ konjekton li ne havis pri la nervostato de sinjoro Theo. Li tute ne povis havi ĝin. Ĉiam estos hazardoj. Tiu A. Winter estis kuracisto, kiun la plenrajta kapitano Watson dungis, laŭ la sekreta propono de la sekretari Thorn, kaj nun li venis por prezenti sin. Sufiĉe da Winter vivas en Usono, sed tiu ŝipkuracisto estas ĝuste Arnoldo, li do estis “A.” Winter, tio jam estas stranga ludo de la malfeliĉo.

Krome tiu kuracisto ŝajnis la plej malgaja homo en la mondo, kaj rajte. Li edukiĝis en Florido, kiel la unusola nepo de la milda-anima leterportisto, publike konata laŭ la nomo olda Winter, en la poŝtejo. Oni dorlotas unusolan filon sentimentala, eĉ se temas pri nepo, kiu estas unusola. Sed kiel povas estiu iu kontraŭ la naturaj leĝoj denaska nepo? Tio eblas! Vere!

La patro de d-ro A. Winter laboris ĉe la migrocirko kun la juna patrino, kiel magiisto. La cirkoĉaro restadis nur unu nokton en Florido, dum la novenaskito venis en la mondon.

Poste A. Winter lasis la bebon ĉe la poŝtejo, kaj la tenda ĉaro tuj ekveturis plu, kiu de tiam estas survoje, aŭ eble la gepatroj jam delonge transveturiligis al la nesuperebla, unuaranga ĉaro de profeto Elio. Estas fakto, ke sinjoro A. Winter neniam estis infano, kaj li suferis de kronika animsatato de eterna nepo, kio ofte esprimiĝis en plorado. Iafoje lia voĉo fariĝis obtuza, kaj interplektinte siajn fingrojn, li rompadis sian manojn malesperiĝinte, sed ĝi estas aŭtomatigita kutimo, kaj preskaŭ refleksa.

Sur lia mild-linia, iom rondforma staturo, super lian kolumon kliniĝanta, mole arkanta submentono montras, ke malgraŭ lia malgajo, li bone nutras sin, kaj li estas ekvilibrigita, sobra homo, sperta karaktero pri la arto kaj en la manĝado. Li nun staras tiel, rompante sian zorge flegitajn, rondformajn manojn, kaj dume li distrite rigardadas la bildojn, pendantajn sur la muro. Eĉ konjekton li ne havas pri tio, ke oni intermikas lian personon kun tiu de samnoma A. Winter, kiu estas trudiĝema, malamata reportero. Li tute ne scias tion. Li erarigis sinjoron Thorn-on, la sekretarion, ke li fariĝus kuracisto en la ekspedicio, kaj Thorn proponis lin al Watson. Nun en la poŝo kun la kontrakto li venis, kiel ĝi decas: prezenti sin al la proprietulo.

– Kion vi deziras? – demandis sinjoro Theo kaj okulmezuris lin.

– Mia nomo estas… A. Winter… Mi ne scias, ĉu vi konas sinjoron Linkoln?…

– Ĝis nun mi ne konis lin. Oni menciis tion hodiaŭ – li respondis morne.

“Li estas malĝentila homo” – li pensis. – “Aŭ li estas anemia.” Ĝi ofte okazas ĉe milionuloj. Li preskribos arsenon al li.

– Nu… mi venis en la afero de la ekspedicio – balbutaĉis A. Winter, malgaje pro la akcepto – ĉu vi permesas, ke mi kunveturu kun vi?…

Li okulmezuris lin kun malafabla ironio. Ĉu tiu homo pensas, ke li atingos celon per atako?

– Nu atentu min! Vi eraris! Nek Hanibalo, nek Kolumbo nek miaj turpaj lentugoj ŝanĝos la situtacion! Mi pensas, ke ĝi estis klara parolo?!

Li retropaŝis singarde. Kie estis klara parolo nun?

– Mi opinias – diris A. Winter anime rompita, – ke mia vizito apenaŭ havas kunligon kun viaj lentugoj, krome kun sinjoroj Hanibalo kaj Kolumo.

– Kaj kio estas al Chaplin?… Ĉu vi forgesis pri li? – li respondis kun sarkasmo, sed vibris liaj buŝo kaj lipoj pro la kolera murdemo.

A. Winter teruriĝis. Sed li ne montris tion.

Li metis sian nigra-kadran naztukon sub siajn punktal-okulvitrojn, poste li denove ĝustigis sian naztukon pedante en la supra poŝo kaj ekĝemis.

– Miaj karmemoraj geavoj tre ŝatis la burleskaĵojn de Chaplin. Ne pli ol kvar jaroj pasis, kiam mi entombigis ilin. La kompatinduloj… ankoraŭ… povintus vivi.

Sinjoro Theo respondis nur tion ĝentile:

– Kion mi scias pri vi, tio sufiĉas por tute kompreni viajn geavojn, kial ili preferis kiel eble plej baldaŭ morti!

La submentono de A. Winter ektremetis, aŭdinte tiun deklaron, kaj unue li levis la ungojn de sia kvin fingroj al sia buŝo, poste al la kravato, baldaŭ denove al sia buŝo, fine li ekuŝis la randon de siaj okulvitroj.

– Mi restriktos min al la plej necesaj – li diris – se mi havos aferon kun vi, ĉar vi ne simpatias al mi.

Li ĉiumaniere ŝatintus partopreni la ekspedicion. Ĉar li pensis, ke dume li malgrasiĝos, kaj tiel aŭtomete li fariĝos plenaĝulo.

– Mi ripetas, kara sinjoro A. Winter! Mia starpunkto estas, kiel vi scias: mi ne bezonas ĵurnaliston sur la ŝipo, sed kontraŭe mi preferas la ŝu-kornojn kaj la sekajn pastojn.

Tiu junulo diras nek unu kompreneblan vorton. Tio estas senduba. La ĵurnalisto kaj la ŝu-korno! Krome Hanibalo, Greta Garbo kaj la lentugoj! Li estas aŭ menskonfuza aŭ tre anemia. Kio okazus, se li prenus arzenon?

– Mi volonte partoprenus… la ekspedicion – li provadis denove.

– Mi persistas pri mia opinio: la ekspedicio veturigos ekskluzive nur multe da sekaj pastoj! Ĉu vi komprenas? – kaj li ridis krude. – Krome meleagro-ovojn!

– Kion fari?… – balbutaĉis la kuracisto

– Mi menciis la memeagro-ovon de Kolumbo – li kriis kun deformiĝinta vizaĝo.

Sankta ĉielo!

Li rigardis lin senkonsile, maltrankvile. Larmoj vualis liajn okulojn.

– La… albumino estas grava – li diris fine. – Mi do ne havas pretekston kontraŭ la meleagraj ovoj, sed laŭ mia opinio, vi devus kunporti ankaŭ legomojn krom la sekaj pastoj – li timiĝinte balbutadis mallaŭte – kaj ankaŭ fruktojn kontraŭ skorbuto…

– Ĝi estas tia rimarko – kriis Theo kolreme, – kiel la triboj Tulaongo aŭ Sambi-Sumbi! Tio estas fiaj asertoj!..

Liaj ŝultroj jam ektremis iomete pro ĝi. Sendube: li estas freneza!

– Ĉu vi permesas – li diris kaj elprenis sian receptolibron, – ke mi preskribu ion?

– Aŭskultu min! Se vi preskribos kion ajn, mi akompanos vin sur la straton, kie jam ne defendos vin la gastorajto, kaj ĉe la plej unua angulo mi batos vin, ĝis vi fariĝos blua, verda, violkolora kaj vi estos striita de la kapo ĝis la piedoj, simila al kvadratita ŝtofo.

Li metis siajn du fingrojn denove al la elstara parto de siaj olulvitroj kaj retropaŝis kun intermita spirado.

– Bonvolu diri… ĉu mi devas kompreni tiel… ĉu eble vi ŝanĝis vian intenocon… rilate mian personon?

– Nenio ŝanĝiĝis! Ĉu vi komprenas?! Nenio!

Li malpeziĝis iomete. Se la milinonulo estas groba, eĉ freneza, tamen A. Winter estus domaĝinta, se li ne povus partopreni la ekspedicion.

Kiam A. Winter foriris, sinjoro Theo vokis la unuokullan kaj idiotan lakeon:

– Sigorski! Se tiu homo, kiu estis ĉi tie, ankoraŭfoje trudiĝos en mian proksimon, vi perdos vian laboron.

Sigorski, kiu estas adepto de profilaktiko, rapidis tuj sur la balkonon, kaj kiam d-ro A. Winter paŝis tra la pordo, li haste surverŝis la kuraciston per sitelo da akvo. Kiu suprenrigardis kun malgaja vizaĝo, tramalsekiĝinte.

– Kial vi surverŝis min? – li demandis, formante megafonon el siaj manoj kun malrapida, artikigita lipmovo al la etaĝo.

Sigorski same tra la megafono de siaj manplatoj respondis kun malrapida mimiko:

– Mi volis, ke vi estus malseka!..

Ŝajnas, ke la evidenta klarigo trankviligis la kuraciston, ĉar li kapjesis kompreneme, kaj eklevinte sian deformiĝinta, gutantan ĉapelon, li foriris mallaŭte plorante.

## S E P A  Ĉ A P I T R O

Sekvan tagon eksplodis la sensacio!

Oni aranĝis monkolektoadn en la rondo de la legantoj de Saturday Pictures Post, kaj el la kolektita mono oni sendos apartan ekspedicion por savi Gustavon Bahr, el Honolulo, kiun partoprenos la mondfamana scienculo, profesoro Hermans, laŭ kiu Gustavo Bahr vivas sur la insulo Sambi-Sumbi. Estas senduba el la rakontoj de la balenĉasistoj, ke la enigma eŭropano estas identa kun la malaparinta Gustavo Bahr, kiu vivas inter la indiĝenoj sur la portugala insulo, situanta proksime al la polusa regiono.

Krom la profesoro kompreneble ankaŭ A. Winter, la karikaturistas reportero partoprenos la vojaĝon, kaj li faros raportojn.

– Tre bone – opiniis sinjoro Theo, – almenaŭ la skandalo estos laŭta, kiam ili revenos kun malplena mano.

– Nek mi pensas, ke oni trovos min sur la insulo Sambi-Sumbi – diris Gustavo Bahr. – Mi rimarkas, se mi vere restadus tie, eĉ tiam estas duba, ĉu mia eminenta kolego, Hermans trovos min?

La varbado de la personaro signifas agrablan ŝanĝon en la vivo de la ekspedicio, kiun partoprenas Jimmy la Ĝisorela kaj Vasiĉ la unuokula. La diskuto iafoje fariĝis serioza interbatado, kaj kelkfoje ĝi daŭris eĉ kvin-dek minutojn, ĝis li faris ordon kun ĵimmy la Ĝisorela, frate dividante po unu parton de seĝo aŭ tablo.

La sentemon de Jimmy la Ĝisorela tre ofendis kapitano Watson, ne nur liaj blanka pantalono kaj blua jako, sed ankaŭ lia antipatia, malvarma rideto.

– Se tiu homo estas kapitano, tiam mi estas minimume unua-oficiro.

– Li pravas – diris Vasiĉ, ĉar li volis protekti Jimmy la Ĝisorelan. – Kie ĉiu duonidiota civilo povas fariĝi kapitano – ĝi ne koncenas vin sinjoro Theo, ĉar vi ne estas duoncivilulo, sed tut-civilulo -: do, kie ĉiu ajnhejmano duon- kaj tut-civilula okso povas interveni, tie ankaŭ Jimmy la Ĝisorela devas havi pozicion. Li estus fregat-ĉefleŭtenanto!.. Diablo forportu tiujn puŝiĝantajn dum-murojn…

Kaj interkonsentite pri tio kun sinjoro Theo, Jimmy la Ĝisorela ankoraŭ posttagmeze aĉetis kuloton kaj ledan gamaŝon. Krome orbutonan flanelan piĵam-jakon, kaj la transimsio kun tenila monoklo pendis ĉirkaŭ lia kolo, kaj li akiris la plej sensacian, blankan kaskedon kun brila, nigra viziero, kiun portas la ĉef- kaj subkuracistoj de la volontulaj ambulancistoj plenrajte. Belega emajlita butono ornamas ĝin. Sur tiu insigno troviĝas edelvejso inter du ŝrabturniloj kaj kvar ruĝaj kamentuboj el brila emajlo, kio laŭ la proprietulo signifas tion, ke “Nin ĉiujn povas trafi akcidento.”

La fregat-ĉeflaŭtenanto dungis tridek unuarangajn personojn; malnovajn amikojn, kiuj ĝojis por la feliĉo. Sinjoro Theo miris la manieron de la dungo, kiam la fregat-ĉefleŭtenanto rifuzis grandegajn, larĝŝultrajn homoj, alifoje li longe persvadis magran, ĉifona, malpur-vizaĝan stratbubon. Ekzemple li logas per ĉio palan, junulaĉon, nomatan Vanek la Dornhara, fine tiu grandanime dungiĝas.

– Tiu homo – diris sinjoro Theo – estas tia, ke mi dungus lin nek senpage.

– Ĉar vi ne komprenas la kompaniaĉon – respondis Jimmy la Ĝisorela, kaj dikaj ŝvitgutoj perlis sur lia frunto, ĉar li

surprenis sian belegan pluvmantelon, malgraŭ la malaktuala, sunbrila vetero. – Vanek la Dornahara valoras oron. Li estas sportisto, en Ŝanghajo antaŭ boks-matĉo li interbatadis sur la strato, kaj la matĉo ne okazis, ĉar la du eŭropaj ĉampionoj enhospitaliĝis fare de la manoj de Vanek. En Limo li preterlasis la kur-ĉampionon de la polica sport-klubo sur distanco de kvarmil metroj, kvankam tiu postpafis lin trifoje. Tia homo valoras oron en ekspedicio.

Sinjoro Theo diris nenion, kvankam li trovis stranga la ideon de Jimmy la Ĝisorela pri la gravaj ecoj de la personaro de scienca esplorvojaĝo.

– Gravas, ke ĉiu havu dokumentojn – li klarigis, – ĉar ĝi estas la unua! La personaro de la ŝipo sen dokumentoj estas nur tiom, kvazaŭ ili ne havus ankron aŭ profundo- kaj rapidec-mezuriloj.

Post du tagoj Jimmy la Ĝisorela transdonis la dokumentojn de la ŝipo en la havena administrejo. La paperoj de la dudek membra personaro estis en ordo. Sinjoro Theo atendis ekstere. La fregat-ĉefleŭtenanto aperis iom zorgopremate.

– Bela ordo estas en San-Francisko!

– Kio okazis? Ĉu iu papero ne estas en ordo?

– Ĉio estas en la plej granda ordo. Sed kia afero estas tio, ke oni petas ankaŭ miajn dokumentojn? Ĉu mi estas ŝipoficiro, aŭ ne?

– Ĉu vi ne havas paperojn?

– Mi protestas kontraŭ tiaj aludoj! Oni konas min en ĉiu haveno de la mondo. Gravas sur ŝipo, ke oni estu faksperta en ĉio. La maro konsistas ne el papero!

La influo kaj riĉeco de sinjoro Theo ebligis, ke Jimmy la Ĝisorela rericevu siajn paperojn por provoperiodo, kio iom mildigis la ofendon.

Sed fine iele-tiele estis ĉio en ordo, kaj antaŭ unu tago de la ekveturo venis sinjoro Maxbell por interkonsiliĝi per kelkaj vortoj.

La furor aktoro ĝis nun laŭtlegis kaj vizitis bankedojn.

Nun li staris antaŭ la blua ŝranko, en kiu malliberadis Gustavo Bahr.

– Gravas, ke kuracisto estu sur la ŝipo, kaj ni trovu lokon por miaj kvincent kombinitaj pulvoroj. Eblas, ke mi havas malarian febron.

Kaj li palpadis sian pulson. Li estis ege hipokondriulo.

– Kiel vi opinias pri la kombinaĵo pri Sambi-Subi?

– Azenaĵo. Gustavo Bahr kun sia malgranda prepariĝo ne kuraĝis veturi tiel malproksimen.

Sinjoro Theo ektimiĝis. Nun estos problemo. Bruo aŭdiĝas el la ŝranko.

– Tamen – li diris laŭte – estus domaĝe pro tiu homo.

– Jes, jes – kapjesis Maxbell. – Fine ja oni ne devas rigardi la scienculon en ĉiu… Ŝajnas, ke la aero malvarmiĝis, ĉar la mebloj krakas ĉi tie.

Sinjoro Theo dorse apogiĝis al la ŝranko pro timiĝo.

– Oni diras – li interrompis rapide, – ke Gustavo Bahr estis eminenta homo.

– Ni ne iluziu unu la alian – mansvingis Maxbell amare, – ni ekveturos por longa vojĝo kune, eksciu do, ke li fariĝis scienculo per plagiato, rilate mian junaĝan verkon…

– Ni iru en la alian ĉambron! La aero tre malvarmiĝis ĉi tie – diris Theo rapide kaj timiĝinte.

– Li pravis pri unu afero – meditis Masbell. – Kaj nun ĝi estas utila por vi. Mi eraris du gradojn en mia mapado, rilate la situon de la insulo Tsiui. Tiel mi nun ne trovus Gustavon Bahr, se dume mi ne divenus mian eraron.

– Jes, vi korespondadis…

– Kaj tiu homo venkis. Mi rekonas tion. La plej gravaj mezuroj pruvis, ke Gustavo Bahr certe hazarde, sed bone difinis la situon de la insulo Tsiui. Eble li ne atentis pri tio, aŭ li estis ebria – li meditis senkonsile.

– Idioto!

Tiu rimarko de la ŝranko estis neatendita, kaj la profesoro levis subite sian kapon.

– Kiu parolis ĉi tie?!

– Mi aŭdis nenion – respondis Theo, – plie mi vidas tiel, ke vi estas iomete pala… vi fartas malbone…

– Jes, jes… – li ĉirkaŭrigardis kaj time palpadis sian pulson… – Ŝajnas, ke ĝi estas febro… Mi haluciniĝas. Sinjoro! Mi estas malsana… Vi devas devojiĝi du gradojn de la vojdirekto, signita sur mia mapo. Notu tion bone, ĉar post mia morto vi bezonos ĝin. Se mi ne mortus, estas superflue encerbigi tion, ĉar mi estos tie…

Kiam la profesoro foriris, Gustavo Bahr haste elvenis el la ŝranko…

– Mi estas perdiĝinta homo… – li spiregis pale.

– Kial?…

– Eh… Ĉu vi ne komprenas?… Vi neniam trovos min… Seniam!.. Li pravis, rilate la du gradojn!..

– Kiel?!

– Jes! Mi konfesas tion. Alvenine al la insulo Tsiui, mi vidis malgaje, ke la mapo de tiu ulo estas bona. Perletere mi venkis, sed en la realo ne! Mi eraris du gradojn, ne li!… Eble li estis malsana, tamen li vidis ĝin bone!

– Nu kaj?

– Ĉu vi ne komprenas?… Ĝi devojigos la eskpedicion, laŭ mia mapo du gradojn orienten. Kaj lia mapo estas ĝusta. Vi do diste preternavigos la insulon Tsiui, rekte en la glacian, polusan regionon!

– Ni do devas diri, ke li eraras! Aŭ vi eraras! Aŭ vi ambaŭ eraras… Diablo povas jam orientiĝi!

– Neniu scias ĝin, nur mi! Se vi trovos min, mi povas diri tion. Sed sinjoro! Tiel vi neniam trovos min!

Li preskaŭ ploris.

– Ni esperu – diris sinjoro Theo fine, – ke Maxbell survoje rekonos sian eraron.

– Kian eraron? Maxbell tiel bone scias la ĝustan direkton, kiel mi!

– Vi ĵus diris, ke li devojiĝas du gradojn! Per la sep sakramentoj!

– Li devojiĝas, ĉar li ne volas trovi min! – kriis Gustavo Bahr malesperiĝinte. – Prefere li akceptas, ke mi pravas, nur li ne trovu min!

Kaj fine, fine! La ŝipo Stanley Up To Date malrapide ekmoviĝis inter brilaj eksteraĵoj, muziko kaj torĉolumo, en la ĉeesto de homamaso, moligita per gumbastono. La sireno sonis, la futbaljuĝisto fajfis, kaj dignoplene, vid-al-vide al la tondra vivuado kaj konsiderinda vico de la cilindraj ĉapeloj… jes!.. Ĝi estas vera! La ekspedicio ekveturis!

La krakantaj megafonoj, dissendantaj surloke disaŭdigis en la spacon. Ankoraŭ estis videbla la brilanta ŝipo, la afable svinganta ekzekutisto… Sed la teksto jam malpliiĝis antaŭ la parolisto, kaj tiel li devis diri laŭ la manuskripto la sekvajn:

“Mi staras ĉi tie kortuŝite, kaj mi ne trovas vortojn, kiam la ŝipo malaperas for de l’ niaj okuloj…” Pro Dio, kio okazis!? Nun mi staras ĉi tie, kaj iu kriegas sur la rodŝipo. Sed kion nun fari?…

“Kaj kiam la nebulo de la oceano absorbis ankaŭ la lastajn lampojn (kiel idiotaĵo, ke ĝuste hodiaŭ ne estas nebulo), la homoj disiĝas emociiĝinte, sur ili vizaĝos estas videbla: Man for man! Niaj herooj ekveturis! Ni scias, kredas, kaj ne estas dubo, ili atingos celon. Sed se ne, eĉ tiam ili estos herooj…! Nun la urbestro svingas per sia cilindra ĉapelo… naztukoj flirtas, kaj malrapide, tre malrapide (sed kiel malrapide! Dio mia!) la homamaso disiĝas. La lastaj lampoj de la ŝipo nun malaperas. Kun dek minuta kaj kvardek ses sekunda malfruiĝo. Mi ripetas: dek minutoj kaj kvardek ses sekundoj… Kaj precize je la naŭa horo kaj dudek minutoj ni disaŭdigos gramofon-muzikon. La surloka dissendo de la

radio finiĝis pri la ekveturo de Stanley Up To Date, kaj ni petas la honestan trovinton, la dokumentujon, perditan antaŭ la borso, li transdonu al la firmao Smallow Co por konvena, sed ne pli ol cent dolaroj. Tie same estas unurangaj pluvmanteloj kaj rakedoj…”

Kaj la ŝipo veturas, naĝas trankvile, kaj inter la spektantoj staras timiĝinta homo sur la bordo: Gustavo Bahr!

La famas esploristo ne scias, kio okazos nun? Oni lasis lin ĉi tie! Kio ĝi estas?! La nebulo englutis la ŝipon, kiu veturas por li. Kaj li, ĉirkaŭ la talio kun frototuko, staras ĉi tie baniĝinte.

L A  L E T E R O  D E  J I M M Y  L A  Ĝ I S O R E L A

A L  L A  R E Ĝ O  D E  L A  I N S U L A R O  F E L I Ĉ O

II.

Estimata adrestita

Lia altestimata arkiduka moŝto Sankta Antonio

ALMIRA

Tronhalo, ĉefŝtuparo, duonetaĝo, n-ro 4 (dekstre)

Per mia letero mi kuraĝas informi vin pri la sekvaj eventoj. Ni plilongigis la ekveturon du tagojn. Mi pensas pri via reĝa moŝto, ke vi estas ĝentilulo, kaj mi sentas tiel, ke mi ne trompiĝos pri vi. Tial mi kalkulas, ke mia fido estas diskreta, ke vi ne perfidos min, kiel oni diras latine, sed kial fanfaroni pri la latina lignvo, kiam ne estas oficiala afero? Mi do petas vian reĝan moŝton, ŝian reĝinan moŝton kaj vian imperiestran avinon (kies manojn mi kisas, kaj

reprezentante min, via reĝa moŝto transdonu ĝin kun elkora amo), ke ili ne disklaĉadu tiun trompon.

Do la oceanŝipo jam estis ekveturonta, kiam aperis miaj du amikoj, kiuj portis longan lignokeston. Mi staris en parada uniformo kaj pro la multe da ĵurnalistoj mi diris al ili, ke "Ili atentu, kaj portu la ŝrankon en la kajuton de sinjoro Thejo!" Estis ĝene por mi, ke tiu portisto, nomata Jasmeno diris, mi ne buŝaĉu, ĉar ankaŭ li lernis la ŝarĝportadon, kie mi. Mi ekhontis, ĉar tamen mi estas fregat-ĉefleŭtenanto, kaj ĝenite mi avertis lin, ke mi piedbatos lin, se li parolaĉos. Li diris responde: "Ĉu ankaŭ vi estas iu ĉi tie?! Ĉu en tiu ĉi haveno jam ĉiu volas esti iu?!" Mi ne komprenis, kio okazas? Ĉu ili ne ŝatas min?

Tiu Theo estas bona knabo. Sed ŝajnas, ke li estas iometa nervoza. Kaj estis tie Watson, kaj tiuj du suspektinde honestaj matrosoj.. Estis videble, ke ili bone konas la maron el libroj. Sed la knaboj ne venis, kvankam mi dungis ilin. Neniu el ili! Nur Vasiĉ, sed plurfoje, ĉar komence li reglitadis. Sinjoro Theo cigaris kaj rimarkis malgaje, ke diablo devus forporti min kun miaj homoj. Intertempe alvenis la ĉefa parto de la ekspedicio. Estas tre interesa tia esplor-ekspedicio, el kiuj homoj ĝi konstistas? Ni havas oraĵiston, kiu multe ordonas. Krome ekzekutiston, kiu estas tre eleganta kun malgranda, detektiva pipo. Laŭ kiu malmultas la savboatoj sur la ŝipo. Poste venis kantisto, ŝajnas tiel, ke li estas bezonata al la ekspedicio, kaj li demandis, ĉu ĝi estas glaciroma ŝipo? Kaj ili karigis unu al la alia, kaj tiu Watson estis tre ĝentila al ili, el kio videbliĝas, kiel maristoj ili ne estas, ĉar tiuj ŝatas tian urban bandaĉon nek el libro. Kaj nur la personaro ne venis. Cetere jam ĉio estis kune al la ekspedicio. Kiel mi sciis de sinjoro Theo, ili atendis nur ian pordiston, kaj tiam la etato estos kompleta. Min jam antaŭe interesas tio, kial ili estas gravaj al la esplorado? Ĉar ili ne estis matrosoj. Sed ili jam muzikas kaj filmisto faras filmon

sur la tegento de la deponejo. Kaj ne estas personaro! Ĝi estas bona! Alvenis sinjoro por adiaŭi nin de la urbo en stria pantalono, kiu portis brilan, nigran, longan ĉapelon, kiun oni nomas ĵaketo kun ia burĝaj kunuloj, kiel delegacio, kaj li levis la ĵaketon de sur sia kapo. Li havis blankajn gantojn, kiuj memorigis min pri Gomperez, pri la etiketema, hispana hidalgo. Tiam mi diris al Theo, ke estos grand skandalo, mi do iros rigardi, kie estas la personaro? Kaj la kuracisto? Watson diris, ke li dungis lin. Mi iris en la operaciejon, ĉar tie troviĝas blankaj kiteloj al la kuracista laboro, kaj mi tuj prenis iun pakitan. Poste mi iris bele malsupren. Estis terure ĝene, ke mia dungita personaro ne venis…

Reĝa moŝto! Vi tre ŝatas tion, kaj kiel bela ĝi estas! Kiam la lampoj estas lumigitaj en la haveno de Oakland kaj la burĝoj ektimiĝas, mi do iris en la internan urbon por vangofrapadi. Kiom da muziko, kiom da ark-lampoj, krome nrandaj vuĝaj, verdaj kaj bluaj lampionoj, kaj polvo, rumoro, malbonodoro de maro, ĉar la alfluso elĵetas la mortintajn fiŝojn kaj snejlojn. Kaj ĝenerale! Kaj kiom da elĵetoj, kiam vesperiĝas, kaj la multe da homoj, kvazaŭ ili irus en sian laborejon, ili ebriiĝas. Mi pensis pri la indularo Feliĉo, kiam mi trinkis kun miaj fidelaj civitanoj, por ke ni estu en cidira rilatu, kaj sinjoro Egmond ne prenis tion de mi kiel ofendon, kiun via reĝa moŝto konas bone ekde via infanaĝo, kaj sur lia frunto estas cikatro. Unuavice mi pensis pri via reĝa moŝto, ĉar tiu haveno estas tia, ke ĉiu idiotaĵo venas en mian kapon. Estas strange, ke ĉi tie oni rigardas min malŝate de iu horo al la alia. Kaj mi diris en mi mem, kia afero ĝi estas? Mi pensis, ke ĝi ŝanĝiĝis de iu vangofrapo al la alia, sed jam komence mi ne volis provoki skandalon. Ĉar venos la policistoj, kaj poste ekzistas tia ulo en la haveno, por kiu estus ĝene, se mi vagofrapadus lin en la arestejo. Lastfome mi spertis tiaĵon en Adeno, kaj ĝi ne okazis sub mia regado en Almira. Ĉar sendepende de ĉio ĝi estintus eĉ ofendo kontraŭ la reĝo. Mi do direktis miajn aristokratajn paŝojn al mia kutima

restoracio Mortinta Fiŝo. Nur kiam mi ekvidis mian stiriston, nomatan Eŭgeno la Buŝaĉulo stari antaŭ la perlokurteno, lumanta bule-ruĝe de la nokta diboĉejo, kiu estas rekonebla, ke inter ĉapo kaj barboamaso fumas pipo, kaj mi vidis, ke li elprenas sian pipon, repuŝas la ĉapelon kaj duone turnas sian dorson al mi, mi do iras al li.

"Ĉu mi ofendis vin?" – mi demandis, nur pro scivolemo. Li diris responde:

"Mi fajfas pri vi."

– "Sed vi dungiĝis al mi, kaj vi ne venis."

Li eklevas sian ŝultron kaj diras:

"Vidu Jimmy la Ĝisorela, ĝis vi estis neniu, ĝis tiam mi faris volonte ĉian ŝercaĵon kun vi. Se vi denove iĝos neniulo, tiam mi denove faros ŝercaĵon kun vi. Sed mia stomako ribelas, ke vi ludu grandsinjoron kaj promenaĉu ĉi tie, mi do diras al vi bele, kial kvereli: mi kraĉas sur vin."

Ĝi estis sincera parolo, mi do diris al li, ke li atendu minuton. Mi iris sub pordegvolbon, mi surprenis la kunportitan laborkitelon, poste mi elvenis kaj diris al li, ke li prepariĝu, ĉar mi nun tre forte batos lin. Tiu Eŭgeno la Buŝaĉulo estas tre vivdanĝera homo, kaj li tuj elprenis la tranĉilon. Je mia plej ganda bedaŭro. Ĉar nur tial li ricevis tiel grandan vangofrapon, ke li pipo disrompiĝis, krome li glutis multe el ties suĉilo. Mi ne lasis min piki en mia nova vestaĵo, li do havis lukscion. Sed eble li ricevis ĝin tial, ĉar estis somero, oni ĉion tenas malfermita, kaj li falis de sur la teretaĝo en kel-loĝejon. Mi ne atendis, ke li elvenu, mi pakis mian laborkitelon kaj iris plu.

Kial ili koleras min?…

Mi kaj Eŭgeno la Buŝaĉulo loĝis kune kvin tagojn en familia kripto, li do estas tia, via Reĝa moŝto scias tion bone, ĝi eĉ plie sigelas la amikecon. Mi ne asertas, ke ĝi malboniĝas, kiam oni vangofrapas iun, kaj li englutas kelkajn gramon da suĉilo, sed tio jam tamen ne estas la vera amikeco. Kaj tiam Roĉild la Malavara ridaĉis min alvizaĝe, enpoŝiginte siajn manojn. Li estis Malavara ne pro sia riĉeco, kaj ne pro la riĉeco li estis Roĉild. Oni nomis lin Roĉild, ĉar li estas riĉa, sveda magnato. Foje, kiel bonŝanca estas tiu Malavarulo, renversis lin aŭtomobilo. Kaj tiu pagis al li multe, ĉar la amikoj, kiuj portis la renversitan Malavarulon sub pordegvolbon, ili helpis iomete rompi lian kruron. Ili faris eĉ tion al li (amiko estas amiko!). Ke ili batadis lian kapon, kiam do la ambulanca aŭto alvenis, li jam estis hospitalpreta kaj oni forveturigis lin. Tiel do Roĉild pagis multe da mono, kaj se la Malavarulo havas iom da prudento, li akceptas la konsilon de Tendenulo la Fervora, kiu diris, ke ili elpremu iun lian okulon, ĉar kio certas, tio certas. Tiel li havus provianton ĝismortan, ĉar li devus ricevi dumvivan renton laŭleĝe, kaj pro lia elpremita okulo. Sed la fola, bona koro de Tendenulo la Fervora (li ĝenis nek vian reĝan moŝton pro la kvin dolaroj, kvnkam nun li ne havas abunde kaj vene ŝovas sian manon en la poŝon, krome en tiun de aliuloj: li maljuniĝas.) Do li ne ricevis dumvivan renton, kvankam la vera superruzo, rilate la surveturanton, estintus tiu elpremo de lia okulo. La maldekstra. Ne estus domaĝe pro ĝi, ĉar ties miopeco estis plur-dioptria. Eĉ tiel li ricevis multe da mono, Ĉar alveninte en la hospitalon, kiom eblis, ankaŭ li mem disartikigis siajn du fingrojn, kaj lerte, per la eĝo de la savŝranko li fendis sian kruron. Eble se la hospitalo estus malpli proksime, li decidintus elpremis sian alian superfluan okulon, kio estis facilanimeco, ke li ne faris tion. Kaj tiam li pagis 1 litron da vino kaj 10 cigaredojn al ĉiu sia amiko! Kvankam ili helpis al li. Nur mi mem enpremis liajn du ripojn per mia dikfingro! (Ĉar amiko estas amiko!) Kompreneble atendu anstataŭ malbonago malbonon. Post unu monto

reversis lin al aŭto de la buĉisto, kaj li riceis tian unuan helpon de ni, ke la deĵoranta policisto diris, ke li porparolos en nia intereso doni la ordeno de la Ruĝa Kruco al ni. Ni tuj ĉesigis la sangadon, kaj vane li nomis nin ĉiaspecaj kanajloj, tiu Tendenulo la Fervora, kiu povas esti ankaŭ tre kruela, per unu tiro reĝustigis la disartikiĝintan brakon, kaj iu haste kambis lin. Via reĝa moŝto povas imagi vin en lia situacio, ke tiu fripono piedbatis, mordis kaj blasfemis, kaj ni atentis, ke li ne ektuŝu la kotlageton per sia vestaĵo. La ambulancisto protestis, ke ili venigis lin, kaj la buĉisto demandis lin, ke ekzistas du elekteblecoj: Ĉu li volas dudek frankojn, aŭ unu vagofrapon, aŭ li denuncas lin pro ĉantaĝo, aŭ li iru en la inferon. Kvina ne estas. Tio estas la instruaĵo, se iu estas sendanka al siaj amikoj.

Sed poste Malavarulo multe ŝipveturis kun ni. Tial oni nomis lin Malavarulo, ĉar li havis tiel grandan manon, kiel büfstök en la desegnofilmo. Kiel li kuraĝas ridaĉi kun enpoŝigitaj manoj, en svetero kaj maĉante maĉtabakon? Bedaŭrinde mi havas molan koron. Tial mi mencias tiomfoje la estimatan avinon de via reĝa moŝto, kiun mi ŝatas. Kaj ankaŭ nun ĝenis min, ke tiuj miaj amikoj, kun kiuj ni tiomfoje estis kune en malbono kaj en relegacio, ke ili fariĝis tiaj. Mi diras tion milde, ĉar eble la bela vorto utilas:

“Per kio mi ofendis vin, vi, idioto kun tretita kapo?!”

Ĉar oni nomas lin ankaŭ tiel, de kiam la aŭto renversis lin, kaj liaj amikoj pidebatis lin je la kapo, por ke li ricevu monon. Li dirs responde:

“Ĉar vi fanfaronas ĉiam, kaj vi pensas, ke vi jam estas iu, kaj ĝin mi ne povas toleri, kaj tia neniulo pensu tion, ke li estas pli ol derompiĝinta cigaredo!”

Mi diris: “Ke derompiĝinta trunko, brava afero venas en mian kapon pri vi, mi nur surprenos mian laborkitelon.”

Okazis tiel. Irinte plu, mi ankoraŭ aŭdis Aŭrelo la Nazuma, kiu estas bilanckapabla librotenisto, ĉar antaŭ la proseco de la defraŭo li trinkis ian mildigan cirkonstancon, li elkalkulas, kiom multe estus prilaborinta tiu Malavara Roĉild, se mi estus kvin-litra sportaŭto. Li povintus vivi ĝis la fino de sia vivo modeste kaj senzorge.

Tiel li ŝvebis inter vivo kaj morto, ĉar nikotinismo atakis lin pro vangofrapo. Ĝi okazas ofte, kiam iu interbatadas en la buŝo kun maĉtabako, kaj li englutas rapide duon funton da kunpremita tabako pro rekono de svinga, korpa insultado. Sed oni ne aljuĝis dumvivan renton, ĉar li ricevis vangofrapojn ne de maŝino.

Tial ankaŭ sur mi gorĝo glitis tre amara gusto, nikotino pro malĝojo, ĉar kion ajn diras la injoroj ĉefpolicistoj, mi estas kanbo el la havenoj, kiu senigis sin eĉ de la trono, ĉar mi sentis tiel, ke oni amas min ĉi tie, kien mi apartenas. Mi do eniris en la restoracion KAPTU LIAN KOLON RITZ por trinki glason da drinkaĵo. Kaj tie je mia granda miro, mi preskaŭ kredis tion, ke min kaptos cerba komocio pro la vangofrapoj, kiujn ricevis Roĉild la Malavara.

Dio mia!

Tie sidis la Kapitano vid-al-vide al ni! Via Reĝa moŝto scias! Nome Fred la Malpura!.. Reĝa moŝto, mi ne mensogas al vi, kredu min, ke ĝi estis tiel: li trinkis refreŝigilon el frambosirop.

Li kirlis tion, kaj ĝi ŝaŭmis.

Li ekstaris kaj diris: ĉi tie li zorgos pri la vestogardejo.

Mi regajnis la unua mian animregadon. Mi diras al la maljunulo: “Vi tre similas al publika kaj vivdanĝera homo, nomata Fred la Malpura. Momenton oni pensas, ke li estas vidata. Kaj nur poste li fariĝis denove trankvila.” Li diris:

“Mi ne nur similas al li, sed ĝi estas eĉ pli multe. Ĉar mi estas tiu.”

Li rigardas malgaje. Kaj li trinkas la refreŝigilin el frambosiropo. Deturninte mian kapon, mi petis, ke li ne faru tion, ĉar ne eblas rigardi ĝin.

“Aŭskultu min Kapitano. Ĝi estas io granda friponaĵo ĉi tie, kion li elkovis denove. Vi ĉiam komencas ĝin inverse. Kaj oni ne povas scii, kion vi kirladas.” Li diris:

“Vi povas vidi, infano mia, ke ĝi estas refreŝigilo el frambosiropo.”

Tiam mi jam estis certa pri tio, ke ĉi tie okazos granda friponaĵo, kaj ĝi denove venos inverse, kun lia multege da menso, ĉar li ne havas eĉ iometan koron, sed anstataŭe du litrojn da cerbo estas en li. Sed li nun rigardas malgaje.

“Vi ĉiam estis nefidinda Jimmy la Ĝisorela, vi ĉiam konsideris min, kiel mensogulon kaj friponon, sed ĝi ne estas bona al tiu, kiu ĉiam serĉas trabon en alies okuloj.

Li diris tion. Kaj li estis malgaja…

Mi daŭrigis:

“Mi neniam insultis vin, kaj vi ĉiam parolas malbonon pri mi.

“Nu do” li respondas, “jen estas multe da atestantoj, neniu el ili konfesos false, ĉar ni ne pagas al ili. Ili pruvas, ke mi hodiaŭ diris multe da bono pri vi. Ĉar mia konscienco

preziĝis, kaj ankaŭ mi mem pensis, ke tiu Jimmy la Ĝisorela ne estas malbona knabo… Li ne estas saĝa, li ne havas multe da korektaj paŝoj, kaj li ne estis tute senkulpe kondamnita, kaj oni pendumis jam pli honestan homon, ol li, tamen li ne estas malbona knabo, tio certas.” Iomete kortuŝis min, ke li laŭdis min tiel post la vagofrapado, kiu okazis tiun tagon. Mi pensis serĉi la matrosojn, kaj mi iris en la drinkejon “Blokiĝado”. Ties proprietulo estis homo, nomoata Rolland, kiu rompŝtelis kun sia iu amiko, sed sekvan tagon li eksciis, ke ili prirabis la kason de la Senpaga Laktodistribuejo de Suĉinfanoj, kaj li estis tia knabo, ke li reportis la rabitan monon. Kvankam oni enkarcerigis lin pro tio. Sed li malliberiĝis, kaj riĉa homo malfermis drinkejon por li, pro lia noblaanimeco. Ĝi estis la “DONACADEJO”, aŭ la INSTITUTO DE NEPRIZORGITAJ PLENKREKULOJ, KIUJ DEVAS PAGI POR LA ALKOHOLAĴO”.. Miaj tri matrosoj sidis tie, kiuj rigardis al mi, kaj unu sur la alian kun moka rideto. Mi demandis la proprietulon, kie mi povus surpreni mian laborkitelon? Tiam mi ekvidis la Tendenulon la Fervoran, kies sekreton nun jam scias multaj homoj: ke efektive li estas la Trebiĉ la Vera. Li aspektis strange en sia nigra, artista ĉapelo, kun siaj elpendantaj, longaj, grizaj haroj, kiel li strabe rigardis al mi super sia dratkadra nazumo, metita sur sian nazpinton, kaj li havis tiel longan, nigran redingoton, ke pro tio li ŝparis la pantalonon.

Eble li scias ion, ĉar li estas flarema homo. “Mi iris al li!”

“Ĉu mi insultis iun ĉi tie? Parolu Tendenulo la Ferora! Vi estas saĝa. Ĉu iu kalumniis aŭ skoldis min?”

Li respondis:

“Jimmy la Ĝisorela, pli granda problemo estas ĉi tie. Ĝi okazis, ke Fred la Malpura laŭdis vin! Oni malfacile povas toleri tion!”

Tiam evidentiĝis:

Tiu Fred la Malpura sidis tie. Kaj la refreŝigilo el frambosiropo fluegis jam dum la tuta posttagmezo. Kaj li diris ĉiam, kiam venis mia iu matroso.

“Mi aŭdis, ke vi dingiĝis al Jimmy la Ĝisorela! Kiu nun jam fariĝis oficiro!.. Li estas bonega knabo.”

Ili respondis jese. Kaj li daŭrigis:

“Tiu Jimmy la Ĝisorela ne estas tiel ordinara prizonbirdo, kiel li aspekta. Li havas saĝon kaj telenton.”

Iu diris responde:

“Nu-nu. Jimmy la Ĝisorela tamen estas Jimmy la Ĝisorela. Kaj troviĝas tia homo ĉi tie, kiel li.”

Sed la olda Fred la Malpura nur trinkis la refreŝigilon el frambosiropo, li nur kapbalancis kaj diris:

“Mi vidis ĉiam, ke li estas multe pri sperta pri la ŝipvaturado sur la maro, ol la aliaj. Kiam li vestas sin per la uniformo, videbliĝas, ke iu estas en ĝi.”

Roĉild la Malavara freneziĝis pro tio, kaj Vanek la Dornhara diris tion, ke li ne trankvilos, ĝis mi ne estos tia neniulo, kia mi estis. Sed tia mi ne estos!

Kaj tiam Filipo la Diru-jam, la ulo kun dubindaj vivtenaj rimedoj respondas:

Tiu Jimmy la Ĝisorelo estas granda, plenbloviĝinta urinveziko de bovo, kio iam krevas, restos nenio alia, nur idioto kaj veziko.”

Surpreninte la laborkitelon, mi kuregis reen. En la restoracion KAPTU LIAN KOLON RITZ”

“Vi, satano, kial vi laŭdis min?”

Li respondis:

“Ĵus vi skoldis min, ke mi diras malbonon pri vi, kaj nun vi riproĉas min, ke mi diras bonon pri vi. Do nek tio, nek ĉi tio estas bona. Kion mi faru, ke vi estu kontenta?

Kiel travidi ies intencon?! Tial mi ne povas interbatadi, ĉar vi diris, ke mi estas pli bona, ol aliaj.

Mi diris:

“Kial vi ŝercadas per la refreŝigilo el frambosiropo?”

Li respondis:

“Ĉu vi ne aŭdis, ke mi vizitis kuraciston?”

Mi diris: “Kiun interesas, ĉe kiu vi faras rompoŝtelon.” Li respondis:

“Mi estis ĉe la kuracisto, kiu faris diagnozon pri mia malsano. Mi ne plu povas surmariĝi, mi ne plu povas trinki brandon, ĉar la kormalsano atakis mian plumon. Ofte okazas, ke la koro pligrandiĝas, kaj la pulmo ne havas sufiĉe da loko. Oni nomas ĝin stomak-kataro, kion kaŭzas astmo.”

Via Reĝa moŝto certe scias, ke ĝi estas tiel. Tio certas, ke ĝi sonas tre verŝajna. Kaj nek Fred la Malpura estas el fero, kvankam tio ne estis evidenta ĝis nun.

Mi diris: “Se vian cerbon ne atakis renmalsano, diru konsile, kion vi farus en mia situacio?”

Post mallonga pensado li respondis?

“Mi opinias, ke mi estus memmortiganto.”

Tiam mi denove foriris. Kaj tiu Watson akiris personaron. Kio estas tre ĝena por mi. Ili konsistas nur el friponoj, kaj tio konsekvencas el ĝi, ke ankaŭ la homo estas tia, kiel la tago: Bonas, se oni ne laŭdas la ĝin antaŭ la vesperiĝo, precipe tiulon, kiel Fred la Malpura. Per tio mi finas mian leteron,

estimanto de via Reĝa moŝto: Don Ĝisorela.

La ceterajn sube mi daŭrigos sekvan tagon, ĉar mi ne rezignis, kaj okazis grandaj eventoj, kiujn mi jen skribos sube. Estis granda sensacio en San-Francisko, kaj mi trinkis kun Vasiĉ, ke ni ekveturos.

Ni trinkis kaj rigardis la ŝipon kune, ankrantan en la haveno, per kiu la ekspedicio de sinjoro Theo ekveturos. Poste ni trinkis denove, ĉar Vasiĉ post la batfaligo trovis oran cigaredujon ĉe Theo. Ankaŭ mi decidis fari honorviziton ĉe sinjoro Theo dum la lasta tago, kaj mi eksidos ĉe li por momento. Estu laŭ la danco de l’ ŝanco! Kaj en tiu cigaredujo estis la provo. Servistino malfermis la pordon en la antaŭĉambro, ĉar alia homo ne loĝis tie. Mi malfermis la pordon de la salono, sed neniu estis tie. Mi do atendis. Sed okulfrapis al mi, ke oni forportis la tabakujon de tie ĉi. Ĝi estas bela konduto. Bonaj gastoj povas viziti ĉi tien. Ŝed troviĝis granda, blua ŝranko tie. Ĝi estis ŝlosita. Feliĉe, mi venkas tiajn malfacilaĵojn. Mi havas porteblan ŝu-butonumilon laŭ la sistemo de Werheim. Mi jam multe da pordoj malfermis per ĝi. Sed je mia plej granda surprizo…

Via Reĝa moŝto estas ĝentlemano, mi do povas konfidi ĉiun friponaĵon al vi! Kaj la mokincito komenciĝis tie! Eble iu loĝis en tiu ŝranko! Ĉar ĝi estis meblita tre komforte, kun salamo kaj kun vetolilo, kaj kun komforto, ke mi volonte

estus pasiginta tiun unu kaj duon jarojn, rilate la faradon de papersaketoj. Sed aŭdinte paŝojn, mi kaŝiĝis en la ŝranko kaj butonumis la pordon zorgeme. Proksimiĝis ŝtelumaj paŝoj! Ŝajnis evidente, ke kolego venos. Li rompŝtelos. Ankaŭ li konjektas valoraĵojn en la ŝranko, ĉar li ŝtelumas ĉi tie kaj koliuzos kun mi! La fak-terminalo nomas ĝin karambolo ĉe la fervojoj. Singarde li enmetas ŝlosilon, pri kio mi nur ridis, ĉar laŭ mia malnova kutimo, mi lasis la ŝu-butonumilon en la seruro. Sed la kolego temen estis videbla ĝistrunke tra la truo, kio servis por preni aeron. Mi ankoraŭ ne vidis tian kolegon! Li portis frotiran banmantelon kaj cetere nur lia propra haŭto. Mi ne vidis la vizaĝon, sed eble nek haŭto estis sur tio, ĉar tamen li blasfemis! En frotira banmantelo! Ŝajnas, ke li venas rompoŝteli el la strando. Aŭ li banis sin ĉi tie, kaj ankaŭ ĝi estas tute utile. Sed nun fostotremis tiel, ke la frotira banmantelo falis de sur li, kiel la kovrotuko de sur la freŝe farita statuo. Sed li ne estis tia, ke oni eternigu lian staturon en marmoro sur iu ĉefplaco. Kvankam mi vidis lin ĝistrunke, sed nek la ceterj estas malpligravigaj cirkonstancoj, se lia kapo estas tiel bela, kiel tiu de Robert Tajlor.

Nun li kaŝiĝis rapide, mi pensas, ke sub la lito. Nun venis, kiel hokbato el serena ĉielo, sinjoro Theo. Mi vidis nek lian vizaĝon, sed mi rekonis lian voĉon. Li frapetas sur la ŝranko al mi preskaŭ ekteruris, kaj li diris:

“Nun restu silenta! Kvankam! Ĉar alvenis pakaĵportistoj sur la ŝipon, kaj ili transportos ankaŭ vin! Ni ekveturos, ĉar ni jam havas matrosojn!”

Ĉu vi komprnas?!.. Kio ĝi estas?… Kaj nun klariĝis antaŭ mi, kvazaŭ mi estus ricevinta mirindan maldekstraman rektan baton: tiu homo nomiĝas Gustavo Bahr, pro kiu la ekspedicio ekveturos!

Eblas, ke nun temas pri trompo ĉi tie. Oni kaŝis lin ie en la ŝranko, kaj li nun ĵus banis sin! Li do tute ne volis rompoŝteli. Kaj nek manĝis lin la kainbalaj indianoj! Se mi estus vidinta lin pli fure, mi ne estus kredinta, ke ekzistas tiel malfeliĉan sorton havanta kanibalo, kiu manĝus lin! Sed kiu ajn povintus ekparoli, jam venis la laboristoj, portantaj lin sur la ŝipon. Li sub la lito ne povis ekmoviĝi!

Alo! Kio ĝi estas?

Oni eklevis la ŝrankon!.. Kun mi!

Ili simple portis min sur la ŝarĝaŭton. Mi devis tute neglekti la fuĝon, ĉar mi ne havis eblon fari kion ajn. Poste ili demetis min en la haveno, apud la kargotajn pakaĵojn. Nur tie mi malfermis la pordon per la ŝu-buonumilo, kaj mi elvenis. Kion fari? Nun okazos problemo pri la trompo. Nun mi devas reiri por venigi la turpan scienculon. Tio estas senduba. Ĉar mi ne estas difektando de ia bono. Kaj nun okazos al Theo malagrablaĵo, pensante, ke Gustavo Bahr estas en la ŝranko, kaj li kunportos min anstataŭ li!

Mi rerapidis en la loĝejon. Sed la scienculo ne estis tie.

Tiam fine venis kapo el la banĉambro.

Li estas tiu! Li diris kun tremanta voĉo, ke li ne havas vestaĵon, kaj li ŝatus foriri de tie ĉi. Mi respondis, ke mi venis ĝuste tial, ĉar la ekspedicio valoras nenion sen vi. Sed li diris, ke li ne volas veni, nun li ŝatus havi nur vestaĵon. Mi batis lin je la kapo rapide kaj metis lin en la malgrandan dokumentŝrankon, sed mi devis la kompatindulon tre ĉifi, sed poste, kiel oni diras, li “povos glatiĝi pendigite”.

Datita propramane:

Via Ekskolego.

## O K A Ĉ A P I T R O

Ili apenaŭ forlasis la havenon, kiam okazis la tragedio: profesoro Maxbell diris al Theo dece al viro, sed kun tremanta barbo:

– Mi opinias, ke mi malsaniĝis je tifo. Ne perdu vian kapon. Mi petas nur simplan maristan entombigon: La ondoj englutu min.

– Sinjoro! Antaŭ ol ondoj starigus vin al neŝanĝebla fakto, ni demandu la kuraciston.

Ili serĉis la kuraciston. Laŭ Watson li estis sur la ŝipo antaŭ la ekveturo, li kunveturigis lin. Ankaŭ Jimmy la Ĝisorela serĉis lin. Kie en la infero li estas? Eĉ dufoje li preterkuris Sigorski-on. La unuokula lakeo apogiĝis al la balustrado kaj revadis.

Eĉ antaŭ la ekveturo li ekvidis lin ŝtelumeti inter la kajutoj. Nu atendu! Per iu stango, uzata por ruligi la pezajn pakaĵojn li batis dek minutojn la grasiĝantan, blankharan adoleskaĉuloj. Li faris bonegan laboron. Li kuntrenis la kuraciston en la moderne instalita operaciejon, ke la ĝuo estu senĝena, kaj kiam la du stangoj rompiĝis, nur tiam li piedbate forigis lin de sur la ŝipo.

Nun li rigardis la akvon reveme.

Jimmy la Ĝisorele traserĉis la ŝipon svitante. Vane. Sur la ferdeko venis renkonte Sokrato Scheachta, aŭ sinjoro Knapp (laŭ via plaĉo). La gutoforma ekzekutisto, en sia smokingo, portanta cilindran ĉapelon, li staradis, kiel indifernenta pasaĝero. Kelkfoje li elprenis el la malantaŭa poŝo sian lornon kaj rigadis tra ĝi.

– Aŭskultu min – diris Jimmy la Ĝisorela rapide. – Vi povas nun fari grandan servon, se vi volas. Mi ne scias, kiel ĝi povis okazi, kvankam mi faris la organizadon ĉi tie, kaj nun la kuracisto estas nenie. Ĝis ni alvenos en havenon, entreprenu aranĝi la aferon de la malsanaj pasaĝeroj.

– En ordo. Mi mortigos ilin – li respondis eklevinte sian ŝultron. – Sed ekskluzive nur elektre.

Kaj li tuj demetis sian dekstran manumon.

– Ne mokincitu min, ĉar mi deŝiros viajn orelojn. Ŝajnigu, kvazaŭ vi estus kuracisto! Venu!

Sinjoro Theo ŝtoniĝis, kiam Jimmy la Ĝisorela kunvenigis Sokraton Schwachta aŭ sinjoron Knapp (laŭ via plaĉo), kiu atenteme aŭskultadis la brustokeston de la profesoro per sia lorno.

– Nu? – demandis Maxbell kun subpremita maltrankvilo. – Ĉu vi trovas ĝin grava?

– En via aĝo ne… Fine ja, kiom longe vi deziras vivi?

– Kiel??… Sinjoro, la geografoj havas longan vivon.

– Se ne kalkuli la esceptojn. Kaj tiurilate mi ĉiam tre estimis vin.

Jimmi la Ĝisorela ĉirkaŭrigardis, kion ĵeti al la ekzekutisto.

– La sinjoro bibliofilo asertas tiun idiotaĵon – diris la fregat-kapitano minace, – ke li malsaniĝis je tifo. Trnkviligu lin!

– Mi ne povas trankviligi sinjoron Maxbell – li respondis malvarmkondute. – Li vere havas tifon… kvankam… – li

aldonis heziteme. – Tio ne certas. Elŝovu vian langon! Hm… Jes… Ĉu vi ne kutimas ekdormi en la bankuvo?

– Neniam.

– Tiam vi havas lepron – li diris eklevinte sian ŝultron kaj ĝemis, kvazaŭ rezignante la neŝanĝeblan aferon. – Sinjoro, vi mortos. Estos aparta bonŝanco, se vi ĝisvivos la matenon. Ni fidu tion.

Kaj li foriris al la bufedo, ĉar li devis trinki bieron.

– Impertinenteco – hurlis la profesoro kolerege. – Tiel paroli kun mortanto!.. Sinjoroj, mi postulas fari protokolon pri la konduto de la kuracisto, kaj okaze de mia morto raportu tion al Maurois, kiu verkas mian biografion!

Poste Jimmy la Ĝisorela en iu malluma turniĝejo flankentiris la ekzekutiston, kaptinte lin je la kolo.

– Diru, kial vi insolentis antaŭ nelonge?

– Bonvolu kredi, ke laŭ mi kuracista konstato la profesoro havas tifon aŭ lepron. La falsa dignozo estas grava krimo, tial vi devas korupti min per alta monsumo.

– Oldulo mia – diris Jimmy la Ĝisorela kun rekono, – vi ne estas perdiĝinta homo. Sed se dumvoje vi temane estus tio, tiam do sciu, ke mi perdis vin.

Baldaŭ la profesoro, ĉar li fariĝis ĉiam pli kolera pro la “kuracisto”, li ekregis sin. Grumblante li studadis siajn mapojn kaj la kunportitajn instrumentojn. Li multe klarigis al la butbaljuĝisto, kiu pro ia kaŭzo pensis lin fama, dana geologo, kiu traktis lin kun alta estimo.

– Laŭ vi, tre respektata sinjoro – kaj li montris sur punkton, – kio estas la situo de tiu flanke troviĝanta insulo ĉi-antaŭe?

– Hm... Ĝi estas en tipa ofsajdo, se ni konideras la Fiĝiojn elektita, avanula linio.

Maxbell ne komprenis ĝin, sed li ĉiam zorgeme forkaŝis tiaĵon. Li do mezuradis per cirkelo. Baldaŭ ankaŭ la oraĵisto venis tien, kaj triope ili interkonsiliĝis intense. Sed la anatomo amindumis la junan kaj grasiĝintan edzinon de la futbaljuĝisto, rakontante in malnovan, gajan historion, kiam li ankoraŭ konsideris ĉiun kadavran lividajon strangolado, estante komencanta prosektoro, dum sia poezia perido. Kie estas tiuj malnovaj, bela tempoj?

La edzino de la ftbaljuĝisto ridetis. Ŝi ĉiam ridetis, pli per fiksado de siaj buŝanguloj, kvazaŭ gaje, ĉar ŝi estis tiel stulta, ke ŝi komprenis nek simplajn, primitivajn frazojn, kaj ŝi uzis la ĝeneralan bonhumoron kontraŭ tio.

Dume sinjoro Theo brakoprenis la fregat-leŭtenanton.

– Venu!

Ili iris en la kajuton de Jimmy la Ĝisorela, kie estis la dokumentŝranko. Ili frapetis, sed nur mallaŭta ĝemo aŭdiĝis.

– Li ankoraŭ vivas – diris sinjoro Theo kun rekono kaj malfermis la pordon.

Ili sentis tuj morti.

...D-ro A. Winter elpaŝis ploretante el la ŝranko, fleksiĝinte kurbdorsa, kiel duone fermita libro, kiam oni anstataŭigas en tio la paĝindikilon per alumet-skatolo.

## N A Ŭ A Ĉ AP I T R O

Kiel venis sinjoro A. Winter ĉi tien, kiun unu horon antaŭ la ekveturo Singorski, kvankam en la operaciejo de la vaporŝipo, sed sen la uzo de la dormigilo estanta ĉemane, tiel draste draŝis kaj piedbate forigis lin de sur la ŝipo?

Simple kaj rapide li revenis denove, ĉar li sciis, ke Sigorski estas sur la ŝipo, li iris trankivle en la hejmon de la milionulo.

– Redonu mian monon! – li ploregis energie al la sekretario, kiu jam nur sola estis en la loĝejo.

– Kial?

– Mi ne plu parolos kun vi! Vi estas trompisto! Se vi ne redonos mian monon, mi denuncos vin!

Thorn sentis tiel, ke li perdos sian laboron, se la koruptado evidentiĝos. Diablo forportu lin! Sed li havis nur kelkajn ŝilingojn ĉi si.

– Atendu min ĉi tie! Mi portos vian monon.

A. Winter sidis malgaje kaj maĉis siajn ungojn, kiam alvenis sinjoro de ie en frotira banmantelo. Ankaŭ li estis korpulenta, krome tre malgaja. Aŭ serioza rezoluto miksiĝis en lian malgajon.

– Estu kore salutata.

– Bonan tagon. Mia nomo estas A. Winter.

– Nu!.. Ĉu vi estas tiu?! – demandis la moroza baniĝinto atekeme. Diru, kion vi scias efektive pri Sambi-Sumbi!? Kaj pri la tribo Tulango?!! Ĉu!?

“Hura!” – kriis A. Winter anime timiĝinte. – “Sekvos batoj!”

– Kredu min… mi nenion scias pri tiuj aferoj – li balbutaĉis kaj aldonis tuj timeme: – Sed se vi deziras, mi lernos kion ajn pri tiuj!

– Jes? – li demandis krude kaj ĉirkaŭrigardis, kvazaŭ li ŝatus, se peza, metala objekto estu ĉemane. – Ĝenerale, sinjoro, diru: kion kunportas surmara Hanibalo?

“Ni estas ĉe la temo!” – ŝrikis A. Winter interne. – “De Hanibalo hareto da Rubikon disigas lin de la unua vangofrapo!”

– Mi informiĝis tiel – li spiregis retropaŝante, raŭke, – ke sur marvojaĝon… nu… sup-kondimenton… aŭ… sekan paston!.. Kaj… jen! Ŝustreĉilon oni kunportos!.. – Subite li malesperiĝis kaj diris: – Ne demandu min plu. Ni komencu: batu min, ĉar vespere mi havas farendaĵon.

La moroza strand-baniĝanto rigardis lin. De la kapo ĝis la piedoj, malestime, sed ankaŭ kaŝita envio latentis en liaj okuloj.

– Ĉu vi estas klarvida pri tio, ke nun mi batos vin duonmorta?

– Eĉ momenton mi ne dubis pri tio.

Kaj li metis sian poŝhorloĝon sur la tablon. Ĝi jam haltis dum la unua batado.

– Vidu do – diris Gustavo Bahr afable. – Vi estas en la faŭko de la morto. Se vi volas, ke la morto graku anstataŭ gluto, tiel do baniĝu!

– Kiel?

La enigma homo, kiel la animo de masaĝisto, reveninta el la transa mondo, diris minacege:

– Baniĝu, se via vivo estas kara por vi!

– Bone… – li balbutaĉis timiĝinte, kaj kvazaŭ li estus preparinta sin paŝi antaŭ la toporon de la ekzekutisto, konsciante pri sia martiriĝo, li malbutonumis sian veŝton.

– Mi venigos vin ien, ke vi prezentu refuton! Sed al tio estas necese, ke vi ordigu vin! Baniĝu! – Ripetis la masaĝisto fantomeske, kaj liaj okuloj brilis avide.

La infaneska A. Winter post kvin minutoj sidis en la bankuvo kaj ridetante plaŭdis en la akvo. Ŝajnis, ke ĉio ŝanĝiĝis bona.

Sed baldaŭ evidentiĝis, ke iu ŝtelis liajn vestojn kaj ŝlosis la pordon de la banĉambro.

Ĝi malfermiĝis denove post pli ol kvaronhoro, kaj la doktoro elrigardis malkuraĝe. La ceterajn ni scias. Jimmy la Ĝisorela pakis A. Winter-on en la malpli grandan ŝrankon, li reportis lin sur la ŝipon, kaj nun oni batis lin gaje pro Chaplin, Hanibalo, pro la sekaj pastoj kaj pro liaj ceteraj, gravaj kulpoj.

Sed A. Winter jam ne klopodis pene informi ilin, li apenaŭ protestis, eĉ certagrade li kondiseris la batadon konstantiĝinta, nova vivcirkonstanco, do inter du vangofrapoj kaj unu pedbato ekideis al li, ke li lasis siajn okulvitrojn ie.

Theo nun fine sentis tiel, ke li definitive aranĝos la aferon de tiu trudiĝema ulaĉo, kaj Jimmy la Ĝisorela ŝajnas, ke solidare al sia dunganto, ankaŭ li survangis la kompatindan kuraciston, naskiĝintan sub malfavora konstelacio.

Ili tre draste batis d-ron A. Winter.

Konkuludo: Kiu estas senkulpa en ĉio, kaj li tamen ploras pro ĉio, tiun, ŝajnas tiel, ke pli malpli poste oni batas lin rekalkulante por ĉio, interŝanĝante la vicordon de kaŭzo kaj kaŭzitaĵo.

Kaj li staris tie nude. Pro tio ili batis lin aparte.

– Ĉu vi scias, kial ni batas vin? – spiregis Theo.

– Jes, mi scias. Pro Hanibalo.

– Kaj pro Kolumbo?! Kaj pro Hanibalo?!

Li kapbalancis amare.

– Vi ne devas puniĝis pro ĉiuj famuloj de la mondo. Kaj poste sekvos la ŝustreĉilo, krome la sekaj pastoj.

– Nun ni zorgos pri tio, ke vi ne flaraĉu! Vi estos fermita en la bilĝon.

Ili portis la dokumentŝrankon kun A. Winter en la bilĝon, kiam ili sukcesis dum longe tempo pene premadi lin genue, pugne en sian lokon, kvankam Jimmy la Ĝisorela jam pensis pri tio, ke li iris supren kaj pruntepetos la ŝu-kornon de Maxbell. Fine iel-tiel la kuracisto kunfaldite kaŭris en la ŝranko, kiel melankolia dosiero, kaj tiam ili fermis ĝian pordon.

– La tuto finiĝis – spiregis Jimmy la Ĝisorela. – Tiu freneza profesoro vojeraris sian ŝrankon du meridianojn. Kaj mi estas ties kaŭzinto. Mi tre bedaŭras ĝin.

– Mi ne rezignas la esperon – ekparolis Theo ĝemante. – Eble li donos vivsignon de hejme.

Kaj ŝajnas, ke la milionulo trafis tion.

Hidroplano alvenis super la ŝipon Stanley Up To Date, kaj ne malproksime de la ŝipo ĝi malsupreniĝis tute ĝis super la akvosurfacon, kaj elĵetinte malgrangan buon, ĝi forflugis…

Letero!.. Oni jam alportas tion! Ĝi estas adresita al sinjoro Theo!

Li kaptas ĝin avide. Jimmy la Ĝisorela apenaŭ povas regi sin.

– Ni tamen gajnis la ludpartion – li flustris.

Ses li eraris, ĉar jen tio estis skribita en la letero:

“Kara sinjoro Theo!

Bedaŭrinde okazis grava problemo, kaj mi klopodas korekti ĝin. Vi lasis hejme viajn ambaŭ piĵamojn! Vi jam ne portis la flavan, sed vi bezonos la blue punktitan. Mi ne sendis ĝin per la aeroplano, ĉar ĝi ne estas gladita. Tagmeze vizitis min ĉarlatano, ke mi donu monon al li, ĉar li deziras flugi, ĉar li planis komunan trompon kun Vi. Kompreneble mi tuj elĵetis lin. La vidvino de Gustavo Bahr (?) vizitis min, ke mi ĉiĉeronu ŝie en San-Francisko. Mi montris al ŝi la novan fiŝ-vendohalon. Ŝi ne tro entuziasmis pro tio. La virino ekveturos hodiaŭ vespere per la ŝipo SAKRAMENTO. Ŝi asertas, ke ŝia spirito estas kun Vi. Mi diris, ke ŝi vidas fantomojn, kion ŝi ne neis, sed ŝi meciis la nervostaton, nomata spiritismo por sia mempravigo. Plurfoje ŝi buŝharmonikis, kaj tio tre incitis min. Cetere ŝi asertas, ke ŝi estas la gardospirito de la ekspedicio. Sed mi esperas, ke tiu danĝero ne minacas serioze. Sed se la spirito de la virino vere aperus sur la ŝipo, kaj sinjoro Theo renkontiĝus kun ŝi, diru al ŝi, ke ŝi lasis sian sunobrelon ĉi tie, kaj mi gardis ĝin. Novaĵo ne estas. Deziras multe da feliĉo:

HARRY C. THORN

P S: Via fianĉino resendis la oran ringon, ŝi nuligis la gefianĉiĝon, kaj laŭdire ŝi mortpafos Vin. Vi lasis hejme ankaŭ vian banmantelon.”

Jimmy la Ĝiorela ekparolis la unua.

– Diru, sinjoro Theo – li demandis mediteme, – de kie vi kolektis la plej grandajn bestojn de la universo?

– Trafe-maltrafe mi dungis ilin, kiel ankaŭ vin.

Antaŭtempesta vento de sinistraj okazaĵoj blovetis kun la intensiĝanta vespera aerblovo, kaj Theo cigaris moroze ĉe la balustrado. Li ne transvivos la honton.

– Malsuprenven al la kaptito – flustris apud li Jimmy la Ĝisorela, la kaŭzinto de la multe da problemo, en sia eleganta vestaĵo. Nun jam estus bone repacigi la ĵurnalistaĉon, se eblas!

– Mi sendos telegramon al Thorn – diris sinjoro Theo. – Nur li povas hepli aŭ la miraklo. Se li helpos, tio jam en si mem estas miraklo.

– Kaj dume venos la fantom-virino.

– Ni ne atendos ŝin…

– Hm… Kaj se venos ŝia spirito? Kun la buŝharmoniko?

Theo rigardis sur lin. Kun malgaja, malestima kapbalancado. Sed li diris nenion. “Idioto.” Ĝi estis videbla en liaj okuloj.

Dume ili alvenis al la bilĝo por rigardi A. Winter-on, kaj ili malfermis la dokumentŝrankon. Ili staris iom konsternitaj.

Sinjoro A. Winter simple malaperis el la ŝranko, de ekstere ŝlosita!

Theo gapis buŝmalferme al sia faktoto.

– Ĝi… vere estas interesega!..

Li neniel povis supreniri sur la helica ŝtuparo. Plenkreskulo ne povas enlokiĝi en barelojn aŭ en lignokestojn. Ili ekzakte traserĉis la deponejon.

– Li malaperis senspure!

– Sinjoro Theo – diris Jimmy la Ĝisorela, – mi estas malnova maristo sur la akvo. Akceptu mian konsilon. Tiun vorton speciale, ke fantomo, neniam eldiru sur la ŝipo. Mi ne estas superstiĉa, kaj mi ne kredas absurdaĵojn, ĉar kiu ĉiun lundo kraĉas trifoje orienten sur brunan gruzelpecon, tiun ne trafos envulto. Vi do povas kredi, ke vi nun staras vid-al-vide ne al malinteligenta matros-tipo. Sed malgraŭ mia klereco mi garde avertas vin uzi tiun vorton, ĉar oni neniam povas scii, kio konsekvencos el ĝi, se tiuj malsaĝaj matrosoj, kredantaj la lulfabelojn, aŭdos ĝin.

– Fantomoj ne ekzistas, sinjoro Ĝisorela. Nur fantomeskaj friponoj.

– Kio ĝi estas?!

Fajna, spirbloveto da buŝharmonika voĉo eksonetis en la mallumo, kaj ĝi tuj mutiĝis.

Sinjoro Theo diris nenion. Li ĉirkaŭrigardis. Eĉ unusola animo ne povis esti tie krom ili.

– Ĉi tie… nun jam – diris Jimmy la Ĝisorela raŭke – ni ne staru…

Li supreniris rapide, kaj estis bone enspiri la freŝan aeron.

## D E K A Ĉ A P I T R O

Proksimiĝis Honolulu! Grandaj arklampoj kaj spaliro de karaj, ekzotikaj palmoj.

Ĝi estis vere bela. Kaj la rodkapitano, ordonanta sur la pilot-vaporŝipo sciis nenion, ke la unua oficiro koleras pri la enviita pozicio de Watson, staranta sur la kapitana ponto. Se li estus sciinta tion, tiam eble ni ne kriegus pro la falinta ŝnurego tiel grobe, ke Jimmy la Ĝisorela havas okazon denombri la genealogian arbon de la rodkapitano, konjektante precipe vicon de gnomaj, degeneriĝintaj homojn laŭ ascenda branĉo, interalie kentaursimilan, duone bestan, sed duone nek homan estaĵon, Jimmy la Ĝisorela priskribis eĉ praulojn, tute apatenantajn al la remaĉula tipo de varmsangaj mamuloj, kiel la fondintojn de la genealogia arbo de la rodkapitano, fin-branĉe li mencias unusolan ĉefan praulon, drinkeman, cerbmalsanan, rinocerforman bufon, al kio (laŭ Jimmy la Ĝisorela) la rodkapitano eĉ nun pleje similas.

Unue ili ankris tre malproksime de la haveno, dum okazis la kontrol-molestado de la multspeca, nemalhavebla instanco. Jam estis videbla la inkokolora, grandega makulo de la homamaso, atendanta sur la bordo, malantaŭ la polvovualoj de la vesperiĝo, krepuskanta kun kuprokoloraj nuancoj, kaj filtrita buo sonis de tie, forviŝiĝinte. Indiĝenaj boatoj, sampanoj savarmis ĉirkaŭ Stanley Up To Date, kaj de sur tiuj, kiel invado de rezolutaj, sturmantaj piratoj, viglaj indiĝenoj kun brilanta korpo inundas la ŝipon, oreltranĉe babilaĉante. Malajaj junuloj kun fruktokorboj, balanciĝantaj sur ilia kapo, kun malajaj popolartaj varoj, importitaj el Lejpcigo, atingas tiun punkton de la ferdeko, kie staras sinjoro Arturo Maxbell en ĵaketo kaj cilindra ĉapelo, kiel la dio de la geografia esplorado, juĝanta en civila vestaĵo, en lia mano estis longa

paperfolio, el kiu li murmuras preĝon, kies titolo estas salutparolo. Lia ĵaketo donas ian ĝirafsimilan karakteron al lia eksteraĵo, nur kun tiom da diferenco, ke oni neniam vidis tiun beston porti cilindran ĉapelon, kaj certe ĝi kutimas lerni nek salutparolon.

La panikemaj indiĝenoj ĵetas sin vizaĝaltere antaŭ li, kion li rigardas atenteme super la krado de siaj okulvitroj, kaj li diras indigne al la proksime staranta anatomo pri la tien promenanta, malhelbruna, sed kelkloke laktokaf-kolora, stranga homo:

– Vi geologoj ne scias, kiel malbone estas tio, kiam aperas tia indiĝeno, kiu laŭ mia ĉefverko estas la membro de la tribo “Kaŭkazid-Tamol”, kaj tiel la junulo efektive jam formortis kelkajn cent jarojn, kion sendubigas ankaŭ la laktokaf-kolore, striita haŭto.

– Tiu koloro vere estas konata – rimarkis doktoro Rüger. – Ĝi memorigas pri alikoloriĝo de lezoj, resaniĝantaj pli ol ok tagojn. Precipe pro la blankaj strioj.

Maxbell turninte sin al la brunhaŭtulo, li respondigis lin en tamol-a lingvo, kial ili ne formortis jam antaŭ pli ol multcent jaroj? La koncernulo respondis tion, ke la profesoro iru el sia vojo, ĉar li serĉos la hokstangon. Cetere li nomiĝas Wander, kaj la striojn kaŭzis la fluetanta ŝvito sur lia korpo, ĉar ĝi solvas la laktokaf-koloron. Cetere li estas matroso.

Granda bruo okazas sur la promenferdeko.

La ekzekutisto protestas energie, ĉar oni foprenis lian fotoaparaton, kaj plorspasmo kaptis la oraĵiston pro la eksitaj eventoj. Sinjoro Theo promenis nervoze en sia kajuto.

Iom post iom vesperiĝas.

Kaj tiam okazis la vera, decida plago!

La milionulo eĉ post jaroj, kiam li atingis tiun parton de la rakonto, li faris kelkajn enspirojn da paŭzo, kaj kuntirinte siajn brovojn, li rigardis la cindron de sia cigaro, kun drameca silento, kaj iom solene li komencis rakonti la mistikan travivaĵon…

La ŝipo ankris en la iom sufoke varma, mistika, multrilate jam en la hinda nokto. La bordo estis forviŝiĝinte, vizie videbla malantaŭ haloaj lampoj kun sia ekzotika flaŭro.

La grumo ankoraŭ alportis teon antaŭ unu minuto kaj ĝustigis la murhorloĝon. Li memoris tion bone. Ĉio ŝajnis tiel trankvila en la nokto…

Tiam venis, kvazaŭ li estus reviviĝinta el superstiĉaj, orientajn historioj kaj el religiaj legendoj, aŭ naskiĝinta el la drako-desegnaĵoj de opiaj fumoj, li venis, kiel la fato, el la krepusko de hinda balado, timige, kaj moroze, kiel la sorto mem… Sinjoro Wangner!

Jes!

Sinjoro Wagner venis! Aŭ li alvenis, kiel la fato, persone, kaj li haltis sur la sojlo! Kaj ŝajnis, ke ĉiu devas morti tuj, kiu vidas lin, ĉar elkreskinte el liaj du tempioj, laŭ regula cirklo ĝis lia ventro li portis grandegan rondbarbon, kaj tiu hararo estis blua!

Blua!

Tiel blua, preksaŭ lumanta, fontomeske brilanta, en obtuza, lapis-lazura ardo de signallampoj, tiel timige viglakolora kaj tute blua, ke tiu vidvibris, kiu vidis lin!

Tiu aperaĵo estis pli ol mita! Ĉar sinjoro Wagner estis pli multe en siaj ĉiuj manifestiĝoj, ol la valorlimo de la homaj ecoj, esprimeblaj per epiteto. Eĉ lia anasa irmaniero estis pli ol kurbakrura, ĉar sinjoro Wagner estis ankaŭ ebria, sed lia ebrieco estis pli ol narkoto, ĉar sinjoro Wagner estis iomete ankaŭ profeto, en sia sennuba gajeco, streĉiĝanta supermezure, ĝisesktreme, preskaŭ en ĉiu momento preta ĉirkaŭbrakumi la tutan mondon, kie la festo daŭras ses monatojn, kaj la sesa tago estas por la laboro, sed oni tradormas ĝin. Kaj dume li estas tiel nekredeble konsternige, elefante malbela, krokodilsimile serena, kaj bonvoleme indiferenta, ke ke li same meritas envion kaj bedaŭron. Lia veruka, falta vizaĝo, liaj dikaj, larĝaj lipoj, la fieregaj, mankohavaj, brunaj dentoj estas tiaj, kiel malplena kukurbo, pretigita, kiel homkranio, kaj li portas ununuran, fieran kandelon, fiksitan apud sian cilindran ĉapelon.

Li havas trikotaĵon kun ruĝaj, blankaj, bluaj strioj, tatuitajn, brunajn brakojn, li forgesis forigi la pakĵportistan lignotabuleton de sur la ŝnuro, kiun li uzis, kiel rimenzonon, kaj liaj grandeaj ŝuoj antaŭsignis lian muzikemon, konfesitan poste, kun la kastanjetsimila klakado de la deiĝantaj plandumoj.

Sinjoro Theo momenton sentis tiel, ke li tuj falos surdorsen! Kaj okazis tiel. Sinjoro Wagner falis surdorsen kaj ekdormis. La milionulo kun la helpo de Jimmy la Ĝisorela, preskaŭ el la kvar anguloj de la kajuto kolektis tiun unusolan homon, tiel inerte, kun tiel disetenditaj brakoj li kuŝis sur la planko.

Ili surverŝis lin per akvo kaj apogis lin al la muro de la kajuto. Tiam li iomete skuis sin, oscedis kaj rimarkis kviete kun raŭka, stertora voĉo:

– Nur trankvile, mi petas… ankoraŭ okazis nenia problemo. Se mi parolas, bonvolu teni min

Iom post iom evidetniĝis, ke la vizitanto estas konata persono de la havenoj. Oni mencias lin, kiel la FABELBARBULO, LA LINIOŜIP-TRANĈILISTO. La predikata, unua parto de la nomo estas konata de tiu kosmetika katastrofo, kiam la barbo de sinjoro Wagner fariĝis blua. Ĉar antaŭ kelkaj tagoj li interkverelis kun la publike timita rabisto, nomata Silentema Drugiĉ. Oni nomis tiun homon ankaŭ Ok-etaĝa Drugiĉ, ĉar lia eskalo konsistis ĝuste el ok ŝtupoj, kiun li kunportis konstante. Neniu sciis, ke la Silentema (aŭ Ok-etaĝa) Drugiĉ kial kunportas konstante sian eskalon, kies ok ŝtupoj estas malmultaj por rompoŝteli. Drugiĉ nomis sian eskalon Melanie. Ĝi ĉiam estis kun li, kaj neniu sciis, kial?

La Linioŝip-Tranĉilisto havis ian diferencon kun Drugiĉ, kaj hazarde li menciis inter la diritaj insultoj eĉ tion, ke Drugiĉ estas multe pli idiota, ol lia ekslao. Tiam Drugiĉ apogis Melanie-on al la muro de domo kaj vangofrapis sian amikon. Sinjoro Wagner falis en unu kaj duon metrojn profundan ujon, en kiu oni miksis tiutage cejanbluan emajlofarbon por kovri per ĝi la kirason de la plej modernaj ŝipoj, Drugiĉ diris malaprobe al la mergiĝanta sinjoro Wangner:

– Kial vi devis miksi la eskalon en la aferon?…

Poste li surŝultrigis Melanie-on kaj foriris kun silentemaj paŝoj. Preteriranta matroso, eble li estis ebria, aŭ li ne sciis, kion li faras: savis sinjoron Wagner. Poste li havis multe da malagrablaĵo pro tio.

Li devintus razigi la akrakoloran barbon, ĝi envidentas, sed sinjoro Wagner ĝuste tiel forte persistis pri sia survanga hararo, kiel pri la blua koloro, kaj li sentis tiel, ke li ne povas vivi plu sen la densa, vira ornamaĵo.

Lia voĉo ofte transiris kun subita gajeco al raŭka, preskaŭ ŝrikanta tenoro de entuziasma, kolektiva homamo. Kaj ĝenerale jen tiel li kriis al siaj konatoj, venantaj renkonte: “Nu, kio nova? Kiel vi fartas? Ĉu denove en libea stato? Ĝi estas kara!” Li havis multe da malagrablaĵo, ĉar li opiniis la mondon unu granda, amika komunumo. Laŭ li tute gajaj homoj kuradas ĉi tie sur la tero, kaj li havas afablan kontakton kun ĉiu, ĉar iam li pasigis belajn tagojn en iu aŭ en la alia prizono aŭ en drinkejo. Kaj pro sia persista optimismo, lin ofte trafis optika trompo. “Nu, kio nova, kio nova?!” – li kriis eventuale kaj haltigis ĉefmuzikdirektoron, kaj li fingre minacis lin gemute, kiam tiu protestis: “Ne ludu la bankon, vi, friponeto! Vi vane neas antaŭ mi, ke vi ŝtelis ĵaketon ie!” Bedaŭrinde la plej gravaj malagrablaĵoj ne konvinkis lin pri tio, ke tiu ĉi mono ne estas la komunumo de fervoraj kaj serenaj homoj, similaj al li. Liaj konatoj, se ili ekvidas lin (kaj ĝi okazas) jam de malproksime ili jen tiel salutas lin: “Nu, kio nova, sinjoro Wagner?!” Kaj li nur apenaŭ diras ion responde kun iom da supraĵa distreco: Ankaŭ vi estu salutata! Kie mi estis tiel longe, ke vi ne vidis min?” Ĉar li konstante estis tiel ebria, ke tiaj ebriaj homoj nur plej malofte troviĝas en tiu ĉi mondo, kaj ĝenerale li sciis nek tion, de kie vi venas, kien li iras, tiel do li estis dankema pro ĉiu informo. Plej bone tio esprimis lian infanan gemuton, ke el parkoj, kie li loĝis nur plej mallongtempe, li ŝtelis freŝan floron por sia butontruo, kaj la malnovan li metis en sian poŝon. Liaj ĉiuj poŝoj estis plenaj de floroj. Kaj en sia ebrieco, revelacianta lian animan kolorblindecon, plelplena de senlima homamo de konstanta, kronika etilismo, li stertore kriadis al ĉiu, svingante sian ĉapelon: “Nu, kio nova!? Kio nova?”

Sed nun li rapidis.

– Sinjoro Trusto Pacifiko – komencis diri la nekredeble strange aspektanta homo solene, pri kiu oni jam tuj devis

pensi, ke li estas ne nura fantomo, ĉar li manĝis duonon da cigaro. – Mi staras ĉi tie kun aperta viziero.

Kvankam li staris tie, portanta nur cilindran ĉapon, kiu tamen estis rondforma, kiel kasko, kaj aperta, ĉar malplaton grand truo faŭkis sur ĝia supra parto.

– Al kiu mi havas la honoron – demandis sinjoro Theo, kiam la vidaĵo de la barbo kapabligis lin ekparoli.

– Mi estas "la" sinjoro Wagner – li diris kun memfida leĝereco de homo, havanta nomon, kiu certagrade fariĝis nocio. Edison, Franklin Benjamin aŭ eble lia parenco, ricevinta la baptomonon Richard ne povintus prezentiĝi pli bone al tiu Wagner en la firma konscio de sia ĝenerala konateco.

– Mi ja ne scias, kion vi deziras, kaj al kiu mi havas la honoron – diris sinjoro Theop ĝoje, ĉar li kolektis la tiulojn, – sed mi gastigas vin volonte. Bonvolu demitu viajn ĉapelon, barbon, kaj sidiĝu!

– Ĉu vi neniam aŭdis pri sinjoro Wagner?

– Jes. Sed mi ne kredas, ke vi estus la multe menciita Wagner – li respondis iom hezitante, kvazaŭ li tamen ne opinius malebla, ke la fama komponisto sidas ĉi tie kun blua barbo.

– Vi eraras – li respondis kun orgojla rideto. – Mi estas la multfoje menciita Wagner.

– Tiam mi precipe ĝojas – daŭrigis Theo rikanante, – kvankam mi aŭdis ĝin pri tiu Wagner, ke tiutempe li mortis en Venecio

– Nu, ne ĝuste. Oni nur tre draste batis lin, kaj poste mi kuŝis longe en la lito.

– Sinjoro Theo – interrompis Jimmy la Ĝisorela, – tiu homo, kies barbon oni certe kolorigis en la frenezulejo, por ke li ne povu fuĝi, nomata sinjoro Wanger, li estas ĉarlatano, ricevanta publikajn vangofrapojn, kies du mankantajn mueldentojn mi elbatis en Aleppo.

Aŭdinte tiujn vorton, sinjoro Wagner kapjesis kun aproba rideto de unupersone rekonita Nobel-premiito.

– Ĉu eble vi havas nenian komunan al la fama komponisto?

– Mi havas tre multe da komuna al la komponisto. Dum jaroj mia patro laboris ĉe orkestro de migranta oper-ensemblo.

– Kion ludis la maljunulo.

– Vetkuron de ĉevaloj. Kion li perlaboris ĉe la orkestro, tion li disipis per vetkuro de ĉevaloj. Cetere lia laboro estis zorigi pri la muziktono de la orkestro. Li portis la muzikinstrumentojn al la teatro. Kiam li dungiĝis, li estis nur solisto de violonĉelo. Poste jam oni konfidis al li du violonĉelojn. Kaj eventuale oni konfidis al li ankaŭ la alpan kornon. Oni uzas ĝin precipe dum operoj de certa komponisto, nomata Wagner, kiu estas mia nomparenco, kiu verkis la francan revolucion sub la titolo Siegfried, prezentatan per alpaj kornoj, ĉar preskaŭ la tuta ribelo okazas en la Alpoj. Ĝia heroo nomiĝas Siegfried, kiu estas nedifektebla, kaj li familia nomo estas sinjoro Gessler. De sur la kapo de tiu maljuna atisto sia propra filo depafis tutan paketon da ludkartoj… Ĉar la afero havis kunligon kun la kartludado, eĉ kun domeno kaj ankaŭ kun ruleto… Tial oni nomis iujn ludkartojn laŭ la opero kaj ribelo Vilhelmo Thell, verda fanto, kaj la kuraĝan knabeton lasta preno, kio estas trefo numero sesp. Jen venas la virino, ŝi nomiĝas Sibilo, sed kiam oni demandas ŝin, ŝi fariĝas cigno kaj kantas en tiu formo. Diregento Ŝekspiro, de kiu mi scias multe da humuraj

sentencoj, li diris pri tiu virino, “Kio nova. Via nomo estas virino”. Li singultis laŭte, kaj li estis proksime al sveno pro sia ebrieco. – Kiel vi vidas, sinjoro, mi okupiĝis sufiĉe multe pri operoj, mondhistorio kaj hazardludoj. Ni trinku ion laŭ mia opinio!

– Kio estas via alia nomo, ĉu Richard? – demandis Theo.

– Mia alia nomo estas same heroo de opero.

Jimmy la Ĝisorela kapjesis vigle.

– Estas tiel! Antaŭ nelonge oni nomis lin Kukurbo-fanto. Ankaŭ mi estas sperta pri la muziko, ĉar iam mi kartludis tage nokte.

– Mi volas paroli kun vi inter kvar okuloj – diris la blubarbulo kun subita malgajeco.

Jimmy la Ĝisorela foriris post la mansigno de la milionulo.

– Sinjoro… mi venis kun aperta viziero… – spiregis sinjoro Wagner enigme. La alpa korno, kiu ne ĉiam estis bezonata, ĝenerale al la komponaĵo de Wagner, ĝi signifis plus tridek cendojn da salajro. Pro la alpa korno ni havas la nomon Wagner, kaj en la rondo de muzikistoj oni mencias nin, kiel familion Wagner Alpa, kiam ili kalumniis nin. Mia patro nomis min laŭ itala opero dank’ al lia kromslaljro.

– Ĉu eblas – demandis sinjoro Theo, – ke vi nomiĝas Karmena? Tiuokaze niaj vojoj disiĝas.

– Mi ĝojas, ke ne estas tiel. En tiu teatraĵo drinkema rolulo ludis la arlekenon kun rompiĝinta koro, kaj li alportigis kruĉojn da biero. Ĝi estas tiu opero, pri kiu oni nomis min, kaj ĝi temas pri fama rabisto.

– Interese, ke mi ne pensis ĝuste pri tio.

– Mia tuta nomo estas Wagner Rinaldo-Rinaldini. Bela, itala poŝoŝtelisto estis la heroo, kaj poste li miksiĝas en ĝenan finalon kun virino nomata Helena la Bela.

– Mi tre ĝojas – ekparolis sinjoro Theo, – ke vi rakontis ĉion ĉin kun aperta viziero. Sed nun diru, kial vi venis?

– Mi diros tion sincere: mi petas cigaron… Dankon… Vi do aŭdu: Mi estis – li komencis malrapide turniĝanta lango – tiu homo, kiu peris negocon por la Magazino kaj la entrepreno Korporacio Wagner. Ĉar mi konas bone la ŝipojn, matrosojn, firmaojn, mi do estas klarvida pri la krimaferoj, kaj tiel mi entreprenas fari negocojn. Ni interkonsentu: kiu el ni trovos la profesoron, tiu dividos la gloron kun la alia.

– Mi ne deziras dividi la gloron kun vi

– Bone… – diris sinjoro Wagner ofendite, kaj lia barbo briletis en la koloroj de ĉielarko, dum la vesperaj sunradioj. – Tiuokaze mi provos foriri.

Sed la provo ne sukcesis, ĉar li plurfoje refalis sur la plankon, ĝis fine sinjoro Theo helpis lin ekstari.

– Dankon… Sed se vi pripensus: la Tursto Pacifika Fervojo kaj la Korporacio Wagner… eble povus fuzii… Ĝi tute ne dependas de mi… Mia ŝipo alvenos hodiaŭ… La ekspedicio ekveturos de ĉi tie al Honolulu… Oni avizis… ke la ŝipo jam estas alvenanta, elvenu, mi montros ĝin… Kie estas mia kandelo?

– Kial vi fiksas tiun kandelon apud vian ĉapelon?

– Ĉar… mi ne portas kandelon, fiksitan en butontruon aŭ apud la ŝuon… La kandelo estas la Korporacio! Oni ŝteladas

la boat-lampojn ĉi tie, kaj la instanco punas min, se ĝi ne estas lumigita… nun ĝi estas mia patento. Antŭ ol ekveturi per mia boato, mi ekbruligas la kandelon, kaj alveninte sur la bordon, mi blovspirante estingas mian ĉapelon…

Dume ili tamen sukcesi atingi la ferdekon, kie sinjoro Wagner ĝoje salutis sinjoron Arturon Maxbell, kaj li miris, ke oni lasis tiun foriri libera el la prizono. Li vane refutis lian supozon, li eĉ ne parolis kun li pri tiaĵo. Li nur mansvingis:

– Ĉu oni volas prezenti al mi tiun prizonbirdon? Ni ambaŭ estis transportitaj katenite de Kolombo ĝis Btavio per la ŝipo de la militfloto. Ĉu, odlulo?…

Kaj li palpebruadis.

– Bonvolu ekbruligi vian ĉapelon kaj veturu per via boato – diris sinjoro Theo.

– Vidu! Tie navigas mia ŝipo! Ĝi ekveturis nur kvin tagojn pli frue ol la via, vi tamen atingis ĝin… Ĝi estas mia propra ŝipo! – ŝriksi sinjoro Wagner.

En la vespero, iom malproksime antaŭ ili, estis videbla malgranda vaporŝipo kun la poŭpo al ili, kiun antaŭvideble oni baldaŭ eligos ankaŭ el la apudborda uzo. Ĝia enkaviĝinta riparo skuiĝis, kvazaŭ la maŝino estus tre malnova, aŭ la korpo de la ŝipo tre kaduka. Ĉu oni volas entrepreni ekspedicion per ĝi? Ja pli granda ondo premos ĝin entute sub la akvon.

– Ĝi estas bonega ŝipo – stertoris sinjoro Wagner. – Kiu dirus, ke ĝi tranĉas la ondojn de la oceano kvardek du jarojn?

Neniu estus dirinta ĝin pri tiu vaporŝipo, kiu aspektis jardekojn pli maljuna laŭ supraĵa prijuĝo.

– Kiel idiota porva esti tiu – ekparolis Jimmy la Ĝisorela, – kiu entreprenas fari ekspedicion per ĝi.

– La ulo estas tute bona maristo – murmuretis sinjoro Wagner kaj kaptis apogiĝinte la orbutonan uniformon de Watson por momento, sed la granda parto de la jako, farita el malforta teksaĵo, restis en lia mano, deŝiriĝinte. Sinjoro Theo denove gardis lin de la batoj.

– La ŝipon de la Korporacio Wagner direktas bona maristo… li estas lerta matriso… vigla kanbo…

– Kiel li nomiĝas?

– Lia nomo estas Fred la Malpura…

– Ĉu… Fred… la… Malpura? – diris Jimmy la Ĝisorela konsternite.

– Jes!.. Li alvenos hodiaŭ el San-Francisko per rapidŝipo por transpreni la komando…

– Per kiu rapidŝipo li alvenos hodiaŭ el San-Francisko?

– Per la via… – diris sinjoro Wagner. – Alo… Mi tute ne sciis, ke vi havas ĝemelojn!.. Saluton, olda matroso! Ĉu vi vidas, ke ili ĉiuj kvin estas samformaj ĉi tie?

Li riigardis.

…Kaj la Kapitano staris apud ili! Fred la Malpura en sia tuta viv-trampeco, sed sinjoro Wagner vidis la Kapitanon en kvin ekzempleroj pro la refraktado de la agrabla, ruĝa suko, vualanta liajn okulojn. Kvazaŭ tuta bando de rabistoj estus aperintaj.

## D E K U N U A   Ĉ A P I T R O

Kaj la dramo komenciĝis per tempesta rapideco!

Sinjoro Theo ne komprenis, ke la kureĝega Jimmy la Ĝisorela kun forto de bubalo kaj evidente konkurkapabla de ruzo de multaj vulpoj, kial li repaŝas konsternite, kaj en liaj okuloj kun embarasita timemo antaŭ tiu maljuna maristo, havanta indiferentan vizaĝon, ŝiritan ĉapelon? La suno tanis lian verukan, faltan haŭton, kaj ankaŭ tio eblas, ke ĝi fariĝis akvorezista, kaj tiu cirkonstanco ekskludas la demandon, ke la Kapitano ankoraŭ neniam provis lavi sian vizaĝon per akvo.

Lia ŝiriĝinta, nigra, altkoluma, longmaniktuba, lana ĉemizo, lia plurpersona pantalono estas identa kun liaj multjardekaj havaĵoj. Sed se nenio estus perfidinta lian indentecon: la movo de lia dikfingro, kiel li repuŝis sian vizieron per unu puŝo sur lia griza hararo, kaj la tiro, per kio, kiel proprietulo de eleganta klubfotelo, kun sinjora komforto, li sinkis ĝisaksele en sian, pantalonon, ĝi evidentigis, ke jen la homo, nomata Fred la Malpura, li estas la plej stranga figuro de la kontinentoj de la mondo, kiu en Algiro, Celebes aŭ Bermudoj eksidas ĉe la tablo de la kutimaj gastoj en kiu ajn drinkejo, kiu scias ĉiujn sensignifajn difektojn de la ŝipoj en la mondo, li estas en ci-dira rilato kun la ĉinaj etreĝoj de la pirat-kaŝejoj sur la Flava maro kaj kun la indiĝenaj magiistoj de la Insularo. Li ĉiam vagadas moroze en solo, kaj el la tempo de sia forpasinta juneco, tiel dirite, ripozis enigmaj, ŝtoniĝintaj postrestaĵoj de lia fosiliaj, sinjoraj, malgajaj aferoj.

– Ni iru… – li diris al la linioŝip-tranĉilisto – mi ŝatus esti sur bona ŝipo. Ĝi estas nur ŝipaĉo ĉi tie!

– Vidu, li estas sperta pri la ŝipoj! Nia ŝipo estas normala por li! La ŝipo de la Korporacio Wagner! Jes, tiu estas bona! Nur

la instanco persistis alinomi ĝin tute! Kaj vi promesis al mi, Fred, ke vi donos al ĝi sufiĉe longan nomon! – Li parolis rikanante, rapide, kaj lia vingusta, senartikulacia voĉo transiris al gaja kriĉado. – Fred estas ĝentlemano, li promesas ĉion! Mi volas, ke ĝi havu longan nomon… Tian, kiel la nomo Stanley is Mony!

– Ĝi havos longan nomon – diris la Kapitano preskaŭ obeeme.

Jimmy la Ĝisorela ne fortiris sian rigardon de la Kapitano. Ĉu li nun kirlas la aferojn ĉi tie, aŭ ne kirlas?

– Kial neniu povsciis, ke vi estas sur la ŝipo? Ĉu?! – demandi Jimmy la Ĝisorela.

– Ĉar lastatempe ĝi estas la kutimo, filo mia, kio en mia tempo tiaĵo ankoraŭ ne estis – li diris per malgaja voĉo kaj rigadis en la foron, – ke la oficiro ne venas en la maŝinejon de San-Franciko ĝis Honolulu, ĉar li timas, ke la oleo malpurigas lin ledan gamaŝon.

Jimmy la Ĝisorela sentis tiel, ke li mortos pro honto

– Venu, my old Malpura. Ni havas nenian pritraktindan kun ili! – diris sinjoro Wagner serioze, sed li sereniĝis subite. – Alo! Jen vidu! Li estas Brugger la enŝteliĝanta! Kio nova, vi, friponeto!

Kaj li feliĉe invitis al si mansvinante la prezidanton de la kartografoj de Honolulu, sinjoron d-ron Jones Antihoppe, kiu alvenis per motorboato al sinjoro Arturo Maxbell, kaj nun li paroladis iom malproksime kun la profesoro. Li aŭskultis sinjoron Wagner konsternite, kiu laŭdis lin kun feliĉa rideto, kiom multe ili ridegis pri la honor-konsulo d-ro Jones Antihoppe, kiam oni batis lin per biliard-bastono en Odeso,

en la kafejo Spielmann, ĉar li ĉiam kaŝrigadis la kartojn de aliuloj.

– Ĉar tio ne kontentigas lin, ke li konas la kartojn laŭ la dorsflanko! – kaj li minacis lin gaje, akresone: – Vi nun estas tre eleganta por mi! Li ĉiam ŝatis fanfaroni!

– Mi do opinias, sinjoro Wagner – diris Theo. – La pokalo superpleniĝis!

– Kiel?… Vi povas doni al mi glason da brando!.. Ĉu vi ne trikas, Fred?… Kial vi pikpuŝadas min?! Ĉiu pikpuŝadas min ĉi tie!

Sinjoro Wanger ekiris, kaj li ne komprenis, kiel li ne povas enpoŝigi sian naztukon, sed poste li vidis, ke efektive li tenas en sia mano la deŝiritan duonjakon de kaptiano Watson.

– Iu… ekbruligu… mian ĉapelon… – li diris ĉirkaŭrigardinte. – Kaj se vi pripenpos: mi fuzios, se via entrepreno, tiu Pacific Standard Oil Broadcasting Ocean volas.

– Mi skribos tion al mia patro, ke li prezentu ĝin al la ĝenerala kunveno. Povas okazi facile – diris Theo nevoze, kaj li premis la manon de sinjoro Wagner, kiu ĵetis sian inter liajn brakojn kaj ekdormis.

Oni verŝis sur lin sitelon da akvo.

– Ĝi utilas al la floro en mia butontruo – li diris dankeme. – Antaŭ ol foriri, mi ŝatus paroli kelkajn vortojn kun vi inter kvar okuloj… Hopla! Theo denove starigis lin subaksele, kiel ian pupon.

– Venu do, sed nur por momento.

– Jen vidu… – diris sinjoro Wanger. Por avizi sian foriron, li elprenis siajn blankajn, gantojn el fadeno kaj suprentiradis tiujn, kiel pli bonaj akciuloj. – Mi proponas al vi, ke ni fuziu, kaj ne prezentu tion al la mitingo de via patro, ĉar la politiko estas nek mia pano, nek mia trinkaĵo… Li denove detiris sian maldekstran ganton, ĉar pro truo li ekŝanceliĝis, kaj ĝi kuris ĝis lia kubuto. – Domaĝe, ke ne estas brando sur la ŝipo.

Kaj li komencis kanti.

– Se vi havas direndon, tiam parolu, sed rapide!

– Rapide… – li respondis kun ironia, superema akcento. – Vi parolas facile. Do se vi estas saĝa, tiam la tuta Metro-Goldwyn Royal Dutsch Ŝipkompanio fuzios kun mi… Vi ne povos trovi la scienculon, ĉar saĝo estas bezonata al tio…

Tiam jam Theo ekfuriozis.

– Vidu, kara sinjoro Wangner

– Nun ne flatu min… – li mansvingis kun leĝera stentorado. – Ankaŭ saĝo estas benozata al tio, kaj vi ne trovos lin, ĉar vi ne estas trompistoj! Sed al mi… tiaĵon akoraŭ ne aŭdis la mondo – kaj li nur ridaĉis. – Je mia honorvorto, ĝis estis mia plej sensacia ideo… Granda sekreto… Sovu vian orelon proksimen al mi… Nu ne timu, infano, mi volas nur flustri… – Li prenis la orelon de sinjoro Theo, kaj li preskaŭ deŝiris ĝin, ĉar falante li kroĉiĝis al la orelo. – Atentu min. Mi knveturigos tiun esploriston Gustavo sur mia ŝipo… Forkaŝite! En lignokesto! Nu?!

– Kiel??!

– Pli rapide mi trovos lin per tiu malgranda ŝipo, ol vi kaj viaj ĉiuj eksprizonpunitaj akompanantoj, ĉar ankaŭ saĝo estas bezonata al tio. Se vi volas la fuzion, vespere mi atendas vin

en mia kontoro. Mia oficejo troviĝas en la tranĉildanĝera restoracio “Mi pagas bele”… Estu saĝa, aŭ kiel oni diras en la opero Lohengrin: “Pripensu, Bajazo, kaj ridu!”

Per tio finiĝis la konferenco, kaj la gastoj foriris.

Sinjoro Wagner amikeme ridetante salutadis, kaj adiaŭante, li ankoraŭfoje gemute minacis fingre sinjoron Arturon Maxbell.

– Tiu homo estas granda friponeto – li laŭdis lin al la ĉirkaŭstarantoj. – Li prirabis la vendejon de sia bofrato en Dakaro, kaj li ekbruligis ĝin. Saluton, vi, olda rompŝtelisto… Nu, kial vi pikpuŝadas min… Ĉiu pikpuŝadas min ĉi tie…

Ili malsupreniris en la boaton. Sinjoro Wagner ekbruligis la kandelon apud sia ĉapelo, kaj li kantis arion pri tio, ke la virino estas ŝanceliĝema. Kredante, ke li prezentas Rigoleton, li kantis Yankee Doodle-on. Cetere li dufoje paŝis en la maron trans super la rando de la boato, kaj nur la lerteco de la ensidantoj savis lian vivon.

Jimmy la Ĝisorela diris malgaje al sinjoro Theo paraliziĝinte staranta:

– Ruĝa sinjoro, nun okazos granda lukto ĉi tie. Ĉar Fred la Malpura kirlas denove, kvankam mi tute ne scias, kion.

– Homo! Ĉu vi ne hontas, ke vi timas unusolan, maljunulo?

– Ne! Ankaŭ mi konfesas: mi timas lin. Ĉar li ne estas homo. Antaŭ ne pli ol kvin jaroj, kiam en Aleksandrio mi vagofrapadis malpli grandan, beduenan tribon, sed mi timas lin. Ĉar li mem estas la diablo.

Sinjoro Theo ridetis larĝe.

– Vi, tre estimata sinjoro, nur rikanas pri tio – diris Jimmy la Ĝisorela miksante sian koleron kaj bonkonduton. – Sed mi ŝatus, se vi komprenus, ke estis ofendo kontraŭ la reĝo konsideri min idioto.

– Se estos tiel, vi povas kalkuli mian viran konfeson. Sed nun mi vere konsideras vin idioto.

– Oni jam tre ofte ŝanĝis tiun opinion pri mi.

– Bedaŭrinde – respondis Theo malgaje, – mi sentas tiel, ke mi apartenos al tiuj malmultaj, kiuj estas persistemaj. Mi ja vidis nek la senkapan pirat-kapitanon, nek la homkapan ŝipon, malgraŭ tio mi ne estas superstiĉa, kaj la trampa maljunulo tute ne maltrankviligas min.

…La boato atingis la bordon, kaj la ario de sinjoro Wagner estis klare aŭdebla, kaj ankaŭ la patentita marĉlumo de lia kandelluma ĉapelo vidiĝis elfore tra nebulo ĝis ĉi tien balanciĝante, flave, kiel li kantis ŝanceliĝante, ke la virino estas ŝanceliĝema.

La unuokula kaj la duon-idiota Sigorski murmuretis ironie ĉe la balustrado, kie li kubutumis:

– Kaldrono ridas pri la virino, ke ŝi estas ŝanceliĝema…

# DEKDUA ĈAPITRO

Proksimiĝante al la bordo, ili jam aŭdis la deformiĝinta muĝegon de la megafonoj, ĝis ĉi tie penetrantan.

“Atenton…! Atenton…! Mi vidas bone de tie ĉi la alvenantojn… Meze de la boato, en blanka ĉapo estas sinjoro Linkoln… Linkoln! Apud li videbliĝas la blankiĝanta, densa, ruĝa hararo de la mondfama profesoro, konata de sur fotoj… Mi ripetas: Apud li sidas… Mi korektas min: Gesinjoroj: la peciza tempo estas la 10-a horo kaj 40 minutoj kaj 25 sekundoj… Nun alvenas konsilisto Walt, anstataŭiganta la urbestron… Atentuon! Perdiĝis brodita, perlo-ornamita retikulo proksimume en la mezo de la spaco. La virino petas la kavaliran trovinton, ke ŝi rezignas la 200 dolarojn, la oran cigaredujon kaj la retikulon, nur la pregitan, ledan kalendaron li ĵetu en la maron… Nun ili elboatiĝas! La ruĝa junulo kaj sinjoro Arturo Maxbell, kiun ĉiu rekonas laŭ lia publike konata, leda gamaŝo. Salutas ilin la popolo de Havajo kaj la liberaera megafono de la entrepreno Broadeasting, kiu elsendas la programon el la kvar anguloj de la spaco tra ebonit-funela magafono Watchern. Mi ripetas: Ĝi jam estas aĉetebla por 7 dolaroj en tre bona kvalito. Samloke estas unuaranga priservo… Jen ili venas, kaj mi vidas bone la entuziasman homamason…”

Nu jes. Estis problemo pri la homamaso. Ĉar:

La homamaso venis. Ili staras ĉi tie pro la ŝipo Stanley Up To Date. Kaj jen estas la anstataŭiganto de la urbestro kaj kun li la ceteraj eminentuloj.

Sed la homamaso tute ne rimarkas la altrangulojn! La homamaso, kiel unusola spitetanta konato deturnas sin de ili! Ankaŭ la urbestro! La parolisto diras: “Jen ili venas! Ĉiu rigardo direktiĝas al ili…”

Kaj dume ankaŭ li gapas aliloken!

Kio okazis?

– Sinjoro! Mi estas la via! – diras iu al Theo. Li estas sinjoro Wagner mem! Sendube. Eble li povis trinki ie, ĉar nun jam li estas eĉ straba, kaj lia kapo batiĝas al arbo, tiel li falas sur la teron, kie li finas sian direndon:

– Vi faros bonan negocon kun mi! Mi estas tia homo, kiu ne konas malhelpojn.

– Vi tre honoras min, sed mi ne bezonas vian helpon.

– Malgraŭ tio, mi helpos al vi. Kial vi lasas min kuŝi sur la tero?! Kial ne helpas iu?! Dankon.

– Kaj kion rigardas la homoj ĉi tie?

– Mian ŝipon! – Kaj li frapis sur sian bruston, sed tiel, ke li stuble falis, kvazaŭ post persista lukto fine li estus knokaŭinta sin mem. – Mi estas ruinigita. Fred la Malpura, tiu ebriulo mortigis min!

En tiu momento ankaŭ sinjoro Theo ekvidis la spektaklon! Antaŭ policoficiro, sin traboranta tra la disiĝanta homamaso, estis videbla la miraklo:

Kaj nun ankaŭ li preskaŭ falis surdorsen.

Ĉar tiaĵo ankoraŭ simple ne okazis sur la Tero!

Sur la freŝe gudritan flankon de la kaduka vaporŝipo, laŭ la ekzemplo de Stanley Up To Date, sed en la grandeco kaj larĝo de la ŝipkorpo, blanke farbitaj literoj kriegis tiun “longan” nomon al la bordo:

N U  K I O  N O V A,  S I N J O R O  W A G N ER?

Ĝi nun estas la nomo de ŝipo!

La haveno skuiĝis pro la rido de sinjoro Theo.

– Ĉu vi ne volas trafiki kun tia nomo sur la maro? – li demandis poste sinjoron Wagner Rinaldo-Rinaldini.

– Ni devas lasi ĝin tiel! – hurlis la prezidanto de la Korporacio Wagner – ĉu vi pensas tion, ke oni laŭplaĉe povas alifarbi kian ajn nomon sur ŝipon?! Oni registris la novan nomon! Kaj nun tiu ĉi enkaviĝinta, aĉa ŝipo portas la nomon, pro kiu nomo mia patro blankhariĝis en honoro.

Kaj vi bluiĝis en honoro... – finis tion Jimmy la Ĝisorela kompreneme.

Poste apoginte sinjoron Wagner al arbo, ili iris en la postoficejon por telegrafi al sinjoro Thorn. La telegramo tekstis jene:

"Ne publikigu, ke vi avizis al mi la alvenon de vidvino (?) sinjorino Gustavo Bahr. Postmorgaŭ ni ekveturos, kvazaŭ ni ne scius tion. Tre gravas. La elĵetitan homon, postrestintan for de la ekspedicio, provizu per ĉio, kaj ekirigu lin. Se li venos per aviadilo, morgaŭ li povas esti ĉi tie. Theo...

Poste promeninte en la haveno, li diris al Jimmy la Ĝisorela la inferan novaĵon. Li elverŝis sian koramaron. Li rakontis la teruraĵon. Ke li atendas ne multe de la telegramo, ĉar li komprenis tiel la vorotojn de sinjoro Wagner, kvazaŭ Gustavo Bahr estus tenita en kaptiteco sur la ŝipo, kiu havas teruran nomon!

Ankaŭ Jimmy la ĝisorela ekteruris. Tamen li kaŭzis la problemon. Ĉar:

– Jen tio estas la problemo – diris sinjoro Theo, tre malgaje, tamen rigardante la belajn, preterirantajn virinojn – nun tio estas la problemo, ke la sorto estas kontraŭ ni. Nenio koincidas dekomence. Mi sendis la telegramon, ĉar la ebriema Wanger ne estas tia homo, ke mi devus nepre preni kontanta mono lian hisorion. Sed bedaŭrinde ankaŭ tio eblas, ke oni forrabis iel Gustavon Bahr, aŭ li aliĝis al ili.

– Kial vi ne intertraktas kun tiu linioŝip-tranĉilisto?

– Ĉu vi freneziĝis? Ĉu vi pensas, ke li povas atingi per la fama blufo, ke mi komplotu kun tia fripono?

– Bone. Mi havas ideon.

– Kion vi volas?

– Nur konfidu tion al mi!

Nun ili alvenis vid-al-vide al la fantomŝipo:

N U  K I O  N O V A,  S I N J O R O  W A G N E R?

kriegis la literoj.

Ĉe la balustrado de la ŝipo subite aperas eksterordinare severan aspekton havanta virino antaŭ iliaj okuloj. Sufice juna, sed sek-starura virino kun nekredeble serioza vizaĝo, kavazaŭ ŝi estus malĝojanta pri tio, ŝi klinas super la akvon morne. – Nun jam iom timeme rigardas sinjoro Theo sian ĉefhomo, kaj tiu lin. Reportero ĵus fotografas ilin, sed poste ankaŭ la malgrandan vaporŝipon. La magnezio ekflagras.

– Sensacia ideo estas tiu ŝipo fare de la Pictures Post – diras la reportero malkuraĝe. – Ekspedicio kun humuro.

– Kaj kia virino estas tie?

– Mi ne konas ŝin. Ĉar ĝi estas la ŝipo de Pictures, mi do pensas, ke ŝi estas A. Winter.

Alia plago!

– Ĉu A. Winter… estas virino?

– Ĉu vi ne sciis? Anna Winter estas ŝia tuta nomo! Mi adiaŭas vin!..

Nun jam ili ne kuraĝis rigardi unu sur la alian, ili nur iri plu, rigardante la etaĝojn de tute fremdaj domoj mekanike. Estas terure, ke ili tiel draste bati iun pro Hanibalo, pro la sekaj pastoj kaj pro la ŝukurno. Sed kiun? Kaj kio okazis al li? Kien li malaperis?

– Nun lasu min sola, sinjoro Ĝisorela. Se mi devas pensadi pri la ekspedicio eĉ momenton, mi freneziĝos.

Kaj se li estus sciinta, ke ĝi estas nur gemuta, milda komenco de tio, kio sekvos!

## D E K T R I A   Ĉ A P I T R O

La Lumturo kaj Bufedo Mi bela pagas en Honolulu estas ekskluziva diboĉejo de kelkaj eksterordinaraj homoj, ĝi estas unika loko en la mondo. Iam lumturo satais sur la proksima rifo, kiun oni fermis jam ekde jardekoj pro ties malrapida sinko. Tie funkciis la restoracio de Teodoro la Kornulo, tiu iama, la plej tipa, la plej konservativa restoracio de solaj rabistoj, kiuj ne ŝatas sian epokon. Kiuj ne preferis la novan, maristan generacion, la banditismon kun mitraloj, la sonfilmojn, la stratosferon, la tubomelblojn, la plus-produktadon kaj la devigan injektadon kontraŭ variolo. Kelkiuj maĉis betelonuksonn, kaj Teodoro la Kornulo, la proprietulo servis ankaŭ sur piratŝipo, aŭ li servis nek aliloke.

La rifon, kiu estis sola roko en la akvo, oni devis atingi iel. Troviĝas sufiĉe da boatoj ĉi tie.

Atinginte ĝin, mallumega vespert-nesto akceptis la gaston ĉe la bazo de la lumturo, sed jam ankaŭ serpento kaj skorpio troviĝis tie. Nu kaj? Ĉu vi pensas, ke oni venigos entreprenon por fari grandan purigon? Estis iuj, kiuj iris sur la ŝtuparo, kaj ili atingis ties supron vivantaj. Ĝi bezonis grandan sperton, ĉar tie kaj ĉi tie mankis kelkaj partoj el la konstruaĵo, kaj oni ne preferis lumigilsimilajn mod-idiotaĵojn ĉi tie. Oni uzis ankaŭ “Lifton”, por ekfunkciigi ĝin, oni devis ektiri ŝnuron. Kiu ne havis ordon en siaj aferoj, ke oni ĵetu korbon da brikoj desupre, pro privata afero, iu malsuprenigis lignokeston, kaj liaj amikoj suprentiris lin por tridek cendoj. Se poste oni tamen opiniis tiel, ke ili ne devintus fari tion, ili simple reĵetis lin en la abismon.

Jimmy la Ĝisorela rapidis sur la ŝtuparo supren, klopodante salti po du ŝtupojn. Li alvenis iom spiregante al la

araneaĵkovrita strigo-nesto de la lumturo, kie dormetadis la timige maljuna Teodoro la Kornulo, kiu havis inflamajn palpebrojn. Li povintus esti mirinda kranio de antropoida vulturo kun sia hoka, granda nazo kaj krete pala vizaĝhaŭto. Jimmy l Ĝisorela sciis la kutimojn ĉi tie. Ĵetitnte sian ĉapon sur murhokon, li eksidis senvorte.

Oni neglektis la salut-similajn formalaĵojn, kiel la flepĵekon, la psikoanalizon, la radioaktivecon kaj ĝenerale la esprimformojn de la neŭrastenio.

– Mi serĉas sinjoron Wanger – li diris al Kornulo

– Vi estas sufiĉe idiota – respondis la proprietulo.

Soleca gasto sidis ĉe iu fenestroangulo, kiu kantis mallaŭte, monotone, kapvoĉe. Li estis la Silentema (aŭ Ok-etaĝa) Drugiĉ.. Li ne kutimis paroli, sed kanti tiel pli ofte. Li zumkantis unusolan, konstantan melodion per sia kapona tenoro, kvazaŭ li konus nefinitan amok-tonkuradon de freneziĝinta komponiso. Drugiĉ ĉiam amuziĝis en duopo, kun sia eskalo, nomita “Melanie”.

– Drugiĉ! Mi havas negocon por vi.

– Bone.

– Okazos ĉirkaŭrigardo. Eble ankaŭ vangofrapado.

– Egalas.

– Kie mi trovos vin?

– En la karbo-kargejo.

Kaj li kantis plu al “Melanie”, klinante sian kapon sur la sesan ŝtupeton, kiu reprezentis tre altan gradon de la

ebrieco de Drugiĉ.

Jimmy la Gisorela trinkis glason da arako, kaj iom trankviliĝinte li enspiris la odoron de la petrolo, opio kaj tiun de la ŝimaj muroj.

Nun estiĝis tia bruo inter la volboj de la ŝtuparejo, kvazaŭ dek-membra, ebria societo estus alveninta! Aŭdiĝas bruo de blasfemoj, falintaj ŝtonoj kaj morterstukaĵo, poste kaoso de diversaj, laŭtaj krioj de malsupre. Sed nur sinjoro Wagner alvenis. Kaj laŭ Teodoro la Kornulo ĝi ne estas malpli granda miraklo de nia epoko, kiel la televidilo, la keĉeskeĉken, la vitamino A kaj ĝenerale la sekvoj de la planizita ekonomio.

Ĉar sinjoro Wagner neniam suprenvenis per lifto. Li alvenis ebrie, piede, kantante, stumbletante, kaj foje li falis inter du ŝtupojn, sed li kroĉiĝis dum falo, tiel do pendante super la abismo, li kantis tutan duonhoron por helpo, ĝis fine iu savis lin, ĉar tiu homo ne rekonis sinjoron Wagner en la mallumo.

La koncernulo poste havis multe da malagrablaĵo pro tio.

Tamen sinjoro Wagner supreniris nur perpiede, kaj neniam okazis al li malbono. Tute ne ekideis al li ekbruligi la fieran kandelon, metitan apud sian ĉapelon. Oni same malestimis tian dandadon ĉi tie, kiel la dancon tango, la grafologion, la fision kaj aliajn damaĝajn efikojn de la troigita kartludado de briĝo.

Malgraŭ lia admirinde ebria stato, li portis tute freŝan gardenion en sia butontruo kaj stentoris.

– Saluton, karaj miaj amikoj! Nu kio nova, kio nova?!.. Alo, mi jam vidis vin! – li kriis al Jimmy la Ĝisorela. – Vi estas ia dentokuracisto el Aleppo!.. – Kaj li jam preskaŭ falis surdorsen, kiel li montris al ĉiu ekŝrikante la ekstravaganculon, zumkantantan en la angulo. – Alo! Jen

vidu, li estas Drugiĉ!.. Li bone aranĝis mian sorton, tiu friponeto!

– Venu intertrakti! – diris Jimmy la Ĝisorela.

– Bone… Mia kontoro… estas por tio, vi, olda dentkuracisto… Ili ĉiu vangofrapadas bone!

Ili povis supreniri al la ilarejo sur ligna ŝtuparo, sub la ladan tegmenton, kaj iam oni tenis en ĝi ian ŝtormavizan flagon aŭ buon. Nun ŝajnis, ke ĝi estas bonega deponejo por la ratoj.

– Temas pri mesaĝo – komencis Jimmy la Ĝisorela.

– Ni povas fari tion – respondis sinjoro Wagner, karesante sian densan, bluan barbon. Mi lasis ĉiujn dek du ŝtelitajn rulaĵojn da ŝtofo ĉe mia ricelista amiko, nomata Pinkerton, kaj mi transonos tiujn malmultekoste!

– Temas pri tute alia afero. La milionulo sendis min. Li ne volas komunan negocon, sed li vendos la esploriston de vi.

– Mi kredas tion – li diris kun tragika ironio… – Alo! Teodoro, mia kara amiko! Alportu rapide la trinkaĵon, ĉar mi sobriĝis, bedaŭrinde… – Kaj turnis sin al Jimmy la Ĝisorela. – Do temas pri tio, kara mia amiko Drugiĉ… Kie estas Melanie? Ĉu vi ne vendis la eska… – Rememoro pri malnova, granda vangofrapo silentigis lin, poste li finis tiel: "Ĝi estas la demando de esto aŭ neesto", kantas la trefo numero ok en la opero Traviata!

Kaj li kantis la komencan arion de la trefo numero ok el la opero Traviata. Sed la ario apenaŭ diferencis usonan ŝlagron kun la teksto "Gudnajd New York. Ĉar li ne eltenis plu sobre, li decidis mem alporti la brandon, kaj li falis en la drinkejon rapide. Reveninte li jam rikanis, kaj samtempe li sentis tiel,

ke alvenis la momento, kiam estus plej bone surpreni siajn gantojn el fadeno.

– Nu, mia kara amiko Strovaĉek, ni finu ĝin: la tuta stokon el tolo, kiu estas ĉe mia kara, ricelista amiko, nomata olda Pinkerton, mi vendos ĝin malmultekoste…

– Mi ne bezonas la tolon. Mi aĉetos la malaperintan scienculon, se vere li estas tiu.

– Mi atestas! Jen prenu!

Kaj li transdonis multe da velkintaj floroj el sia interna poŝo. Sed li tuj reprenis ĝin kaj premegis tion en sian pantalanpoŝon, bedaŭrinde, kun la nebukita rimenzono de Jimmy la Ĝisorela, kion tiu retiris, sed la buko ŝiris la ŝnuron, kaj la pantalono de sinjoro Wagner falis malrapide.

– Bela perplekso ĝi estas – li kriis gaje, kaj ĉar la ŝirita ŝnuro kapitulis, ekde nun li prenis sian pantalonon ambaŭmane. – Vi mem serĉu tion! Ĝi estas en mia interna poŝo. Atentu pri la birdonesto!

Ĉar ankaŭ birdonesto troviĝis en lia interna poŝo!

Kun du birdidoj. Li trovis ilin matene en la parko, por ke tiuj ne malsatu, poste li kaptakiris ankaŭ insektojn, kvankam ĝi estis tute superflue, ĉar la birdoj ne suferis pro manko de nutaĵo super la koro de sia protektanto.

Jimmy la Ĝisorela etendis sian manon singarde an la poŝon de sinjoro Wagner. Papero bruetis inter du lanugaj birdidoj kaj inter kelkaj ŝtelŝlosiloj. Li eltiris ĝin.

– Ĝi estas tiu – diris sinjoro Wagner, kiun katenis sia pantalono, kiel malliberulon. La fregat-ĉefleŭtenanto legis:

“Vidu, Wagner! Mi atendos ĝis vespero! Se ĝis tiam vi ne transdonos mian koncernan parton, mi disrompos vian lavpelv-buŝan, idiotan kapon, diablo forportu vin. Vi povas kredi ĝin, kaj mi submetas tion al via atento.

Hugo la Labor-evitulo”

– Hopla, jen rigardu! Ĝi estas rekomendletero! Atendu! Tenu mian pantalonon… Dankon… Tiel… Mi trovos ĝin pli rapide… Ĝi ne estas tio… nek tio… Jen ĝi estas!.. Hopla! Kion vi faras!?… Vi devas teni tion!

Jimmy la Ĝisorela rigardis la pruvaĵon, kaj komprenis, ke estis domaĝe telegrafi al Thorn. Sinjoro Wagner diris la veron! La ora medalo estis la pruvo:

G O L F – E S P L O R I S T O J: A L   G U S T A V O   B A H R!

– Mi fidis tion, ke la medalo estas vera!

– Ĉu ĝi?… – Kaj li ridis. Ĝi estas tiel vera, kiel mia oraj dentoj!

Kaj li malfermis sian buŝon, kaj li tute ne havis orajn dentojn.

– Mi donas kvincent dolarojn por li – proponis Jimmy la Ĝisorela.

Sinjoro Wagner ridis, kiel rabia hieno.

– Haha!.. Ĉu por li?! Por tia profesoro! Kiu apenaŭ havas kvardek sep jarojn, li finis gimnazion, li trovas marfluojn kaj havas du fontoplumojn! Prefere mi ŝiros lin je pecoj!

– Li ne valoras pli multe!

– Ĉu li?… Ve! Kiel vi povas diri tion, mia amiko Strovaĉek!.. Mi devas kapti mian pantalonon, ĉar mi falos surdorsen!.. Li

estas bonega profesoro!.. Li verkas unuarangajn librojn… Kaj kiajn spektaklojn li povas fari! Ekzemple li estas en malgranda lignokesto de tagoj, kaj li ankoraŭ vivas!

– Mi ne aĉetos lin!

Jimmy la Ĝisorela lasis lin tie. Elirinte, li vidis ankaŭ Roĉild-on la Malavaran en la drinkejo. La fregat-ĉefleŭtenanto ĵetis malŝatan rigardon al li. Li ankoraŭ faros kalkulon kun tiu homo.

– Jimmy! Alo!

Aŭdinte la krion li haltis kaj returnis sin al la Malavarulo. Domaĝe, ke li ne kunhavas sian laborkitelon.

– Kion vi volas?

– Mi havas negocon… Kaj se vi volas, Jimmy, mi dungiĝos al via ŝipo. Por neniom da mono mi veturos per la ŝipo Sinjoro Wagner.

Kia ŝipo estas tiu, kiu ne konvenas al Roĉildo la Malavara? Li ne demandis tion. Ĝi estas privata afero.

– Bone, bone… Kaj kio estas la negoco?

– Ni devas ataki virinon.

– Mi ne faros tion.

– Ŝi pagos. Tiel ŝi volas konatiĝi kun iu, ŝi atendos la koncernulon. Ni forkuros de antaŭ tiu homo… La virino donos cent dolarojn por ĝi!

– Kiel estas bezonate du personoj?

– La virino timas, ke la fremdulo eble venkos unu atakanton.

La afero interesis Jimmy la Ĝisorelan. Ili iris.

Kaj cetere li bezonas la Malavarulon. Post kvaronhoro ili alvenis en iun strtetaĉon, kondukanta el la ĉefstratoj de la interna urbo. Multaj tiaj stratetaĉoj troviĝas en grandaj havenoj. Unu turniĝo, kaj la luksaj lumoj malaperas, ke antaŭ cent jara urbo aperu anstataŭ ĝi.

Ili staris sub pordegvolbon… Ili atendis. Jam estis malfrua vespero. Eble en ĉiu kvara horo preteriris iu.

– Kiam ekveturos plu la ŝipo Sinjoro Wagner?

Ili menciis la nomon de la vaporŝipo nur mallongigite.

– Morgaŭ. Sed diable…

Li glutis la vorton. Kio povas esti al tiu veturilaĉo? Li devas ekscii.

Nun aŭto haltis ĉe la stratangulo, kaj elegante vestita virino descendis kun magralonga junulo. Ili rapidis rekte al ili.

– Jen estas mia amiko – diris Roĉild la Malavara.

– Tiun sinjoron, kiun vi povas fidi, tial mi venigis, ke vi havu kaŭzon ataki duope. Ni sekvis la fremdulon per aŭto, pri kiu temas. Li jam venas. Post nelonge li turniĝos ĉi tie… Faru ĝin laŭnature.

– Ni ne kutimas fari fuŝaĵon – trankviligis ŝin Roĉild la Malavara. Poste ĝi komenciĝis. La knabo iris kun la virino. En la blinda mallumo ankoraŭ ne estis videbla tiu certa, alia viro, pro kiu ĉio ĉi okazis, sed ili jam aŭdis liajn paŝojn. Nun! Malavarulo ekiras. Ankaŭ Jimmy la Ĝisorela…

Li atingas la knabon kaj la knabinon… Malavarulo subite kaptas la retikulon de la virino… Laŭfaka tordomovo…

Ŝriko… Tamburado de la piedoj! La fremda sinjoro “ekmordis la logaĵon”, kiel la fiŝistoj diras. La akompananto saltas kaj kaptas la gorĝon de Jimmy la Ĝisorela, poste li vagofrapas lin iele-iome, ke punktoj dancas antaŭ liaj okuloj. Ankaŭ Jimmy la Ĝisorela volas ŝajnigi bone la aferon, li do ĵetas la magrulon al la flanko de rubujo, ke ĝi disromiĝas sub la kanbo, kaj tiu falas inter la lignajn ruinojn… Jimmy la Ĝisorela forkuras!.. Sed lia ĉapo defalas…

Kaj tio estis la poblemo!

La aŭguro, rilate la ĉapon, laŭ kiu Nin ĉiun povas trafi akcidento plenumiĝis. Ĉar la fregat-ĉefleŭtenanto ne lasis perdi sian elegantan havaĵon… Li etendas sian manon por levi ĝin… sed dume la nekonata, sola viro atingas lin.

Pif-puf.

Kavr-kvin pugnobatoj… Malfacile estas lukti en la mallumego. Kaj tiu dura ulaĉo… Nun li tamen sukcesas knokaŭiti lin per preciza hokbato, kaj li tuj sterniĝas pace, laŭlonge sur la granitaj pavimŝtonoj.

Phu! Ĝi estis granda batalo!

– Idioto! – kriis la magrulo, pene leviĝante el inter la ruinoj de la rubujo. – Kiu diris, ke vi batfaligu lin?

– Kiu povas atenti pri tio dum interbatado…?

La virino ne hontas genuiĝi sur la teron. Ekflagras aŭtomata fajrilo.

…Kiam Jimmy la Ĝisorela ekvidas la vizaĝon de la batfaligita homo, evidentiĝas antaŭ li la tragika, konsterna, timiga realo!

…Li estas sia mastro. Sinjoro Theobald Linkoln, la ĉefo de la ekspedicio kuŝis tie, batfaligita unuarange.

## D E K K V A R A   Ĉ A P I T R O

Kiam Theo rekonsciiĝis, li kuŝis sur kanapo en la halo de la hotelo, kie li loĝis.

– Ĉu vi fartas pli bone? – demandis la virino apud li.

– Jes… – respondis Theo langvore. La junulo havis zumadon en sia kapo, cetere li farits bone.

– Mi dankas al vi…

– Nur tion ne!.. Kie estas via akompananto? – li demandis rapide, ĉar li memoris pri la magrulo, kiun kovris la ruinoj de la lignokesto post la fino de la de la flugvoje de la terura vagofrapo.

– Nu… En sanatorio… Ĉetere mi nomiĝas Lilian Hiller.

Li rigardis la virinon ekzakte! Ŝi estas bela! Hu, kiel belega!

– Mi estas Theobald Linkoln.

La okuloj de Lilian Hiller larĝe malfermiĝis pro la sincera miro.

– Ĉu la fama malkovranto?

– Kiel?! – demandis sinjoro Theo timiĝinte.

– Ĉu vi estas tiu, kiu serĉos Gustavon Bahr?! – ŝi daŭrigis entuziasme. Ho, mi tiel admiras vin pro tio!

– Fraŭlino, vi ĉikanas min, kaj mi ne ŝatas tion. Vi scias bone, ke estas nenio temerara en tio, kion mi faras, temas nur pri komforta vojaĝado kun iom da blufo.

La okuloj de Lilian Hiller iom larĝe malfermiĝis pro miro.

– Interese – ŝi diris mallaŭte kaj eble ankaŭ iomete trompiĝinte. – Mi pensis, ke vi estas vanta ŝlemilo.

– Kial?… – konsterniĝadis Theo.

– Mi pensis…

Malpli proksime, ĉe la akceptejo, sinjoro, portanta ĉapelon de ambulancistoj kaj ledan gamaŝon, interesiĝis nervoze, ĉu sinjoro Theo revenis en la hotelon?

– Alo! – kriis la milionulo, ĉar li rekonis la fregat-ĉefleŭtenanton, kaj li tute ne konjektis, ke tiu homo estas samtempe ankaŭ la mastro de la hokbato, pro kio li svenis. Sed Jimmy la Ĝisorela direktis sian rigardon iom flanken, kvazaŭ li ne estus vidanta sinjoron Theo, kaj forrapidis lametante. Eble li bat-difektis sian kruron ie.

Lilian paliĝis, kiam ŝi rekonis la fidungiton.

– Kiu… kiu li estis? – ŝi demandis timiĝinte. – Ĉu vi konas lin?

– Jes bonege! Li estas la unua oficiro sur la ŝipo Stanley Up To Date. Kio okazis al vi?

– Nenio, nur estas iomete varme…

– Jimmy la Ĝisorela estas amuza kaj bonega homo… Certe ne videbliĝas, kiel forta li estas?

– Jes, ĝi videbliĝas – diris la virino kaj rigardis sur la blukadritajn okulojn de sinjoro Theo. Ĝi estis terure ĝene malkovro por ŝi… Kaj tio iomete tute ruinigis ŝiajn planojn. – Venu en la koktelejon. Mi ŝatus trinki glason da ĉampano.

Ĉampano. Delikata, mallaŭta muziko. La orkestro ludas tangon… “Ho, se mi povus denove reveni en Havajon…” – kantas dika tamburisto kun dolĉeta sopiro, kvazaŭ li ne estus ĝuste tie. Theo sentas iel eĉ pli serioze, ol antaŭ nelonge ĉe Charlotte Dusan, ke tiu ĉi virino estas konsternige kara. Ankaŭ la okuloj de Lilian brila. Interese! Kvazaŭ tio sidus en ŝiaj okuloj, ke “mi imagis vin ne tia”.

– Ĉu vi ne havus emon akompani min per la ŝipo Stalnle Up To Date?…Ĉu vi akompanus min, kiel gasto dum la vojaĝo

– Ne… Bedaŭrinde ne… – respondis la virino tre malgaje. – Hieraŭ vi devintus diri tion al mi.

Grasiĝinta ploras en la mikrofonon kun mola voĉo:

“Mi sendas mian koron en Havajon, ĉiun vendrede posttagmezon, Ankoraŭ ne resendu min, mi petegas, kaj pensu kelkfoje pri mi silente… Lulos min la arda pasio… Se venos la nokto… Venu, kaj ne timu…”

Kaj la dampita trumpeto ludas sola, kaj klaketas la ŝaltilo de la malhelruĝa lumo, susuras la vestaĵoj, klakas la ŝuoj…

– Kio okazis de hireraŭ? – demandas Theo

– Nek mi mem scias precize. Sed bedaŭrinde, mi ne povas kunveturi per la ŝipo Stanley Up To Date.

“Kies unua oficiro rekonos kaj malkaŝos min, ke mi dungis la atakantojn” – ŝi aldonis en si mem.

…Poste ili elpromenis el la paradizo de la tango-tekstverkistoj, kie la nokto de Havajo atendis ilin… Kaj vane, ne banalaj vortoj estas la multe da versaĵoj, kiujn zumzumadas la ĵaz-orkestroj pri tiu Havajo. Tamen eksterordinare sulte bela spektaklo estas la pufiĝinta luno

inter la vaporoj, kiel en la ardo en sia larĝa haloo ĝi preskaŭ krepitas. La palmoj ekbruetas tie kaj ĉi tie pro la aperanta kapo de la scivolemaj simioj… La ĉielo estas tia, kiel raketo, kvazaŭ ĝi estus rigidiĝinta en la momento de la eksplodo, kaj ĝiaj fajrejoj brilus senmove…

– Estas domaĝe, ke ni renkontiĝis ne morgaŭ – diris la virino kaj ĝemis.

– Kio okazis de hieraŭ? – demandis Theo kaj ekprenis ŝian manon. – Ĉu vi enamiĝis al iu?

– Bedaŭrinde jes… – ŝi respondis malgaje.

Pro tio Theo sentis sin tre malfeliĉa, kvankam la virino komprenis ĝuste tiel, ke ŝi enamiĝis al li.

Tiaĵo ankaŭ en Havajo povas okazi, dum belega, somera nokto, kiam la lunlumo tremas sur la arbo… Kaj birdo kantas al la frondaro konjektanta nenion, kiam proksimiĝas la nokto. (Venu, ne tiumu.)

Kiel stultaj tekstoj ili estas!..

Kaj Dio scias… La pozemuloj povas diri kion ajn: estas io en tiuj tekstoj… Vane!

## D E K K V I N A  Ĉ A P I T R O

## D I B O Ĉ E J O  M E D O L O

## A L  L A  G A J A  C E R B E L V E R Ŝ I G A N T O

## Ĉ E  L A  F O R T E P I A N O  O F E L I A  P E P I T A  S T A R A S

kaj gitaras

Bela afero estas la uniformo, kaj belega vestopeco estas la volontula ĉapo de ambulancistoj ĉe la ŝipoficiroj, sed kiom ĝi valoras sen la Diboĉejo Medolo. Kompreneble la ĉiutagaj homoj scias nenion pri tiaĵo, kiuj alvenas en tiun unuarangan havenon, ili iradas en ĉiuspecaj glitumej-similaj ĉambregoj sen sketiloj, kaj oni alportas la manĝaĵon sur rulseĝo antaŭ ilin, kio estas bona ago, ĉar ili manĝas malsanigajn nutraĵojn.

Kiel alia estas tia Diboĉejo Medolo! (al la Gaja Cerbelverŝiganto!) Dio mia, kiel alia ĝi estas! La simplaj tabloj el lignotabuloj, balanciĝas kvazaŭ ŝipo dum milda ondofrapiĝo, kiam oni kubutumas sur tiujn

Ĉe la fortepiano vere Ofelia Pepita staris persone, ĝi ne estas troigo kaj multpromeso, sed realaĵo: la artistino mem agadas tie! Nu kaj ankaŭ la fortepiano estas grava akcesoraĵo, ĉar la popolo de la maroj estas muzikemaj. Ofelia Pepita de tempo al tempo turnas ŝraŭbon ĉe la flanko de elektra fortepiano, kaj post sekundoj aŭdiĝas mallaŭta blasfemo.

La artistino esprimas sian opinion pri la obstina maŝino.

Je la tria aŭ kvara ŝraŭbado la fortepiano, kiel vekiĝanta ebriulo, komencis muziki post kelkaj mallaŭtaj singultoj. Plej

ofte la ŝlagron Tamara, mi revadas pri vi, kiam iom post iam vesperiĝas, en nia malnova bagno de Sumbava. Poste la artistino kubutante sur la fortepianon, akompanas la kanton kun malgaja citerado, kiu havas publike ŝatatan, aldan voĉon, raŭkan de hejmfarita brando.

Kiam la fortepiano ĉesis funkcii, post kelkaj buton-premoj la blasfemo denove aŭdiĝas.

Ĉu ĝi ne estas bela? Kaj kiel bela estas la familiaraj muroj! Ekzemple tiaĵoj estas skribitaj sur ilin per karbo: “PINGLOKAPULO! MI ESTIS ĈI TIE ĜUSTATEMPE! PARTO DE LA KARGO KONCERNAS ANKAŬ MIN! MI ELPREMOS VIAJN OKULOJN!”

Ŝajnas, ke ili nur evitis unu la alian, ĉar senpere apud ĝi jen tio estis skribita: “Kial vi fanfaronas, vi, ĉevalo! Via koncerna parto estas ĉe Spilek!”

Sed ankaŭ suspektema Otelo trviĝas ĉi tie.

E V I T U   M I A N   E D Z I N O N!   L A   S U S P E K T A

Ŝ A R K O   Ĉ I A M   R E V E N O S!

M I   K U N P O R T O S   L A   H A R P U N O N   S U R   L A   B O R D O N!

D E V I Z O:

“D U M V I V A   P U N O   E S T A S   M A L P L I   O L   L A   M O N D O!”

Ankaŭ kelkaj karikaturoj estas videblaj, liberstilaj desegnaĵoj kun apartenanta teksto. Nek la stilon de la teksto ligas multe da formalaĵo. Poste sekvas la belega devizo de saĝaj ebriuloj: “Drinku, ĉar la ebriceco esta moderiga

cirkonstanco!” Kiu estis ebria, tiu ne povas konfesi la puran veron! Do: En vino estas vero!” Poste sekvas verko de dio-benita, senmoraliĝinta poeto:

BALADO DE SAĜAJ RABISTOJ

Verkis

ALADARO ŜEKSPIRO

Elspezu vian monon amiko por drinkaĵo!

Kion vi povas drinki hodiaŭ, ne prokrastu tion ĝis morgaŭ.

Ne etendu la krurojn trans sub via kovrilo,

Vi dekutimiĝos de la laboro, kaj kiu ajn kaptos vin ĉe l’ freŝa faro!

Tiu devas labori, kiu fordrinkas sian monon,

Oni kaptas ŝparemena gangsteron, ĉar li estas maldiligenta!

Lernu de l’ abeloj, kiel ili kolektas mielon

Kaj ili neniam havas eĉ unu groŝon; estas mirinde, ke ili vivtenas sin!

DEDIĈO!

Kiu fordrinkas sian monon, tiun la laboro tenas en vivo,

Tial okazas, ke la sobreco mortigas, stultigas kaj puŝas en mizeron!

Jimmy la Ĝisorela alvenis ĉi tien rapide, kaj ĝenerala ĉiu alvenis ĉi tien, se oni nur iomete konsideris la devigajn malbonajn kutimojn la la etiketo de la krimula mondo.

– He! Jen vidu! – kriis Martin, la kubo-kapa mulato. – Ofelia, turnu la krankon por muziki fanfarion per la fortepiano!

Kaj eksonis krakanta, rapidritma blasfemo.

– Saluton – mansalutis ili Jimmy la Ĝisorela degne

Sed se li estus konjektanta, kia insida fato kaŝrigardas lin ĉi tie, eble li tuj estus forkuranta.

– La artistino vespermanĝu kun la unua oficiro! – disponis Jimmy la Ĝisorela, menciante sin mem je la tria persono de singularo. Kaj tiel plenumiĝis lia fato!

Ofelia Pepita estis sufiĉe beleta. Eble iomete tro kuspnaza, sed ankoraŭ ne estas decidita, ĉu tiu propreco estas makulo de beleco? Ŝi fumis cigaron, nomatan pri la pitoreska, usona ŝtato Virginia, kiu ekbruliĝis nur post pluraj snufetoj kaj uzante alumetoj kaj pajleroj. La artistino konsevis sian pasion, rilate la fumadon de la cigaro virgini, el tiu tempo, kiam ŝi ludis la malfacilan servon de la dua alkoholisto sur la kargoŝipo Lukso, en la proksimo de kapitano Kuloto.

Vi tre memorigas min pri kapitano Kuloto, estimataa sinjoro Ĝisorela – ŝi diris iom ĝentil-afekte. – Antaŭ du jaroj la kompatindulo fariĝis viktimo de eraro, tamen mi atendas lin fidele. Tion vi povas demandi de ĉiu ĉi tie. Ne pli ol du semajnojn mi ĵetis la gitaron al la kapo de Hugo la Laborevitulo, ĉar li kisis min.

– Ĉu tiu muzikilo estas peza? – informiĝis Jimmy la Ĝisorela kaj eklevis la gitaron mediteme.

Sed ne okazis lukto. Jimmy la Ĝisorela forgesigis kapitanon Kuloto! Ĉar kiam li poste altiris tenere la artistinon per sia maldekstra brako (kaj dekstramane li levis alten, surper sian

kapon la plumbobastonon), Ofelia Pepita flustris kun pudora cedemo:

– Ne kredu, ke mia koro ne estas el vakso… Nur tial mi toleras ĝin, ĉar mi amas vin…

Tiam alvenis kun granda bruo la personaro de la ŝipo Kio Nova, Sinjoro Wagner. Kaj ili kverelis. Ankaŭ Tendneulo la Fervora, Vanek la Dornhara kaj la Ĉefkuracisto estis tie, la pli famaj el ili. Krome ruĝhara junulo (jam la tria en nia historio), kiun oni konis laŭ la nomo Kupro-grafo tre avantaĝe en la havenoj.

Unuavice li estis tre bela knabo, malgraŭ lia ruĝeco. Li vestis sin laŭ hispana modo, tial oni pensis lin parte greko, parte anglo. Sed poste iu diris, ke li vere estas hispano, malgraŭ tio, ke li disvastigis tiun famon pri si.

Kupro-grafo estis la unua oficiro de la ŝipo Sinjoro Wagner. Ĵus la ĉiam flustranta, astma Peters diskutis kun li, kiam ili invadis la drinkejtablon.

– Vi povas diri, kion vi volas! Ni ne veturos, kaj fino! – li flustris, kaj lia putriĝanta laringo eĉ fajfis pro la fortostreĉo.

– Fred la Malpura parolis la veron – diris Tendenulo la Fervora. – Kaj se Fred parolas veron, tio jam en si mem sufiĉas por maltrankviliĝi.

– Pro Dio! Vi estas stultaj, superstiĉaj homoj! – riproĉis Kupro-grafo ilin.

– Mi diras tion – alparolis la Ĉefkuracisto, post kiam li trinkis, – ke la knaboj pravas.

– Post tiaj antaŭaĵoj nek mi veturos volonte – diris la du-metra, skeletsimila Ĉharley la Lunmiena. – Ĉar per tia ŝipo…

– Fermu vian buŝon ĉi tie! – diris Kupro-grafo kaj rigardis sur Jimmy la Ĝisorelan, kiu tuj ekstaris.

– Pardonon – li diris al Ofelia Pepita kaj malrapide li venis antaŭen. – Ĉu eble iu havas problemon kun mi?

Sekvis atenda silento, streĉiĝanta antaŭ pli gravaj korp-kontraŭ-korpaj bataloj

– Ne komencu interbatadi – intervenis Tendenulo la Fervora, kaj super siaj dratkadraj okulvitroj, kiel ia strigo, ŝajniganta sin grava, lia rigardo direktiĝis de iu al la alia. – Jimmy la Ĝisorela nun estas bezonata al ni.

– Dungiĝu al li! – diris Kupro-grafo ironie. – Ĝoju, Jimmy, ke vi povas akiri tiujn honestajn junulojn!.. Mi transdonas ilin al vi!

Filipo Diru-jam batis sur la tablon kolere:

– Vi tamen ne persvados nin, ke ĉiu estas idioto, nur vi ne! Kion diris Fred, kaj kion ni vidis…

– Silentu!

Ili eksilentis denove kaj rigardis al Jimmy la Ĝisorela.

Ĉi tie estas ia sekreto! Li eksentis la enigmon jam ĉe la Malavarulo! Ili ĉiam rigardas sur lin kaj eksilentas. Li draste piedbatos tiun Kupro-grafon.

– Domaĝe pro la multe da vortoj – diris Tendenulo la Fervora, kiu, same, kiel ankaŭ la vera Trebiĉ, tre timis nun. – Charley la Lunmiena kaj la Ĉefkuracisto restu, se plaĉas, sed mi dungiĝos al Jimmy la Ĝisorela.

– Jes – diris Vanek la Dornhara. – Ankaŭ mi iros volonte sur la ŝipon de Linkoln.

Subite fariĝis silento. La Kapitano venis! Ankaŭ sur la vizaĝo de la kolera Kupro-grafo malaperis la ironia, nervoza rido. Tamen, ĝis li vivos, Fred la Malpura estos la Kapitano ĉi tie. Ĝi jam estas neniel alie.

– Donu al mi refreŝigilon el frambosiropo, Martino – li diris, kaj rigardinte sur neniun, li eksidis.

– Mi aŭdis, ke nuntempe vi havas strangan antaŭsenton – komencis Martino kaj metis la glason sur la tablon kun fermitaj okuloj, ĉar tiu frambo-afero faris ĉiun histeria.

– Ĉu eble vi estas malsana? – demandis ankaŭ Jimmy la Ĝisorela flankenumante tien.

La Kapitano plenigis sian pipon kaj ekfumis.

– Eksidu, Jimmy la Ĝisorela… – li diris poste mallaŭte. – Kaj ankaŭ vi ĉiuj atentu min…

Ili venis iom pli proksimen. Dio mia! Kio fariĝis tiu protokanajla satano?

– Ĉu vi priridas min? Eblas. Tamen ĝi estas tiel: io okazos al mi.

Kelkaj matrosoj alveni de sur la ŝipo Stanley Up To Date bruante. Ili iris al la parolantoj.

La vantecon de Jimmy la Ĝisorela flate flegis, ke la plej moroza stelulo de ĉiuj havenoj okulfrape esceptas kaj sidigas lin al sia tablo.

Fred la Malpura mediteme rigardas la fumon de la pipo. Li palpebrumas reveme per siaj ruĝaj, dormemaj okuloj.

– Aŭskultu min, Jimmy la Ĝisorela kaj ankaŭ vi knaboj. Mi jam ne kaŭzos multe da problemoj sur la maro. Vi scias bone, kiu vivas sur la oceano, tiu eksentas la morton. Ankaŭ vi jam eksentis tion. En bela, serena vetero, kiam la akvosufaco estas galta, kaj videbliĝas nenia maltrankviliga… Kaj tamen… La ferdekestro interkverelas kun la stiristo, la kabloj estas malpli facile elnodigeblaj, kiom ajn multe oni trinkas, oni ne ebriiĝas, kaj iu matriso rimarkas: “Io estas okazonta.” Kaj nokte estos pereiga tempesto, aŭ ekbrulos la sufoke varma karbopolvo, do… Estos bone, se kelkaj homoj ĝisvivos atinginte la bordon en boato…

Li faris longan paŭzon. Li kunbalais la tabakerojn de sur la tablo en sian manplaton.

Ankaŭ Martino, eĉ Ofelia Pepita venis tien, kaj zumado de moskito, la brueto de kelkaj spirantoj estis klare aŭdeblaj en la masiva silento.

– Alportu ginever-on! – diris la Ruĝa Vasiĉ.

– Atendu!.. Eksidu, kanboj! Hodiaŭ mi pagos la trinkaĵon! – diris la Kapitano solene.

Ĉiu paliĝis. Ili rigardis unu sur la alian…

Eĉ post monatoj rondiris la famo, kaj kiuj ne vidis ĝin, eĉ nun ili ne kredas, sed ili devas kredi tion, ke ĝi okazis tiel: Fred la Malpura gastigis la matrosojn. Ne estas eskludite, ke li vere malsanas, kaj eblas, ke li estas mortanta, sed li perdis sian prudenton, tio estas senduba post la okazintaĵoj.

La Ruĝa Vasiĉ demandis kun kompato:

– Kion vi drinkis, ke vi fariĝis tiel ebria?

Li ne respondis. Burasko ekskuis la fenestron. La senmotiva, stranga vento, alveninta el la nenio en tiu serena nokto, ĉiam estas sinistra antaŭsigno.

Sendube, tiu ĉi nokto certagrade estis fantomeska.

– Atentu min – li diris mallaŭte. – Fred la Malpura lastfoje surŝipiĝas morgaŭ, kaj neniu homido vidos min plu en iu ajn haveno.

– Kiel trafis vin tiu malsano? – demandis Vasiĉ. – Ĉar mi ne vidas, ke ĝi estus tusado… Hej, Martino, alportu denove glason da trinkaĵon je la sano aŭ malsano de Fred… Ĉu vi pagos ankaŭ ĝin?

– Trinku trankvile… Mi jam ne havas kaŭzon vivi ŝpareme. Kaj ankaŭ vi ĉiuj trinku! Alportu grogon al Jimmy la Ĝisorela, vi, rabisto, sed enverŝu ankaŭ ĝinon, ĉar li ŝatas ĝin tiel… – Kaj li reveme gapis en la fumon, kvazaŭ li estus atentanta ion en la griza ŝvebaĵo. – Trinku, mi pagos al ĉiu!

Kiel mi jam menciis: ĝi estis fantomeska nokto…

En Port Suez mi vizitis la drinkejon Ebria Delfeno dum mia doro – li komencis mallaŭte, kun trenata voĉo. – Vi scias bone, ke antaŭ nelonge en Port Suez de sur la velŝipo Brigita tri hindaj pilgrimantoj venis en la drinkejon, kaj iu mortis pro bubone pesto. Baldaŭ evidentiĝis, ke la pilgrimantoj kaŝis dekkvar kadavrojn sur la ŝipo Brigita!..

Ili konis bone la hororromanon. Ĉiu ĵurnalo menciis tion. Estis granda paniko! Oni ekbruligis la drinkejon kaj forbruligis la ŝipon sur la aperta maro.

– La stultuloj volis ŝipveturi ĝis Gango kun la kadavroj – kapjesis Borck, kiu similis al gorilo.

– Mi sonĝis tion: kvazaŭ la drinkejo Ebria Delfeno ankaŭ nun ekzistus, rekte mi iris tien el la haveno. Sed eĉ unu homo ne vagis en la nokta, malseka Por Suez, kaj ĉiu fenestro estis nigra sur la stratoj. Nur akra flutado aŭdiĝis. Mi scias bone: ĉi tie la Verda Vizaĝulo atendas ie, ĉar nur li kutimas flutadi, antaŭ tempesto, kiam dronas ŝipo.

Ili kapjesadis. Ili ĉiuj estis klarvidaj pri tio.

– Ĝi okazis tel. La Verda Vizaĝulo atendis min en la drinkejo Ebria Delfeno kaj invitis min ludi per la ĵetkuboj, kiun ankaŭ vi ĉiuj vidis sub la konstelacio Suda Kruco, sed neniam aliloke, kaj ĉiam en la proksimo de freŝe droninta vrako.

Konpreneble ili vidis lin. Filipo Diru-jam foje eĉ parolis kun li. Kiu ne estus vidinta la Verdan Vizaĝulon? Li estas publike konata fantomo, lia vizaĝo estas fumkolora, sur la pinto de lia nazo videbliĝas nigra makulo, liaj okuloj palpebrumas kun flava lumo, kiel lampoj de po unu lumturo, li blovsinigsas longan fajfilon el lado, kaj liaj skeletaj fingroj rigide moviĝas sur la turetoj. Krome li portas ĉerkosimilan, nigran vestaĵon kun ŝim-ornamaĵo, kiu ŝajnas baroka borderaĵo. Kiu ne estus vidinta la Verdan Vizaĝulon? Fine ja ne infanoj sidas nokete en la Diboĉejo Medolo!

– Kaj poste – daŭrigis la Kapitano rikse rigardante antaŭ sin – alvenis ankoraŭ la rusa Muravjev, mia malnova, bona amiko, kiun oni pendumis pasintjare en Pernambucco.

– Tio signifas malbonon… – grumblis Borck.

– Ni ludis per la ĵetkuboj, kaj la Verda Muzelo gajnis.

– Kiel li Jetis?

– Li levis la glason super sian kapon – flustris Fred la Malpura anime rompiĝinta.

Ili rigardis lin kun kompato. Tiuokaze al li estas kapute! Tio sendubas! Ankaŭ li estas nur homo. Nu bone, tamen ne!.. Egalas. Sed oni povas kompati kiun ajn. La vizaĝon de la Kapitano kovris subite elblovita fumnubo, kvazaŭ la kurteno malleviĝus post prezentado.

– Li havis konstante malpli multe da poentoj – li daŭrigis tute mallaŭte en la fokuso de senmovaj, brilantaj vizaĝoj, – sed kiam mi ĵetis, rompiĝis kubo.

Klara afero: al li estas kapute!

– Aŭroris. Muravjev subite montris tra la fenestro. La Kanalo estis malplena, kvazaŭ la Mondo starus kelkajn minutojn antaŭ la fina juĝo. Nur unusola du-fumtuba ĉerko naĝis trankvile. Mi sciis bone: ĝi estas la ŝipo Brigita!

Ili silentis pele. La tempida drinkejodoro fariĝis ĉiam pli peza, ĉar la nebulo de la aperta oceano ondruliĝis kun la alta tajdo, kaj ĝi premis malalten la vaporojn. La Kapitano denove ekbruligis sian pipon, kaj li daŭrigis tel, elblovante la fumon kun levita kapo, fingrumante sian barbon per siaj kaprosimilaj ungoj.

– Estis mortinto sur la ŝipo. Ĝi estis videla bone. Grandkega mortinto! Mi kuŝis tie, kaj mi estis tel longa, kiel la vaporŝipo mem… Kaj tiam mi sciis bone: estas kapute al Fred la Malpura.

Ili sidis silente. Kelkaj homoj estis blanka, kiel la muro.

Martino rapide eltrinkis duonglason da rumo. Ankaŭ Jimmy la Ĝiosorela palpebrumis ofte, sed kun dubaj sentoj. “Ĉu li

kirlas?” – li pensis mediteme en la eterna dilemo de Hamleto: “Ĉu li kirlas nun, aŭ ne kirlas?”

– Poste – daŭrigis la Kapitano mallaŭte – la Verda Vizaĝulo frapetis mian ŝultron ridetante, li enkasigis miajn kelkajn restontajn jarojn de sur la tablo kaj foriris… Ĝi estis mia sonĝo… Mi ankoraŭ vidis Muravjev-on malklare, kiel li rigardas sur min el sub sia akselo, ĉar lastatempe li portas sian kapon tie. “Venu Fred” – diris la ruso… Lastfoje antaŭ kvar jaroj ni estis kun li sur ŝipo, ĉe la Kabo Farrere. Nun li diris, ke li baldaŭ renkontos min denove… Kaj fino. Mi vekiĝis. Sed mi sciis bone, kaj ankaŭ vi scias, kion ĝi signifas.

Neniu ekparolis. Ili ĉiuj scii, kion ĝi signifas! Ankaŭ Ofelia Pepita, kiu balbutetis mallaŭte:

– Ĉu mi ludu al vi funebran marŝon?

Ili ankoraŭ neniam aŭdis tel longe paroli lin. Kaj kun tiom da langvora, mallaŭta melankolio. Neniu amiis lin. Tamen ili nun malgajiĝis. Nek la diablo estas simpatia, tamen ili ŝatas lin pli bone, kiam li estas malica, ol li kantus lulkantojn. Oni persistas pri siaj iluzioj.

Sed la Kapitano zorgis nek pri tio. Li ekstaris ĝemante.

– Knaboj, diskonigu: Fred la Malpuras surŝipiĝis, kvankam li sciis bone, ke alvenis la fino. Se tamen ĝi estas tel, prefere sur la maro. Mi pardonas miajn malamikojn. Ankaŭ ili pardonu min. Lasfoje Jimmy la Ĝisorela fermis min en lignokeston, kaj mi sidis en la bilĝo du tagojn. Tial mi volis pagi, ke li rememoradu tion. Nun mi paronas lin. Mia longa vagado finiĝis. La ondoj de la maro nek min lulos eterne, sed almenaŭ ne surface…

Surŝultriginte sian jakon, li ĵetis papermonon sur la tablon kaj iris. Sekvan tagon oni vidis lin en la haveno, kiam li ekveturis per la vaporŝipo Nu Kio Nova, Sinjoro Wagner?

L A   L E T E R O   D E   J I M M Y   L A   Ĝ I S O R E L A

A L   L A   R E Ĝ O   D E   L A   I N S U L A R O   F E L I Ĉ O,

A L   A R K I D U K O   S T. A N T O N I O,

Altestimata

Reĝa moŝto

St. Antonio

Insularo Feliĉo, Reĝa fortikaĵo, deksre

Estimata sinjoro Kolego, kara reĝina moŝto, kaj via kore amata imperiestra avino. Vian altvaloran bildkarton mi ricevis en ordo, en kiu mi estas salutata persone, kaj ĉi-sube mi dankas vin pro la sincera interesiĝo. Profunde emociiĝinte mi ricevis ĝin, en kiu via reĝa moŝto propramane skribis vian valoregan respondon, pensante pri mi. Ankaŭ mi povas respondi same, kiel vi, sur la bildkarto: ni pensas kun sincera bonvolo pri nia karmemora Jimmy la Ĝisorela, kiu estis nia eksreĝo, sendante niajn bondezirojn al li.

Kiam mi skribas “Ni”, ĝi estas nur reĝa pluralo, kaj ĝi ne signifas tion, ke ankaŭ la Ruĝa Vasiĉ, Tendenulo la Fervora kaj Eŭgeno la Buŝaĉulo salutas vin, kvankam ankaŭ ili pensas pri via reĝa moŝto kun estimo, ĉar mi tre laŭdas vin. Sed la reĝa pluralo koncernas nur min.

Ni albordiĝis en Honolulu, kio estas la ĉefurbo de Havajo, kiu havas gravajn kargejojn, grandajn drinkejojn, imponajn raziojn, kaj ankaŭ tre multaj vangofrapantoj loĝas tie.

Precipe, kiam mi alvenas. Ĉi tie mi denove renkontiĝis kun la kapitano, nomata Fred la Malpura, kiun nun jam mi bedaŭras, ĉar li vere estas kortorde vidi lin. Se via estimata reĝa moŝto vidus lin, kiun nomas la ĉinaj piratoj Malpura, Avara Drako, Yu-Hi. (Yu-Hi signifas tion ĉine, ke "la koncernulo estas bela fripono"), se vi vidus lin kun tiom da kompato!

La tuta Diboĉejo Medolo parolis pri li (Dining Room al la Ĝaja Cerboelverŝiganto), kie estas kvina-hora interbatado, kaj ĉi tie renkontiĝas la prominentuloj de la malsupera socitavolo, kiuj montras malbonan ekzemplon. Jen estas artistino, kiun mi ame admiras, estimas, ŝi fortepianas tenere kaj noble, ŝi estas vera artistino kaj mia malnova adorantino. Vi povas pensi, via reĝa moŝto, ke ŝi ne estas tiel malmoraliĝinta, drinkeja muzikistino, kiel la aliaj, similaj al ŝi. Ŝi fortepianas bele, sed ŝi ankaŭ violonludas kaj pinĉas harpon, krome ŝi scias fremdajn lingvojn.

Eĉ tio povas okazi, ke mi fondos kun ŝi dinastion pere de geedziĝo, kaj mi zorgos, ke la posteuloj de via reĝa moŝto ne manku, kiel tronpretendantoj. La patrino de tiu tronpretendanto, laŭ patra devenlinio, estos Ofelia Pepita, kiu ĉiutage faras promen-koncerton, irante tien kaj reen en la ĉambro de la Diboĉejo Medolo…

Tie diris la kompatinda Fred la Malpura, ke li sonĝis pri la fantomŝipisto, nomata Verda Vizaĝulo, kiu ludis kun li per ĵetkuboj kaj Muravjev, kiu estas lia subaksela amiko, samtia, kiel Fred, kaj li vidis sin mem veturi per la fantom-ŝipo sur la kanalo.

Komence mi suspektis. Ĉar kiel ajn verŝajne sonis tiu historio, ni devas estis singardaj, rilate la Kapitanon. Sed mi komprenis: Kompatinda homo: li mortos! Kaj li estas tiel kompatinda, ĉar neniu kompatas lin.

Nun gravas!

Aŭrore mi iris al la karbokargejo por renkonti mian amikon, nomatan Silentema Drugiĉ, kun kiu partoprenis intimajn fuĝojn dum la feliĉaj tempoj. Iam li laboris en minejo, tial li povas bone eksplodigi ferŝrankojn, kaj li havas ĉiam iom da dinamito ĉemane. Ĉar li estas utiligeble vivdanĝera homo, kaj li posedas tre karan, simpatian eskalon. Ĝi nomiĝas Melanie, kiu havas ok ŝtupojn, tial la policistoj nomas lin ankaŭ 8-etaĝa Drugiĉ. Kaj ĉiu koratoro de prizono scias, ke oni devas atenti la eskalon de Drugi en la deponejo, kie ankaŭ la objektoj pasigas la punon de sia mastro. Ĉar ne atentante pri lia eskalo, oni povas teni lin dumviva malliberulo, ĉar tiu Drugiĉ portus al ili kelkajn neplenaĝajn, eksplodajn ŝargaĵon de dinamito. Neplenaĝa estas tiu eksploda ŝargaĵo de dinamito, kiun oni povas submeti al kuratoreco, kaj la ŝargaĵo eksplodas sub la kuratorejo.

Tiu Drugiĉ eble ne estis reganto, ĉar estus malfacile eternigi lin. Nian kolegon Napoleonon oni povis facile eternigi sur ĉefplaco kun siaj kvar frat-parencoj, kiujn oni skulptis flankfiguroj, krome la rusan caron Petro, kiun oni eternigis sur ĉevalo. Sed kiel eblus eternigi Drugiĉ-on? Ĉu staru statuo kun eskalo sur soklo, meze de la ĉefplaco? Tiel oni pensus, ke temas pri mondfama fenestropurigisto. Nun eblas (kaj oni certe) eternigos min, kiel statuon kun gamaŝo, en ĉapo, dekstramene kun glavo, maldekstramene kun revolvero, kaj dume mi etendas mian iun manon benante la popolon…

Mi do renkontis ĉe la karbokargejo tiun 8-etaĝan Drugiĉ-on, kiu portis sian eskalon, prenante ĝin je iu ŝtupo, kaj mi diris al li, ke ni suriros ŝipon. Laŭkutime li respondis tion, ke li diris nenion. Kaj ni iris en la havenon, kie ankris la ŝipo de la alia ekspedicio, kiu havis la plej strangan nomon en la

mondo. Kies nomo estas: Nu Kiel Fartas Tiu Wagner? Ĝi esta stranga nomo. Tiam ni faris la sekvan dialogon:

“Ĉu ĝi estas?” demandis Drugiĉ kaj haltis.

“Jes” mi diris mirante. Sed li respondis al mi jene, kiel fulmo frapanta el serena ĉielo:

“Adiaŭ.”

Ĉu li estas idioto aŭ kio? Simple li ekprenis iu ŝtupon de Melanie, li kroĉis sian brakon al ĝi kaj foriris kun ŝia sinjorina moŝto.

“He! Kien vi iras?”

“Trinki.”

“Ĉu vi ne venos sur la ŝipon?”

Poste li diras idiotaĵon, frapantan el serena ĉielo:

– Mi ne iros. Kaj ne vi. Ĝi ne estas ŝipo. Ĝi estas la infero! Ĉi tie neniu povas esti forta.”

Ĝi tre surprizis min, ĉar li ankoraŭ ne parolis tiel multe en sia vivo. Li diris al mi sian du-semajnan vortostokon.

“Drugiĉ!” mi kriis mirante. “Mi ne kredas, ke vi estas tiel malkuraĝa! Ĉu vi timas tiun ŝipon?!”

Tiam okazis la suprizo. Drugiĉ timis! Ĝi estis videbla! Li ŝvitis! Drugiĉ ne estas kverelema, interbatiĝema, li evitas la lunkotn kun trancîlo, Drugiĉ estas tia, ke li iras sur la transan flankon de la strato, kiam oni batas unu la alian, li ne ŝatas vangofrapadi, interbatadi, li estas silenta kaj meditema, kiuj liaj ecoj memorigas min. Tamen ĉiu sciis, se oni lasas lin paca, tio jam estas tia, kiel iom da asekuro pri vivo. Foje la

rebonigantaj laboristoj metis tubojn en la teron, kaj dum li dornis ili prutepreni s lian eskalon. Ili estis dekope kun la fertuboj. Sed li ĵetis sin sur la laboristojn nur per siaj manoj, kaj post minuto tubo sur tubo ne restis. Tial mi demandis lin denove:

“Ĉu vi timas 8-etaĝa Drugiĉ?” Tiam li respondis jene

“Mi timas! Mi ne iros tien!”

Ĝi estis eĉ pli surpriza, ke li diris denove tian vortinundon, sed kio eĉ pli trafis mian kapon, kiel gumbastono el serena ĉielo, ĝi tamen estis tio, ke li timas. Ĉu eble tiu malnovmoda, malklera superstiĉulo kredas la reaperon de transmondaj sipritoj? Ĉu li estas tia, kiu timas la fantomojn, kiuj nokte elvenas el siaj ĉerkoj? (Foje mi vidis tian en la fortikaĵo de Via Reĝa moŝto, nomata citadelo. Pri tio mi devas atenti bone.) Kiu en la mondo de la mirinda tekniko ankoraŭ kredas tiajn idiotaĵojn, tiu ne konsiderindas kulturita, kaj laŭ mi, li estas malinteligenta homo. Do tiu 8-etaĝa Drugiĉ estas 6-etaĝa idioto. Mi diris tion al li, sed li lasis min tie.

Estimata Reĝa moŝto! Tre saĝa, eminenta homo diris: neniun ni nomu idioto antaŭ la kono de faktoj! Ĝi estas granda diro, kiu devenas de mi, propramense. Dubindaj homo ŝtelumis ĉe la pitoreska doko, ĉar alvenis la fluso, ĉio humidiĝis en la havena nokto.

Per boato mi singarde proksimiĝas al la ŝipo. Mi vidas bone la nomon de la ŝipo, skribitan per grandaj literoj: Kiel Fartas Wagner? (Mi devas ĉiam ridi, ĉar ĝis nun oni neglektis tian idiotaĵon, rilate la nomon de ŝipo.)

Kompreneble mi surgrimpis ĝin kaj vidis, kiel malbona ŝipo ĝi estas. Ĝi konsistas el malpuraĵo kaj lignotabuloj, kiuj krakas. Eĉ unu lampo ne lumis. Mi pensis, ke tio nun estos interesa, ĉar mi kunportos Gustavon Bahr, malliberigitan en

kofron. Novaĵo. Mi ankoraŭ ne ŝtelis scienculon. Tio certas, ke ĝi estas stranga ŝipo… Eĉ la aero estis pli prema. Mi rigardos, kio estas ĉi tie! Kaj mi ŝteliris antaŭen mane-piede, kaj pulsis mia kolo, lancinis mia kranio en la nebulo pro la humido, krome la silento sur tiel malluma ferdeko… Kaj ĉiu kajut-pordo estas malfermitaj, kvazaŭ la tuta personaro de la ŝipo estus foririnta, ĉion lasante ĉi tie.

Kaj la putriĝantaj lignotabuloj havas tiel strangan apotek-odoron… Kaj… nun, ie aŭdiĝas buŝharmonikado…

Verdire mi ne citras pro la harmonikado, kiel muzikemulo. Mi ne estas superstiĉa, ĉar la magiisto sur Timoro ŝmiris min per plantaĵo, ke mi estas imuna kontraŭ la malbeno, precipe tiam, kiam mi trafis en tian krizan staton, kaj mi karaĉis dufoje al oriento. Poste ankaŭ al okcidento. Sed oni povas surkraĉi ĉiun direkton de la ventorozo; eĉ se kulturita homo ne kredas, ke tiaĵo estas utila kontraŭ fantomoj. Kaj se li ne kredas, ke la kraĉo utilas, tiel li devas timi la fantomon. Mi pensas, ke ĝi estas evidenta.

Tiam mi tamen ne forkuris. Kvankam fariĝis vento, kaj bruis, grincis ĉio. Mi pensis rigardi en iun kajuton. Tie estis malbonodoro kaj multe da muŝoj. Mi tute ne sciis, kio troviĝas ĉi tie, kio odoras ne tute same, kiel la flanela linioŝip-jako, sed ĝi striktis ankaŭ por mia brustokesto. Kvankam la vasteco de mia torako estas n-ro cent sepdek centimetroj, kiam mi enspiras la aeron. Mi enspiris kaj elspiris la aeron, poste mi viŝis mian frunton, tamen mia brustokesto estis malvasta. Sed mi iris.

Kaj mi kraĉis al nordo kaj ankaŭ al sudo…

Nenie estis iu. Nur mi. Kaj mi ekiris en la bilĝon sur ŝtuparo, kiu ekkrakis tiel laŭte, kvazaŭ ĝi havus gorĝon, kaj mi estus paŝinta sur tion, ke ĝi devas ŝriki.

Via Reĝa moŝto devenas el bonfama familio, sed mi opinias, ke ankaŭ via reganta sango estus galciiĝinta en la vejnoj, kaj ankaŭ mi sentis tiel, ke mia koro haltos, kiel la poŝhorloĝo, metita en pistujon, kiam oni faras el ĝi rompitan oron. Iu metis pezan lignokeston sur la klappordon, kondukantan en la bilĝon. Terure pezan. Mi forrulis ĝin el mia vojo.

Ĉar en la bilĝo estis mallumo kaj io tute stranga… Kaj pro la aĉaj lignotabuloj estis aŭdebla la ondofrapado de malproksime. Krome sentiĝis tiel malbona odoro ĉi tie, kia estis ankaŭ supre. Nun mi divenis: Ĉi tie estas odoro de karbolo! Ĝi pruviĝis iomete sinistra sento por mi.

Mi iris antaŭen. Nun de supre kaj de malproksime la fantomoj harmonikis per tute mallaŭta zumado. Jes fantomoj, ĉar mi ne estas superstiĉa kredi la kraĉadon! Tiam mi stumblis pro io, kaj ĝi falis ruliĝante, bruante kelkajn ŝtupojn, kio estis pli profunda parto de la bilĝo. Mi haltis timiĝinte kaj atendis. Silento!

Mi etendis mian manon tien, kie mi stublis, kaj ĝi estis la supro de longa lignokesto. Kaj denove ĉifonoj estis en la kesto

Ĝi estas tia… kiel… ĉerko!

…Disinjoro…

Tiam la luno lumis tra la aerumfenestro, kaj tiam la karbolo jam tre premis min. La luno prilumis la ejon, kaj mi vidis, ke tre multe da ratoj estas ĉi tie. Kvazaŭ miaj piedoj enradikiĝus, ĉar mi nun jam pensis ion, kio estis tia, ke Vanek devis timi, kaj povis tremi Drugiĉ, kaj eble frostotremis pro ĝi ankaŭ la ŝtupoj de la eskalo Melanie… Rajte!

Kaj tiam nek mi povis preni aeron, kvankam mia buŝo estis tute malfermita.

La lunlumo falis sur la vid-al-vidan muron! Tiam mi vidis lignokeston, sur kio estis skribite!..

B R I G I T A

Mi scias nur tion, ke vidinte ĝin, mi kuregis! Kiel frenezulo! Okazis la plej altgrada fuĝo! Kion la subuloj nomas ek do!

Mi neniel ekscios, kiel mi revenis en la Diboĉejon Medolo. Mi scias tion, kiam mi enpaŝis spiregante, ĉiu ekstaris kaj rigardis min. Ĉar eble mi aspektis tiel, kvazaŭ mi venus de sur la ĉeflapco, kaj mi jam estus eternigita en gipso.

Via Reĝa moŝto devenas el altranga familio, sed vi scias: ke la koro de la dinastio Ĝisorela ne estas el vakso, sed se mi devus travivi tion ankoraŭfoje, prefere mi estu denove en la kontoro de la ĉefpolicisto Crikley en Adeno, kiu estas scivolema homo pri mi, kaj onidire li posedas la plej grandajn vangofrapojn de la mondo. Transdonu Via Reĝa moŝto mian plej humilan bondeziron al Ŝia Reĝina moŝto kaj al Ŝia Altaĝa Imperiestra Patrino. Krome mi restas via fidela anstataŭiganto sur la trono de Via Reĝa moŝto

Esprimante mian altestimon:

don Ĝisorela il Jimmy, sed iomete

mi ektimis, ĉar ankoraŭ en la mondo ne okazis tiaĵo, ĉar orienta bubona pesto estas danĝera malsano, krome tute infekta.

don supreskribita, di Ĝisorela.

## D E K S E S A   Ĉ A P I T R O

Nun tuj sekvos la turniĝo.

Mi petas la trankvilon de la leganto, kio cetere estos konstante bezonata dum la daŭro de la horora historio, en kiu fantomoj kaj teruraĵoj svarmas, de tiam, kiam la ŝipo Stanley Up To Date forlasis Honolulu-on, kun kvin taga malfruiĝo. Ĉar tie aperas la heroldo de la teruranta, neelkalkulebla fato.

Venis la virino!

Ĉiam komenciĝas tiel! Gardu vin! Atenton!

La viro kalkulas ĉion kun bone pripensita antaŭzorgemo, precize, difinitive. Kaj tiam venas la virino! Kun mensogoj, havantaj cent kilometran rapidecon po sekundo, spiregante, vortmuelante, mallevinte la okulojn, svenadante aŭ ridetante; subite ŝi venas kaj ruinigas ĉion!

Poste ŝi eksidas sur tiujn ruinojn kaj pudras sin. Kaj ŝi kondolencas sincere.

Ni gardu nin de la virinoj! Ankaŭ la plej simplaj, ĉiutagaj nocioj fariĝos konfuzaj, se ni volas klarigi tiujn, rilate virinon. Ni menciu ekzemple la amon.

Aŭ ni ne menciu ĝin? Egalas. Ni do menciu ĝin. Jen estas ekzemple la amo.

Kie?

Pardonon, ke mi interrompas mian direndon, sed ni nun klarigis tion fine. Kie estas la multe menciita amo?! Kiu vidis ĝin? La koncernulo levu sian dekstran prudenton.

Nu jen?

Tamen ĝi tre gravas! Ĉar ankaŭ en nia romano aperas tiu aĵo, kaŭzante multe da problemo. La amo ĉiam kaŭzas problemon. Mi do asertas kategorie: amo ne ekzistas! Aŭ pli ĝuste: ekskluzive amo ekzistas. Ni devas paroli pri tio. Ĝi tre gravas, ĉar se ni eliminas el la eblecoj la ideokonfuzon, nomatan amo, tiam ni povas vivi laŭ difinitaj planoj. Kaj kiu asertas, ke ĝi ne gravas.

Mi!

Mi asertas ne plenkonscie, ke sinjoro Theo pravis, kiam li konstatis tuj, ke estas malpermesite por li komenci paroladon kun tiu virino, poste li paroladis, sidis, dancis, iradis kun ŝi konstante dum kvi tagoj, en prozo, en kanto, kaj inter ĝemoj. Mi pensas tiel, ke ili eĉ interkisiĝis. Sed post kvin tagoj li konstatis kun kruda rido en sia animo, ke la virino estas mem- kaj pulbikdanĝera individuo, de antaŭ kiu li devas fuĝi.

Tiam li petis ŝian manon.

Sed Lilian eldiris la malfeliĉigan vorton ne. Tiel la ŝipo Stanley Up To Date povis ekveturi. La virino estis bela. Ni nur ne serĉu la logikon en ĉio! Klarigo ne estas! La virino estas tia, kiel poezia metaforo. Se ŝi estas bela, nek tio estas problemo, se tiu havas nenian sencon.

La okazaĵoj nun ekimpetis per tempestas rapideco. Ekveturo: je la 18,20-a horo. Theo inter sinmortigaj pensoj oficiale informiĝas, ke la parenco de la angla reĝo, lordo Hamilton akompanos la ekspedicion.

Je la 19,40-a horo posttagmeze. Mi ripetas je la 19,40-a horo. Laŭ la Mez-Azia, Amerika, krome laŭ la tempokalkulo de ĉiu mondparto, la ebrieco de sinjoro Wanger potenciĝis mirinda

fenomeno, kiel la boreala aŭroro, kiam ĝi disvolviĝas per sia tuta arko sur la nord-polusa ĉielo.

Tiel konsterniga li aspektas, kiam li elvenas el la stratangula drinkejo kun siaj fiera kandelo, poŝ-birdoj, tenante sian pantalonon ambaŭmane, kaj li iras al sinjoro Theo, havante la plej bluan rondbarbon.

Je la l9,45-a horo oni elĵetas lin la sepan fojon el la halo, kvankam li aplacias la fidelan amikecon de la ĉeestanta hotelestro, menciante la malnovajn, belajn tempojn, pasigitajn en la bango de Sumbava. Fine sinjoro Theo venas hazarde tien, kaj brakapogas la aferon de sinjoro Wagner. Brakapoginte la ebriulon, Theo sidigas lin en fotelon.

Ĉiu rigardas tien-reen timeme, ĉar aŭdiĝas konstanta birdo-kvikado en la halo, kaj oni ne komptenas tion.

Je la 19,56-a horo kaj 7 sekundoj, sinjoro Wagner proponas aĉeti la scienculon, malliberiĝantan sur la ŝipo por 5000 dolaroj.

Je la 19.58-a horo, sinjoro Wagner ridas krude pri la cent dolara porpono, kaj li volas foriri, sed levinte de sur la planko, oni senpolvigas lin.

Je la 19,59-a horo kaj unu sekundo, sinjoro Wagner akceptas la cent dolaran proponon senhezite

La medalo de la golf-esploristoj konvinas sinjoron Theo pri la identeco de Gustavo Bahr.

Je la 20-a horo kaj 10 minutoj, oni ankoraŭ apenaŭ prepariĝas al la ekveturo. Aŭdiĝas kantado. Vasiĉ rigardas malsupren. La cilindra ĉapelo de sinjoro Wagner ŝanceliĝas sur la akvo kun vibranta lumo, kiel ia malnova buo.

– Kio nova?! Vi, fripono!.. Ĉu nun vi rekons min? Vi ja fanfaronis en ĵaketo. Aŭskultu min! Mi kunportis lignokeston al via mastro. Ĉu vi ne volas aĉeti tolon?

Kaj li komencis kanti, sed pro ventatako la flamo de la kandelo ekbruligis lian ĉapelon, kiu ekflamis. Li premis ĝin sub la akvon per kutima movo, poste li surmetis la malnovan, nigran feltaĵon denove. Nun ankaŭ verda algo pendis sur lia kandelo.

Fine la lignokesto estis supre.

Jam lumas la lampoj, kiam alvenas alia transportaĵo. Ankaŭ Jimmy la Ĝisorela kunportas lignokeston. Neniu scias, de kie.

Li portigas ĝin en sian kajuton. Freneza homo elvenas el ĝi. Li batas kaj fermas lin en la ŝrankon. Poste li metas en la ŝrankon sian pluvmantelon kaj porcion da kolbasaĵo.

Dume li batas denove la koncernulon.

La 24-a horo vespere kaj neniu minuto.

La ŝipo Stanley Up To Date ekveturas. Muziko, homamaso ktp. La vaporŝipo ŝajnas tri-fumtuba marveturilo de sur la bordo pro la kolosa cilindra ĉapelo de sinjoro Maxbell.

Lordo Hamilton venis sur la ŝipon, akompanate de eleganta, blankhara sinjoro. Li balancadis sian bone konatan, blondan, studentan kapon al ĉiu, kaj irinte kun sia akompananto en sian kajuton, li akceptis sinjoron Theo.

Li petas, ke lia ĉeesto sur la ŝipo kaŭzu nenian ĝenatecon, li veturos, kiel simpla civilulo.

Lia lorda moŝto konatiĝis kun ĉiu. Li ŝajnis iomete embarasita, kiam post sinjoro Maxbell en la nomo de la aliaj

esploristoj doktoro Rügen anatomo salutis lin. Kaj la oraĵisto transdonis al li bronzan plakedon.

– Kiu estas ankoraŭ? – demandis lia lorda moŝto nervoze.

– Ni havas ankoraŭ unuarangan futbaljuĝiston – respondis sinjoro Theo sen palpebrovibro – kaj tiu eleganta sinjoro kun la lorno. Sokrato Schwacht aŭ Knapp, li estas frenezulo kaj florĝardenisto, laŭplaĉe. Ĝi estas ĉio.

Sed li eraris.

Subite aŭdiĝas sono de citro.

– Sinjoro – flustris Jimmy la Ĝisorela, – mi kunportis Obwelion, ĉar mi ne povas vivi sen ŝi.

– Homo! Kion faros tiu muzikistino ĉi tie?

– Ŝi observos la futbaljuĝiston, la ekzekutiston kaj la anatomon dum esplorado, kaj ŝi imitos ilin.

Sinjoro Theo iomete rifuzis tion kun sia restinta forto, sed poste li komprenis, ke estas nemalhavebla la ĉeesto de dua alkoholisto, sperta pri la gitarludo en la ekspedicio. Kaj li klinis sin antaŭ la persona argumentado de la artistino:

– Oni ne devas enuiĝi dum la ekspedicio – kveris Ofelia Pepita. – Vi faros la sciencan esploradon pli bone, aŭskultante tangon, kiam mi kantos, diros ŝercaĵojn kaj gitarludos…

– Ŝi eĉ cigaras – favoris ŝin la fregat-ĉefleŭtenanto, kaj ĝi tute forigis la reziston de sinjoro Theo.

La ŝipo Stanley Up To Date rapidis al sia celo plenvapore, gaje kaj esperante. Direkto: sudoriento, tempo: la 16,20-a

horo. Bonega vespero!

…Matene iu skue vekis Jimmy la Ĝisorelan el sia lito. Tiu homo estis sinjoro Theo.

– Ĉu vi aŭdas?! La Ruĝa Vasiĉ pikis per tranĉilo Borck-on, kaj Eŭgeno la Buŝaĉulo eltordis ies dikfingron. La futbaljuĝisto divorcas dis de sia edzino, la ekzekutisto provokis la oraĵiston, neniu scias, kien veturas la ŝipo, ĉar Watson malsaniĝis por nikotinismo pro la fumado de la fortaj cigaroj Virginia, kaj Maxbell ankoraŭ dormas, ĉar li lernis danci tagnon ĝis mateno! Mi…

…Li ne povis daŭrigi, ĉar malgraŭ la relative trankvila vetero, subite la ŝipo oblikviĝis krakante.

– Ĉu la stiristo freneziĝis?

– Ne – respondis sinjoro Theo kaj aldonis plendinde: – Kion vi faris, vi, rabistaĉo?! Mi povas forĵeti la ekspedicion! Ĉe la direktilrado de la ŝipo staras Ofelia Pepita kaj gitaras!

L A L E T E R O D E J I M M Y L A Ĝ I S O R E LA

AL L A R E Ĝ O D E L A I N S U L A R O F E L I Ĉ O,

A L A R K I D U K O S T. A N T O N I O

Estimata Reĝa moŝto!

ALMIRA

Reĝa fortikaĵo, duon-etaĝo

Ni do ekveturis per la ŝipo, kaj tio certe estis malagrabla, ĉar Theo trovis en sia monŝranko la artistinon Ofelia la Kvadratita.

Tiu fia Wagner, kiu eĉ sin mem kontrabandis sur la ŝipon, ĉar li ne havis kandelon por la vojo revena, pro ties malsekiĝo.

Kaj ankaŭ la vera scienculo estas en mia ŝranko persone. Kiam li volas elveni, mi batas lin. Li estas Gustavo Bahr.

Ĝi okazis tiel, ke antaŭ ol la ŝipo estus ekveturinta, mi estis kun Ofelio, kaj mi ekhavis ideon. Ankaŭ Ofelia la Kvadratit veni kun mi! Bedaŭrinde mia mastro, nomata Theo ne volas kunveturigi mian fianĉinon Pepita. Ŝi tre ploris, ĉar dum nia kunesto mi konstante provis persvadi ŝin. Ni parolis kun sinjoro Wagner. Estis bona plano, ke li portos Ofelian Pepita sur la ŝipon en lignokesto, ĉar li havas boaton.

La fiulo petis pagi dek dolarojn kaj tiun medalon, kiu restis ĉe mi hazarde, kiam li montris ĝin al mi.

Sed poste informis min Theo, ke li ne komprenas la aferon. Dume li akiris Gustavon Bahr, kaj nun telegrafis la sekretario, ke nun li estas en hotelo sur proksima insulo. Tion sendis la sekretario Torn, kaj tiun scienculon, kiun mi fermis en la ŝrankon per la ŝu-butonumilo. Theo diris, ke mi iru por tiu scienculo, kaj mi portu lin kun la lignokesto en la ŝrankon de mia kajuto, kie nur mi rajtas kontaktiĝi kun li. Ĝi tiel estas sekura. Mi portis kaj terapias la perdiĝintan scienculon en mia kajuto, dum la ekspecidio trovos lin. Mi estas la motoro kaj la kapo de la tuta kaoso. Kaj mi veturis per motorboato sur pitoreskan insulon, kie estis liphara homo, kiu portis jupon, kaj estis videble, ke li ne estas tute normala

Li estis Gustavo. Ankaŭ la jupo koincidis. Ke li ne havas pantalonon, mi estis ties kaŭzinto, kiam mi fermis lin per la ŝu-butonumilo. Nun mi vidis ankaŭ lian vizaĝon. Nek tio estas pli bela.

“Ĉu vi estas tiu, kiun la sekretario elĵetis?”

“Eĉ kvinfoje” – li respondis.

“Ĉu pro sinjoro Theo?”

“Jes. Ankaŭ el banko pro li.”

Kaj li rakontis, ke li ne havis pantalonon: Mi diris, ke mi scias, ĉar bedaŭrinde mi vidis tion el la ŝranko. Nun gravas, ke ni iru. Li respondis, ke li ŝatus iomete ĉirkaŭrigardi en Honolulu, ĉar li havas tie propran filon kaj propran pantalonon, ĉar mi sendis ilin al la subŝtofigisto. Mi diris tion ke ĝi estas indiferanta por mi, kaj li povas iri nenien, nur en la lignokeston. Tio ne plaĉis al li. Sed mi diris al li, ke ĝi estos tiel, ĉar ĝi estas la ordono de Theo. Li konstante kriadis, ke mi ne faru tion al li! Li ne toleras ĝin! Jam ŝajnis tiel, ke mi ne povas plenumi la ordonon, sed kio faras Dio; mi subite batis lin je la kapo tiel, ke li tute silentiĝis.

Ankoraŭ la mateno ne krepuskis, kiam mi metis la ulon el la lignokesto en la bluan ŝrankon. Li provis klami, sed mi atentigis lin, ke ni petas silenton, ĉar se li kuraĝas kriadi ĉi tie, mi komplete ruinigos lin per du samformaj vangofrapoj.

Dume el la alia, fermita lignokesto elvenis Ofelia, kiu estas mia fianĉino. Kaj ni promenis. Mi vidis, ke la Ruĝa Vasiĉ rigadas ŝin avide. Sed mi diris al li, ke li vane pensas pri ŝi, ĉar ŝi ne estas tia, kiel la aliaj, sed ŝi estas tia knabino, kiu provas ŝin delogi, ties kapon mi platigos per karboŝovelilo.

Okazis tiel. Ĝis la insulo Kopro mi jam batis ĉiun membron de la personaro per la karboŝovelilo. Estis tiulo, kiun trifoje. Bedaŭrinde ankaŭ la pasaĝeroj!n Nur la kapo de la scienculo Maxbell ne estos batita, ĉar li estas maljuna kaj honesta.

Sed ĝis tiam, ĝis la bonvola revido. Datita, kiel estas sube skribita:

Don. St. James di Ĝisorela, sed

mi fiaskis, ĉar sekvan tagon, kiam mi alpoŝtigis tiun ĉi leteron, jam estis evidente, ke nek la kapo de la scienculo Maxbell faros escepton, rilate la displatigon per karboŝovelilo. Sincere via:

don supre skribita.

## D E K S E P A   Ĉ A P I T R O

La sovaĝaj kaj timigaj eventoj kun la ritmo de la altiĝanta varmego pliiĝis, kiel la ŝipo plenvapore ĉiam pli proksimiĝis al la Hinda Oceano. Fru-antaŭtagmeze sinjoro Theo flankenvokis sinjoron Wagner:

– Atentu min! Malnova konato kunveturas, kun kiu vi estis malliberigita antaŭlonge. Nun mi ŝatus, se vi kondutus tiel, kvazaŭ vi ne rekonus lin el Sing-Sing. Vidu, jen tie li venas…

Lordo Hamilton promenis sensuspekte iom pli malproksime, kaj li tute ne konjektis, ke sinjoro Wagner rekonas lin.

– Li estas granda friponeto! Sed ni estis malliberigitaj ne en Sing-Sing, sed en San-Francisko. Tio oni multe puŝadas la prizonulojn. Demandu lin, kio estas al Harry la Tranĉilisto? Ĉi tiu homo estis lia bona amiko. Alo!.. Bone, bone, mi ne rekonos lin. Kion vi volas?… Vi ĉiam tiradas min.

Lordo Hamilton haltis konsternite, aŭdinte la “alo”-adon. Kvazaŭ li vidus miraklon, tiel li fiksrigardis la blu-barban, hirtegan homon, kiu ĵus okulumis al li kelkfoje kaj minacis lin per sia montorfingro, sed poste li kaptis sian pantalonon haste.

Tipa antaŭtagmezo sur la ŝipo Stanley Up To Date: ĝi kargos iom da karbo ĉe insuleto. La motorboato kunportas ankaŭ novaĵon. Quebra, la hispana pirato, vaganta sur la Pacifika Oceano ekscitas maltrankviliĝon per malpli grandaj ribeloj tie kaj ĉi tie, kaj oni jam anoncis precize duonmilionon da dolaroj por lia kapo, sed vane!

Mallonga interludo kun sinjoro Maxbell, kiu hodiaŭ denove demandas la “kuraciston” maleme. Sed tiu ne volas fari

diagnozon kontraŭ sia konscienco por trankviligi la profesoron, sed sinjoro Theo ne volas korupri.

Sinjoro profesoro Maxbell montris etajn, ruĝajn erupciojn sur sia brako al Sokrato Schwachta aŭ al sinjoro Knapp (laŭ via plaĉo).

– Mi opinias – diris Maxbell, – ĝi estas sepsemio.

– Ankaŭ mi vidas tiel… sed ĝi ankoraŭ ne estas certa. Ĉu vi ne sentas vertiĝon?…

– Ne.

– Hm… Ĉu vi kutimas promeni antaŭ matenmanĝo?

– Ne…

– Ĝi estas antrakso – li diris kaj eklevis siajn ŝultrojn, kvazaŭ kompatante, sed li povas fari nenion.

– Diru! Ĉu vi ŝercas pri mi?! – kriis la scienculo kolere. – Ĝis nun vi konstatis minimume dek mortajn malsanojn ĉe mi!

– Jes, ĝi okazis tiel. Estas nekompreneble, ke vi ankoraŭ vivas. Kaj mi demandas: kial?… – Turninte sin, li apogiĝis al la balustrado gemute kaj klarigis babilante: Via malsano, sinjoro, estas malofta kaj nekuracebla: la scienca mondo timega ĝin laŭ la nomo paralokala molestito. Laŭ la fama scienculo, sinjoro Aŭrelo Pincetta, el Oksfordo tian homon, kiel vi, estus plej bone liberigi de la suferoj per bone direktita injekto.

Kaj li rigardis plezure en sian lornon. Li ĉiam rigardis en la tubon kun plezuro

Maxbell kuregis al Jimmy la Ĝisorela kriegante.

– Via kuracisto estas ekzekutisto! Ĉu vi komprenas?

– Tial, ĉar iu estas ekzekutisto, li povas esti kuracisto – diris Jimmy la Ĝisorela timeme, ĉar li pensis, ke Maxbell divenis la trompon.

– Tiu homo ne estas sperta pri sia profesio!

– Eble li tamen estas sperta pri tio – li respondis objektive. – Onidire nur lia kaŭĉuka manumo kaŭzis la problemon.

Tiu respondo definitive elĉerpis la paciencon de Maxbell, ĉar li pensis ĝin tute idiota. Furioze li rapidis al siaj instrumentoj. Dume sinjoro Rügen en la salono vangofrapis la oraĵiston pro Ofelia Pepita.

Mi diras, ankaŭ ĝi ŝajnis gemuta, kutima antaŭtagmezo, kiel la aliaj. Tiam sinjoro Theo ektuŝis la ŝultron de Jimmy la Ĝisorela.

Li ankoraŭ neniam vidis sian mastron tiel pala.

– Alvenis radiogramo el Honolulu – diris sinjoro Theo raŭke. – Sinjorino Gustavo Bhar mortis. Ŝi volis veni per aviadilo, kaj… survoje.

– Sinjoro – diris Jimmy la Ĝisorela mallaŭte. – Vi scias, ke mi ne estas superstiĉa, sed mi nun returniĝus plej volonte.

…Kaj li pensis pri la ŝipo Brigita. Li forsilentis tiun sian aventuron antaŭ sinjoro Theo.

La milionulo jam ne ridetis pri la naiveco de la fregat-ĉefleŭtenanto.

La glata, senlima oceano scintilis en belega sunbrilo, la ĉielo estis super ili serena, cejan-kolora, kaj tamen:

Jen estas la Morto!

## D E K O K A   Ĉ A P I T R O

Komenciĝis…!

Unue nur la tondro de etaj, sinistraj antaŭsignoj, poste la fulmofrapo de la fato batis en rapidaj sinsekvoj.

Jimmy la Ĝisorela, komisiita de Theo, devis entrepreni, ke li diros takte la morton de sinjorino “Gustavo Bahr” al la edzo. Unue do li skribis nur tiom en la letero, enŝovita ĉe la malsupra parto de la ŝranko:

“Ĉu vi bonvolas scii, altestimate, ke ni ricevis la informon; sinjorino Gustavo Bahr ekveturis el San-Francisko, kaj poste ŝi venos per aviadilo el Honolulu. Subskribito.”

“Mi ne sciis. Ŝi estas hero virino. Ŝi imponas al mi. Diru do, ĉu vi ne forlasos min eĉ por minuto spiri freŝan aeron, vi, fiulo?”

– Cinika ulaĉo – murmuris Theo, kiam li informiĝis pri la respondo.

La dua letero estis taktoplena preparo de la okazaĵoj:

“Mi havas la feliĉon sciigi vin, ke ni informiĝis: ke sinjorino Gustavo Bahr malsaniĝis en la aero, kien vi ne rajtas iri, ĉar mi satras ĉi tie kun basono.”

Respondo:

“Se vi retenos min eĉ plu, tiel mi malbenos vin, ke ankaŭ vi malsaniĝos! Insolentulo!”

Nu, alvenis la tempo, diri la veron.

“Mi legis viajn altestimatajn malbenojn, kaj nun mi havas la feliĉon informi vin, ke estus forta. (Tio ne malutilas ĉi tie.) Nun alvenis radiogramo, laŭ kio vi havas la feliĉon kun estimo sciiĝi: sinjorino Gustavo Bahr survoje pro malvarmumo mortis.

La respondo estis nekomprenebla kaj surpriza:

“Mi bedaŭras la kompatindulinon. Se vi farus tiun komplezon, ke vi donu al mi iom da salamo. Mi abomenas manĝi ĉiam bovoviandon. Komprenu tion, mi petegas!”

Lia nekredebla senkoreco indignigis Jimmy la Ĝisorelan tiom, ke tiun tagon li donis al la malliberulo de la ŝranko nek manĝi, nek trinki. Kaj posttgmeze li endonis al li biblion en la ŝrankon.

– Vi estas degenerinta, sendia homo! – li diris kategorie. – Prefere preĝu por la animo de la kompatinda virino!

– Mi preĝas – respondis la pordisto malesperiĝinte, – sed donu salamon al mi. Mi ne povas manĝi la bovoviandon…

Tiam Jimy la Ĝisorela surverŝis lin per kruĉo da akvo.

La kompatinda pordisto ploris amare kaj viŝis siajn larmojn per la litkovrilo. Se li estus sciinta tion, li tute ne estus veninta ĉi tien. La pantalono kaŭzis ĉion, kiun oni hazarde perforis per la stampilo de la banko sub pakumpapero.

Vespere okazis la fatalaj eventoj per tempesta rapideco.

Multaj steloj brilis, ankaŭ la akvo disiĝis per stranga, helverda ardo ĉirkaŭ la ŝipo, kaj longe irizis malantaŭ ili la scintilo de la kirlitaj bestoj, kaj la vento kunportis melodion de fore.

Sinjoro Wagner kantis la komencan arion de la Verda Aso el la opero Bajazzo, kun profunda malĝojo, ĉar oni fermis lin en terpom-deponejon, ĉar oni ne toleris plu, ke posttagmeze la edzino de la futbaljuĝisto jam svenis la kvaran fojon. Sed kiu povintus konstraŭstari en la situacio de sinjoro Wagner, kiam li ekvidis sian iun malnovan amikon, li disetendis siajn brakojn por ĉirkaŭpreno?

Kaj sinjoro Wagner ne plu povis fari tion!

Ofelia Pepita sidis apud profeosor Maxbell kaj ludis sur sekstanto kortuŝite.

– Kiel bela vespero estas… – flustretis la artistino. – Ĉu vi neniam aŭdis, ke estas tiuloj, kiuj elektas stelon?

– Jes, mi aŭdis – kapjesis la profesoro. – Ĝi okazis al Arkimedo. Li deklaris pri la steloj, ke oni elektu punkton en la spaco, kaj li formovos la teron el ties loko. Tiu punkto estas elektebla kie ajn. Ĝravas, ke ĝi estu fiksa.

– Prave – kapbalancis Ofelia, – grvas, ke ĝi estu fiksa, sed se oni ne havas kromsalajron, nek tio estas bona. Ni elektu stelon… – Post mallonga paŭzo ŝi ankoraŭ flustris tion: – Mi jam elektis.

La moroza ombro de Jimmy la Ĝisorela atentis ilin el malantaŭ la ventoltubo. Tiam okazis, ke la Ruĝa Vasiĉ enpaŝis en la kajuton de la milionulo rezolute:

– Sinjoro! La personaro estas tre nervoza. Ni aŭdis, ke mortis la edzino de la profeso.

– Nu kaj?

– Kaj nun iu buŝharmonikas ĉi tie!

Ĝi komenciĝis tiel.

La personaro kolektiĝis en malgrandaj grupoj. Ia maltrankvilo streĉiĝis sur la ŝipo. Nervozaj, raŭkaj voĉoj diskutis. Theo rapidis kun Vasiĉ al iu grupo.

– Mi aŭdis la harmonikon – stridis Petters kun sia senvoĉa parolo. – Kaj ankaŭ Tendenulo la Fervora!

– Mi staris ĉe la malsuprenirejo de la ŝtuparo – diris Tendenulo la Fervora kaj elprenis kelkajn, etajn najlojn el siaj dentoj, – ĉar li muntis draton kun Vanek la Dornhara. Dornharulo iris en la kuirejon por io…

– Mi elportis hakilon de tie.

– Okazis tiel – daŭrigis Tendenulo la Fervora, – ankaŭ mi manĝis el tio, aŭ ankaŭ mi rigardadis la hakilon, kaj dume mi ekaŭdis la buŝharmonikadon el la ilarejo.

Decidkarakteraj, maltrankvilaj matrosoj ĉirkaŭis Theo-n… Ili malfermis la ilarejon, kaj kiel ili antaŭe konjektis: nenio.

– Fine ja vi ne estas infanoj, ke vi ektimu pro ĝi! – li diris tion kun malmulte da konvinkiĝo.

– En la zono de la Verda Vizaĝulo neniu estus miranta, se la mortinta edzino de la profesoro estus veninta ĉi tien… – diris Borck.

– Kiu ekscitos maltrankvilon per timigaj misinformoj – diris Watson malvarmkondute, – tiu bladaŭ renkontos la animon de la edzino de la profesoro. Mi havas dekdu kuglan rapidpafan, kanelitan revolveron por tia vojaĝo.

– Kaj cetere! – kriis Jimmy la Ĝisorela, ĉar li sciis bone, ke ili timiĝas ekskluzive de mortinta homo, ili do timos Watson-on

nur tiam, kiam ili jam mortigis lin. – Pasintjare ĉe la Kabo de Bonespero mi navigis kvarfoje preter la ombroŝipo de Morton la Kriptokapa, sed neniu ektimis, kiel vi; sed tio estas vera, ke tie ni neglektis la kor- kaj nevomalsanajn spickomercistojn dum la dungo de matrosoj.

Kiam li finis sian mallongan kaj specialan oratoraĵon, la tuta societo malrapide forŝteliris, kaj sinjoro Theo, kiu en kelkaj aferon ne konsentis kun la ekspliko de la antaŭe parolanto, sed li komprenis, ke estas plej bone efiki ĉiuspecan socitavolon per konvena, psika rimedo.

– Sed – diris sinjoro Theo mallaŭte apud ili – iu tamen ŝercas per buŝharmoniko ĉi tie.

– Mi ne estas superstiĉa…

– Ĝi nun jam estas tiel kalara, ke ni ne plu devas pruvi tion. Unuavice ni bele, nerimarkite traserĉos la ŝipon.

Ĵus ili estus ekirintaj, kiam kun sia konsternige enkaviĝinta flanko, tre malproksime, kie la rando de la maro, kiel turniĝanta telero, ĝuste grandarke leviĝis, kun siaj nekredeble kadukaj ripoj aperis ŝipo, blanciĝanta, kiel kafmuelilo. La ŝipo Sinjoro Wanger!

Oni mallongigis ties nomon, kiu nun jam fariĝis mondfama, kiel absurdaĵo. Ili rapide atingis ĝin, kiu havis kelktagan avantaĝon.

La kadukiĝintan helicon ili antaŭos per grandega distanco post kelkaj horoj, kaj ili preteros ĝin por ĉiam, tio certas.

Sed Vanek la Dornhara, la astma Petters kaj Tendenulo la Fervora rigardis longe al la ŝipo Sinjoro Wagner iom post iom forviŝiĝanta en la malproksimo de la tremantaj vaporoj. Poste ili rimarkas Jimmy la Ĝisorelan, kiu ĝuste nun staras

sur la kapitano ponto antaŭ Watson, sed kun malfermita buŝo li fiksrigardas al la forviŝiĝanta rando de la maro, en la lontanon, kaj lia vizaĝo estas sensanga.

Nur ili scias, ke la antaŭdiluva pantoflo, ali-farbita per la komika nomo, efektive estas la ŝipo Brigita, la pesto-ŝipo.

## DEKNAŬA ĈAPITRO

Sekvan tagon sinjoro Theo interkonsiliĝis kun Jimmy la Ĝisorela. La atmosfero, eĉ inter la pasaĝeroj estis senteble prema sur la ŝipo.

La oraĵisto diris maltrankvile al Jimmy la Ĝisorela, ke malmultas la savboatoj, kaj li tuj vidis tion. La respondis estis mallonga kaj forte karakteriza, sed ne priskribeble efika. Venis en la kapon de doktoro Rügen, ke li ne preĝis depost sia infanaĝo, kvankam li estis vere diotima homo. Nur Sokrato Schwachta aŭ Knapp (laŭ via plaĉo) maltrankviligis sian ĉirkaŭaĵon kun sia proza kvieto. Li iradis ĉe la balustrado en ĉiam pli elegantaj kaj akrakoloraj, angla raglano, kvadratita, kamlota ĉapelo, kaj en tute flavaj, blindige brilantaj ŝuoj, kun ĝuo rigardante tra sia lorno la densan nebulomuron, starantan senpere apud la ŝipo.

Laŭ Maxbell famekonta scienculo Du Bois Reymont vere tre kredis la fantomojn, kaj li korespondadis kun Haeckel pri tiu temo. Sed laŭ Haeckel, se tamen ekzistas fantomoj, oni povas meti ilin en bokalon laŭ la leĝoj de fiziko, logiko, matematiko kaj kemio. Aŭdinte tion, Ofelia Pepita proponis malfermi ĉiun konfitaĵon sur la ŝipo, por ke ne estu fantomoj, kaj fine ili faru boleon, poste, se oni volas danci tangon, ŝi ludos citron. Ĝi tamen estas pli bona, ol la buŝharmoniko.

Vasiĉ kun kelkaj junuloj interkonsiliĝis sur la interferdeko. Maltrankvilo vibris en la aero, ekscita kaj stranga.

– Nun estas aparta malbeno – diras sinjoro Theo, – ke la scienculo du gradojn preter Tsiui kondukas nin al la Suda poluso. Kaj precizege, ĉar li havas tiajn instrumentojn, kies fabrikadon li kontrolis.

– Mi jam helpis pri tio – konfesis Jimmy la Ĝisorela. – Ni navigas rekte al Tsiui, ĉar li havas tiun pazan, platinan objekton, kaj mi aranĝis pere de drato, ke ĝi montru du gradojn erare. Kion mi fabrikas, tion li ne povas kontroli.

La ferdeko baldaŭ silentiĝis. Sinjoro Theo eniris en sian kajuton, sed li ne enlitiĝis.

Li volis rigardi en la okulojn de tiu fantomo sola!.. Damne… Surpreninte sian pluvmantelon, li ŝovis revolveron kaj elektran manlampon en ties eksteran poŝon. Poste li eliris. Kie povas kaŝiĝi nerimarkite iu sur la ŝipo? Jen estas la demando! Li denove malsupreniris en la bilĝon, kie d-ro A. Winter malaperis tiun abomenindan tagon. Ankaŭ nun staris la lignokestoj, la sakoj kaj la dokumentŝranko same.

Ĝi certe estas ĉi tie… Li sciis bone: la solvo latentas ĉi tie en la malluma, muta bilĝo.

Li klake ekfunkciigis la poŝlampon.

Larĝa lumstrio trakuris ĉion. La riparo… la lignokestoj… la dokumentŝranko… Nun li aŭdis mallaŭtan buon…

– Kio ĝi estas?

Ja nevidebla mano jam lasis libera A. Winter-on. La ŝranko estas malplena! Kaj tamen! Ĝi ripetiĝis…

Li iris tien… Li turnis rapide la ŝlosilon, kiu ankaŭ nun etis en la seruro, kaj li malfermis la pordon.

La lampo falis el lia mano!

…En la dokumentŝranko, duonmorte kaŭris la geografo Gustavo Bahr malesperiĝinte…

## D U D E K A   Ĉ A P I T R O

Sinjoro Theo mansvinge venigis matroson al si sur la ferdeko.

– Suprenportu mian dokumentŝrankon el la bilĝo, ŝajnas, ke ŝimo ekkovris ĝin! – ordonis Theo.

…Kaj fine post tiom da peripetio kaj laŭ tiel nekredeble komplika maniero; Gustavo Bahr vere estis en la ŝranko de tiu juna milionulo, kiu ekveturis iun tagon por serĉi lin, spitante eĉ kontraŭ la morto.. Sed nun evidentiĝis la sekvaj:

Gustavo Bahr akiris tiom da mono de la entrepreno de la polvosuĉiloj, ke li povis veni en Honolulu-on per aeroplano. Sibite, kiam li promenis en la haveno, afabla frenezulo falis al lia kolo, kisante kaj brakumante lin, ĉar tiu pensis rekoni en Gustavo Bahr iun sian malnovan amikon, kun kiu li pasigis neforgeseble familiarajn tagojn en la relegaciejo de Tokio.Gustavo Bahr feliĉe konsideris tion miskompreno, kiam li eksciis, ke la kara krieganto estas la ĉefdirektoro de grandega ŝipkompanio! La scienculo menciis, ke li malfruis al la ŝipo Stanley Up To Date, kaj li ŝatus suriri ĝin sekrete, sed tiel, ke li parolu nur kun ties posedanto, kun sinjoro Theo. La kriegante babilanta fremdulo tuj diris, sinjoro Theo estas lia malnova, bona amiko, eĉ lia parenco, kaj ili pasigis longan tempon kune en pluraj prizonoj, pri kio Gustavo Bahr nun deklaris sincere, se li estus sciinta tion pli frue, li neniel partneriĝus kun la milionulo. Do tiu parenco de sinjoro Theo entreprenis sekrete surŝipigi lin sur Stanley Up To Date, tiel li kaŝiĝis en lignokesto sur la bordo. Poste li vane porvis elveni de tie. Kvankam li jam sciis ankaŭ tion, ke oni portis lin sur alian ŝipon. Sed li divenis tion malfrue! La fermoplato de la kesto ne estis fermita, sed iu konstante estis en la proksimo, kaj ĉiufoje, kiam li provis elveni, oni tuj vagofrapis lin, tiel li

ĉesigis ĝin post iom da tempo. Baldaŭ li rimarkis, ke neniu restadas en la bilĝo, sed oni metis pezan keston aŭ io similan sur la klappordo, ĉar li ne povis malfermi ĝin. Poste iun nokton eble iu ŝtelumis sur la ŝipon. Li proksimiĝis kun singardaj paŝoj. Fine la ŝtelumanta homo subite diris: Disinjoro!… kaj li forkuregis, tute ne atentante pri tio, ke li faras bruon. Tiam la profesoro forlasis la malgrandan keston, en kiu li praktikis sian akrobataĵon, laŭditan fare de sinjoro Wagner, kio fierigas lin. Sed eblas, ke li neniam plu povos rektiĝi, kio en lia aĝo jam estas neglektebla. Li do grimpis de sur la ŝipo, kaj per iu sampano, ĉirkaŭe restadantaj li remis al la ŝipo Stanlej Up To Date. Tie li suprengrimpis sur kablo kaj ŝtelumis en la deponejon. Li atendis, en la dokumentŝranko, ke sinjoro Theo fine venu por li. Hieraŭ, eble la diablo estis, ĉar li aŭdis nek paŝojn, iu ferme turnis la ŝlosilon en la seruro, kaj li jam agoniis, kiam la milionulo liberigis lin hodiaŭ.

– Diru al mi – flustris Theo, – pro kio timiĝis la enŝteluminto en la bilĝo?

– Eĉ konjekton mi ne havas. Lignokestoj estis ĉie. Kaj mi vidis nur tiom. Krome kelkajn tute grandajn vangofrapojn.

– Ĉu vi ne scias, kiel nomiĝis tiu ĉi ŝipo, antaŭ ol ĝi ricevis la nomon Kio Nova, Sinjoro Wagner”?

– Kian nomon havis la ŝipo? – demandis la profesoro timiĝinte. – Vi ŝercas!

– Ne. Ĝi nun estas la sensacio de la epoko de teknokratio. La nomo de la ŝipo, sur kiu oni tenis vin en mallibereco, estas Nu Kio Nova, sinjoro Wagner.

La profesoro side refalis kaj flustris anime rompiĝinte:

– Sinjoro, estas malpermesate, ke tio evidentiĝu… Jam eĉ tio estos timiga, se la verkistoj de mia aŭtobiografio skribos mian historion sub la titolo: “Tra fajro, infero, maroj en dokumentŝranko!” Sed mi demandas vin, kiel oni opinius pri la vivo de Kolumbo aŭ pri tiu de Peary, se ties iu fama ĉapitro tekstus jene: “NU KIO NOVA, SINJORO WAGNER EN LA REGIONO DE LA ETERNA NEĜO!”

– Tute maljunaj profesoroj kaj junaj artistinoj prijuĝas ĉion tra sia vanteco. Kaj dume vi havas nek konjekton, en kia terura situacio mi estas. Ĉar sur tiu ĉi ŝipo…

– Sinjoro! Ne daŭrigu! Mi diros unu vorton, kaj vi komprenos, ke mia situacio estis multe pli terura. – Li leviĝis, kaj ektremante nur pro la rememoro, kaj eĉ pli hirtigante siajn hirtajn harojn per siaj fingroj, li flustretis tion: – Sur la ŝipo, kie mi estis en lignokesto… nokte fantomo buŝharmonikis!

– Estas varme… – diris sinjoro Theo post stranga paŭzo, kaj montrofingre li iom vastigis duoncirkle sian kolumon, kvankam ĝi ne estis strikta! Sed ŝajnis ĝena, ke nur tre longa kaj mallarĝa kajutŝranko estis je la dispono de la profesoro por loĝi.

– Sinjoro… – li flustris en dilemo – mi havas nenian seriozan problemon pro la lignokesto. En mia aĝo vere ne gravas iam rektiĝi, sed se mi staros longe en la mallarĝa ŝranko, mi neniam plu povos klini min, kaj ĝi kaŭzus mian pereon. Temas pri mia vivpano…

– Mi bedaŭras. Se vi ne estus baniĝinta tiun tagon, tiel vi nun povus loĝi sinjore en la blue emajlita ŝranko, kiun mi mebligis tiel bele por vi, kiel sekretan rendevuejon.

– Estis tie enkonstruita radio… – li flustris kun plendinda voĉo. – Kaj kiom da salamoj… Tiu baniĝo faris min mizera, kaj fine mi mortos pro tio. Sinjoro! Neniu diru al mi plu, ke la

pureco estas duono da sano! Mi fariĝis la viktimo de la higieno!

Sed nun la Ruĝa Vasiĉ anonciĝis kun modesta frapetado, kaj tiel riskante la pluan karieron de la profesoro, li devis enpaŝi en la korpostriktan, preskaŭ bone fasonitan ŝrankon, kaj estis bonŝance, ke li staris en ĝi, tiel fizike estis neeble, ke li falu, eĉ se li mortus, ĉar la Ruĝa Vasiĉ raportis per timeme gapanta, malcerta kaj mallaŭta voĉo:

– Sinjoro Theo… ni devus fari ion, ĉar iu buŝharmonikas ĉi tie…

## D U D E K U N U A   Ĉ A P I T R O

Dume okazis simile fantomeska sceno en la kajuto de Jimmy la Ĝisorela tiun enigman, noktan horon, kaj eble tio formas la ŝipon eĉ pli simila al frenezulejo, ol tia ĝi jam estis ĝis nun. La antaŭaĵoj de la evento komenciĝis ankorŭ dum la fur-posttagmezaj horoj, kiam sinjoro Theo ne trovis la veran profesoron kaj decidis provi fini la vojaĝon. Li elŝipigos la profesoron ĉe iu proksima insulo (el la ŝranko de Jimmy la Ĝisorela), kaj li trovos lin. Egalas! Oni senmaskigu lin… Nun temas pri la vivo de homoj. Eble eĉ pri pli multe!

Li venigis Jimmy la Ĝisorelan.

– Atentu min! Vi ricevos kvin mil dolarojn, se vi entreprenos surbordiĝi, kaj se okazos problemo, vi surprenos la skandalon, vi ne estos punita pro tio.

– Ĝis estas detalaĵo.

– Gravas, ke vi estos surbordigita pli fure. Nun atentu: Vi kaj Gustavo Bahr enfermiĝinte en la ŝrankon, provu tiun scenon, kiel tiun kun Livingstone.

– Kia ĝi estu?

– Gustavo Bahr scias, kion diri. – Nun notu tion bone, kaj provu ludi ĝin kun li. Sur la bordo, kien ni metos vin nokte, la profesoro atendos vin antaŭ la tendo de indiĝeno. Kiel iam la kompatinda Livingstoen en la regiono de Kongo Stanley-on. Vi alpaŝos lin dirante: “Se mi ne eraras, ĉu vi estas sinjoro Gustavo Bahr?” Tiam li respondos: “Jes…” Vi diros ian tiaĵon: “Mi dankegas Dion, ke mi trovis vin…”

– Mi rimarkas, ke la dialogo estas sufiĉe origina. Kaj kiu estas Livingstone?

– Alia scienculo, kiu mortis jam delonge en Afriko, sed unue li malaperis, kiel Gustavo Bahr.

Jimmy la Ĝisorela jam apenaŭ atendis, ke ĉio silentiĝu sur la ŝipo. Malrapidirinte en la kajuton, li fermis ties pordon kaj ellasis sian kunvojaĝanton el la unuaklasa ŝranko.

– Diablo forportu vin ĉiujn – diris unuavice la fama homo, iom pale, kaj svingante siajn membrojn, kiel reviviĝinta, intersezona mantelo, ĝojanta, ke fine ĝi povas pend-etendi sin. Eĉ nun li portis la loz-materialan litkovrilon. Tiurilate karakterizis lin imila anarkio, kiel sinjoron Wagner.

– Nun ne diru vian propran tekston. Atentu min! Ni metos sur la bordon. Vi sidos en la tendo, mi alpaŝos vin kaj demandos vian nomon, vi diros: “Jes”, mi respondos: “Dio benu vin.”

– Ĝi estas idiotaĵo.

– Tio certas. Sed dungito ne kritiku. Kaj okazis la mondfama sceno jene:

Jimmy la Ĝisorela, kvazaŭ nun alveninta, rapidis al la ŝranko.

– Ho! Bonan matenon! – li salutis la pordiston, kiu staris tie leĝere, sed en pozo, dece al mondfama homo, vestita per litkovrilo, metita sur liajn ŝultrojn. – Estas bone vidi vin! Ĉu vi estas Gustavo Bahr, la malaperinta, geografa profesoro?

Sekvis surpriza respondo.

– Ne. Mi estas Livingstone.

Jimmy la Ĝisorela kaptis sian kapon ambaŭmane pro kolero:

– Vi estas azeno! Ĝi estas alia teatraĵo! Li malaperis ĉe Kongo, kaj tiookazis tre longe, kvankam ankaŭ li estis malsana homo. Nun ne intermiksu ilin! Diru vian propran nonom! Do: kiu vi estas?

La alia eklevis sian ŝultron, kvazaŭ li ne povus helpi la aferon:

– Kredu min, nek por mi estas agrable, sed mi nomiĝas Baruch T. Livingstone. Se vi volas, mi povas diri ankaŭ pseŭdonomon, sed ĝi estas la stato de faktoj – defendis sin la pordisto de Pacioci.

– Ĉu vi jam malaperis foje ĉe Kongo? Ĉu vi ne la unuan fojon faras tiun trompon?

– Antaŭ dudek jaroj mi vere malaperis, el Bostono, ĉar la patro de juna vendistino serĉis min en la urbo kun ŝargita revolvero.

La vivin de Livingstone savis hazarda bonŝanco: sinjoro Theo enpaŝis en la kajuton kaj liberigis lin.

Li jam estis bula.

– Tiu fripono faris idioton el mi! – kriegis la fregat-ĉefleŭtenanto.

– Sinjoro... – ĝemetis la pordisto – je kio mi ĵuru, ke mi estas Livingstone?

– Tiu homo vere estas Livingstone – klarigis la milionulo la aferon.

– Ĉu vi do ne mortis ĉe Kongo?

– Mi rakontos ĉion, nun venu, ĉar mi volas paroli kun vi.

Jimmy la Ĝisorela sekvis lin maltrankvile. La pluvo kaj la vento ĉesis. Estis belega nokto.

– Kio okazis?

– Nenio grava. Watson estas fripono.

Estis malluma nokto. Kaj la malgranda vaporŝipo veturis plenvapore for de la civilizacio, al ĉiam pli svaga, mistika kaj minaca sorto…

# D U D E K D U A   Ĉ A P I T R O

Theo elpaŝis el la kajuto kun Vasiĉ.

– Kie oni buŝharmonikis? – li demandis la ruson.

Anstataŭ Vasiĉ respondis iu alia. Longa, fajfanta tunkurado. Kradita lampo sviniĝis, frapiĝadis kun terura bruo.

La vento trasiblis la ŝipon, kaj aperis la oblikve leviĝanta surfaco de la murmuranta maro, kun sennombraj, blankaj, muĝantaj krestoj. La ŝipo Stalney Up To Date oblikviĝis grincante.

Ankaŭ Watson estis pala. Ĉu estas fantomo, ĉu ne, paniko minacas. Tio certas.

La zumeto nun aŭdiĝis el alia direkto. Tute mallaŭtaj, spiretoj da flutetadoj de buŝharmoniko

– Ĝi ne estos bona tiel, kapitano – grumblis iu.

– Ni serĉu lin, homoj! – diris Theo. – Nun temas pri friponaĵo, kaj sekvos vangofrapoj.

Sed li sciis bone, ke oni ne kredas tion. Theo serĉadis en la bilĝo kun Watson. Ankaŭ la enigmon de A. Winter englutis la bilĝo ĉi tie.

– Neniu povas kaŝiĝi ĉi tie. – diris Watson. – Mi kutimas aranĝi la kargadon tiel, ke oni ne havu eblecon al tio.

Theo rigardis sur la plankon hazarde. Li konsterniĝis. Jen estas libro! Nun jam nek al Watson kuraĝis diri siajn rimarkojn. Li lerte levis ĝin de sur la planko, por ke la kapitano vidu nenion, kaj li enpoŝiĝis tion rapide.

Unu harmonika ronkurado… Poste aŭdiĝas terura piedtamburado super ili. La matrosoj kuris en la pruon. Ili persekutis la nevideblan buŝharmonikanton.

Nenio! Sed la sonoj venis de tie ĉi.

– Ĉiu iru dormi – diris sinjoro Theo. Kaj ankaŭ li iris en sian kajuton. La ferdeko fariĝis malplena. La pluvo apenaŭ drizelis. Sinjoro Theo rigardis la libron ĉe la lumo de lampo. Estas bonŝance, ke li trovis ĝin.

Diablo vidis tiaĵon. Ĝi estis skribita sur ties fermoplaton:

Harmonikaj ekzercoj

Kaj sub tio per plumo: “sinjorino Gustavo Bahr.”

Li nur staris kaj rigardis tion. Kio ĝi povas esti?… Ĉu ekzistas fantomo? Tamen estus io?… Li staris antaŭ sia kajuto kaj tute klare li aŭdis mallaŭtan tonkuradon. Ĝuste el sia propra kajuto!

Unu salto, kaj li estis interne…

Ĉu eblas, ke li fine devus kredi pri la fantomoj?! Li vidis neniun. Sed buŝharmoniko estis sur la planko. En la mezo de la ĉambro, kie antaŭ kvin minutoj ankoraŭ ne kuŝis la muzikilo. Iu langvore skrapis la ŝrankon interne. Ĉu Gustavo Bahr ankoraŭ vivas? Li ne estus povinta kredi tion!

– Ĉu estis iu ĉi tie?…

– Sinjoro… Terure…

– Estu forta!

La profesoro flustris plendinde:

– Kiel?…

Sinjoro Theo elŝtelumis. Nun li esplorkontrolos tion! Li sentis, ke ekstere, sur la nokta ŝipo li trovos la solvon. Kvankam jam ankaŭ li konjektis, ke nun li ne povos batali per revolvero. Iu ektuŝis lian brakon, kaj voĉo flustris:

– Venu en la bilĝon…

Tiu estis virino, sed ŝi jam estis for. Nun! Li sentis nun, ke sekvos ia solvo. Ia terura, sed laŭ la realo trankviliga. Li rapidis sur la malluma, malseka ferdeko kaj iris en la bilĝon.

Li tuj retropaŝis timiĝinte kaj kovris siajn okulojn.

Ie supre, tute alte, ekbrilis lumo subite, kiu frapiĝis ĝuste en lian vizaĝon blindige.

– Restu tie, kie vi estas! – diris mallaŭta, sed inteligenta voĉo malantaŭ la ŝajne senmastra lumfonto. – Se vi donos signalon, aŭ vi ekmoviĝos, vi trovos min neniam!

– Mi ne ekmoviĝos, sed estingu la lampon. La lumo nevizigas min, se ĝi frapas en mian vizaĝon, kaj oni povas ekvidi ĝin de supre.

La lumo estingiĝis.

Kaj en tiu momento en la mano de la knabo ekbrilis la prete tenita lampo, kaj ĝi rekte lumis tien, kie li ĵus aŭdis la voĉon.

…Lilian Hiller sidis supre, en kaŭĉuka mantelo.

– Ĉu vi… vi aranĝas… tiun stultan komedion?!

– Vi aranĝis la komedion – diris la virino kaj balancis per siaj beletaj kruroj supre, kun insolenteco, esprimanta, ŝian restariĝintan animan ekvilibron.

– Mi petas vin ne fumi ĉi tie en la deponejo.! – diris Theo kategorie. – Vi povas ekbruligi la tutan ŝipon!

– Nek tio estus mirinda. Oni persekutas min ĉiutage, kiel ĉasbeston. Estas tute bonŝance, ke la viroj ne havas prudenton. Kompreneble vi estas escepto. Nek vi havas prudenton, sed vi ne estas viro.

– Kial, se estas permesate ekscii tion?

– Ĉar vi minacas sendefendan virinon.

– Bonvolu diri, kial vi faras tiun buŝharmonikadon?

– Se mi donos mian honorvorton, ke ne mi buŝharmonikas, ĉu vi kredos tion?

– Ne.

– Nu mi donas mian honorvorton. Kaj se vi ne kredos tion, tiel vi ofendos min. Ne mi buŝharmonikas, sed mi scias, kiu buŝharmonikas, kaj mi ne diros tion al vi.

– Ĉu vi ŝatas tiun?

La virino sidadis en la alto, apopginte sin per siaj manplatojn kaj ŝovinte siajn du mandorsojn sub siajn genufleksojn kaj pintiginte siajn lipojn, ŝi fajfadis mute. Theo volonte estus vangofrapinta tiun impertinentulinon.

– Mi demandis, ĉu vi ŝatas tiun?! Respondu al mi!

– Kial vi kriegas?!

– Ĉu vi ŝatas tiun?

– Kiu ŝatas tion, se iu kriegas? Mi toleras ĝin, ĉar tia estas la situacio, kiam sendefenda fantomo kaj misedukita milionulo

renkontiĝas.

– Se mi petas vin bele, diru al mi: ĉu vi ŝatas tiun, kiu buŝharmonikas?

– Tre.

– Kial vi venis sur la ŝipon sekrete? Mi ja invitis vin!

– Vi uzas tute nedecajn deklarojn pri mi, antaŭ miaj oreloj! Vi tute ne volis preni min sur la ŝipon.

– Ĉu vi diras tion al mi?! Ĉu mi ne petegis?

– Tiam mi jam ne povis suriri sur la ŝipon Stanley Up To Dete. Kvankam mi volis. Mi aranĝis unuarangan rabistan atakon, sed kiu kulpas pri tio, se mia dungito, tiu pasia amatoro, maskinta sin bandito, vangofrapis vin tiel, ke vi svenis, ĉar vi konsistas el laktokremo kaj el silkopapero.

Ŝi ekfumis cigaredon kaj balancis per siaj kruroj.

La senekzempla insolenteco de la virino efikis lin kun tia sugestia forto, ke li preskaŭ ne povis ekparoli.

– Ĉu vi dungis miajn atakantojn?

– Pardonon… Mi dungis miajn proprajn atakantojn. Inter ili estis via dua oficiro, kiu nomiĝas Jimmy la Ĝiskola…

– Ne Ĝiskola, sed Ĝisorela!

– Eblas. Se vi finis vian anatomian prelegon, mi ŝatus daŭrigi. Nun, kiel suriri la ŝipon, kiam ĉiumomente povas senmaskigi min tiu… Aleksio Ĝisokula.

– Ĉu vi ne dirus al mi, kiu vi estas?

– Sinjorino Gustavo Bahr.

Ĝi estis konsterna! Kvankam oni diris tion konstante, kaj li trovis ankaŭ libron, malgraŭ tio li sentis tiel, aŭdinte la novaĵon, kvazaŭ li estus batita je la kapo.

– Ĉu… vi estas… sinjorino Gustavo Bahr?

– Jes! De antaŭ kiu vi fuĝis. Ne prenu miaflanke kiel la signon de simpatio, se ĝi ne sukcesis al vi!

Kaj nun veraj larmoj ekbrilis en ŝiaj okuloj kaj disetendis siajn brakojn en la alto, kiel malfeliĉa akrobatino sur la trapezo, senapoge. – Mi venis por serĉi mian edzon! Gustavo! Kiun nek la spiritismo, nek la scienco sukcesis trovi…

Sinjoro Theo por momento iom hontante klinis sian kapon, kaj ŝajnas, ke tiu momento sufiĉis al la malesperiĝinta virino, ke ŝi falu sur la kapon de la viro.

La vizaĝo kaj la kapo de sinjoro Theo kontuziĝis inter la lignokestoj, sed li salte leviĝis kaj kaptis la mallarĝan ŝultron de la preterglitanta Lilian. La teksaĵo ekkrakis… io ŝiriĝis, vangofrapo aŭdiĝis. Theo ne lasis ŝin libera!.. Subite altirinte ŝin, li sentis tute proksime la parfumodoran spiregon:

– Lasu min… Mi petas, lasu min libera… – ŝi flustris tremante. – Mi senmaskigis min… memvole, ĉar mi vidis, ke vi eltiris vian revolveron, kaj mi timiĝis terure… ke vi fariĝos murdisto…

Kial li tuj kredis tion? Li ne estis tromemfida homo. Tamen li sciis: tiu publikdanĝere mensoga virineto diris la veron:

– Ĉu la buŝharmoniko?

Estis superflue daŭrigi. Ie en la mallumo, kvazaŭ mallaŭta spiro ricevus reeĥon, tute aereske ekzumetis bruo de komenco de harmonika tonkurado, kaj tuj poste ĝi mutiĝis.

Dum sekunda, tolpora mirego de la junulo, Lilian lerte eltiregis sian pojnon kaj malaperis…

…Aŭroris, kaj li malrapide stumbletadis sur la ŝtuparo. La ferdeko jam estis senhoma. Li decidis diri nenion pri la spertitaj aferoj. Li povas komprenigi nek al si mem, kio estis tio, kion li spertis? Sed kien ŝi povas malaperi dum momento, ke oni nenie trovas ŝin?

Nur unu aferon li povis konstati pri tiu virino nun jam tutcerte. Tion, ke li amas ŝin. Sed freneze… Eble nek li estas indiferenta al la virino, ĉar ŝi estas impertinenta, insolenta kaj kruda, kiel dratbroso. Li alvenis al la kajuto de lia lorda moŝto… Li murmuris ion en si mem…

…La kajuto de Watson. Tiu bela, juna kapitano estis malbona akiraĵo. Sen la bohema Jimmy la Ĝisorela, kiu ĉiam implikiĝas en malagrablaĵon, krome sen la unuokula, sed neniam duone ebria Vasiĉ li ne povintus atingi multe. Ni rekonu tion virece…

Maldense falantaj pluveroj farapiĝas en lian vizaĝon kaj atentas. Li estas iomete nervoza… La koro funkcias malbone ĉi-regione… Iu diras mallaŭte en la kajuto de Watson:

– Se Quebra ne venos antaŭ nin, ĝi vanigos niajn ĉiujn kalkulojn!

– Mi ne timas tion – diris alia voĉo. – Sed tiu malbenita harmonikado povas fiaskigi ĉion.

Hoho!.. Kio ĝi estas?

Li frapetis kaj enpaŝis. Preskaŭ li falis tra la pordo pro sia miro.

Infero kaj diablo! Watson estis sola en la kajuto!

Kie estas tiu, kun kiu li parolis? Kaŝiĝi ne eblas ĉi tie.

– Kion vi deziras, sinjoro? – demandis Watson kun malvarmkonduta ĝentileco, akompanate de sia kutima, marioneta rideto. Theo ekregis sin.

Li sentis instinkte: estos pli ĝuste ne mencii, ke li aŭdis ion. Kion fari sur la vasta maro, se li volas, ke Watson konfesu la veron?

– Vi maltrankvilas pro la malbona atmosfero, kio regas inter la matrosoj!

– Jes…

Kien malaperis tiu, kun kiu li parolis?

– Mi esperas, ke ne estos alia surprizo.

Sed li eraris. Kiam li diris al Jimmy la Ĝisorela, ke la kapitano kaj la personaro planas ion, subite aperis la radiisto.

– Ŝipo elsendas S.O.S. signalojn. Eksplodis ĝia kaldronego!

– Ni veturos tien plenvapore! – kriis Theo. – Kio estas la nomo de la ŝipo?

– Nu Kio Nova, Sinjoro Wagner?

## D U D E K T R I A   Ĉ A P I T R O

Jes…

La ŝipo Nu Kio nova Sinjoro Wagner finis sian surteran karieron, aŭ la surmaran karieron aŭ pli ĝuste sian malrapid-iradon. Ĉar la kaduk,a vaporŝipo, kiel laca, maljunulo malrapidiris sur la oceano, aŭ promenetis, kaj se eblas diri: ĝi trafikis pland-ŝove. Certagrade ĝi eĉ spiregante, anhelante, kiel apatiaj poŝtistoj dum enmanigo de leteroj, sed estantaj jam antaŭ emeritigo.

La trouzitan, kadukan korpon de tiu vaporŝipo, sensignifa nek en sia vivo, ĝiajn krevetintajn fumtubojn preskaŭ oscedante kaj marasme klinis por dormi sur la fajnan ŝlimon, troviĝanta en la profundo de la oceano, kiel koro de patrino. Kompatinda, bona, astma helico, krome Fred la Malpura, la Kapitano kaj lia suspektinda personaro dronis. Ankaŭ la vigla sensacio, farbita per grandegaj literoj, ripozas tie kun ili: “Nu Kio Nova, Sinjoro Wagner.”

“Nenio grava”, respondas la ondoj, kaj tiuj certe pravas pri ĝi.

Estas la 5-a horo aŭrore. La ŝipo Stanlej Up To Date veturas plenvapore al la scenejo de la katastrofo. Jam eĉ postesigno ne estas videla de la finiĝinta tragedio sur la oceano, baniĝanta en la matena sunbrilo. Sed tamen… Ĝuste apud ili, ĉe la flanko de la ŝipo albatiĝas kelkaj vrakeroj el la riparo… krome barelo…

– Li eksentis… – murmuris Tendenulo la Fervora.

Lordo Hamilton demetis sian ĉaplelon. Ili ĉiuj staris tie kun kapo nekovrita. Ili rigardis mute la lignopecojn, la multajn etajn rubaĵojn, dancantajn sur la akvo kaj ĉion, kio tiam dum

mallonga tempo ankoraŭ montras sur la senlima oceano, ke antaŭ nelonge ŝipo rapidis ien kun homoj kaj ambicioj, proksimume antaŭ kelkaj horoj la hejtisto enpoŝigis pecon da ŝinko inter du pantranĉaĵojn, kaj la stiristo eble decidis, ke sekvonttage li tamen skribos al sia familio, ĉar dudek jaroj estas longa tempo; povas okazi, ke iu faldetis paĝon de libro, kaj nun tiu ĉi ironia rubaĵ-amaso, kio restis el la tuto, dum mallonga tempo, kiel ĝi balanciĝante, pigre kuŝas sur la akvo, baniĝanta en sunbrilo, kiel la fina resumo de la granda kaoso: tiu malgranda, senpove naĝanta, paciĝinta, sedimentiĝonta rubaĵo.

Tio okazis. Kaj vi ne sciis…

Kelkaj timemaj, demandaj kaj akuzaj ekrigardoj. Vanek la Dornhara, Roĉild la Malavara… Jimmy la Ĝisorela kaj Filipo la Diru-jam… Iliaj timide moviĝintaj rigadoj algluiĝas al la malgranda rubaĵ-amaso. La ŝipo Brigita. La teruro, la pesta ŝipo. Kaj nun sekvas mallonga, tragikomika epizodo. Venas sinjoro Wagner, ŝanceliĝante ankaŭ pro la malĝojo, kiel funebranta familiestro, antaŭ kiu disiĝas la grupo de la partoprenantoj por malfermi vojon silente. Sed kie estas tiu vojo, kiu estas sufiĉe larĝa por la pendolaj paŝoj de sinjoro Wagner? Lia vizaĝo estis serioza, liaj okuloj malsekaj, kaj li venis, aŭ li portis sin mem, kaptinte sin je la pantalono, mute kaj forkaŝante sian malĝojon kun vireca forto, eĉ li volis forkaŝi ankaŭ sian eksterordinaran ebriecon, sed li singultis subite, kaj pro tio la kandelo, fiksita apud lian ĉapelon falis sur la plankon klakante. Li haltis ĉe la balustrado, rigadis la akvon, kiu englutis la veturilon, nomitan pri li, kvazaŭ ĝi estintus glaseto da brando. Li etendis la manon en sian poŝon por ĵeti velkintan floron en la maron el sia stoko, kiel signon de sia funebro, kaj dum li vidis konsternite, ke or-kadraj olulvitroj falis en la akvon, li ekkonsciiĝis, ke eble li tamen ne en sian poŝon ŝovis sian manon.

Ĉi-foje ili ne batis sinjoron Wagner, konsiderante la situacion, ili lasis lin stari tie, kaj en la granda silento kvikado aŭdiĝis el lia interna poŝo.

– Ekveturo! Ni ĝiras la ŝipon!.. Per plena vaporo!.. – krakis la voĉo de Watson en la paroltubon.

Maxbell diris trankvile al sinjoro Theo, se ia subita malsano metus finon al sia vivo, pro kio li mortus, tiuokaze li petas balzamigi sin. Se li ne mortus, kompreneble ĝi estos superflue.

Sinjoro Theo promesis, ke ĝi okazos tiel, poste li iris en sian kajuton. Sinjoro Theo pensadis. Jen rigardu: La profesoro estas en la ŝranko, kaj la edzino ne scias pri tio. La edzino estas sur la ŝipo, kaj la profesoro ne scias pri tio. Li devus transdoni la sciigon pri ŝia morto, sed la virino ankoraŭ vivas. Li devus diri al li, ke lia edzino vivas, sed la porfesoro ne scias, ke ŝi mortis. Ŝi ja ne mortis…

Atendu iomete! Ni ne devas intermiksi ĉion… Kiel ĝi estas? Ekzemple la pik-damo estas la mort-sciigo de la virino, kaj tiu tref-bubo estas ŝranko…

– Vi havas tre bonan nervosistemon – diris Jimmy la Ĝisorela, – se nun vi faras tiun privatan kartludadon. Ĉar se veras, ke tiu Watson estas fripono, kion ni povas fari?

– Tio estas demando, kion li volas, antaŭ ol ni timus lin. Kaj tio estas la demando, ĉu je kies flanko staras la maristoj?

– La plimulto de maristoj konsistas el ĉiuspecaj fiuloj, kiujn Watson kolektis.

– Ĉu tiuj, kiujn vi varbis, estas honestaj homoj?

– Hm… Neniu el ili ŝtelis fontanon. Nek tion mi supozas, ke ili venus kontraŭ mi aŭ kontraŭ vi. Neniu povas aserti pri Vasiĉ, aŭ pri mi, ke ni forvendis tiun, kiu dungis nin. Vi aŭdos multe da fiaĵoj pri ni, kies iu parto tute ne estas vera. Sed tiaĵon neniam…

Milda skrapado aŭdiĝis sur la ŝranko. Sinjoro Theo iris tien kaj diris tra iu ventola aperturo el la du:

– Restu trankvila – li flustris, – vi povos elveni nur vespere!

– Laŭ mi eĉ tio estas multa – rimarkis Jimmy la Ĝisorela. Ĉar la skrapado ne ĉesis, ili tamen malfermis la pordon:

– Sinjoroj… – flustris la profesoro – mi sufokiĝos.

Li ankorŭ ŝatintus detali la aferon, sed la milionulo tuj repremegis lin en la ŝrankon per tenera movo, iomete kun la helpo de sia genuo, ĉar la profesoro grasiĝis. Plendinda voĉo estis aŭdebla tra la ventola aperturo:

– Mi petegas, sinjoroj… La tineoj manĝos min!

– Jam ankaŭ mi pensi pri tio – reflustris sinjor Theo, – jam morgaŭ ni ŝutos sur vin naftalinon.

Neniam plu li menciis la tineojn.

Sed kvazaŭ la ŝipo mem sentus, ke ili kuras de anataŭ la ne deskuebla fato, kiu estas sur ilia spuro plenvapore, kaj ĝi veturegis plu al sia malproksima celo sub nigra, funebrovual-simila nubo, eliĝanta el ties fumtubo, kaj la nevidebla sangohundo de la fato konstante bojadis malantaŭ ili…

Theo iradis tien-reen sur la ferdeko trankvile. Kie povas kaŝiĝi Lilian ĉi tie? Subite maldika, severa homo kun kuspita,

mallarĝa liphararo paŝis antaŭ lin, kiu portis cilindran ĉapelon.

– Mi petas, ne eltiru vin de la priparoladoj! Ĉio havas limon! La anatomo infulas la futbaljuĝiston, ke ni veturu rekte al Tsiui! Tiel ne eblas fari ekspedicion!

– Pardonon – rimarkis Theo modeste, – al kiu mi havas la honoron?

– Ne koleru – respondis la homo indigne, havanta cilindran ĉapelon, pro kio li devis pintigi sian buŝon, tiel ambaŭ ekstremaĵoj de liaj lipharoj tuŝis liajn nazlobojn, kiel la tondilo de kankro, kiam tiuj palpe trovas la ĉasakiraĵon! – Vi devus koni viajn kolegojn en la faŭko de la morto! Almenaŭ ĝis nun mi sentis tiel, ke ni kunfandiĝis en la lukto!

– Mi komprena, ke mi kunfandiĝis kun vi, sed tio ankoraŭ ne ekskludas, ke ni prezentiĝu reciproke, ĉar je mia honorvorto, mi ne konas vin.

La alt-ĉapela, magralonga, sinjoro kun kuspitaj lipharoj diris dolore:

– Vi ne devus entrepreni ekspedicion, se vi ne rekonas min, ĉar mi tre ofte malfermis la pordon antaŭ vi. Mi estas la juna frato de la domprizorgisto. Vi kunveturigis min, kiel gas-akvodukt- kaj friduj-muntiston. Mi nomiĝas Brogles, mi devenis el Svedio, sed mia patro jam naskiĝis en Usono, kaj li estis komercisto de agrokulturaĵoj en la ŝtato Massachusetts.

– Estas superflue prezenti vin tiel precize.

– Mi ŝatus, se vi notus bone miajn indikojn, ke vi konu tiujn, kiam la verkistoj de leksikonoj informiĝos pri ĝi. Temas pri tio, ke laŭ mi kaj ankaŭ laŭ sinjoro Maxbell ni devus

preterveturi la insularon Ĵaŭdo. Sed la anatomo asertas, ke ni devus veturi sen devojiĝo al Tsiuri.

Kiam Theo alvenis tien, la diskuto iom drastiĝis. Inter la oraĵisto, la anatomo kaj la mekanikistoj okazis incidento, tiel la futbaljuĝisto instinkte fajfis per sia fajfilo vidinte la tumultiĝon.

– Kiel vi opinias, sinjoro? – demandis Theo la profesoron, kiam la ribelo mildiĝis.

– Mi trovos la esploriston laŭ miaj observoj, mezuroj kaj laŭ la apenaŭ signifaj verkoj de Gustavo Bahr! Ĉar li en aŭgusto li ankoraŭ veturis al Tsiui, se li vivas, tiel post septembro li estis ĉe la insulo malgranda Tonga. Ĉar pro la eta holdo lia provizaĵo estis elĉerpiĝonta. La sola vojo estas atingi la Kabon Farrere helpe de la tre forta polusa marfluo, de kie li jam ne povis maltrafi la portugalan insularon Sambi-Sumbi.

– Kaj se… Se vi eraras…

La orgojlaj fulmoj de Zeuso, sidanta sur sia trono, zigzagis el liaj okuloj.

– Ĝi, sinjoro, estas pura ŝtalo, eĉ pli ŝtala: ĝi estas papero, kiel la ciferoj estas verkitaj helpe de la logiko kaj la majesta funkcio de la homa cerbo kun senmorta, tutcerta rekono, ke duoble du verŝajne estas kvar! Ni ne asertas tion tutcerte, ke ĝi estas kvar! Ĝi fontas el nia ekzakta dubo, devige rilatanta niajn perceptojn. Kaj ĝuste tiu, ĉion superanta, ekzakta kopodo nia faras netrompeble certa, ke duoble du vere kaj difinitive estas kvar.

Theo rapidis en sian kajuton nervoze. Malferminte la pordon de la ŝranko, li komencis flustadi.

– Diru al mi! Kio okazintus, se vi estus veturinta plu de Tsiuri al la inuslaro Tonga?

– Mi povas diri tion kun granda precizeco: miaj maristoj estintus tuj kaptintaj kaj ŝnurligintaj min kaj informintaj la mondon pere de S.O.S.-signaloj, ke Gustavo Bahr freneziĝis, krome, se eblas, oni savu niajn spiritojn. De kie vi akiris tiun grilon?

– Nu, nu… Ĝi ne tute estas grilo.

– Pardonon, sinjoro, sed ĝi ĉirpas! Tiaĵon povas diri nur stulta laikulo, se vi ne prenas ĝin, kiel ofendon. Mi estis sur la insulo Tsiui en aŭgusto, kaj se mi estus ekveturinta ĝis decembro al la direkto de la Kabo Farrere, tiam la malfluo estus drivinta min inter la glacimontojn, deiĝintaj laŭhorare disde la Suda poluso.

Sinjoro Theo rigardis longe Gustavon Bahr. Nun kiun kredi el inter la du scienculoj.

– Vi havis ŝipon kun eta holdo – li recitis sinjoron Maxbell. – Se vi forlasis la insulon Tsiui kaj preterveturante la insularon malgranda Tonga, vi devis konfidi vin al la marfluo ĝis la Kabo Farrere, por rekompletigi vian provizaĵon sur la insularo Sambi Sumbi.

– Nu ne!.. – li respondis ridegante. – Nun jam ankaŭ vi kredas tion, ke mi estas sur la insularo Sambi-Sumbi? Sinjoro, mi ĵuras, ĝi estas tiel absurdaĵo, kvazaŭ…

– Sankta Dio!.. Kio ĝi estas?!

Gustavo Bahr sekvis la rigardon de sinjor Theo, kaj liaj genuoj fleksiĝis.

Antaŭ la malgranda fenestro de la kajuto pendis ostokadra buŝharmoniko averte, ligita la ŝnuro, kun alfiksita papero.

## DUDEKKVARA ĈAPITRO

“Mi surŝipiĝos ĉe la insularo Ĵaŭdo. Ĝis tiam diru al ĉiu sur la ŝipo, ke mia radigramo refutis la informon pri mia morto. Mi skribas tiun ĉi leteron kuŝante en tre malbona korpopozicio, sur strikta loko, tial ĝi estas tiel malbela skrapaĉo. Vi estas terure turpa homo, miaj ŝultroj eĉ nun estas bluaj. Sinjorino Bahr.”

Jen tio estis skribita sur la papero.

– Montru ĝin… – diris la scienculo.

Ho ne! “Miaj ŝultroj eĉ nun estas bluaj” – Ne mankas al li ĵaluza edzo en la ŝranko.

La homoj iomete trankviliĝis. Theo sidis sur la poŭpo kaj rigardis la buŝharmonikon faritan el osto. Ĉirkaŭ li estis la bone prilumigita, plata ferdeko. Ĝi gravas el la vidpunkto de la okazaĵoj.

Malpli porksime la edzino de la futbaljuĝisto paroladis kun la anatomo. Ŝi rakontis, ke ili loĝis en la domo apud la sportejo kaj luis la bufedon. Ŝi ekkonis sian edzon dum nacia futbalmatĉo. Dekkvin mil homoj prezentis lin iun posttagmezon. Ili diris pri la futbaljuĝisto, ke li estas idiota, azeno, ĉarlatano, paralizulo, sed ŝia edzo fajfis pri ili, kaj li montris sur punpunkton. Oni ŝotis golon, kaj tiam ŝi enamiĝis al li. Li sendis floron de al ŝi sur la angul-linio. Tiu sovaĝa sportisto poste engrimpis tra ŝia fenestro. En la malluman dormoĉambron! Li estis tiel freneza knabo. La virino diris timiĝinte al la futbaljuĝisto, se li kompromitos kaj ne edzinigos ŝin, sia patro mortpafos lin. La amanta futbaljuĝisto tuj petis ŝian manon en la mallumo. – Ĝi okazis tiel – finis la virino. – Tiu estis sportista geedziĝo.

– Jes – kapjesis la anatomo, – la futbalo estas danĝera korpekzercado.

– Mi amas la sportistojn. Ĉu vi scias, kian koron ili havas?

– Jes! – li mansvingis supereme. – Aritmia kaj la limoj tre vastiĝis. Mi konis faman futbaliston, kiu nomiĝis Wichmann, kaj li amindumis mian iun nevinon. Liam li havis dudek jarojn lia aorto jam vastiĝis dubola. Li havis tre valoan koron. Mi havas ĝin ie en mia hejmo.

Estis tre bela nokto. Kiel ĉiam, kiam okazis io terura.

Ofelia Pepita staris kun klinita kapo apud la mutisto kaj flustris tion:

– Onidire… se ni pensas ion… kaj ni rigardas sur bonŝancan stelon, tio plenumiĝas… Ĉu vi kredas tiaĵon?

– …Ekzistas multe da stangaĵoj. Iun nokton la bildo de mia avo falis de la muro, kaj post monato mi fiaskis en la borso… De tiam mi kredas, ke devas esti io… – kaj li paŝis pli proksimen. – Ni elektu stelon…

– Mi jam elektis – flustris Ofelia kun mallevitaj okuloj, kaj hazarde ŝia mano ektuŝis la manon de sinjoro Borges.

Kaj tio nun okazis. Ĝi daŭris nur momenton:

…Theo faligis la buŝharmonikon. Dume li etendis sian manon por ĝi, li rigardis sekundon al la mezo de la ŝipo, poste li volis levi la buŝharmonikon…

Kaj la buŝharmoniko malaperis!

Ĉirkaŭe estis la prilumigita, glata poŭpo, nenie staris eĉ unu homo. Kio ĝi estas?

Post kvin minutoj estas plena la paniko kaj histerio!

Ie en la alia fino de la ŝipo, poste en ties mezo, aŭdiĝas mallaŭtaj, etaj sonoj de harmoniko. Kaj komenciĝas ĉio denove…

– Tiu ŝipo ekveturis sub malbona konstelacio! – kriis Vasiĉ.

La matrosoj denove rigardas unu la alian pale.

– Fred la Malpura sciis tion antaŭe… – ili murmuris.

Theo, kiel frenezulo iradis trae-retrae sur la ŝipo, en la bilĝo, en la kameroj por trovi tiun virinon. Li vagadis dum la tuta nokto, serĉante la spurojn de Lilian, poste li stumblis pro io en la interferdeko.

…Kaj subite frostotremo trakuris lian dorson.

…Borck, la gorilo-simila matroso kuŝis antaŭ liaj piedoj.

Iu mortpikis lin!

## D U D E K K V I N A   Ĉ A P I T R O

…Rigardante la ŝipon Stanley Up To Date de ie el la alto de la ĉielo, ĝi kuregis malesperiĝinte sola al la polusa marfluo, plenvapore, kaj la morto postsekvis ĝin! La fato, nomata Verda Vizaĝulo persone, elleviĝinte el la horizonto, laŭ duoncirklo de la firmamento tute oblikviĝinte al al ŝipo, kiu senpove kuregas de antaŭ ĝi, ekveturinte de Honolulu, kaj ĝi ne povas senŝarĝiĝi de tio, kaj ĉiu pasaĝero aparte sentas pendi sur sia gorĝo kun ĉiam pli morta mordo!

Poste ili informiĝas en la proksimo de la insulo Ĵaŭdo, ke la sciigo pri la morto de sinjorino Bahr estis malvera, kaj ŝi surteriĝis per aeroplano sur la insulo Ĵaŭdo. Tamen estas nervozige, ke iafoje aŭdiĝas spireto da tremado de susuranta fajilsisteno de buŝharmoniko. Kvazaŭ nun ili estus disiĝintaj je grupoj. La varbitoj de Jimmy al Ĝisorela el Honolulo kaj dungitoj de Watson el San-Francisko ne turnas sian dorson unu al la alia. Nokte ili starigas apartajn gardistojn. Eŭgenon la Buŝaĉulon deŝangas Filipo la Diru-jam, kaj lin je la tria horo Tendenulo la Fervora.

Krome estas strange, ke la Ruĝa Vasiĉ kaj Jimmy la Ĝisorela kune faras kontrolan rondiron. La ruĝulo kaj la fregat-ĉefleŭtenanto defendas la dorson de unu la alia konstante. Sinjoro Theo sentas, ke io agitiĝas, krepitas, bolas malantaŭ li, kion jam ĉiu scias, nur li ne, li estas “civilulo” el ilia vidpunkto.

Kaj kie estas Lilian?… Li denove traserĉas la ŝipon. Ĉiu iu turnjiĝejo li falas laŭ sia tuta longeco, ĉar sinjoro Wagner kuŝis tie, kiu depost la drono de la Korporacio fariĝis iomete lakona, li apenaŭ kantis, eĉ li ne aspektis ebria, ĉar li trinkis tiom, ke li tute ne povis paroli aŭ moviĝi. Kiel li diris, li dronigas sian ebriecon en alkoholaĵon. Li ne trovis Lilian-on!

Matene estis eĉ pli stange. La duono da vizaĝo de Vanek la Dornhara ŝveliĝis kun bluaj ekimozoj. Sed matroso, nomata Hubert, malaperis. Multaj homoj vidis, ke li falis en la maron. Ankaŭ Eŭgeno la Buŝaĉulo vidis tion. Ankaŭ la astma Petters kaj la Ruĝa Vasiĉ. La matrosoj de Watson diris nenion. Ili staris moroze.

Tiel ili alvenis al la forlasita, pitoreska ĉefurbo de la insulo Ĵaŭdo, kies nature favora situo kaj elkonstruiteco faris ĝin ĉefurbo inter la ĉirkaŭantaj, malpli gravaj insuloj. Kiu konstruis tiun budon, en kiu la rodkapitano loĝis, tio ne gravas. Gravas, ke tiu budo signas la ĉefurbon, kaj tio jam signifas lampon sur ĝi, kiu estas ankaŭ lumturo. La ŝipo alvenas vespere, kaj la morsaj signaloj de la acetilen-lampo avertas, ke ĝi ne povas enhaveniĝi.

Post unu horo la lampo morsas tion, ke la vojo estas libera. Kaj la ŝipo Stanle Up To Date ankras. La rodkapitano, dum li venas ĝis la moelo, dufoje surventriĝas, sed li konsolas la personaron ridetante, ke estas nenia problemo. Oni krias de sur la ŝipo al la rodkapitano, ke li sendu tiom da akvo, kiom li povas.

La koncernulo respondas, ke anstataŭ tio li kantos volonte, kaj li komencas kanti la ĥoron de francaj ludkartoj el la opero Aida. Tiam fine oni rekonas lin, ke iel diable sinjoro Wanger faras liberaeran prezentadon sur la bordo kaj ili nur miregis. Bonŝance la kanto de la ĥoro de la francaj ludkartoj relative estas mallonga, kaj ĝi temas nur pri tio, ke Bajazzo ridas, ĉar la virino estas ŝanceliĝema, sed la taŭro jam atendas lin en la areno antaŭ ridetantaj spektantoj!

La solvo de la enigmo estas simpla. Dum ili atendis, li malsuprengrimpis sur la kablo en sian boaton. Ĉar la boato de sinjoro Wagner, per kiu li alvenis al la ŝipo, balanciĝis tie, ligita al poŭpo, de Honolulu. Nun li remis sur la bordon dum

la duonhora atendado, sed li jam venas, la kandelo ŝanceliĝas sur lia ĉapelo, kaj li adiaŭas la rodkapitanon stentore:

– Saluton, mia olda amiko! – Mi ne volas malfruiĝi al la ŝipo, neniu scias, kiam venos la sekva, kaj ili ĉiuj estas bonaj figuroj! Grandaj friponetoj! Nur sidu trankvile, ne la boato balanciĝas, sed mi vertiĝas, kaj tial vi vidas… Hopla! Jen vidu… Alo, Strovaĉek! Sendu boaton, ĉar iu remilo estis tiel ebria, ke ĝi rompiĝis! Mi kunveturigas pasaĝerojn! Ni prirabos ilin bele!.. Nun ni kantu, estimataj pasaĝeroj, ke “Mia patrolando, mi revenos al vi, se mi havas nenion alian fari…”

Kaj li kantis tiun kanton el la opero Walkür, ĝis alvenis boato por ili, kaj ĝi transportis ankaŭ pasaĝerojn. Je la plej granda surprizo de sinjoro Theo kaj Jimmy la Ĝisorela, Lilian Hillero-on kaj sinjorinon Gustavo Bahr kaj…

Jes!

Kaj A. Winter-on! A. Winteron, kiu venis ĉi tien, ke la suferoj de la ekspedicio malgrasigu lin, kiu suferis pli multe dum semajno, ol Nansen dum tuta jaro, kiam la anktarta glacio drivis lin kaj lian enfrostiĝintan ŝipon trafe-maltrafe tra la poluso. A Winter, kiu poste, se oni rakontis tiajn historiojn de polusesplorantoj, li nur ridis kaj mansvingis: Kion ili scias pri la vera batado, do, ankaŭ A. Winter estis tie, post la okazintaĵoj minimume dek kilogramojn pli peza!

Kiel ili trafis ĉi tien? Estas evidente, ke sinjoro Wagner liveris ilin sur la bordon sekrete, por ke ili nun surŝipiĝu. Tio doloris Theo-n. Sinjoro Wagner estis lia tikla punkto. Sinjoro Wagner, malproksime de ĉiuj teraj intrigoj, la mond-bohemo kun serena humoro, en kies kapo kaj en lia animo estis la narkoto de la optimismo, apud sia ĉapleo kun la lumo de

unusola kandelo de la slogantabulo de senzorga gajeco, sur lia dorso estis sia domo, sur lia brusto sia pano, en liaj poŝoj estis siaj birdoj, kaj en lia mano sia pantalono… Ankaŭ tiu homo trompis lin. Eĥ! Amara lernejo estas tia ekspedicio!

Kaj jen! La eta fariseo!..

Lilian kun malgaja, malserena vizaĝo, preskaŭ en tranco ŝi prezentis sin al ĉiu, kaj en ŝiaj ĉiuj movoj estis sentebla, ke ŝi estas la antaŭvidebla vidvino de la granda scienculo. Ekvidinte la faman profesoron, ŝi aŭdigis mallaŭtan, subitan ĝemon, ŝi alrapidis kaj ĵetis sin sur lian ŝultron.

– Ho, Maxbell!.. Revenigu lin…

– Ni faros ĉion, sinjorino – respondis la muntisto mallaŭte.

– Mi deziras diri kelkajn vortojn al vi, sinjoro A. Winter – komencis Theo. – Mi ŝatus klarigi…

– Sinjoro – ekparolis la kuracisto, – ni iru en izolitan lokon, kaj batu min, sed poste mi ŝatus manĝi ian varman manĝaĵon.

Kiam Gustavo Bahr eksciis, ke sia edzino estas sur la ŝipo, li estus falinta sur la plankon, ĉur la vestohoko tenis lin staranta, kiu kroĉhokiĝis sub lian kulumon

Kaj la ŝipo Stanley Up To Date denove estis survoje, persekutata de la fato. Oni jam preskaŭ ne ekatentis, kiam cerboŝira, akra kriio aŭdiĝis dum la fru-posttagmezaj horoj. La antaŭvidebla vidvino de Gustavo Bahr kunportis etan simion, kiu subita saltis sru la dorson de la edzino de la futbaljuĝisto por urĝi elŝiri ŝiajn harojn.

– Kio okazis? – demandis Theo, alveninte al la okazejo.

– Bobby kondutis malbone – respondis la virino, karesante la simion, sidantan sur ŝia brako. La simio nun el la retikulo de Lilian subite elprenis la buŝharmonikon kaj metis ĝin antaŭ sian buŝon, kiel la homoj. Ĝiaj spiretoj reeĥis malaŭtajn, susurajn flut-sonojn el la muzikilo. La milionulo fikse rigardis la virinon, sulkiginte sian frunton.

– Ĉu vi amas ĝin? – li demandis kaj montris sur la beston.

– Jes – ŝi respondis kun mallevitaj okuloj. – Ĝenerale – ŝi aldonis flustrante – mi amas ĉiun simion.

Kaj ŝi klinis sian kapon profunde. Kaj Theo ege ridis, ĉar nun jam li komprenis la fantomeskan harmonikadon! Nu ja!.. La malgranda simio liberiĝis kaj kuradis tien-reen kun la harmoniko. Ĝi facile grimpis enen kaj eksteren tra la kajutfenestroj. Kiam ĝi metis la harmonikon antaŭ sian buŝon, aŭdiĝis zumetantaj sonoj pro ties spirado… Kiel simpla ĝi estas! Kaj neniu pensis pri tio!

Nun li rapidis al sinjoro A. Winter, kiu en la kolo kun buŝtuko atendis la vespermanĝon. Neniu estis en la salono krom ili.

– Diru sinjoro, kiu vi estas?

– D-ro A. Winter, la kuracisto de la ekspedicio. Mi esperas, ke oni ne batos min ĝis la vespermanĝo? Mi havas tre gravan direndon al vi.

– Sinjoro, neniu batos vin plu – respondis sinjoro Theo.

Kaj li eraris pri tio…

Li lasis A. Winter-on sola nur unu minuton, kaj kiam li revenis, la vaporanta vespermanĝo kuŝis sur la tablo netuŝite, sed la kuracisto jam estis nenie.

Ĉar en tiu momento, kiam sinjoro Theo elpaŝis el la salono, mano kaptis A. Winteron je la kolo. Ĉar la kuracisto volis diri ion, oni vangofrapis lin tiel, ke li rezignis ĝin kun mallaŭta singulto. Poste oni vindis lin en ion kaj portis, piedbatis, rulis lin, ke li falis malsupren sur ferŝtuparo… Poste frapfermiĝis io super li.

La ŝipo Stanley Up To Date veturegis, kiel la vento por fini sian malbenitan vojon, atinginte la insulon Tsiui.

## D U D E K S E S A   Ĉ AP I T R O

La ŝipo ankris ĉe la insulo Tsiui.

Nokte Jimmy la Ĝisorela kontrabandis per boato Gustavon Bah-on kaj raportis al sinjoro Theo diskrete, ke la scienculo atingis lerte la domon de la misio.

Nun ili elŝipiĝis. Estis ĉirkaŭ tagmezo. La tuta indiĝena tribo aperis sur la bordo, gvidate de la ĉefo, vestita per pompa ŝamuimigilo, rezerita por solenaj okazoj, en sia dekstra mano li tenis vekhorloĝon, heredigota de la patro al la filo kun la tribestra moŝteco, en lia maldekstra mano estis ŝutro-stango, simbolanta la netuŝeblecon de la leĝo, kun la tri cilindraj ĉapeloj!

Grava tago!

La magiisto, kiu pere de amelita brustumo kaj duono da kandelingo fariĝis preskaŭ ŝtato en la ŝtato, klini sin profunde.

Baptante la ĉefon en misiejo, oni donis al li la nomo Edmundo, kaj li montris sur la magiiston, kiel kompleza artisto, kiam li transigas la aplaŭdon al sia partnero. La tribanoj rigardadis tumultante.

Sinjoro Maxbell sciis bone: ĝi estas lia tago! Ĉiuj okuloj atentas lin. Elpaŝinte, li ekparolis jen tiel en la lignvo de la indiĝenoj:

– Ni serĉi, hivi-hivi – (ĝi signifas blankan geografon) – al vi, ĉe vi malaperon gazi-hazi al vi, de vi bisunga orang mami-hami!

Kaj li ĉirkaŭrigardis fiere. Edmundo, la ĉefo de la kanibaloj, eklevinte sian ŝultron, diris al Watson en perfekta angla lingvo:

– Li estas idioto, ĉu ne? Ĝi okazas al maljunuloj sur la oceano.

Evidentiĝis, ke nur tute kadukaj kanibaloj memoras tiun konfuzan babilaĉon, kiun uzas la kaprosimila fremdulo. Sed, se li ne povas paroli alimaniere, tiam ili venigos la naudek jaran, emeritan kuiriston por interpreti la vortojn de la debila fremdulo, ĉar ili komprenas nur la anglan lingvon, sed bedaŭrinde, ĝi estas malproksima insulo, kien alvenas la kulturo nur malrapide.

– Homoj! Esploristo vivas ĉe vi, kiun la civilizacio reatendas. – diris lordo Hamilton. – Mi venis por kunorti lin hejmen.

Edmundo, la kanibalo eklevis sian ŝultron.

– Mi volonte rigardos la antaŭ dudek jarajn menukartojn. Momente ne vivas eŭropano inter ni. Sed ni povas servi per unubraka hindo, kiu alvenis antaŭ dekkvin jaroj, de tiam li manĝas konstante, kaj li estas tre enigma homo, ĉar neniu scias, kial ni ne elĵetas lin de tie ĉi?

Kio estas?… Jimmy la Ĝisorela kaj la milionulo interrigardis.

– Homo! Pripensu! – kriis Theo – ĉu vi ne memoras pri malalta, dika scienculo??!

La ĉefo eklekis siajn lipojn, kaj ankaŭ la aliaj glutegis.

– Iam ofte venis tiaj homoj ĉi tien – respondis Edmundo, la kanibalo. – Antaŭ jaroj rosite-kuirite estis sinjoroj scienculoj ĉi tie, sed lastatempe eĉ unu ne venis ĉi tien. Atentu min, kaj kunportu, sinjoro la hindon, ĉar li manĝas multe, kaj li

estas maldika al tio, ke li malaperu dum vespermanĝo. Ni havas ornamaĵetojn, konvenajn al eŭropaj indiĝenoj. Se vi kunportos lin, vi ricevos sekigitan kokoson, eĉ gumon, el kio oni faras antaŭmanĝaĵon punktroller.

Sinjoro Theo kun Jimmy la Ĝisorele promenis iomete en la internon de la insulo. Sur la ĝangala vojo staris la malnova domo de la misio, kaj antaŭ la domo, ne pli ol tricent metrojn de la ekspedicio, sidis Gustavo Barh malgaje kaj nerazite.

– Sinjoro! – kriegis Mr. Theo. – Mi trovis vin!

– Kie vi estas de tio… – mansvingis la scienculo malĝoje. – Ĉu eble vi trovis ian spuron? Aŭ vi volas distrumpeti en la mondo, ke vi trovis min, post kiam vi liveris min ĉi tien per aeroplano?

– Kiel mi komprenu tion?

– Eble la indiĝenoj havas ian malĝojan sperton. Ili diris, se oni trovos min ĉi tie, el tio estos tutmonda skandalo.

– Sinjoro – ekparolis Edmundo, la kanibalo, kiu venis ĝis ĉi tie, – ni diris al tiu ĉi sinjoro, ke ni ne bezonas petrol-esploristojn, vojaĝoficejon, kronikon kaj infektajn malsanojn. Ni volas vivi pace ĉi tie, kaj laŭ niaj magiistoj, interpretantaj sonĝojn, revadi pri civilizadio signifas baldaŭan vojkonstruadon. Vi povas surŝipigi la blankulon, jen estas barelo por haringoj, li havos lokon en ĝi, se ne: ni ĝoje detranĉos ion el li, tio ne estu problemo por vi, sed li malkovru nenion ĉi tie!

– Komprenu, ke ĝi estas senespera…

Aŭ ĝi estas admirinda. Sed estas malpli ĝoja, kio okazis poste. Ili havis ankaŭ rezultaton.

La maljuna magiisto, kiun oni venigis, diris al Arturo Maxbell, ke li memoras ankoraŭ la fuĝinta, malvarman vespermanĝaĵon. Li donos volonte informon, ĉar li vidas en la poŝo de la kaprosimila, langvora fremdulo manĝilon. Jam ankaŭ alifoje li sertis ĉe komplezaj rostaĵoj, ke nekuirite ili havas fiksite al sia vestaĵo tiun dentopikilon, laŭ Wattermann. Kiel domaĝe, li diris aldone, ke vi ne fiksas saŭcon Worĉester aŭ muelitan pipron apud viajn poŝojn. Sed la mondo progresas, kaj inter la atingaĵoj de la tekniko eĉ tio povas estis post paso da tempo. Ricevinte la fontoplumon, li rakontis, ke tiu malata, dika manĝaĵo alvenis ĉi tien per malgranda ŝipo, en kiu jam la provizaĵo estis elĉerpiĝonta. Ĉar li devintus resti duonjaron, li decidis ekveturi al la sinsularo Tonga, kie atendos lin granda ĉefo, nomata Marfluo, kiu kondukos lin rapide al la rekompletigo de siaj provizoj.

Gustavo Barh aŭdis tion en la barelo por haringoj, kaj eĉ hodiaŭ li ne komprenas, ke ne trafis lin apopleksio. Jimmy la Ĝisorela paliĝis pro kolero, kaj ankaŭ la vizaĝo de Theo sensangiĝis. Ĉi tie okazas io terura trompo!

– La scienco estas netrompebla! – kriis sinjoro Arturo Maxbell. – Kiel ni kalkulis, tel ĝi okazis.

– Prave, sinjoro – diris Edmundo, la kanibalo, – kaj ni ŝatus eviti ĝuste tion. Okazas, ke oni manĝas la mortintan homon sur nia malgranda insulo, sed ankoraŭ nun la vivantoj estas en paco, kaj nia insulo prosperu feliĉe en la nekonata, malproksima oceano, sen trafiko, poem-dramoj kaj kantĤoroj. Lastfoje vizitis nin eminenta scienculo, kiu volis esplori kankron (kanceron), ĉar ĝi estas granda beno de la kulturo, kaj ni kolektis al li niajn ĉiujn riveregajn astakojn, krome niajn trutojn, sed li ne trovis tian kankron (kanceron), kian li ŝatintus esplori, tial li tre malestimis nin. Se li ne estintus tiel maldika kaj turpa, kiel tiu ĉi kaprosimila

malsanulo, nu, ni estus manĝinta lin, por ke ne restu spuro de nia honto.

Poste ili malankris kaj ekveturis.

## DUDEKSEPA ĈAPITRO

La fatobatita ekspedicio ekvojis por trovi la profesoron sur eĉ pli malproksimaj, eĉ sur pli sovaĝaj, polusaj akvoj, kiu cetere estis malsupre, en la ŝranko de sinjoro Theo.

Ĝi ne estas la unua kazo, ke la scienco kun longa kaj laciga, kurba vojo trovis en malproksima jarcento tiu malgrandan veron, kiun sen la falsa kompaso de orgojlo kaj monavido oni povintus facile elpreni el la najbara jardeko, kvazaŭ ĝi estus tenata en ŝranko.

Ĝustavo Bahr, kiam sinjoro Theo ellasis por momento, malgaje klinis sian frunton en la manplantojn.

– Sinjoro, ne mi estas la kulpa!

– Stanley ja ne kunveturigis Livingstone-on per ŝipo – meditis sinjoro Theo, – sed li almenaŭ trovis lin!

Nu, sed tio ankoraŭ estas nenio! Nur bagatelo! Ĉar nun venis la virino! Oni havus emon vangofrapi ŝin! Tiu bestio scias bone, ke sinjoro Theo konas ŝin! Ŝi estas klarvida pri sia leĝera kaj gaja karaktero, kio igas ŝin batigi lin je la kapo helpe de fidungitoj, danci tangon kaj ridadi. Nun ŝi iradas ĉi tie kun antikva, revema promenado, kiel la heroino de la socia teatraĵo, kies titolo estas Sinjorino Kamelia.

– Bonvolu diri, kial vi faris tion? – li demandas, kiam fine ili estas en duopo, kaj li eksidas apud ŝin.

– Sinjoro Theo… – ŝi rukulas tiel, kvazaŭ ŝi pentus ĝin kun rompiĝinta koro, – estus mia “anima frato”, kontaktiĝu kun mi astrale, kaj ni revokados Gustavon.

“Ŝi revokados lin, ĝis li elvenos el la ŝranko…” – li pensi kolere, sed li respondis nur tion laŭtvoĉe:

– Vidu, ne faru ĝin! Sen tio oni estas nervozaj sur la ŝipo, kaj nekompreneble, sed mi ne havas forton ĵeti vin en la maron, malica sorĉistino!

La virino balancis sian kapon kun malgaja rideto kaj rukulis per tiu abomeninda, teatra voĉo, pro kio la mano de Theo pugniĝis.

– Riproĉu min, kulpa homo… Eĉ tion mi toleras pro mia edzo!..

Ĉu ĝi estis hazardo aŭ ne?… Theo vane pensadis pri tio. Tamen certas, ke Lilian ektuŝis lian manon sub la tablo, preterkure, kiam ŝi ekfumis cigaredon. Se momenton li pensis, ke ĝi okazis hazarde, liajn duboj forigis rapide la subita ekbrilo de la trance revemaj okuloj de la virino, kun tiu stranga arto de tiu rigardo, per kiu subite, kiel malluma spektejo post la akto, ekbrilas la ardo, radianta de interne.

– Kial vi rigardas min tiel, se vi amas vian edzon? Kial mi kredu, ke vi ne trompas min?

– Tute ne kredu tion. – Kaj ŝi daŭrigis ĝemante. – Ĉar mi trompis vin. Ĉiutage plurfoje. Ni estas malfortaj fari ion kontraŭ ĝi… Kaj ne estu ĵaluza pri Gustavo! Kio ligas min al li, tio estas io tute alia… Ni estas muzikemaj animoj. Li ŝatis, se mi buŝharmonikis al li… Interese, kial vi paliĝis?

– Kiel?… Jes, mi pensas, eble mi estas pala… Nu, dankon, kaj nun jam mi komprenas ĉion… Pardonu min, sed mi vizitos sinjoron Maxbell pro prunti al mi kombinitan pulvoron…

Li glutegis kaj ekiris kun tremantaj genuoj. La scienculo pravis! Tiu virino estas tia, kiel Afriko: la plej obskura!

Kaj nun eksplodis!.. Inside, kiel kaŝita mino!..

Denove estis la tipa, paca vespero sur la ŝipo Stanley Up To Date, kaj instituto, konanta la lokajn cirkonstancojn, entreprenus asekuri la trankvilon de la ŝipo ĝis mateno, nur okaze de la plej alta tarifo.

Maxbell klarigis al la futbaljuĝisto kun sia katena maniero pri la fiktiva rekto, kunliganta la Sunon kaj la Teron, kiuj samrapide kuras sur sia orbito. Laŭ la futbaljuĝisto ne ĉe ĉiu avanulo estas tiel, ĉar multaj sportistoj laciĝas dum la dua duontempo, kaj ili nur staradas sur la ludkampo. Ĉar la scienculo ne komprenis tion, li kapjesis signifoplene.

– Gesinjoroj – diris Watson gaje, kun sia rigida, marioneta rideto. – Hodiaŭ ni muntis megafonon sur la ferdeko, kaj vi povas aŭdis mallonge la radiodissendon de Londono.

Ofelia Pepita staris ĉe la balustrado apud sinjoro Sokrato Schwach aŭ Knapp (laŭ via plaĉo).

– Kiel bela estas la hodiaŭa vespero – diris la artistino ravite. – La stelplena ĉielo ĉiam elektras min.

– Cetere, elektri: Jen estas du seĝoj, ni eksidu! – proponis la ekzekutisto. Kaj ili eksidis.

– Oni diras – ekparolis Ofelia Pepita mallaŭte, – kiu longe rigardas iun stelon, ties unu deziron plenumas la superaj potencoj.

– La leĝo preskribas – diris la ekzekutisto, – ke oni devas plenumi la deziron, se ĝi ne estas malebla, konsiderinte ankaŭ tion, ĉu la deziro servas nur la ĝojojn de la vivo aŭ ankaŭ la progreson de la animo.

– Ni elektu stelon… – diris Ofelia Pepita mallaŭte, poste ŝi aldonis kun klinita kapo, flustrante: – Mi jam elektis.

Kaj hazarde ilia mano kuntuŝiĝis. Apud kajuto la serioza ombro de Jimmy la Ĝisorela atentis ilin.

Tiam, kiel ia signalado, eksonis la ĵazmuziko el Londono. La vetero estis iom malseka. Iafoje la lunlumo ekbrilis el malantaŭ la vapor-nebuloj, kaj dum momentoj, kvazaŭ ĝi venus el nekonata lumfonto aŭ el sub la akvo, ĝi ekbrilis tie kaj ĉi tie kelkloke sur la marsurfaco. La ĵazmuziko eksilentis en la radio, kaj la parolisto raportas, ke noktomeze oni dissendos la sonorilsonon de la abatejo Westminster…

Mallaŭtaj zumadoj aŭdiĝas ankaŭ tie kaj ĉi tie.

En tiun trankvilan atmosferon la voĉo de sinjoro Wagner kriĉas, kiel tiu de rabia papago:

– Ej, jen vidu!.. Mi diras spite al mia honorvorto! Tie estas mia malnova ŝipo! Mia olda Korporacio! Se ĝi estas eraro, mi tratranĉos mian gorĝon ĉi tie, kaj ne estu mia nomo Wagner, kvankam ĝi estas bela!.. Tie venas la droninta ŝipo!..

En la sekva momento la vivo sur la ferdeko vigliĝis.

La matrosoj starantaj piedpinte, etendadis sian kolon kaj gaprigardis la malproksiman, nebulan oceanon… Sur la rando de la malleviĝanta kaj leviĝanta akvotelero, kiel jam antaŭlonge, malgranda vaporŝipo estis videbla en la lontano forviŝiĝinte, sur ties flanko kun malcertaj, blankaj strioj, kiel ĝi veturas pene en la krepusko…

– Kapitano! – kriis sinjoro Theo al Watson. – Kial vi ne ordonas, ke la radiisto kontaktiĝu kun la ŝipo?!

– Mi jam ordonis! Oni ne respondas je nia radioalvoko.

– Sed mia kara amiko Paramount Ocean Pictures! – krias sinjoro Wagner kun kontraŭnatura stentorado – ĉefdirektoro do tamen rekonas sian ŝipon! Tie estas la vaporŝipo de la Korporacio!… Mi portis ĝin sub mia nomo!.. Mi rekonas ĝin, ĉar lametas iu ties helico, kaj ĝi ne havas du el tiuj!..

– Tuj fermu vian buŝon, ebria ŝlemilo – kriegis Theo, – ĉar mi ĵetos vin tra la balustrado en la maron!

– Granda afero! Provu ĵeti min tra la balustrado sur la teron!.. Jen rigardu tion! Nun ankaŭ la luno prilumas ĝin! Mia ŝipo… Tiu vaporŝipo estas granda friponeto! Ĝi elmergiĝis bele el sub la akvo! Ĝi estas bela figuro, je mia vivo! Jen vidu!.. – Kaj li formis funelon el siaj manoj. – Alo! Mia olda Fred la Malpura!.. Alo!

Frosto trakuris la dorson de la homoj, kiel tiu homo vokis ĝojkriante la dronintan vaporŝipon, kiu tie en la lunlumo… estas nekontesteble: ĝi memorigas pri la ŝipo Sinjoro Wagner. Ĝi nun malaperis por momento kaj denove aperis ĉe la rando de la sinkanta telero en la kretokolora radiado de la nevidebla lumfonto de la luno, sur ties flanko kun forviŝiĝintaj, blankaj strioj, kaduke rapidanta vaporŝipo, kaj…

Kaj en la silento, estas mirakle, ke ili ĉiuj ne mortis tuj: kun profunda muĝego eksonis la basa sonorilego de la abatejo Westmister! Kruele, senindulge, kontinue ĝi signalis la noktomezon, kun teruraj bastoneg-similaj batoj en la cerbo de tiuj konsternitaj homoj, ke la teruro preskaŭ elverŝiĝetis el ilia nervosistemo!

Jam nek sinjoro Theo diris ion, kaj la malgranda vaporŝipo spiregante baraktis en la malproksimo… Nur oni povus vidi pli klare… Pro maltrankvilo paraliziĝintaj matrosoj

gaprigardis unu apud la alia, kun malfermita buŝo, kaj la sonorilego muĝis.

Sur la ŝipon Stanley Up To Date alvenis la plej granda sinjoro: la paniko.

## D U D E K O K A  Ĉ A P I T R O

Matene la personaro ne volis pluveturi. Ĉiu asertis, ke la vaporŝipo en la malproksimo estas Sinjoro Wagner. La matrosoj postulis, ke la blu-barbulo rakontu ĉion!

Sijoro Wagner sidis sur la planko, apoginte sian dorson al la balustrado, ĉar duonhoron ne troviĝis homo, kiu estus levinta lin. La birdo de la strangulo, ligita al lia butono, nun jam de tempo al tempo ekflugis malkuraĝe kaj sursidis la randon de la cilindra ĉapelo, ĝi frapetis la kandelon per sia beko kaj kvikis. La paseron, ĉar ĝi plenkreskis dume, li nomis Arnoldo, kaj pere de sia butono li certigis mallongan flogvojon al ĝi.

– Kial vi kunportis tiun kompatindan birdon? – demandis Borges, la mekanikisto. – Ĝi ne trovos konvenan paron por si. La kompatinda…

– Ankaŭ mi vidas tiel – ekparolis sinjoro Wagner malbonhumore: – La edzino de la futbaljuĝisto plaĉas al ĝi.

– Diru nun al ni – venis Theo tien aplombe, – kial vi asertis hieraŭ vespere, ke via ŝipo venas? Ĉu?! Kaj la personaro staris malantaŭ li minace.

Sinjoro Wagner respondis tuj, solene kaj serioze! Unue li enpoŝigis la paseron, nomatan Arnold, poste li surprenis sian gantojn el fadeno.

– Do sciu, kial sentis Fred la Malpura sian morton, kaj sciu, kial mi ĝojas ĉiam, kiam mi estis bona knabo, kaj rilate mian striktan financan situacion, mi protektis ankaŭ la birdojn, havantajn kompatindan sorton – diris sinjoro Wanger kun serioza ĝentileco kaj eklevis sian ĉapelon, kion li poste pentis, ĉar marinita fiŝfileo falis el sub ĝi. – Kompreneble mi

konservis tiun fiŝon sur mia kapo, kiel birdo-nutraĵon… Mi do estis en Pott Said, kie mi kaj Fred la Malpura fondis bankon kun tre malmulte da baza kapitalo, sed la mono ne gravas ĉe rulet-banko, ĉar la ludantoj kutimas kunporti ĝin, kaj tiam okazis la ĝena intermezo, kiel oni nomas la uverturon de operoj. Alvenis ŝipo, nomata Brigita, kiu anticipe kargis malsanon, nomatan pesto. Oni ne toleras tian importon en Port Said. Kiam evidentiĝis la uverturo, oni diskuradis kun granda teuro ĉiudirekten. Kaj poste oni deklaris, ke la ŝipo Brigita estos forbruligita sur la aperta maro. Nur mi entreprenis tion en la tuta haveno, kaj mi ne havis alian partneron, ol mian oldan amikon Fred la Malpuran, la Kapitanon. Kiam ni jam estis sur la vasta maro, mia amiko diras al mi: Amiko Wagner, estas domaĝe poro tiu bona vaporŝipo, estus domaĝe forbruligi ĝin pro la pesto-kargo. Eĥ, mi respondis, vi parolas veron, mia olda amiko, mi ĵuras je mia antaŭa vivo, la ideo estas unuaranga… Ni do verŝis petrolon sur la lignaĵojn, kiuj troviĝis sur la ŝipo, ni ekbruligis tiujn, kaj malproksimiĝinte, ni ĵetis la brulantajn lignotabuloj en la akvon. Ĉar komenciĝis granda tempesto, ni ekhejtis la maŝinon, poste fondiĝis la Korporacio Wagner plenvapore. Fred la Malpura kaj mi ĵetis en la akvon la multe da pestajn mortintojn, bele aranĝitajn en la bilĝo… He!.. Kien vi iras?… Kia infanaĵo ĝi estas? Mi povas trankviligi ĉiun: mi ne kredas, ke la ŝipo Brigita veturadas nokte sur la maro pro la pestaj mortintoj. Se tamen, ĉar ankaŭ tio eblas, vi tute ne devas esti nervozaj.

Sinjoro Theo plej volonte estus mortpafinta sinjoron Wagner, kiel hundon, kvankam li sidis pie apud la balustrado. Al la pasero Arnoldo, kiel ĝi staradis antaŭ li, li montris paneron de surpre, ĉar li decidis, ke li instruos sian protektaton servi.

Tagmeze aperis la insularo Tonga.

Kiel jam tiomfoje, li ankaŭ nun eraris.

La indiĝenoj de la malgranda insulo akpectis ilin kun humila estimo. La ĉefo venis antaŭ ilin kliniĝante.

– Kion vi scias pri la scienculo? – ekparolis Maxbell.

Ho, ili havas informojn pri multe da scienculoj. Ĉu la malalta dikulo? Kompreneble ili konas lin. Li estis ĉi tie.

Kiel?! Theo kaj Jimmy la Ĝisorela vertiĝis. Li ja ne alvenis ĉi tien! Kio ĝi estas?!

– La scienculo alvenis ĉi tien antaŭ du jaroj, ĝuste komence de la somero.

– Kion vi scias pri li?

– Li postlasis paperon, sur kio estas skribita, kien li veturos plu.

“Mi veturis plu, por ke mi atingu per la marfluo la insularon Sambi-Sumbi. Mia provizaĵo ests malmulta, sed mi provos ankaŭ la neeblon. Gustavo Bahr.”

– Jen! – kriis Maxbell. – Gustavo Bahr inventis la sciencon!

Poste ili traserĉis la internon de la insulo. La ĉefo montris al ili groton.

– Oni tendumis ĉi tie.

“Kiuj? Sankta Dio! Kio ĝi estas?!” – konsterniĝadis Theo.

– Jen rigardu! Ĝi estas lia diplomo!

Kaj estis tie la akademia honordiplomo de Gustavo Bahr!

Ili revenis sur la ŝipon, kie sinjoro Theo unuavice rapidis en sian kajuton kaj neniam komprenis, kial restis vivanta

Gustavo Bahr, kiam li diris la faktoj al li frid-kondute.

– Ĝi estas absoluta trompo! – li flustris pene spirante. – La diplomo estis hejme, kadrumit sur la muro! Ne mia skribo troiĝas sur tiu letero! Mi neniam estis sur tiu ĉi abomeninda insulo Tonga!

– Se vi diras tiaĵojn, vi ne komprenas la geografion! Tamen nenio estas perdita. Nun mi montros la leteron al via edzino, kaj ŝia sinjorina moŝto rekonos, ke ĝi estas falsaĵo.

Kaj li iris. Tiu anĝelo! Li atendis tiaĵon de la virino, ke ŝi savos lin! La praa naiveco de la viroj apenaŭ dekadencis ekde la ŝtonepoko. Nur tiu cirkonstanco povas klarigi la esperon de sinjoro Theo, kun kiu li revenis sur la ferdekon. Kaj fine ĉi tie li povis renkonti Lilian-on. Ŝi ĉifadis malgrandan, batistan naztukon inter siaj fingroj, tremante de ekscitiĝo. Ŝia voĉo nun estis raŭketa, kvazaŭ ŝi estus plorinta, kaj ŝi rukulis tremvoĉe!

– Bonvulu montri ĝin – ŝi rukulis, – mortru ĝin!

“Ho – pensis la viro – kiel mi povas esti enamiĝinta al ŝi?! Kial estas tiel bela tiu ĉi virino?”

Kaj li transdonis la skribaĵon al Lilian. Ŝi ankoraŭ ne povis vidi ĝin, kiam ŝi jam ekkriis:

– Ĝi estas lia skribo! Ho, kiel mi konas liajn ĉiujn literojn! Gustavo, Gustavo, kial vi faris tion kontraŭ mi?!

Kaj ŝi ploregis. Kaj sinjoro Theo tute langvoriĝis por la fia insidatako. Li duonhisis sian fumantan cigaron inter siaj inertaj lipoj, ke ĝi preskaŭ falis el lia buŝo. “Sinjoro! Vi vidas, kion ŝi faras kontraŭ mi, vi vidas, ke mi staras ĉi tie, vi scias, ke ĉiuj sorĉistinoj, okupiĝantaj pri amtrinkaĵo, venen-preparo, estis martiroj en komparo kun ŝi, kiujn iam oni

forbruligis sur gotikaj ĉefplacoj… Kie estas tiuj malnovaj, belaj tempoj?…”

Dume Jimmy la Ĝisorela kelkfoje spiris profunde, ĉar malbonfarto ĉirkaŭis lin. Watson staris pale, kaj la matrosoj murmuris, kiam la virino denove demandis la senliman oceanon, kial ĝi faris tion kontraŭ ŝi?

– (Gustavo! Gustavo!) – Kial ŝi faras tion kontraŭ ni, tiu demando estis pli interesa kaj drameca ĉi-momente: pri ĝi la sultan-edzino ne okupiĝis, uzanta kompresadon laŭ Priznic.

– Ĉu vi estas certa pri tio, kion vi asertas, sinjorino?

– Sinjoro! Mi tamen rekonas la benitan skribon de mia edzo?!.. Mia scienculo! – ŝi rukulis.

Ah! Li ne faros tion plu! Li kunportos la geografon el la vestoŝranko al tiu ĉi virino! Li ĵetos ŝian edzon ĉi tien, poste li ĵetos ŝin en la maron, kaj sekvu la elektroekzekuta seĝo, krome diablo forportu ŝian muzikeman animon!

Li pensis tion kaj staris kun sia malgaje pendanta cigaro, de kie faladis la cindro sur lian jakon, kiel sur funebran kapon. Li nur staris kaj pensis tiaĵojn, kaj ne estas ekskludite, ke ankaŭ la serpento meditas pri tiaĵoj, kiam ĝi samtiel senmove rigardas sian dresisto kaj dancas.

Sed, nova espero ekbrilas! Venas! La savanĝelo!

Haliho!.. Nenio estas perdita! Jen estas la perlo de la ekspedicio, la emerita Jupitero de la fulmoj de la leĝo, Sokrato Schwachta aŭ sinjoro Knapp, ĝi nun jam egalas, laŭ via plaĉo… Li paŝas al la grupo! Li portas brunan flanelvestaĵon kaj kvadratitan ĉapon, krome ankaŭ mallongan pipon sur siaj liprandoj, kiel ia ĉefdetektivo.

– Pardonon – diris la akrakolora savanĝelo, – mi ne volas interveni la envejnajn aferojn de la ekspedicio, ĉar mi ne estas sperta pri la sporto, kaj ĉiu estis junulo, ĉiu estis pekulo. Sed ni scias el multaj medicinaj libroj, ke la maltrankvilaj virinoj, en histeria stato falas en revaĵon pro la perturbo de la sekciaj glandoj de la subkonscio, kaj tiam ili asertas realaĵo tion, kio efektive nur debila supozo, aŭ kiel skribis Pasteur: maksimuma fantasmagorio. Permesu, ke mi, kiu jam en multaj faksimiloj studis la manskribon de la gegorafo Gustavo Bahr, kaj mi konservas multe da leteroj de li en mia kolektaĵo, mi kunlaboru objektive.

La okuloj de sinjoro Theo ekbrilis.

– Stultaĵo! – kriis la virino. – Mi rekonas la skribon de mia edzon!

– Mi petas vin – diris sinjoro Theo, – nun povas decidi nur la objektiva fakulo.

La oficiala martiro de la kaŭĉuka manumo transprenis la skribaĵon, li rigardis ĝin longe, eklevis sian ŝultron kaj kapjesis:

– Sendube ĝi estas la skribo de Gustavo Bahr… – Li malrapide iris plu kaj turnante sian lornon antaŭ sia okulo, li rigardadis la pejzaĝon enprofundiĝinte. Sinjoro Theo neniam dum la vojaĝo paliĝis tiel morte pro kolero, kiel ĉi-foje. Kaj Jimmy la Ĝisorela, kiel li observis en sia ulster-jako la ekzekutiston en ties pompa eleganteco, li transdonis sin al havena revaĵo. Li imagis, ke la suno subiras, li staras reveme ĉe la balustrado de la ŝipo, ripetante malgaje: “ŝi amas, ŝi ne amas”, kaj li disŝiradas la ekzekutiston je etaj pecoj, dume per malrapidaj, sed per leĝeraj, graciaj movoj li ĵetadas tiujn al la mildaj ŝarkoj, svarmantaj sube.

Theo iris en sian kajuton.

– Elvenu!

La profesoro volis elveni, sed li kuntrenis ankaŭ la ŝrankon, ĉar lia kolumo malantaŭ alkroĉiĝis al hoko.

– Dekroĉu min!

– Nun temas ne pri tio. Kvankam mi volonte farus al vi ties malon.

– Kial vi ne kunportis jam ankaŭ la ekzekutiston?

– Estu trankvila, mi ne preterlasis ĝin. Tiu ĉi ekspedicio estas bone organizita. Sed kiel vi opinias pri tiu dufoje dirita deklaro de via edzino, ke Gustavo, poste ŝi demandis stantore, kion vi faris kontraŭ ŝi?

– Sinjoro, kion mi povis fari kontraŭ ŝi? – balbutaĉis Gustavo Bahr timiĝinte – vi scias, ke mi vendis polvosuĉilojn en San-Francisko.

– Diablo estus forportinta vin, antaŭ ol mi ekkonis vin! Via edzino asertas, ke vojaĝante vi kunportas ankaŭ vian diplomon!..

– Tiu aserto estas tiel travidebla kaj inversa, kiel la Fata Morgano super la dezerto en akuta angulo kvardek kvin grada.

– Sed ĝin almenaŭ povas forporti kirlo-vento!

– Granda kirlo-vento jam kuntrenis ankaŭ vivantan homon – rimarkis la profesoro kun iom da optimismo, kaj ŝajnis tiel, ke li revadas.

Aŭdiĝis frapeto, kaj Gustavo Bahr reiris rapide en la ŝrankon. Jimmy la Ĝisorela envenis nervoze:

– Estas granda problemo. La personaro nun postulas, ke ni tuj returniĝu, ĉar ili ne devas daŭrigi la vojon, se vi freneziĝis.

– Ĉu??!

Jen tio okazis: Subite aperis Borges, la mekanikisto, kaj ankaŭ Ofelia Pepita estis kun li.

– Sinjoroj – diris la homo en cilindra ĉapelo, – bedaŭrinde mi devas diri malgajan informon. Nia amata sinjoro, Mr. Theo freneziĝis, kio cetere estis antaŭvidebla por lia vivmaniero. Mi promenis kun la artistino, kaj ni aŭdis antaŭ la pordo de sinjoro Theo, ke la kompatindulo paroladas en si mem. Malsupreniru, kaj ŝnurligu lin.

– Stultaĵo! – kriis Jimmy la Ĝisorela.

– Se sinjoro Theo, la respondeca entreprenisto freneziĝis, ni devas returniĝi – diris Watson avide.

La personaro murmuradis. Kaj nun aperis ankaŭ sinjoro Theo, post kiam Jimmy la Ĝisorela venigis lin. Sed antaŭ ol li povintus ekparoli, vidvino (?) sinjorino Gustavo Bahr diris entuziasme:

– Ah, vi eraras! Ankaŭ sinjoro Theo estas spiritista frato, kaj ni priparolis, ke li parolos al mi en sia kajuto, mi forte pensos pri li, kaj mi aŭdos lin. Mi aŭdis! Kaj mi dankas vian mesaĝon, spritiista frato!

– Mi petas… – li balbutaĉis kolere kaj plendinde, sed sinjoro Theo kaptis la savzonon – mi tre ĝojas…

Li devis ĝin akcepti iel-tiel. Ankaŭ Watson. Nur Borges diris mediteme al Ofelia Pepita:

– Tiuj spiritistoj… La virino aŭdas ĉi-supre tion, kion ŝia spirtista frato diras al ŝi malsupre, en tranco: “Diablo estus forportinta vin, antaŭ ol mi ekkonis vin…”

Kaj la ŝipo Stanley Up To Date nun jam la lastan itineron de sia vojo, denove ekveturis akompanate de la malbona antaŭsento de la plimulto de la pasaĝeroj per la nevidebla haŭsero de la nedeskuebla fato.

## D U D E K N A Ŭ A Ĉ A P I T R O

Poste la plej diversaj informojn encirkuliĝis pri la ŝipo Stanley Up To Date. Aŭrelo la Ĉifonulo ĵus veturis al la insularo Pasko, kiam la ekspedicio krucis lian vojon. Li vidis matrosojn, civilulojn sur la ferdeko, kaj cetere li spertis nenion eksterordinaran sur la ŝipo. Li komprenis, ke nek li mem kredus, se iu alia asertus tion. Oni kredis tion nek al li.

Subite ili ricevis alarmsignalojn, kiuj konsternis la tutan mondon: S.O.S… S.O.S… Stanley Up To date! Kabo Farrere… La peklita kukumo elĉerpiĝis!.. Ni ne trovas natrian hidrogenan karbonaton!..S.O.S…S.O.S…!

Poste sekvis la raporto de la destrojero Renown: La ŝipo Stanley Up To Date malaperis ĉe la Kabo Farrere, kaj la destrojero kontaktiĝis kun ĝi pere de morsaj signoj. La ŝipo tuj respondis, ankaŭ pere de falgo, tion, ke: “Nu atendu, vi, nazmukulo! Se via patro, la maljuna krozŝipo ekscios, ke vi alparolis nian ŝipon, ĝi do volus droni de honto. Atenton: Dum semajfina ferio, en ripozdomo, hejme kaj dum vojaĝo gajigas vin la kurdormaŝino Ericson. Ĝi estas aĉetebla en ĉiu drogejo.”

Poste la ŝipo denove malaperis plenvapore.

Kapitano Kuloto, kiu post sia lasta amnestio liveris salpetron sur Javon per sia ŝarĝŝipo, nomata Lukso, kaj nun li kuŝas malsane en sia loĝejo, ĉar veturante al la polusa maro, kie oni havas nenio farendan, li ekvidis la ŝipon Stanley Up To Date, en la stirejo staris Ofelia Pepita, lia iama dua-alkoholistino, kiu portis ban-trikotaĵon, kaj sur ŝia kapo estis tre ĉifona, nigra, cilindra ĉapelo! Kaj kio estis la plej terura: pasero flugadis ĉirkaŭ la ĉapelo. La ŝipo Lukso alproksimigis la ekspedicion, la vidaĵo fariĝis eĉ pli fantomeska: nur kelkaj virinoj en vesperfesta kostumo kaj viroj en frako estis sur la

ferdeko, havantaj tre gajan humoron, ili svingis per la manoj, kaj sur la kapitana ponto kaprobarba, serioza sinjoro dirigentis orkestron en ruĝa togo, moda ĉe la romianaj virilist-oj. En solena korpopozicio, kun nekovrita kapo ili kantis al la proksimiĝanta ŝipo la ĥorkanton kun la teksto: Ek, skotlandaj leterportistoj, ek-ek, la laboro atendas vin! Kapitano Kuloto estas kuraĝa homo, li do transkriis, demandante, kio estas al ili?

Tiam de sur la rando de la kamentubo, sur la plej supra ŝtupo de la fer-eskalo pardonpetis garderoba ŝranko, kial ĝi partoprenis la paroladon, kaj ĝi demandis kapitanon Kuloto, se li vidos ekspresan frenezulejon sur la maro, sendu tion por ili. Poste elpaŝis sinjoro en frako kaj en sport-pantalono, kiu memorigis pri direktoro de cirko, kiu transkriis la sekvajn per megafono:

– Ĉiu pasaĝero malsaniĝis je lepro! Mia nomo proksimume estas Aristotelo aŭ Aristofano Schwachta, aŭ Knapp aŭ Homero, laŭ via plaĉo, la ne dezirata estas forstrekenda! Posttagmeze mi operaciis d-ron A. Winter, sed mi jam fartas bone. Kaj nun estu permesate prezenti al nia kara publiko la ŝlagron de nia ensemblo: Nur la Horsi-Horsi estas tre bela.

Tiun ŝlagron ili faris pli bonetosa per la terura tintegado de kuirpotoj.

Tiam la ŝarĝoŝipo Lukso panike forveturegis el la proksimo de Stanley Up To Date.

…Ankoraŭ unu raporto alvenis el la ĉirkaŭaĵo de la insularo Tonga. Iun nuban nokton, kun ĝiseksplode trohejtita kaldronego, kun tremanta riparo, danĝere proksime al la bordo veturegis la ŝipo. Ĝi malproksimiĝis rapide, kaj en la nebulo oni aŭdis helpokriojn de sur la fedeko.

Harry la Kukumo, ducent kilograma kapitano ĵuras, ke la dektiran de la monato, vendrede inter la tria kaj kvara horo nokte li vidis la ŝipon Stanley Up To Date sur la ĉielo, kiel ĝi veturis de la Laktovojo al la direkto de la Suda Kruco.

Kaj pasis la tempo, kaj ne alvenis informo pri la ŝipo Stanley Up To Date. Ĉu eble la oceano englutis aŭ la ĉielo sorbis ĝin?… Kiu povas scii tion?…

Kiam ĝi ekveturis al la ĉefurbo de la insularo Sambi (al Sambi-Sumbi), ankorŭ ŝajnis tiel, ke la fato, delonge minacanta evitos ilin. La ĉielo estas iom nuba, sed videbliĝas sufiĉe da steloj al tio, ke Ofelia Pepita alpaŝis al homo, malgajanta sola.

– Kiom da steloj ekzistas?… – flustras la artistino mallaŭte.

– Mi tute ne scias, kiom da steloj ekzistas. Tiun demandu, kiu kutimas esplorkontroli tie supre! – respondas sinjoro Wagner el la mallumo nervoze, kaj poste lia aŭdigas birdo-kvikadon.

– Ĉu vi estas tiu… sinjoro Wagner? Vi scias, ke mi konas vin bone el la Diboĉejo Medolo? Antaŭ kvar jaroj vi foriris por kvin minutoj, kaj vi restis ŝultanta per unu dolaro, se mi venis ne por ĝi kun la ekspedico – diris Ofelia Pepita kaj ĉirkaŭrigardis mirante. – Kial vi ŝmacas?

– Ĝi ne “ŝmacas”, sed kvikas – klarigis sinjoro Wagner. – Kompatind-sorta pasero, nomata Arnoldo rimarkis tion en mia interna poŝo. Ĝi jam kvikas bele la funebran marŝon de Lohengrin el la opero de Mendelssohn. Poste tiu heroo devas morti, ĉar li tiel sopiris vivi, sed li ne povis fari tion.

– Strangaj aferoj okazas nuntempe en via interna poŝo – meditis Ofelia Pepita, kaj ŝi levis sinjoron Wagner, ĉar tiu, kiel ia neĝhomo, li sinkis malrapide ĝis la planko, apud la kajuto de la futbaljuĝisto. – Ĉu eble vi estas ebria?

– Mi protestas kontraŭ tio! – kriis sinjoro Wagner kategorie, kaj en orgojla, leĝera pozo li etendis sian brakon kaj mane apogiĝis al la kajuto. Tial li falis en ĝin tut-ŝultre.

La de malproksime flustrantan anatomon kaj la edzinon de la futbaljuĝisto trafante buŝe-naze, la mano de sinjoro Wagner preterflugis ilin vizaĝon. Li mem ekdormis panike, dume lia brako svingante enpendis al ili, kaj doktoro Rügen kvazaŭ averte tuŝis sian cigaron al lia manplato. Sinjoro Wagner ekkriegis laŭte kaj eltiris sian manon, sed li jam ridetis, rimarkinte, ke li havas cigaron.

– Ĝi estas bona kajuto – li diris feliĉe al Ofelia.

La ekzekutisto enlitiĝis frue kaj petis alporti la vespermanĝon en sian ĉambron, kaj ĝenerale pacaj pasaĝeroj ripozis sur la ŝipo, en kajutoj kaj en ŝrankoj, kiel tio decas.

Sinjorino Gustavo Bahr kaj Mr. Theo paroladas.

– Se eble mi estus koninta vin pli frue, mi neniam estus entrepreninta tiun vojaĝon – diris Theo poste.

– Kial?

– Ne ne estus dezirinta trovi Gustavon Bahr.

– Vi estas la kaŭzinto de ĉio! Mi alvenis en San-Franciskon sekrete, kaj mi informiĝis, ke vi ne volas atendi min. Tamen mi venis ĉi tien. Iu ludis mian rolon al via sekretario, mia iu amikino. Ŝi estas tiu, kiu diskonigis la informon pri mia morto.

– Ĉu la dika nekonato, A. Winter?

– Ĉi tie mii renkontis lin nokte. Ni vagadi, kiel du fantomoj ĉirkaŭ la fenestro de la kuirejo. A. Winter povas danki multe al mi, aŭ al mia simio. Bobi fuĝis de mi kaj kaŝiĝis en la bilĝo.Ĝi vidis tie, kiam oni fermis A. Winteron. Kiam ĝi restis sola, ludis per la ŝlosilo, imitante, kion ĝi vidis, kaj hazarde ĝi malfermis la pordon, tiel elvenis A. Winter.

Hm… Kaj certe ankaŭ Gustavo Bahr fermiĝis tiel en la dikumentŝrankon: La simio turnis la ŝlosilon. Estis domaĝe malfemis tion.

Ili silentis.

– Bonan nokton – diris Lilian. – Pruntedonu al mi libron… Mi dormas malbone…

– Ankaŭ mi… Nur tion diri al mi: kie vi kaŝiĝis sur la ŝipo?

Theo rigardis ien en la vibrantan nenion. Jam kelkajn taojn stranga melenkolio ekregis lin. Kion ni volas? Kial ni stentoras, planas, venkas kaj suferas, kion ni kredas?

Absolute, kio estas tiu cirko?!

– Ĝi estas la problemo – plendis la futbaljuĝisto al la oraĵisto, ĉar ili repaciĝis kaj trinkis konjakon, – ke la ŝoto de sur la punpunkto ne estas sufiĉe ekzakta. Kiam la mano de la ludisto tuŝas la pilkon, ĝi signifas tion, ke li estas kulpa pri hentz. Tial mi estas ĉi tie, ke mi juĝu! Vi tuŝis ĝin per via mano ene de la severigita areo! Sekvas ŝoto de sur la punpunkto! Bedaŭrinde vi estas artisto, kaj vi ne komprenas la futbalon…

– Mi ne scias tion… – diris la alia. – Cetere ni oraĵistoj havas striktan rilaton al la futbalo, ĉar nia majstro, Benvenuto Cellini, estis kruda, interbatiĝema homo.

– Sed la menciita matĉo brutaliĝis vere nur post ties fino: pro punŝoto mi konatiĝis kun mia edzino! Mi fuĝis al ŝi tra Sŝia fenestro, antaŭ ol dekkvin mil spektantoj povus prirespondigi min. Ŝi nek hodiaŭ scias tion. Kiam mi amkonfesis al li, nur tio ŝvebis antaŭ mi, ke la virino ne estus matrono, kiu havas blankajn barojn kaj iras kurbadorse. Kiam mi petis ŝian manon, mi ankorŭ ne sciis, kiel ŝi nomiĝas?! Kaj tiel okazis mia la plej granda, futbaljuĝista eraro: mi edziĝis pro la mantuŝo de la pilko. Kvankam mi anticipe ne ektuŝis la knabinon per miaj manoj, kaj ĝi okazis tute ne interne de la severigita areo, ĉar Ernestina tiutempe havis pli ol dudek jarojn.

– Ĝi estas kruda sporto, sendube. – Kaj ili tintigis la glasojn. Ekblovis delikata vento, kiel la heroldo de ia latenta maltrankvilo…

– Kion vi pensas pri la steloj? – demandis Ofelia sinjoron Wagner, kiu vekiĝis tiam.

– Tio venas en mian kapon, sed nur se estas necese, kiel altranga soldato povas esti la ĉielo, havanta tiom da steloj en efektiva servo! Eĉ ora strio estas sur ĝi, kiam falas kelkaj ĉielaj ŝtonoj… Nu! Kiel oni nomas tiun hotelon en Honolulu, kien neniu iras pro la turistoj?

– Ĉu Meteoro?

– Jes… Kiam tia hotel-ŝtono falas el la ĉielo, eĉ ora strio apartenas al la steloj, kaj aŭrore oni alfiksas la ordenon, nomatan Venuso…

– Ĉu nenio alia venas en vian kapon pri la steloj?

– Je mia honorvorto, vi pravas! Ĉar venas en mian kapon, ke mia patro pensis pri kantisto: li estos granda stelulo. Li nomiĝis ia Titta Ruffo. Sed de tiam mi ne aŭdis pri li. Eblas,

ke li senmoraliĝis. La plimulto de la ĥoristoj preskaŭ idiotiĝas pro la ebrieco.

– Ĉu vi estas ĥoristo?

– Kiel?! Mi estas amatoro. Ĉu vi jam estis en la operejo?

– Ne. Sed oni operaciis mian farton pro apendicito.

– Ĉu vere?! Kiel?!.. Jen rigardu tiun familion! Sed mi vidas tiel, ke vi intermiksas operacion kun la opero Majstrokantistoj de Nürnber! Tiuj estas belegaj operoj. Ĉu vi scias ekzemple, kio estas la Kavalireco Kamparana?

– Jes! Ekzemple nun redonu mian unu dolaron, kiun vi ŝuldas al mi.

Sinjoro Wagner karesis ŝian hararon bonvoleme:

– Vi estas granda infano, filino mia, se vi okupiĝas pri tio. Ĝi ne povas okazi. Kial ni ne parolus pri la muziko, kie rolas ankaŭ Ofelia? Ŝi estas la filino de reĝo, nomata Pepita, en la verko de dirigento Ŝekspiro, kie Otelo, histeria dana tenoristo ne estos feliĉa kun ŝi, ĉar la sprito de sia patro malbenas lin, kiomfoje ili volus ekkisi unu la alian, intervenas la orkestro, kaj ili devas kanti.

– Ĝi estas tre malgaja… – respondis Ofelia kaj paŝis pli proksimen al sinjoro Wagner kun klinita kapo, kaj tiu falis surdorsen.

– Krome – daŭrigis sinjoro Wagner sur la planko – la ĉielo estas ĝuste tia, kvazaŭ ni starus antaŭ montrofenestro, antaŭ la fermo, kiam mi rajtas kunporti nenion el la vendejo, kiel aliaj homoj post la fermo. Se okaze mi mortos, mi vidos, ĉu supre oni tenas la stelojn ne malantaŭ vitro, kiel arĝentan servicon por dek du personoj? Oni ne povas suprengrimpi

post noktomezo fari truon sur la Laktovojo per vitrotranĉilo, tra kiu li povas elpreni stelon aŭ belan, grandan Metropolon…

– Ĝi ne estas Matropolo…

– Do Kontinental’, kio egalas, ĉar ne ekzistas tiu falanta grand-hotelo, kiun oni povus ŝteli de sur la Laktovojo, kaj tia estas la vivo: Ni vane revadas, la realo valoras nur tiom, kiom mia maljuna amiko, la olda Pinkerton pagas por la ŝtelita numerplato de veturilo…

Li ĝemis, krucis siajn krurojn, kaj kun etendita brako li apogiĝis al sia maldekstra manplato, ĉar tie ne estis kajuto, li preskaŭ falis tra la balustrado, en la maron.

– Kiom da breĉoj! – li kriis timiĝinte kaj kolere. – Ĉio ĉi estas pro viaj idiotaj steloj.

– Vi eraras – diris Ofelia… – La elekto de stelo ne estas idiotaĵo… – Ŝi mallevis siajn okulojn embarasite. – Mi jam elektis…

– Ĉu jes? Ĝi estas kara. Tiam mi ne ĝenas vin plu – diris sinjoro Wagner, eklevis sian ĉapelon kaj foriris. Sed li falis plu en la interferdekon, rompinte sian nazon, poste li kantis kaj fine ekdormis…

…Theo kisis la manon de Lilian, li iris en sian kajuton kaj vidis kolere, ke la profesoro elvenis.

– Bonvolu kredi, ke la ŝranko estas strikta pro mia grasiĝo… – senkulpigis sin Gustavo Bahr. – Ĉu ne estus eble…

Puf! Lilian, senpripense, subite malfermis la pordon pro la libro, kiun ŝi petis, kaj…

Edzo kaj edzino! Renkontiĝis… En la oreloj de Theo jam montriĝis senartikualcia antaŭsigno de okazonta ŝriko! Sed kio ĝi estas?!

He!.. Aŭskultu min! Gustavo Bahr iom ektimetis, sed li relative indiferente kapjesas!!

– Pardonon. – Tion diras Lilian.

Kaj ŝi eliras. – La genuoj de Theo fleksiĝas.

Pardonu min – diras Gustavo Bahr kun bedaŭro, – eble ĝi ne estas tiel granda problemo…

– Homo! Ŝi ja estis via edzino!

– La orelo de la sorto, via buŝo kaj mia edzino! Mi vidis tiun karan virinon la unuan fojon en mia vivo. Nu!.. Kio estas al vi? Trinku iom da akvo!

## T R I D E K A   Ĉ A P I T R O

Nun jam eksplodis la tempesto! Kiam Gustabo Bahr eksciis ĉion, li ŝiris siajn harojn, kaj sinjoro Theo volis helpi lin en tio.

– Mi postulas – kriis la profesoro – transdonis ŝin al la polico!

– Bone! Mi alvokos ĉi ien la policiston, deĵorantan sur la plej proksima koralrifo! Kiel vi imagas tion cetere?! – li kriegis. – Kiel mi sciu, ke la virino ne estas via edzino?

– Mi protestas…

Sinjoro Theo koleriĝis kaj simple enpremis Gustavon Bahr en la ŝrankon, frapferminte la pordon, li turnis kaj ŝovis ĝin al la muro. La situacio de la scienculo nun estis tia, kiel tiu de ŝajnmortinto, kiun oni entombigis starantan.

Sinjoro Theo ne povis pensadi. Kvazaŭ tra liaj tempioj nevideblaj trikiloj estus penetrintaj en lian cerbon. Li ekdormis…

…Poste nervomalsana kuracisto pridemandis ilin, kiu kion sonĝis tiun nokton sur la ŝipo Stanley Up To Date, kaj io pendis en la aero, aŭ la suda aerblovo latentis en la ostoj, tio certas, ke la antaŭsento de la okazonta dramo elpremis ŝvitajn, sinistrajn sonĝojn el la brustokesto de la dormantoj.

Ekezemple sinjoro Arturo Maxbell sonĝis tion, ke li sidas kun Koperniko en la pasport-divizio de la ĉefpolicejo, kaj evidentiĝis, ke la Tero ne estas globforma, sed kuboforma, krome la planedoj havas ne elipsan orbiton, sed luĝejon, en kies fokuso staras tag-al-tage Ofelia Pepita kaj gitarludas…

La futbaljuĝisto en sia sonĝo dufoje volis blovsonigi sian fajfilon post decida golo de nacia matĉo, sed la dua sono de la fajfilo restis muta. Li blovis tion timiĝinte, sed vane, kaj ĉiu pensas, ke li ne aljuĝis la golon. Li ŝatintus diri, ke ĝi estas valida, sed difektiĝis lia fajfilo. Antaŭ ol li povintus ekparoli, oni disŝiris lin je eroj, kaj ĉiu konservas el li peceton memore.

Ĉu Theo?… Li havas la plej teruran sonĝon. Li renkontas Edmundon la Kanibalon sur Trafalgar Square. Kiu fine flustras al li, ke ili uzis Gustavon Bahr dum bankedo kiel hepatan paston sur sandviĉoj, kaj bedaŭrinde ili devas kunporti sinjoron Theo anstataŭ li por trovi iun, ĉar ili ne povas "dezavui" la Reĝan Geografian Socieon, kies prezidantino, sinjorinoo Ofelia Pepita deklaras, ke la scienco estas netrompebla, nur Jimmy la Ĝisorela estas tompebla, kion ŝi pruvos dum ĉiu suneklipsio al sendita komitato en la polusa regiono. La komitato ekveturis per moderna, trimotora, ĉenbenda, unuafrotlinia ĉas-epidemia hospitalo, kie oni felgas pestajn malsanulojn.. Oni zorgeme kaŝas Theo-n en la tegaĵo de pluŝa fotelo, ne dirante, ke la meblo efektive estas elektroekzekuta seĝo. Moka voĉo kriegas ie el la spaco: "Ne timu! Nun mi demetis miajn manumojn!" … Mil-loke penetras en lian korpon la kurento, li senkonsciiĝas en la terura skuiĝo de la elektra morto, kaj li vekiĝas…

Jimmy la Ĝisorela skuas lin.

– Sinjoro, venu sur la ferdekon – li diras apenaŭ aŭdeble.

– Kio okazis?

– Unu mejlon antaŭ ni… La ŝipo Sinjoro Wagner proksimiĝas al ni…

## T R I D E K U N U A   Ĉ A P I T R O

La vento ŝiris el lia mano la pordon de la kajuto, kaj ĝi klake puŝas tion al la muro! Kaj ili blinde ŝanceliĝadis pro la pluveroj, rekte frapiĝantaj alvizaĝe. Ĝi estas vera nokto, konvena por la fantomoj!

Ie oni kriadas… Jimmy la Ĝisorela superhurlas la sibladon de la vento.

– Oni volas ĵeti la Blubarbulon en la akvon!

Vere sinjoro Wagner estis vekita laŭ tiu versio, kaj li ĉiumaniere estis kontraŭ tio. Eble ni ne neglektu mallonge, en kelkaj vortoj, nek la sonĝon de sinjoro Wanger inter tiuj teruraĵoj, kuregantaj per la rapideco de tempesto.

Ĝi okazis tiel. La personaro venis, gvidate de Gordon por ĵeti en la akvon la grandan konanton de la operoj kaj hazardludoj. Kaj tio ne estis sonĝo.

Sed Vanek la Dornhara, Eŭgeno la Buŝaĉulo kaj Tendenulo la Fervora savis lian vivon el la mano de la matrosoj. (Pro kio ili havis multe da malagrablaĵoj.)

Ili tiradas li… Diskuto… Kaj dume sinjoro Wagner iomete ekdormas inter la manoj de Gordon, kiu strangolas lian koron, ĝis oni interkonsentas.

Sed oni jam kaptas lin, kaj iu ektuŝis lian manplaton, kie la anatomon bruligis lin. Tiam li vekiĝis. Dum sekundo, kiam li sentis pikan doloron akran, li sonĝis la sekvajn:

Li mortis iel, sed nenia problemo, kaj sur la krada pordego jen tio estas skribita:

A T E N T O N, T R A N S M O N D O!

“Homo, kiu enpaŝas ĉi tien,

rezignu ĉiun esperon!”

(cito el iu opero de Dante)

Antaŭ la enpaŝo bonvolu skrap-purigi la sopirojn!

Kunporti biciklojn sub la pordegon, aŭ ŝteli

tiujn de tie, ne estas malpermesite, sed ĝi havas

nenian sencon!

Alo! Jen vidu, kiel kara li estas!.. Blankhara pordisto malfermas la pordegon. Pro la pli bona ŝajno li prezentiĝas tiel, ke li estas Wagner Altmontara. Tiam la maljunulo frapfermas la pordegon. Sinjoro Wagner li mem ekstaras de sur la tero. “Nenia problemo”, li pensas kaj etendas sian manon en la birdoneston. Bonŝance edukiĝas tie ankaŭ kelkaj ŝtelŝlosil-birdidoj, kaj per tiuj li malfermals la seruron! “Kial vi mensogis?” – draste alkriis lin la blankhara pordisto. “Vi ja ne estas Wagner Altmontara, sed Nesta, kiu havas paseron! Ne estas diferenco! Tiam ĝi ne estas ŝtelŝlocilo, sed vera! Do vi estos la domprizorgisto ĉi tie.” Apud la ĉapelo de sinjoro Wagner brilas mil-vattaj lampoj, kaj li elrapidas kun la ŝlosilo. Li iras en klakantaj flanel-pantofloj, kantante, ĉar laŭ la pordisto li devas ricevi tridek cendojn pro ĉiu malfemo de la pordo…! Sed dum li dormis sian eternan dormon post la tagmanĝo, iu pendigis novan tabulon kun la jena surskribo:

T R A N S M O N D O!

A L   L A   A T E N T O   D E   N I A J   V I Z I T A N T O J!

Sinjoro Wagner araĝas post ĉiu deka horo

enpagan pordomalfermon por siaj malnovaj konatoj

LI DONAS SIGNIFAN RABATON EĈ EL TIO

POR SIAJ IAMAJ SAMPRIZONULOJ!

Kaj tiam… Okazis la plej granda impertinentaĵo! Tute fremdaj uloj alvenas gemute kriegantaj, asertante, ke ili konas lin! Homoj portantaj frakon kaj vestaĵon de grafoj, eĉ aktujon jam de malproksime krias: “Kio nova?! Kio nova?! Alo, Wagner!” Kompreneble li kriordonas al ili kolere, kek nenia nova estas ĉi tie, kaj ili intermiskas lin kun iu alia ebriulo, sed tiuj sinjoroj ridetante klarigas unu al la alia, ke: “Li estas bona tipo!” Kaj vane li volas protesti kontraŭ ĉiu konfidencumo, ili venas! Ili superkrias lin, okulumas unu al la alia, ke ili konas bone lin,”Tiu estas granda friponeto, li nun ŝtelis ŝlosilon de ie, kaj li volas koni neniun! Li estas bonega figuro!” Kaj ĉio estas vana: Li perlaboris nur tridek cendojn dum la tuta nokto! Eĉ tion li ricevis de sia bona amiko infanaĝa, kiu prefere pagas tridek cendojn, ol apelacii la konatecon kun sinjoro Wagner. Kaj li metas en ties etenditan manplaton la tridek cendojn da fajra ĉiela Matropol-ŝtono, kiu ekbruligas lin…

Tion li dormis dum momento, kiam iu ekprenis lian manplanton, tie, kie la cigaro de doktoro Rügen ektuŝis lin.

– Tiu malbenita fripono kunportis la peston!

– Sed, infano mia! Ne ĵetu min en la akvon! Vivanta birdo estas sub mia ĉapelo!..

Ankaŭ Jimmy la Ĝisorela kaj sinjoro Theo devis interveni por savi sinjoron Wagner el ties senespera situacio.

Samritmaj, grandaj ondoj leviĝis kaj malleviĝis sur la maro. El la nekonata profundo de la ampleksantaj, etendiĝantaj nubo-ĉifonoj malcerta rebrilo saltadas, sur la kresto de la refalanta akvo…

– Tie…!

…Malproksime, ĉe la horizonto, en la fumeca radiado de la oblikvaj lunlumfaskoj, kaduka vaporŝipo baraktas sur la maro, ŝanceliĝante, tremante, longaj funebrofumoj svingas el ties kamentubo, kaj estas videble, kiel la multe da blankaj literoj trairas sub la lumo… sur la riparo de la ŝipo:

N U  K I O  N O V A,  S I N J O R O  W A G N E R?!

– Sinjoro, indulgu nin… – flustras iu matroso, kaj ili ĉiuj demetas sian ĉapelon…

La pestoŝipo!

Nun malaperis la lunlumo sub la densiĝantaj nuboj, kaj mallumiĝis, kiel dum sceneja ŝanĝo, kiam oni estingas la lampojn… La vaporŝipo preskaŭ timiĝinte veturegis sur la akvo, kaj ĉiu ondo desegnis ombrojn de pestaj mortintoj ĉirkaŭ ilin…

– Hej, kapitano! Ni returniĝu!

Theo staris kun krucitaj barkoj, kaj transigis sian cigaron el sia iu buŝangulo en la alian.

– Kiu ektuŝos la savboatojn sen permeso, mi motrpafos tiun!

La personaro pritraktis la aferon murmurante. Iu frapetis sur la pordo de la kajuto de Jimmy la Ĝisorela, kaj timiĝinta, blonda kapo enrigardis. Lia lorda moŝto!

– Atentu min – diris tiu tre eleganta kaj tre timiĝinta junulo al la unua oficiro tute mallaŭte. – Mi decidis surprenis la respondecon, se sinjoro Theo returniĝos kun la ekspedicio.

– Sed vi devas sciigi tion al li, sinjoro…

Lordo Hamilton foriris. Sed iu frapetis denove!

Livingston bruis en la ŝranko! Interne!.. Ĉar dume li elŝovis leteron ĉe la malsupra breĉo de la ŝranko. Damne…! Li kapte levis la leteron kolere. Jen tion skribis la pordisto de Pacioci: "Kiu estis tiu homo, kiu staris en la pordo? Kiel li aspektas? Mi ne vidis lian vizaĝon!"

Tia estas impetinentulo! Nu atendu!

"Tiu homo estis sinjoro princo de Kimrio, kaj lia iu orelo estas tute surda, sed tio ne gravas, ĉar lia barbo pendas ĝis la zono. Sed se vi korespondos kun mi, poŝtrevene mi havos la feliĉon bati vin je la kapo tiel, ke vi invalidiĝos. Nun estas bona okazo al tio, ĉar

ni restis en duopo ĉi tie:

Don Ĝisorela di St. James."

Theo venis nun taŭzite!

– Donu al mi ion trinki! – li diris kolere. – Se la lordo volas, ni do returniĝos… Je via sano.

Sed li apenaŭ levis la glason al lia buŝo, iu frapetis sur la ŝranko, kaj aperis letero sube. Jen tiel ĝi tekstis:

"Sinjoro Theo! Mi diras je mia honorvorto, ke la kimra princo portas mian pantalonon. Livignstrone."

…Post kvin minutoj Theo enpaŝis en la kajuton de la lordo.

– Nu?… Ĉu ni jam returniĝas? – demandis la lordo.

– Jes. Ni tuj returniĝos, kontrolinte viajn dokumentojn – li respondis aplombe.

La du aritokratoj kunrigardis.

– Nu do…

– Levu viajn manojn! – la revolvero de sinjoro Theo direktiĝis al ilia vizaĝo. – Sufiĉe la ŝercaĵo! Ĉu vi estas la filo de pordisto, nomata Livingstone?!

La “lordo” paliĝis, kaj… Puf!

Tiumomente gumbastono batis lin el dorsdirekto. Li sterniĝis sur la planko de la kajuto sveninte. En la breĉo de la lerte malfermebla vando staris Watson!

– Li preskaŭ kaŭzis nian peron per tio, ke li ŝajnis tiel stulta komence.

– Sed kiel li sciis, kiu mi estas?

– Ĉu vi tute ne pensis pri tio, ke via patro, kiu vidis vin ĝistrunke, tra la serurtruo, ĵus, rekonis malgraŭ la artefarita ŝtopaĵo la perforitan nomon de la Trusto Pacifika Oceano sur la pantalono.

…Dume sur la ferdeko ekplodis la paniko! Oni kriadis.

– Per boato ni atingos la insulon Tonga!

– Ĉi itie pli-malpli poste la diablo forportos vin!

– Vi estas stulteguloj! – kriis Jimmy la Ĝisorela. – Moderna homo scias, kiun la diablo volas forporti, tiun forportos ankaŭ de sur la insulo Tonga!

Lilian venis ekscitite kaj flankentiris Jimmy la Ĝisorelan.

– Watson volas returniĝi.

– Kie estas sinjoro Theo?

– Mi ne scias. Ĉu eble ankaŭ vi estas… la homo de Watson?

– Homo de tiu de fulmotondro frakasa.

Li rapidis malsupren sur la helica ŝtuparo. Ili vanigos la planon de Watson en la maŝinejo. Kiam li alvenis tien, la paroltubo ĵus krakis.

Hejtisto staris pipfumante, turniĝanta al la maŝino.

– Haltu! – alkriis lin Jimmy la Ĝisorela.

– Nur ne nervoziĝu – diris la maŝinisto, – eĉ ĝis nun ni neglektis vin, kaj ankaŭ en la futuro ni prosperos sen vi.

– Fred la Malpura!.. – li kriis timiĝinte kaj eksidis!

## T R I D E K D U A   Ĉ A P I T R O

– Alo! Kion vi atendas! – sonis el la paroltubo.

Fred la Malpura prenis la aŭdilon en sian manon kaj diris en ĝin:

– Ne buŝaĉu konstante, vi, fripono, ĉar mi venos supen kun la karboŝovelilo, kaj hazarde mi vangofrapos vin per ĝi.

– Mia fratego Fredy… – balbutaĉis Jimmy la Ĝisorela. – Ĉu vi… vi… vivas?

– Ŝajnas tiel, ke mi ankoraŭ vivos iomete…

Nun aperis d-ro A. Winter. Li liveris karbon per puŝĉaro, kaj la ŝvito brilis sur lia glata korpo, simila al tiu de porko mangalica.

– Rapidu jam, bradipo! – kriis la Kapitano.

– Iru nur supren, tio oni plie povas utiligi vin. Ĉu vi aŭdas? – diris Fred la Malpura.

Komenciĝis furioza piedtamburado kaj kriegado supre.

Jimmy la Ĝisorela kuregi timiĝinte. Dio, indulgu nin!

De malproksime, sed per rapideco, superanta tiun de destrojero, veturegis rekte al ili la pestoŝipo, trafonta ĝuste la flankon de la luksa vaporŝipo!

La vento siblis, la pluvo falis, kaj la panika personaro zorgis pri nenio plu!

Kaj nun sekvas la rolo de Jimmy la Ĝisorela, konvena al heroa eposo! Li estis blanka kiel la muro, kaj ankaŭ interne

furiozis la paniko! Li pensis pri tio, kion farus oficiro nun, kiu rajte portas la ledan gamaŝon? La unuan fojon en la vivo venis en la kapon de Jimmy la Ĝisorela la vorto “devosento”. Li elprenis sian revolveron:

– Kiu toŝos la boaton, mi mortpafos tiun!

Kaj sekvis la lukto. Ĝi estis mallonga, kaj malesperiĝinta.

…Iu matroso falis surdorsen kun rompiĝinta vizaĝo! Kaj sekvas tri-kvar pafoj… la rondo vastiĝas.

Lia pugno falĉas… Sed li ne povas elteni longe… Io siblas al li el la alto. Li estas trafita je la kapo… Li sterniĝas…

…La vento muĝas, raŭkaj voĉoj kriegadas, kaj la plimulto de la personaro jam balanciĝas en la boato sur la akvo… Ili fuĝas. De antaŭ la morto! Sed jen, ĝuste la plej laŭtaj homoj restas! La Dornharulo, la Malavarulo…

– Kio ĝi estas?… Jimmy la Ĝisorela venas antaŭen kun vertiĝanta kapo kaj apogiĝas lace al ŝranko, sed la groba meblo draste alkrias lin:

– Kial vi ne iras de tie ĉi?! Kial vi apogiĝas peze sur min?! – Kaj ĝi forpromenas: – Jen vidu!

Tio estas tro. La genuoj de Jimmy la Ĝisorela fleksiĝas.

…Sinjoro Theo vekiĝas je tio, ke lia kapo kuŝas sur la sino de Lilian, kaj la virino metas akvumitan tukon sur lian kontuziĝon.

– Kio… Kio okazis… sur la ŝipo? – li demandas.

– Ribelo. Kaj nun jam kolektu vian forton!

– Kio estas la problemo? – li demandas, ĉar Lilian spiregas.

– Mi pene elportis vin el la kajuto, kaj vi estis peza… Nu!

Sinjoro Theo ekkisis ŝin. Kaj ili kisadis en tiu perplekso dum iom da tempo. Kiu aŭdis ankoraŭ tian frenezaĵon?

Mi. Tiu senlima, insolenta egoismo estas la karakteriza simptomo de la ekstazo, nomata amo. Du homoj sendepedigas sin en temo kaj spaco de ĉio tial, ke ekzemple en incendio, sur la tegmento de brulanta domo, ĝis la fajrobrigado alvenos, ili kisadu iomete

Knalas kelkaj pistolpafoj… Sinjoro Theo elrapidas. Estas mallumo. Pafoj fulmas. Iu ekkrias!..

La ekzekutisto nun aplombe diras tra la fenestro de sia kajuto:

– Mi petas silenton! – Kaj li frapas sur la kornicon.

– Je mia honorvorton, li tute pravas – rimarkas de ie, la fantomeska voĉo de la nevidebla sinjoro Wagner. – Ĝi okazas tiel ĉiun nokton. Sed venos Strovaĉek, mia brutala amiko, kun kelkaj unuarangaj vangofrapoj, kaj tiam estos silento… Dormu bone, Arnoldo! Mi estas ĉi tie…

“Ĝi estas naĝata frenezulejo!” – Theo pensis tion. Poste li vizitas la radiokajuton laŭregule grimpante, kiel en milito. Dume pafaro de antaŭenŝovita homo de malproksime preskaŭ trafas lin. Voĉo de virio aŭdiĝas de interne. Ĝuste nun oni dissendas ion… Nun kvikado… Ankaŭ sinjoro Wagner estas ĉi tie!

– Alu… – diras la radiisto. – Mi ripetas: Stanley Up To Date! Stanley Up To Date. Bonvolu transdoni la sekvajn informojn al mia ĵurnalo: “Ni veturas plenvapore al la celo. A. Winter…”

La sango leviĝis al la kapo de sinjoro Theo! Ĉu tiu viro tamen estas ĵurnalistaĉo?!.. Nun li estos kaptita! Li malfermas la pordon…

Sinjoro Wagner prenas la randon de sia pantalono kaj dormas, apogiĝinta al la muro.

– Dankon – diras Lilian al la radiisto.

Nun ŝi ekvidas Theo-on. Ŝi paliĝas, kaj ŝiaj lipoj ektremas… La milionulo ridas, sed ankaŭ li estas blanka kiel la muro.

– Jes! Mi estas A. Winter! – diras Lilian abrupte. – Vi komencis tiun batalon.

– Vi venkis – li diras raŭke. – Viaj rimedoj certigas vian venkon super ĉiu ĝentlemanoj!

– Vi estas impertinenta! Ĉu vi komprenas?!

– Sufiĉe, sinjorino… Via afero ne interesas min! Radiisto! Dissendu danĝersignalojn…

Revolvero ekbrilas en la mano de la virino.

– Levu la manojn!.. – ŝi krias…

Kaj ŝi jam ekŝrikas kaj svenas tuj! Lilian perdis la ludon, ĉar ŝi ne antaŭvidis tion, kio estis la plej logika: ke la vivo por sinjoro Wagner (neniu scias, kial?) estis kara, li do levis siajn manojn.

…Kaj tiam, sinjoro Wagner, bedaŭrinde, ne povis fari tion.

…La radiisto dissendis danĝersignalojn laŭ la ordono de Theo, kaj Wagner humiligita ĝispolve, dormas profunde kun levitaj manoj…

Sur la ŝipo oni dividiĝis je memstaraj, tute sendependaj, eĉ malamikaj grupoj. Ĉe la poŭpo pafis Vasiĉ kaj liaj kamaradoj, en la kontraŭa flanko Watson kaj liaj amikoj, poste sekvis la aŭtonoma Sokrato Schwachta aŭ sinjoro Knapp (laŭ via plaĉo), kiu vivis ankaŭ plu en sia kajuto, kiel privatulo, kaj de tempo al tempo li pafis blinde ien. Ankaŭ ĝi nun apartenas al la lokaj kutimoj...

Neŭtralan teĉmenton formis: sinjoro Maxbell, kiu iafoje elŝovis sian kapon el barelo, kaj Brusier, franca fizikisto, kiu ĝis nun ne rolis en la romano, kaj jam ne plu li aperos, ĉar depost la ekveturo li kuŝis en la lito pro marmalsano. Nun jam estus malfrue mencii lin aparte, kaj tio tute ne gravas.

Sinjoro Theo, la futbaljuĝisto, la mekanikisto kaj la oraĵisto tenis okupita la interferdekon, kaj kelkfoje tie kaj ĉi tie aperis alta, mallarĝa ŝranko, piedirante. Oni alpafis ĝin el ĉiu direkto. Poste ankaŭ la bula meblo-parenco venis, same nudpiede.

Gustavo Bahr volis elpremi la supran parton de la ŝranko, kaj anstataŭ tio li levis ĝin de sur ties bazo, pro kio liaj piedoj liberiĝis. Kion li povintus fari ceter, forlasite?

Kun unutaga diferenco ankaŭ la korpulenta, blua parenco, Livingstone aperis, li pliigu la totalan panikon kun tiu senekzempla eksteraĵo.

La anatomo kaj Ofelia Pepita dume iel-tiel stiris la ŝipon, kaj sekve de tio la ŝipo Stanley Up To Date aspektis sur la oceano tiel, kvazaŭ ĝi nun venus el la drinkejo kun fiere flankenŝovita kamentubo.

Sinjoro Wagner pasigis tiujn malfacilajn horojn en la operaciejo, kie li kŝis sur la tablon kaj dormis aŭ kantis. Poste ne multe mankis, ke Sokrato Schwachta operaciis lin.

A. Winter, kovrita de karbopolvo ĝis la frunto, estis lia paciento, kies kruro doloris kaj turnis sin al la kuracisto.

– Mi estas A. Winter, kaj iam mi havis ekzemon ĉi tie – li diris al sinjoro Wagner, kiun li trovis unue en la operaciejo. – Mi ŝatus, se vi rigardus ĝin, sinjoro kolego…

– La ekzekutisto estas via kolego – respondis sinjoro Wagner. – Kaj atendu lin, ĝis li venos ĉi tien! – Kaj li ekdormis.

– Bum!.. Kuglo penetris tra la lignotabulo. Bum! Bum!.. A. Winter sidis sub la seĝon kaj ne komprenis, ke sinjoro Wagner nun ronkas. Poste vere venis Schwachta:

– Mi ne kredas, ke vi restos vivanta – li tuj konstatis. – Ĉu vi havas proksimulojn? Ĉu vi mesaĝas al ili?

– Mi petas vin… Tio estas nur malnova cikatro. Ĉu eble vi devus elektrumi ĝin?

– En ordo – diris sinjoro Sokrato entuziasme kaj ekbrilis liaj okuloj!.. Li demetis siajn manumojn. Dio mia! La malnovaj, belaj tempoj!.. Li ŝaltas!.. Zumado… elektraj fajreroj… Muziko al liaj oreloj. Li ĝuas tion kun fermitaj palpebroj.

Bum! Kuglo penetras tra la muro. A. Winter singultas…

– Dankon – li diris dankeme kaj tremante al A. Winter. – Viaj pacientoj certe estis dankemaj.

– Nu… Neniu plendis pri la elektrumado post la terapio – li respondis orgojle. Bum! Bum! Bum!

– Je mia honorvorto – diris sinjoro Wagner kaj side leviĝis, – mi ankorŭ ne vidis tiaĵon. Vi venas paroladi en operaciejon, kvazaŭ ĝi estus ia ŝranko. Ĉi tie mi ne povas dormi, se vi konstante babilaĉas…

Tiam enfrapis la plej nova fulmo: evidentiĝis, ke iu boris la akvobarelojn nokte. Ili ne havas akvon! La akvoportistoj de la malamikoj, simile al parlamentario, dividas la alkoholaĵ-provizon. Ĝi estas la sola trinkebla likvaĵo.

Je la 12,10-a horo posttagmeze oni dividas la unulitrajn porciojn.

Je la 1,5-a horo posttagmeze ne plu estas malamiko sur la ŝipo! Sinjoro Theo, Watson kaj Vasiĉ sidis gaje, duoncirkle en la mezo de la ferdeko, kantis sentimentalajn kantojn, akompanatajn de buŝharmoniko kaj gitaro.

Mi ripetas: oni dividis la unulitrajn porciojn je la unua horo posttagmeze, kaj sinjoro Wagner sobriĝis je la kvina horo!

…Je la kvina kaj kvarono li ĉirkaŭiris kun malgaja mieno kaj prezentis sin al ĉiu aparte.

– Mi estas Manfred Zaturek – li diris mallaŭte.

Se sinjoro Wagner ne estus firmkaraktera individuo al tiu komparo, mi dirus tion, ke li staris tie, kiel Dornrozinjo, vekiĝinta el sia centjara dormo, kun suspekta timiĝo, en la regiono de la Suda poluso. Kun cejankolora barbo!..

Li vagadaĉis nervoze kaj serĉis ĵurnalon en la salono, ĉar li ŝatintus scii, kio okazis intertempe en la batalo inter Rusio kaj Japano? Laŭdire io estas okazonta apud Ĉemulpo. Poste li skribis leteron al sia edzino, en kiu li informas ŝin, ke li vojaĝas bone. Lin interesas tiu ĉi ekspozicio. Ŝi ekvidos tiun flugmaŝinon. Dum la tuta nokto li vidis flugi en la aero dinamomaŝinojn, per flugiloj (!) longe! Eble la veronezer kaŭzis tion. Li ĉiam dormas maltrankvile pro ĝi. Ni ne manĝu multe da vespermanĝo. Sed precipe ni ne volu flugi. Tio ne doniĝis al ni. Ni havas telekomunikadon, idlan (kontraŭdirektan bremson!) sur biciklo, telefonon,

telegrafon, aŭtomatan fajrilon kaj fotografadon. Quo vadis? Kion ni volas ankoraŭ?

Kredu min, Edita, ne estas plu! Se la tekniko ankoraŭ progresus, Dio estus el la homo! Kaj tiaĵo malofte rezultas bonon. Mi sonĝis ankaŭ pri skatolo (?), nomata radio. Kiam oni ektuŝis ĝin, la veronezer tuj kantis el Londono kaj Munkeno. Kaj tiu malfacile digestebla kolbasaĵo eĉ fortepianis. la idioto pene portis lin en la sonĝo, kaj kandelo estis apud lia ĉapelo. Ĉio svarmis pro tiuj kinematograf-projekciiloj, kaj tio estis la plej terura: Imagu! La bildoj parolis (!), kantis (!), kaj la ŝvito fluis sur mi, kaj mi ne povis vekiĝi. Mi neniam plu kunportos veroezer-on! Tiuj estas malfacilaj tempoj – li skribis ankoraŭ, ĉar li devis skribi. – En nia aĝo ĉiu jaro kalkuliĝas duoble! Sed estus bone fariĝis 30-40 jarojn pli maljuna! Tiam la tuta mondo ne sidos zorgoplene apud la telekomunikilo, ve, kio okazis apud Ĉemulpo aŭ al la ribeluloj luktantaj per boks-fero? Sed eblas, tial mi havas malbonan humoron, ĉar mi gustumis gluton da trinkaĵo. Vi scias, ke ni havas superstiĉon en nia familio (stultaĵo!), kiu trinkas unu gluton da drinkaĵo, tiu fariĝos alkoholisto, kaj li neniam ĉesigos tion, ĉar ni ĉiuj hontis, ke la patro, kiam li drinkis, li zumkantis en la ŝtuparejo. Estis varme, mi do trinkis gluton da drinkaĵo. Sed se mi estus zumkantinta, tion mi ne kredas. Mi esperas, nek vi. Mi ankoraŭ ne vidas Pola-on, ŝajnas, ke nia ŝipo malfruas…

…Li skribis, kaj skribis, la aliaj kantis, kaj Theo ekhavis bonegan ideon: ili surprenu vesperfestan vestaĵon!

Estis varme, kaj salaj vaporoj ŝvebis, ili do ĉiuj devis trinki, kaj tiel la pseŭdolordo poste, Dio scias, de kie, akiris harpunon kaj pelis Ofelian Pspita kun deformiĝinta vizaĝo. Ŝi kuris ridante, ŝrikante en la mano kun gitaro, ĉe iuj turniĝejoj ŝi montris azenorelojn al li, aŭ ŝi kantis kelkajn

gajajn strofojn pro ĉikani la amokulon. Fine ŝi fuĝis en ŝrankon. Hamilton piedbatis ĝin… La ŝranko nur ridis pri tio.

Lia lorda moŝto tiam kunportis siajn instrumentojn kaj ŝraŭbis!

– Nu, nu!.. – diris la ŝranko… – kion vi volas?

– Silentu, fia meblo, vangofrapante mi faros el vi fajroligno! Ofelia, revenu! Mi pardonos vin…

La pordo malfermiĝis, Hamilton paŝas kun disetenditaj brakoj por brakumi Ofelian, kaj li vidas timiĝinte, ke li ĉirkaprenas la pordiston de Pacioci.

– Filo mia! – tiu krias, froĵetinte sian gitaron.

– Kortuŝa monento! Patro kaj filo staras vid-al-vide.

– Mi petas vin, paĉjo… – balbutaĉas la knabo – estas bone, ke vi venis. Mi ne trovis hejme la artoŝtopiston…

– Ĉu la plej proksima tajloro estis ĉe la Suda poluso?!

Tamen li brakumis sian filon kaj ploris iomete, kaj riproĉas lin, sed vine li ne koleras: li vidis multe da belaj aferoj dum tiu instrua marveturo, ĉar en la ŝranko estis ilustritaj magazinoj.

Theo kaj Watson trinkas antaŭ la bufed-breto

– Nur tion diru al mi, oldulo mia… – demandis Theo – kion vi volis… sur tiu ĉi ŝipo?…

– Mi, se vi permesas… Saluton… ex! Via ŝipo… pro koruptita inĝeniero, estas farita kun duobla riparo… Kaj ĝi estis plena de armiloj inter la du riparoj de la bilĝo… Nu, vi fermis tiun dikan A. Winter-on, kaj li subaŭskultis, kiam mi traktadis pri

la armiloj, kaŝitaj inter la du riparoj. Ankaŭ li kaj la ĵurnalistino kaŝiĝis tie de antaŭ ni. Jimmy la Ĝisorela kaj liaj amikoj eksciis de la virino la aferon de la armiloj. Tiuj banditoj de la Ruĝa Vasiĉ nokte ĵetis la armiloj en la akvon sekrete!.. Tiam komenciĝis la mokincito inter la amikoj de Vasiĉ kaj miaj homoj! Kelkaj mortigis unu la alian.

…Super la nigra maro alcionoj rondflugis kun oblikva glisado. Io skrapis la gorĝon de Theo. Sed li ne trinkis. Jen estas la lasta okazo! Ofelia Pepita kantis, dancis, trinkis kaj ridis, kiel gutoforma Puck, ekzaltita ĝis rekorda rapideco el la teatraĵo Terursonĝo de Somermeza nokto.

La okuloj de Livingstone sinkis en sian pufan vizaĝon pro ebrieco, kiel la lastan kvaronon kurbanta lunarko. Ie ili trovis lian pordistan ĉapon, kaj li sidis tie portante ĝin, dike, kun stankolora, vitreca rigardo.

Theo malrapide foriris ŝtelumante en la ombro de la kajutoj. Li devas fari ion! Kien veturegas tiu malbenita ŝipo?

Iomete li svenadis pro la soifo. Li vidis lumon en la interferdeko ĉe la kajutoj de la matrosoj. En iu ĉambro de la personaro estis Tendenulo, havanta element-instruistan aspekton kaj du aliaj homoj, kiujn Theo neniam vidis sur la ŝipo.

– Tiu ĵurnalistino estas lerta.

– Prave. Tamen gravas, ke ni batfaligis Jimmy la Ĝisorelan – diris iu el ili.

Kompatinda fregat-ĉefleŭtenanto!..

Lilian estas bestio.

La dikulo oscedas kaj ekiras al la pordo, kie staras Theo. Eh, se li jam miksiĝis en tion, ek!.. Kaptinte seĝon, li ekbatas la dikulon per ĝi, ke tiu surdorsiĝas, kiel ŝtono. Ankaŭ Tendenulon la Fervoran trafas bato, kaj li falas surdorsen, kovrita de sango. Strangolante la gorĝon de unu la alia, li ruliĝas kun la altulo. Fine ankaŭ tiu kuŝas senmove.

Li ŝnurligas la tri homojn kaj rulas ilin en la bilĝon. Iru plu… Li ŝtelumas spiregante preter la muro. Li haltas por momento. La futbaljuĝisto kriegas supre.

– Tio estas nenio. Atentu min! Mi volis fariĝis fama! Mi havis eĉ inventaĵon! Tio gravas! Mi havis celon, kiel futbaljuĝisto: Korekteco! Objektiveco! Atento! kaj multaj aliaj aferoj…

En tiu momento venis Sokrato Schwacha.

– Neniu forlasu la ŝipon, ĝis la polico alvenos! Oni blokadis la markolojn. Malaperis grava lorno! Oni traserĉos ĉiun, kiam ni albordiĝos en Zuriko!

…Dume la Ruĝa Vasiĉ ŝteliris post Theo-n, kaj oni batfaligis lin per brakseĝo. Ankaŭ sur Filipon Diru-jam falis io… Li svenis. Oni fermis ilin en la bilĝon.

Nun li atingis la ilarejon

Li aŭdis voĉojn… Li premas sian orelon al la muro. Ŝi estas Lilian!

– Ĉu via patro… estis ĉe cirko?

– Jes. Mia avĉjo rakontis multe – lamentis A. Winter. – Mia patrino estis la altira spektaklo, ŝi ekvilibrigis sin per bambuo. Paĉjo lernis, ke li estu malpeza, kiam oni levas lin. Do, mia patrino tenis mian patron sur la fino de bambuo…

Theo frapetis sur la eta, ronda fenestro.

– Mi petas vin… iru de tie ĉi… – diris Lilian timiĝinte, kiam Theo malfermis la pordon.

– Estas afable, ke vi maltrankvilas tiom…

– Theo… – diris la virino tremante. Kaj li elpaŝis.

– Mi ŝnurligis ilin – komencis la ruĝa junulo mokante, – kaj en la bilĝo…

…La virino subite ekpuŝis lin je la brusto, ke li falis en la ilarejon, poste ŝi ŝlosfermis lin.

Theo kape kuris al la pordo pro kolero…

Nun la paniko ekplodis sur la ferdeko.

Al iu ekideis, ke ili ne havas manĝaĵon. Kial li pensis tion? Estas enigmo! Post unu minuto komenciĝis ekscitita interkonsiliĝo. Sokrato Schwachta petis la homoj konservi sian trankvilon, kaj li falis en la pluv-cistenon, de kie oni eltiris lin. Ni ne perdu vian kapon, li diris, sur la maro estas bone elprovita kutimo kontraŭ malsatmorto. Vi manĝos pasaĝeron. Estos festeno de matrosoj!

Eksplodis vekriado kaj paniko! Maxbell petis ĉiun, se oni elektus lin, antaŭ la manĝado oni enbalzamigu lin. Se li restos vivanta, kompreneble tio estos superflua. La futbaljuĝisto saltis sur la supron de la tablo kaj kriegis.

– Sinjoroj – li kriis sovaĝe. – Mi oferos min… Nu… Ve! Atendu, vi, idioto! – (Ĉar la malpacienca Sigorski, dum la futbaljuĝisto parolis, salis ties manon kaj ekmordis ĝin.) – Mi scias, kio estas la devo, mi ofer-proponas mian edzinon!..

– Pfu, juĝisto! I-di-o-to! I-di-o-to!

– Se la afero statas tiel, ke iu el ni devas morti, ni trinku gluton da drinkaĵo – diris Maxbell kaj eltrinkis duonbotelon da brando. Pro tio li subite ebriiĝis ĝis sveno. Alia paniko! Ofelia Pepita kriis por helpo ie… Ili kuregis tien kaj vidis, ke la artistino genuas sur la muntisto, kaj ŝi batas lian kapon per kaserolo.

– Helpu! – ŝi ŝrikadis – mi ne povas mortbati lin sola! Alportu ŝovelilon de la hejtistoj.

Ili kuregis por alporti ŝovelilon.

– Estintus multe pli saĝe ensidi en malmultekostan sukeraĵenojn kun stulta virineto, ol partopreni la ekspedicion – krias Maxbell. – Dissendu danĝersignalojn! – Kaj li kroĉis sin al kablo, pendanta super stango, kaj li pendis tie rikanante. Kiam venis tien Livingstone en pordista ĉapo, li transdonis al li monerojn:

– Donu al mi itiner-bileton ĝis Piccadilly, kaj jen ĝi estas aparte, pro tio dissendu danĝersignalojn.! Ni ne faru el tio demandon de prestiĝo – mangestadis Maxbell ridaĉante, kaj li ricevis publikan aplaŭdon, ĉar li insultis la edzinon de la futbaljuĝisto per sia mandorso. – La pordisto sonorigante haltigu la ŝipon!.. Kaj la prestiĝon… tion… ni tute ellasu el la ludo… Mi vidis tiun admirinda, senliman spacon tra la plej granda teleskopo de la mondo, kiun oni sentas en sia kapo, kiam oni longe rigardadas la stelplenan ĉielon. Ĉar miaj tre estimataj, altaĝaj akademianoj, kiun interesas, se estas permesate demandi, la senlimo de la malproksimaj lumjaroj?!.. Kio okazos ĉi tie al la limigita afero de la proksimaj senlumaj jaroj?… Ŝteli sur la tero ununuran lum-minuton de la morto. That is the question… kiel reciti la vortojn de sinjoro dirigento Ŝekspiro: mi konas nur unu

grandan astronomon… Ofelian Pepita! Kiu… ĉiuvespere… straras apud nia koro kaj gitaras… My old Ofelia. Mi… fariĝis sesdek jara de ie kaj tie… Cetere tute egalas, de kie! Mi fariĝis tiom-aĝa! – balbutaĉis la profesoro kaj sinkis et-spirale en pozon kun krucitaj kruroj ĉe la bazo de la paliso. Aksiomo de Arkimedo… ĝi estas: Donu… en tiu senfina malpleno fiksan rigardon de kanbino por ekmovi min en la mondon… Ĉar tiu mondo… estas kinematografa palaco… la vivo ne estas algebro, sed sonfilmo.

– Prave! Epurci move… – diris la muntisto.

– Kaj la tero tamen estas kinejo! – kapjeis Maxbell. Sed jam tiam, kiel la ŝipo oblikviĝis, ĝi dronis proksimume kvincent metrojn, ke poste ĝi altiĝu ĝis la pinto de Mont-Blanc, kaj tie li ekvidis Adrien-an sur la altplataĵo, kiun li ne vidis dudek jarojn kaj diris malgaje: "“vi venas el Tibeto, mi vidas tion pere de mia kompaso, kaj tie vi lernis sekreton, pro kio vi restis tiel juna, kaj mi maljuniĝis tiom.” La knabino nur mansvingis kaj brilis ŝiaj lipoj kaj okuloj, kaj la glacia vento de Mount Everest eklevetis ŝian, helverdan, tolan bluzon, sur kiu ripozis pezaj, belegaj, blondaj harplektaĵoj dike, mole, kaj ŝi ridis, tiel sonorante, kiel la glacio de la glacirivero krakante disiĝas je eroj, kiam la sunbrilo varmigas ĝin.

…Kaj nun aperis la Dalai-lamao en masko, sed Maxbell ridaĉante montadis al la knabino: – Tiu estas bona tipo, mi konas lin delonge! Mi estis fermita kun li en la Muzeo British, en la etnografia sekcio! Li nun ŝtelis de ie altebenaĵon, kaj li ne volas rekoni min! Li estas granda friponeto! – Tiam li aŭdis, ke vibro-sono aŭdiĝas ie! Li retropaŝis! La Dalai-lamao montris sur lin akuze, kaj li paraliziĝis pro teruro, ĉar li sentis, ke Ofelia Pepita staras en lia stomako kaj gitarludas!..

Sur la ferdeko plenumiĝis la tragedio de la pasaĝeroj de la oceanŝipo! Ili manĝis la lastan pecon da pankrusto, kaj unu

horon ili bol-kuiris la ledan zonrimenon de la mutisto. Vane! Sokrato staris tie kun rigida rideto. Stultaj provadoj. Ĉi tie povas okazi nur festeno de maristoj! Kaj li tuj disdonis la demandilojn, servantajn por tiu celo, kiujn li jam anticipe serĉis en la kajuto de la kapitano. Ĉiu skribis sur ĝin la nomojn de sia patro kaj patrino, la adreson de la konstanta loĝloko, profesion, kaj ĉe la malsupra parto de la formularo ĉiu skribis en la rubrikon de la “Rimarkoj”, se oni manĝos lin post la lotado, tiel li deklaras, ke li faris tion propradecide, neniu devigis kaj influis lin fari tion…

– Venu vespermanĝi! – kriis la edzino de la futfaljuĝisto.

– Ĉu ankaŭ ĉi-momente vi pensas pri la manĝado? – riproĉis ŝin grumblante Sigorski. La futbaljuĝisto nun elprenis slipon kaj diris serioze: – Kiu estas el vi… Sokrato, nomata Schwachta?

– Hoho! Ĉi tie okazis trompo! Mi skribis vian nomon. Ni do manĝos vin. Estu forta.

– Tempo! Juĝisto – ili kriadis. – Okulvitrojn al la juĝiusto!

– Kiu diris, ke idioto?! – spiregis la juĝisto.

– Mi tiros alian demandilon! – stertoris la ekzekutisto, kaj li jam legis: – “Sokrto Schwa”… Ĝi estas friponaĵo!

…Kaj evidentiĝis, ke sur ĉiu slipo estis la nomo de la ekzekutisto. Tiam denove eksplodis la ĝenerala kantado…

…Proksimume en tiu tempo okazis, ke Lilian liberigis la kaptitojn. Ŝi promesigis al ili ne bati Theo-n, kaj ankaŭ ŝi mem klopodis kaŝiĝi ie. Ŝi malfermis la pordon de terpom-deponejo, situanta tute flanke, sed mano kaptis la gorĝon de Lilian:

– Theo! – ŝi kriis – Theo, helpon!

– Mi estas tiu – flustris la atakanto. Kaj li vere estis Theo, kiun liberigis Ofelia Pepita, vaganta ĉie sur la ŝipo.

Vane beligi: mi devas konfesi, ke tiu ĝisekstreme turmentita, tute trompita junulo, li nun hm… Li vangofrapadis la virinon! Tie en la mallomo, senvorte, rezolute okazis la batalo… Poste ili spiregis kun malesperiĝinta spitemo, amariĝinte, kaj ili interkisiĝis iomete…

Poste la manbatalo daŭris plu!

…Dume oni altabligis la fazeolaĵon sur la ferdeko. Okazis proksimbatalo por la unusola medolosto, kiun akiris Ofelia Pepita kaj ŝmiris ĝin abunde per salo kaj pripro, poste ŝi frapetis tion al la rando de la telero, kaj ŝi miris, kiam rompiĝintaj vitropecoj falis el ĝi. La ekzekutisto kliniĝis sur la tablon plorante…

La medolosto estis lia lorno!

Kaj Milano falis el ĝi! Eĉ Romo kaj Tokio! La morte pala ekzekutisto konfesis:

– Tio estis mia sekreto! La patento de la senriska optimisto! Estu ĉu nebulo, ĉu pluvo, ĉu neĝo, ĉu misdigesto; en la ekstremaĵo de la lorno estas videbla Tokio, Ŝtokholmo, Milano, Vieno, eĉ Lucien Boyer. Anstataŭ mensogaĵoj mi vivis por diapozitovoj!

– Disinjoro… – balbutaĉis la futbaljuĝisto. – Kiajn teruraĵon oni devas travivi sur la maro…

– Tio okazis al la lorno… – daŭrigis la ekzekutisto. – Kaj nun jam ne frapetu tion al la telero… nur jam Ateno troviĝas en ĝi, kaj nek tion eblas ŝmiri sur panon. Nun vi senmaskigis

min, kaj tiu ĵetu la unun ŝtono sur min, kiu ankoraŭ povas dekliniĝi, sen tio, ke li terenfalus vizaĝaltere… sciu, tial mi fariĝis Schwachta, ĉar oni trovis min antaŭ la vendejo de samnoma buĉisto la aŭroron de Karnavalo, mi fariĝis Knapo, ĉar frizisto adoptis min, kiel metilernanton, kaj Sokrato, ĉar iu idiotiĝis kaj altrudis tiun nomon al mi… Tial mia nomo estas Sokrato Schwachta Knapp kaj ankaŭ Achmed pro la posedo de belega turbano, ĉar kiam mi estis dekok jara, mi travagadis Mez-Amerikon, havante titol-rolon en opereto… Tiel mi fariĝis ekzekutisto…

Ili jam ĉiuj dormis kun grandega emiciiĝo, kaj Sokrato Schwachta, Knapp aŭ Achmed kun palpebrumaj okuloj ekfumis cigaron el la supra poŝo de Sigorski.

Sed baldaŭ ĝi falis el lia buŝo. Estis la unua horo post noktomezo. Ĉiu pasaĝero de la ŝipo dormis, ankaŭ Teho kaj Lilian, elĉerpite, kunkliniĝinte kaj strangolante unu la alian…

La ĉielo, kiel ia senlima kupolo de katedralo brilis super la akvo, sur kies senlima surfaco nur la ŝipo Stanley Up To Date veturegis iom zigzage kaj sanceliĝante, ĉar dum la tuta tago Ofelia Pepita staris kaj dormis ĉe la direktilrado…

Aŭrore la ŝipo Brigita denove aperis en la proksimo, kaj la piratoj okupis la ŝipon, gvidate de la Ĉefkuracisto.

“Nun ni alvenos en Triest-on, karulino – skribis sinjoro Wagner. - Sekvos la dogankontrolo!”

## T R I D E K T R I A   Ĉ A P I T R O

Sinjoro Theo vekiĝis en sia kajuto kun terura kapdoloro, kaj side leviĝinte, li ekvidis tabulon sur la pordo:

P O R   E V I T I   L A   M O R T P A F O N:

B O N V O L U   R E S T I   T R A N K V I L A

E N   V I A   K A J U T O,

E N   K O N T R A Ŭ A   O K A Z O   N I   L I K V I D O S   V I N!

Ili ankris ĉe la insularo Sambi-Sumbi.

Nun la ŝranko paŝis al sinjoro Theo kaj diris humule:

Malfermu la pordon, pro ke mi ne devu demeti tiun ĉi meblon, kiel noktoĉemizon.

Nur reiru al vi loko! Ĉu vi komprenas?!

La ŝranko revenis malesperiĝinte al la muro. Aŭdiĝas la voĉo de sinjoro Arturo Maxbell de ekstere:

– Ni iriu! Kaj mi certigas vin ĉiujn, ke ni revenos ĉi tien kun Gustavo Bahr.

La ŝranko ekridis, kaj sinjoro Theo avertis lin kolere, ke li oleumos ĝin, neĉesiginte tion!

En la haveno staris la gubernatoro de la insularo Sambi, kelkaj indiĝenaj soldatoj, kaj dornhara skribisto de la gubernio, malsana je bazedova morbo kaj la fama pentristo, en mallonga bankalsono. Ili atendis la ekspedicion.

En la kajuto de Theo subite aperis Tendenulo la Fervora, la pirato kun aspekto de elementa instruisto.

– Ĉu vi bonvolas akcepti vizitantinon? Se vi akceptas mian konsilon, nun diru, ke ne! Temas pri la vera sinjorino Gustavo Bahr. Kupro-grafo atendis ŝin ĉe la stacidomo de San-Francisko, kaj li kunveturigis ŝin en via nomo per la ŝipo Sinjoro Wagner.

– Ĉu ili trompe venigis ŝin sur tiun kadukan, maljunan vaporŝipon?!

– Mi petas – diris Tendenulo la Fervora severe, – la virino nenion povas riproĉi al la vaporŝipo. Eĉ. Al mi la vaporŝipo plaĉas pli bone.

…Tendenulo la Fervora foriris, kaj venis la vidvino de la profesoro, kiu estis nervoza en la ŝranko. La vera sinjorino Gustavo Bahr! Ŝi ne rukulis. Sed iafoje ŝi ektremis kun ĝemoslimila stertoreto. Ŝi havas pintan harnodon, ŝi estas turpa kaj maljuna.

– Mi ĝojas konatiĝi kun vi – ŝi diras kaj ekstertoras, kaj ambaŭ brovoj de Theo vibras. – Mi informiĝis nur hieraŭ, ke mi intermiksis vin kun via juna frato. Hi!

– Bonvolu trinki… hopla!.. glason da akvo. Pro kio ĝi estas al vi?

– Ĝi estas malnova simptomo ĉe mi. Ankaŭ la alia sinjoro estas ruĝa. Li menciis, ke vi estas junulo de pia vivo, kaj vi deziras labori en la ĝangalo, kiel misiisto. Hi!.. Ĉu vi ĉiam palpebrumas tiel?

– De nun ĉiam…

Li sentis, ke li furiozos! Kion diri? Ĉu Kupro-grafo ne estas sia frato. Klarigi tion, ankaŭ li havas multe da butero sur sia kapo.

– Ĉu vi havas nur unu fraton? – demandas la virinno.

– Kiel?… Ne. Mi havas sur la ferdeko ankaŭ kronikan fraton, nomatan Vasiĉ. Mi esperas, ke ni trovos vian edzon.

– Mi kompatinda Gustavo… Bedaŭrinde li perdis multe el sia spirita freŝeco en la lasta jaro… Ĉu vi bredas kortbirdojn en la ŝranko?

– Duone… Eble, mi devas rimarki, ke muso estas tie interne, kaj mi agas jen tiel…

– Ĉu la granda kruĉo da akvo ne nocas la ŝrankon?

– Tio ne gravas. Mi foĵetos tiun malnovan meblon sur la vasta maro. Ĝi perdis sian freŝecon. Ĉu vi vivis bone? – li demandis, ĉar li decas diri ion.

– Mi esti feliĉa kun Gustavo, kvankam mi povis flegi malmulte da iluzioj… Ĉar Gustavo Bahr, kiam li havis dekok jarojn, nomiĝis Teodoro Zpruzic. Li estis komizo en la vendejo de koloniaj varoj… Tamen eble rato estas en tiu ŝranko. Kiom da akvo! Ĉu ĝi ne nocas?! Li do faris malkorektaĵon, hi!.. li forvojaĝis kun la kaso. Post kelkaj jaroj subite mi ekvidis Zpruzic-on…

– Se mi povas peti vin, ne diru tiun nomon. Ĝi incitas min…

– Bone… Kiel li fariĝis el defraŭdisto, malliberigita anstataŭ unu jaro, dumvivan fidelecon garantiana homo…, mi ne sicas. Li jam plaĉis al mi, kiam mi estis infano, ĉar li ŝteletis ankaŭ sekvinberojn por donaci tiujn al mi. Tia estis Zpru… Ne, mi ne diros… Vi estas tre nevroza…

Nur malfacile li povis senŝaĝigi sin de la virino. La profesoro staris en la ŝranko pale, kiam Theo malfermis ĝin.

– Mallonge mi nomos vin Ŝtonĵetilo, kaj mi konstatas, kiel komiozo vi malversacie manipulis la sekvinberojn kaj la kason, kiel edzo vi simple defraŭdis vin mem kaj la sekvinberojn, per kio rekompence por la havaĵo de ŝia patro vi volis dolĉigi la vivon de la virino. Sinjoro Huzloviĉ, hontu! Vi fuĝis de antaŭ via sorto!

– Sinjoro! Pro defraŭdo oni neniun kondamnas al puno dumviva!

– Viaj pluaj friponaĵoj: tiu estiminda virino neniam havis blankan haŭton, kiel la Norda poluso kaj ne estis tiel bela, kiel koralrifo, ŝi ne estas flirtema, kiel Usono, ŝi ne estas svelta, kiel la Fajrolando, ŝi ne havas bluajn okulojn, kiel la Altebena ĵo de Irano, kaj ŝi neniam kisis tiel, kiel Afriko!

– Konfesite. Kion mi povus diri? Ke mi rilatiĝis al la kolonio per de ŝildo, kaj dum mia unua vojaĝo ne mi estis la esploristo, sed la polico?

– Ĝi estas via plej granda kulpo, sinjoro Huŝovski! Ĉar se vi estus dirinta, ke via edzino estas anemia, preskaŭ nevidinta la altaron, al kiu devigis vin la bezono, kiam vi rompis la leĝon, tiel mi evitos tiun virinon, kiu vere estas svelta, kiel la Fajrolando, kaj ŝi estas la plej malhelkolora, kiel Afriko! Krome ŝi estas filirtema, kiel la Kabo de Bonespero, kaj ŝi diras pli grandajn mensogoj, ol Himalajo!

– Mi bedaŭras, se mi senintence trompis vin.

Sed tiam ankaŭ sinjoro Theo frapfermis. La pordon de la ŝranko.

Ĉar aŭdiĝis bruo supre, kriegado, rumoro, poste duraj paŝoj, kaj envenis la ĉampiono de la sciencoj, spiregante!

– Sinjoro! Mi venis ĉi tien pro diri al vi, ke ni trovis Gustavon Bahr! Ĉi-momente li jam estas zorge flegata sur la ŝipo! Bonvolu doni al mi kartonpaperon... Mi devas subapogi la malsupran parton de la ŝranékon.

Li metis skartonpaperon sub la malcete ŝanceliĝantan meblon. Theo vertiĝis... Kio okazas ĉi tie? Li rigardis ilin paraliziĝinte.

– Sinjoro! – kriis la futbaljuĝisto. – Mi povas diri nur tion, kion sinjoro Maxbell. La scienco estas nedefendebla. La scienco estas duon-alten ŝotita pilko, subite tordita per ekstera instepo sub la maldekstran kverfoston de la golejo!

– Prave! – diris Maxbell entuziasme, ĉar eĉ unu vorton li ne komprenis el la tuto. Kaj li foriris.

Kion nun fari?... La scienco estasn nedefendebla. Kiel opiniis la Tero, kiam la fruaj antaŭuloj de Maxbell deklaris, ke ĝi havas teleran formon? Kaj kion li povintus fari, se oni kalkulas, ke tranĉilo kaj forketo kuŝas apud ĝi en la spaco? Kaj en ties fokuso troviĝas marmelad-knelo? Gustavo Bahr certe scias sian devon, kaj li pasigos siajn restontajn jarojn en tiu ĉi ŝranko. Ĉar se li elvenus eĉ por momento, la realaĵo ruiniĝus. Kio okazus, se nun evidentiĝus, ĉiu korpo perdas tiom el sia pezo, kiom tiuj volas, kaj la sumigo de la anguloj de la simetria triangulo estas modesta, po-monata, dumviva rento? Sekvonttage ĉesus la kantĥoroj, ĉiu malfruiĝus al la kontoro, kaj la homaro drinkigus sin horizontala.

Mallaŭta frapeto aŭdiĝis en la ŝranko, tiam Theo diris siblante:

– Se vi kuraĝos doni vivsignon, mi forbruligos vin pro la grava intereso de la homaro, kiel hindan vidvinon!

Tio okazis efektive: Kvarope ili surbodiĝis per boato: sinjoro Maxbell, Kupro-grafo (kiel Theo), kaj Lilian (en la rolo de sinjorino Gustavo Bahr, pro tio ŝi aparte lernis buŝharmoniki), kaj sinjoro Ĉefkuracisto, kiu reprezentis anstataŭ Jimmy la Ĝisorela.

La edzino de la fama homo kortuŝis la guberniestron.

– Helpu min, sinjoro gubernatoro! – lamentis la "edzino". Mi timas, ke mia edzo ne volos veni. La kompatindulo estas tre malsana... Nek spirite li estas la iama...

– Kiel mi scias, troviĝas eŭropano ĉe la sovaĝuloj, vivantaj inter la montoj, kiu nomas sin Bahr.

– Ho! Se ni povus kunveturigi lin... Se mi ne devus resti ĉi tie pro li – diris la virino per rukula voĉo, poste ŝi buŝharmonikis iomete. Tuj poste la gubernatoro deklaris, ke ŝi neniel restos ĉi tie, ĉar li sentas sia morala devo redoni la malsanulon al sia familio.

En la societo de la indiĝenoj, vivantaj inter la montoj vere loĝis tie "Gustavo Bahr", tiu malata, dikstatura, blankhara, monokla homo. Li konsultis multe kun la tribestro, li fumis unuarangajn cigarojn, kaj nokte suprenis sian multkoloran, pli belan vestaĵon, kion neniu komprenis, ĉar li kuŝis en la lito tiel. Nun alvenas homo, kies hararo havas tian koloron, kiel la subiranta suno, kaj lia vizaĝo estas punktita. Ili tuj nomas lin Punktita Vesperiĝo, kun li estas Mentona Krino, la nevoza kapor kaj Blanka Ĉapo (la Ĉefkuracisto, kiu kunportis vangofrapojn, kaj li abunde disdonas tiujn al la scivolemaj indiĝenoj, svarmantaj ĉirkaŭ la pakaĵoj. Krome venis ankaŭ virino.

– Kiel vi nomiĝas? – demandas Punktita Vesperiĝo la ĉefon.

– Mi havas la nomon Mensoga Fiŝo, kio ne estas vera.

– Ni serĉas scienculon ĉe vi… – Punktita Vespriĝo rakontis la mesaĝon de la gubernatoro. Sed dume alvenis la “profesoro”.

La dikulo promenis fumante cigaron, kaj la sango glaciiĝis en liaj vejnoj, kiam la virino, kiun li neniam vidis en sia vivo, ekŝrikis tiel laŭte, ke la plimulto de la indiĝenoj kuris sur la marbordon, kredante, ke alvenas ŝipo. Ŝi ĵetis sin ploregante al lia kolo, brakumante la timiĝintan homon, kaj en la proksimo ekparolas telegraf-stango, depreninte sian ĉapelon:

– Mi salutas vin en la nomo de la Geografia Sicieto.

La scienculo estis klarvida pri tio, ke ankaŭ la respondo estos korekta el literatura vidpunkto. Nun sekvas kelkaj tiuj robuste simplaj frazoj, kiu estas nemalhevablaj ĉe la granda sceno de ĉiu romantika biografio. Tiu kelkaj “spontaneaj” vortoj, kiujn la scienculo elpensas dum jaroj, ĝis li atendas sian trovinton, kaj ĝi sonos jene en la verko: Post la nekredebla fortostreĉo, kiam efektiviĝas la neeblaĵo, kun tiu oratoraĵ-simila kaj tamen senpatosa anglosaksa soleneco li ekparolis jene: Kaj nun sekvas kelkaj majstre simplaj vortoj.

Sed eĉ Maurois estintus senpova, aŭdinte la respondon de Gustavo Bahr, kiu diris:

– Kia idiotaĵo ĝi estas?! – li ekparolis nervoze. Mi ne konas la virinon. Cetere mi fartas bone ĉi tie!

– Vi ne diras la veron, sinjoro, kvankam mi estas la Mensoga Fiŝo – respondis la indiĝeno. – Doloras via koro, doloras via cerbo, oni devus kuraci vin. – Kaj li pravis, ĉar li mem batis

Quebra-on je la kapo tiel, ke tuj longdaŭra terapio fariĝis aktuala.

…Ĉar la scienco estas netrompebla, sukcesis la trompo. La ŝrikanta virino subite surprizis la paraliziĝintan, kapebatitan Quebra-on, kaj oni ekpikis lian brakon per io. Quebra ekkriis laŭte kaj etendis sian manon por elpreni sian revolveron, sed la multe da ĉirkaŭprenantaj brakoj, krome ame strangolantaj manoj kontraŭstaris ankoraŭ duonminuton, kaj dum tiu tempo efikis la injekto.

Tiel ili sukcesis porti la gangsteron sur la usonan ŝipon sen la ofendo de la portugala suvereneco! Ĉar ĝi estis la ŝajne neatingebla celo. "Ellelvi" Quebra-on de sur la netuŝebla tereno de la fremda ŝtato! Kiun la pacema, portugala gubernatoro kun siaj kvar ĝendarmoj ne estus arestinta lin, se oni perpoŝte petus lian ekstradicion.

Kiel eblas tamen tiu festado? Jen! En ĉiu ĵurnalo aperis multkolumnaj artikoloj… Kaj jen estas ankaŭ fotografaĵo!.. Li ja estas la vera Gustavo Bahr! Nek la virino estas Lilian, sed la pint-harnoda, multaĝa virino… Kiel ĝi okazis? Ĉu oni interŝanĝis ilin? Jes!

Sekvan tagon oni ellasis Gustavon Bahr el la ŝranko, klarigante, ke li povas elekti inter la malkaŝita trompo kaj la senmerite entreprenita festado. La granda scienculo cedis la devigon, rezignaciante je la mondfamo. Ankaŭ Maxbell-on oni starigis antaŭ la saman elekton: mond-mokado aŭ kandidateco pri la Nobel-premio, kaj la genia homo rezignaciis je la Nobel-premio kun amara gusto en sia buŝo. Ne li estas la kaŭzinto, ke Brusier, tiu perdiĝinta fizikisto estas pli bonŝanca kandidato, ĉar lia kuzo estis la kameraisto de la Kinejo Okuloj de la Mondo, kaj tiel la fizikisto konstante aperis en la kroniko, ridetante kaj svingante sian cilindran

ĉapelon, ĝis fine oni jam pensis lin reklamo, kiel la delonge kapbalancantan leonon de Metro.

…Ĉe la insularo Tong sub la mantelo de la nokto oni enboatigis la malnovan personaron kaj flustris al ili, ke ili povas elekti: ĉu ili entreprenas la esploradon, aŭ oni starigos ilin antaŭ la tribunalon, kiel ribelulojn. La homoj elektis la lastan. Kiam la personaro okupis sian lokon sur la ŝipo Stanley Up To Date, la pesto-ŝipo, nomata Sinjoro Wagner jam veturis malproksime kun Quebra, kaj kiam ĝi jam estis sub la horizonto, oni komencis malkonstrui de sur la riparo la malnovan ŝelon, almuntitan, kiel karoserion, la enkaviĝintan fumtubon, la putriĝintajn lignotabulojn…

… Kiu ja estus dirinta, kiam alvenis en San-Franciskon la rapidvetura krozŝipo Radzeer, ke antaŭ nelonge ĝi estis la ŝipo Kio Nova Sinjoro Wagner.

…La haveno naĝis en luksa brilo, sur la festa podio estis eminentuloj, mondfamuloj, malantaŭ la kordono svarmis vivdanĝera tumulto, mikrofono muĝas, aŭtokornoj, sirenoj bruas. Kaj sonas la ekscitita voĉo de la parolisto: Alo! Mi ripetas… Alo! Jam aperas la ŝipo Stanley Up To Date…

…Sinjoro Theo ne elŝipiĝas, dirante, ke li estas malsana. Lilian ne volas paroli, kaj ankaŭ ŝi ne descendas, sed jen estas Ofelia Pepita, ŝi transprenas bukedon da floroj kun modesta gesto, kaj oni eternigas ŝin en la kroniko, kiel ŝi staras en la havano kaj ridetis en ĉiu minuto! La aŭto antaŭeniĝas malrapide al la urbo, kaj ĉie oni vivuas la fizikiston Brusier, oni vivuas ĉiun, oni vivuas la senmortuloj kaj vivuas la malkapablulojn.

…Kaj la personaro de la ŝipo Kio Nova Sinjoro Wagner, aŭ tiu de Radzeer ekiras kun Fred la Malpura, Petters, la Ruĝa Vasiĉ kaj la Ĉefkuracisto al la restoracio Kaptu lia kolon Ritz, en la

suburbon, kaj ili kverelas, ĉar Fred manipulis denove. Diable, kiel kostis la oleo monon, kiam eĉ nun la ŝipo Radzeer estas plena de la sigelitaj kruĉoj de Stanley Up To Date?

Fed la Malpura fingropuŝe ŝovas sian ĉapon malantaŭen:

– Vi jam denove tedas min ĝisgorĝe! – Li lasas ilin tie.

…Ĉe la angulo la gaslanterno en strato, plena da kavetoj, ankoraŭ radias el malantaŭ ĝia malklara vitro, kiel li iras en sia svetero, kun enpoŝigita mano, kun surŝultrigita jako, kurbakrure kaj malaperas en la mistika krepusko de la mallarĝaj, malnovaj domoj de la suburbo, kvazaŭ lia grandiĝinta ombro sorbiĝus inter tiuj de la kurbaj kamentuboj, ke baldaŭ oni revidu lin tiel same en Cape Town, aŭ en Malmö, moroze kaj indiferente, kun sia multe da menso, kun la nekontaj, malnovaj tragedioj de sia kripto-odora vivo, sed sentiman kavaliron de legendoj, krimbaladoj.

– Je mia honorvorto… Tiu Strovaĉek ĉiam ŝtelas dum la divido… Vi ne konas lin, li estas Fred la Malpura, malnova rabist-kapitano… Mi bruligis kun li en Port Suez la ŝipon, nur tial, ke ĉiu terure timiĝu. Ĉar estas bela vespero, Arnoldo ni adiaŭ, mi havis la honoron.

…Kaj li eklevis sian ĉapelon, tiam ekflugis pasero kun feliĉa flugo, salut-ĉirkaŭŝvebante en la aero super sinjoro Wagner, tro feliĉa en la ekvilibro de sia malnove vertiĝanta animstato, kaj li postkriis ĝin instige:

– Nu ne hontigu mian kapon… kompatindan sorton havanta pasero ne estu tuj tiel alte – sed li jam krias timiĝinte. – Ve, Dio mia! Je mia honorvorto, ĝi kunportis ŝtelŝlosilon…

…Kaj li iris gaje kun sia fiera capelkandelo, kantante, kun poŝoj plenŝtopitaj per velkintaj floroj, kaj li ekkriis jene antaŭ la urbodomo, lukse prilumigita:

– Kia parado estas hodiaŭ? Ŝajnas, ke okazos festo! Tiam li kantis la marŝon de la trefo numero tridek de la komponisto Mendelssohn!

Kaj li kantis…

…Dum oni diris belegajn tostojn en la solenejo de la prilumigita urbodomo, Ofelia Pepita staris sur la balkono apud A. Winter.

– Kiel bela vespero… Ĉu vi scias, kio venis en mian kapon?

– Mi pensas tion – diris A. Winter – estus bone elekti stelon, kiel en nia infanaĝo.

“Ĝi estas mia teksto”, pensis Ofelia kolere.

– Mi tute ne elektas stelon – ŝi diris seke.

– Estas bone al la infanoj. Ili povas kredi ĉion – daŭrigis A. Winter timeme. – Miaj geavoj dum la festo de Sankta Nikolao metis silko-sukeron en mian ŝuon, sur la kornico de la fenestro. Sed mi demandas: kion metas la plenkreskuloj en sian ŝuon?

– Ŝustreĉilon! – respondis Ofeia Pepita kolere.

D-ro A. Winter fariĝis morte pala, aŭdinte tiun vorton:

– Ĉu… ŝu… streĉilon?… – Ĉu ne sekvos Hanibalo, la sekaj pastoj kaj la filmaktoroj?!

– Ĉu vi scias, kio fari? – diris la artistino grandanime, ĉar ŝi ekkompatis lin: – Teman ni elektu stelon.

– Jen bonvolu… – li diris iom pli esperante. – Kiun stelon vi preferas?

– Ĉu mi? – respondis Ofelia Pepita, kaj bona diro ekideis al ŝi.
– Mia ŝatata stelo estas Charlie Chaplin! Tiu fea homo, kaj

Kiam ŝi rigardis supren, ŝi estis sola. A. Winter fuĝis kurante sur la prilumigitaj stratoj sen ĉapelo kaj mantelo…

**M O R T A N O N C I L O**

La partoprenantoj de la ekspedicio Gustavo Bahr

(Man for man)

sciigas kun sincera malĝojo, ke la publike konata, laŭ la civila nomon nekonata

Jimmy la Ĝisorela, ĉ 25 jara junulo, kiu naskiĝis ĝis nun en nedifinebla loko,

li mortis laŭ maniero nemalkovrita. La supre nomito servis la aferon de la ekspedicio per sia fideleco, kuraĝo kaj moderna klereco.

**Ni konservos lian memoron!**

18. III. 193… San-Francisko.

En a nomo de la ekspedicio Stanley Up To date “Man for man”:

prezidanto Brusier.

La posedanto de la Odeno de la Reĝa Geografia Societo,

Fondita je la Memoro por Trovi Gusvavon Bahr,

estas membro de la akademio ktp

**F U N E B R A   A N O N C I L O**

Bone atentu ĉiu, kiu devas ordigi konton aŭ alian aferon kun tiu

## J I M M Y L A Ĝ I S O R E L A

Al li estas kapute. Li mortis!

La Klubaro de la Kolonio en Singapuro raportas funebre, ke la

Fidelaj Pomoj (ne falas surkapen de sia arbo), krome la societo

Tranĉilo aŭ Enspezigo ĉiun sian membron, la kontraband-asocio

“Ĉio Havas Limon, Sed Ni Evitas Ĝin”, kiel seketarion, konsi-

deras lin mortinta kun dolorrompita koro. Lian memoron kelkaj

homoj, kiuj ne plaĉis al li, flegos ĝis vivofino. Tiun funebran anon-

cilon oni pendigos en multaj ĉeflokoj de la diboĉejon tutmonde, ke

liaj amikoj ne serĉu lin, liaj ŝuldantoj povu dormi trankvile, kaj liaj

kreditantoj povu funebri lin. Lia fidela fianĉioo, Ofelia Pepita pri-

ploras lin, ĉiun vesperon de la oka horo en la Diboĉejo Medolo

(La elita publiko dancas!)

**Pri mortintoj bonon, aŭ nenion!**

**L A   A M I K O J   D E   J I M M Y   L A   Ĝ I S O R E LA**

**R E M E M O R O**

Lia Reĝa moŝto, Arkiduko St. Antonio, la Reganto de la

Insularo Feliĉo, ni rememoras pietate nian fidelan subulon,

**L A   M O R T I N T A N   J I M M Y**

Kiu multfoje pruvis sian sinceran fidelecon, sindonemo al sia

Reĝo. Tial mi donacas al li la II-a rangan Ordenon de Fide-

leco kaj civitanecon de nia insulo, krome el la polica ekstra-

dicia kontrakto, subskribita en januaro de 193..., kies aparta

klaŭzo esceptas nian adepton, kaj la oficialajn petojn, koncer-

nantajn lian personon, ni ne konsideris, tiuj estas metitaj en la

arkivejon, bindite en du dekoritaj albumoj. Pro liaj kelkaj sin-

ceraj homaj ecoj li ĝuis nian favoron.

**Pacon al lia cindro!**

Datita, en Almira, 19. III. 193...

En la nomo de Lia Reĝa moŝto, pere de la kabinet-kontoro:

Y'Sangerano di Costado Gomparez,

hidalgo p.m

## LA LETERO DE JIMMY LA ĜISORELA

## AL LIA ARKIDUKA MOŜTO ST.ANTONIO

Estimata Sinjoro Reĝo, Kara Sinjorina Reĝa Moŝto kaj la kara, bonkora patrina moŝto.

Krome mi tre ĝojis, ke vi malgajis pro mia morto kaj vi sincere kondolencis, mi kuraĝas esprimi mian kortuŝitan dankon en la nomo de la mortinto.

Estas malgaja afero, se iu mortas, sed evidentiĝis, ke ĝi estis nur mokincito. Kiam oni venas el la transmondo kaj vidas, kaj la Dokoj, la havenoj, deponejon, ĝojoj kaj vangofrapoj kaj ĉio estas ĝuste tia, kiel antaŭe.

Ĉar oni tamen konscias ĉi tie, ke Jimmy la Ĝisorela mortis, sed oni eĉ nun iras kaj bruas samel, kiel hieraŭ. Alico la Mensoga, la direktorino de la tranĉil-lokalo kaj pansio ĝuste tiel batas la ŝoforon, kiel hieraŭ.

Ĝuste tiel kuradas la aŭtoj, ĝuste tiom mensogas Tendenulo la Fervora, kaj ĝuste tiel sonorigas la tramoj, kaj kio la plej ĝena: la suno brilas same!

Mi ne scias, ĉu vi bonvolas kompenis tion?

Mi neniam pensis pri tio, ke mi mortos, tiam oni tafiku trafiku, kaj la sunbrilo estu fermota pro rekonstruo. Mi ne deziris, ke la oceano ĉesu, kaj Tendenulo la Fervora ne mensogu (pri kio ĝis nun eĉ detektivo nur per korpa puno povis persvadi). Kial deziri, ke ne dancu la multe da polvo ĉi tie en la klamo? Kial ne batu la direktorino Alico la Mensoga sian ŝoforon? Kaj tamen…

u …Ĝi estis gravas instruo. Kaj bedaŭrinde, nek pro tio mi serioziĝis. Nur tio konsolas min, ke nek al grandsinjoroj

okazas alia. Se mi ekmeditas, kiom da grandan entombigoj estis en la mondo, festita kun pompo kaj granda homamaso, kion mi ne ŝatis, ĉar kiel signo de funebro iu ĉefinspektoro diris ĉiam, ke ĝsi la sekva tago mi estu en lia oficejo, dum okazos la ceremonio kaj tumulto. Ĝi ĉiam estas tre malagrala. Oni kredas, ke mi ŝtelas. Sed kion oni povas ŝteli en policeje oficejo?

Nun mi transiras al la afero. Kial oni rakontis, ke mi mortis? Mi jam plurfoje menciis al via Reĝa moŝto, ke estas ĉi tie homo, kiu nomiĝas Fred la Malpura. Li do mortis min. Li estas la plej bona faklaboristo, rilate la morton. Ĝi okazis tiel, ke la ĝenerala mokincito eksplodis sur la ŝipo. Mi forte tenis min inter la malfacilaj cirkonstancoj. Kiam Via Reĝa moŝto edziĝis al via sinjorina Reĝina moŝto, tiam la multe da moneroj falis, falis malantaŭ vian veturilon, kiam la vitrokaleŝo kun kvar ĉevaloj pretergalopis en polvonubo. Okazis la sama afero. Mi staris ĉe la balustrado kaj falis abunde tiom da vangofrapoj, ke tiuj preskaŭ polvis, kaj nur falis, falis la tuta societo, ĝis oni batis min je la kapo per portebla manlanterno kaj mi ĉesis, ĉar kontraŭ tuta kohorto eĉ Herulo estas knokaŭitta, kio koncernas min.

Tiel okazis, ke oni traktis min bone kaj fermis min en la ŝipo Brigita. Kaj diskoniĝis la informo pri mia morto, ĉar mi malaperis ankaŭ de sur tiu ĉi ŝipo.

Tiel ni veturis reen! Ĉiu atento koncentriĝis sur nin! La okuloj de la mondo aŭskultis la radion!

Theo estas bonega knabo, ĉar li laŭdis mian nomon en la afero. Mi estos sur ĉefplaco en gamaŝoj kaj uniformo, surkape kun blanka ĉapo. Tiu blanka ĉapo estas belega! La du ŝraŭbtiriloj simbolas la vorton savo, ke “antentu, se la trajno proksimiĝas!” Ĝi tute ne tion simbolas…) Ĝi estas slogano, mi nur forgesis tion. Via Reĝa moŝto scias, ke mi ne

estas vanta, sed ĝi tre ŝveligos mian bruston, kiam venos la elegantaj sinjoroj, surkape kun brila ĵaketo, kaj ili eklevos tion inter siaj du fingroj.

Ni veturis reen kaj evidentiĝis, ke tiu ŝipo estas Radzeer! Oni nur renovigis ĝin kaduka! Kompreneble ĝi gajnos per sia rapideco ankaŭ la bluan rubandon Hilde Franc.

Sur la insulo Tsiui, minacante kaj koruptante, oni instuis al la kanibal-ĉefo Edmundo la fabelon, per kio sendis nin al la insulo Tonga. Ankaŭ la ĉefo de la insulo Tonga kondutis same, kion diri al la ŝipo Kiel fartas Tiu Wagner. Tiel do ili ŝtelis Quebra-on sed sur la insulo Sambi-Subi, kiu troviĝis ĝuste tie, kiel la profesoro. Li nun estas malsupre en la bilĝo, sed li tre bruis, kaj oni mallaŭtigis lin, sed li jam fartas tute bone.

La kapitano do havas cerbon, genian cerbon! Tio certas!

Sed foje mi aranĝos la konton kun li, tio ne povas esti objekto de diskuto por mi. Ĝi nun jam estas tutcerte! Mi pardonis lin, ke li ĉie kirlis, kie mi povintus havi negocon, kaj li trinkis la refreŝigilon el frambosiropo, se mi sonĝas pri tio, oni venkas min, ĉar mi ĝemeta. Sed kio nun okazis, mi ĵuras je nia trono, ke mi venĝos tion!

Ni jam proksimiĝis al San-Francisko. Mi purigis miajn gamaŝojn, la butonon de mia ĉapo, sur kiu la ŝaraŭbotirilo simbolas, ke “Fumi estas malpermesite”. (Nek tio estas la vera. Kvankam ĝi estas bona slogano.) En San-Francisko oni metis min sur la bordon, ĉar ili iris fari sian propran aferon kaj mi al Teho, ĉar vespere estos la solenaĵo! Sed ne estas permesite scii, ke mi venos aparte de la Ekspedicio. Tial oni deponis min en kesto sur la ŝarĝokajon.

Fred la Malpura sidis sur la kesto, en kiu mi kaŭris, kaj li cigaredis. Poste li diris: “Ĉu vi memoras, infano mia, ke foje

mi petis vin en tia lignokesto, kaj vi ne ellasis min? Eĉ! Vi metis lignokestojn sur ĝin.” (Vere povis okazi tiaĵo foje.) Kaj mi diris: “Frategĉjo Fredy, ĉu vi ankoraŭ memoras tiun ŝercaĵon?” Li diris responde: “Mi ne kredas, ke mi estus distrita.” Mi rimarkas, ke tio estas vera. Ĝi ne estis agrabla sento por mi! Ĉar vespere diras al mi la okuloj de la mondo, kaj mi staras sur la ĉefplaco en gamaŝoj, portante ĉapon de ambulancistoj, la du ŝraŭbotiriloj simbolas sur mia kapo: “Atentu, profunda akvo!” (Nek tio estas la ĝusta). Li respondis tion, ke li ne estas venĝema, kaj li iros tuj en la urbon, ĉar tie li havas nenion farendan. Mi diris: Malfermu la lignokeston! Li respondis, ke li ne estas lignaĵisto, mi lasu lin trankvila. Kaj li foriris. Nek ĝi estas tiel granda problemo, ĉar mi havas ŝraŭboturnilon nek sur mia ĉapo. Perforte malferminte la lignokeston, mi elvenis, sed tiam jam multaj homoj staris ĉirkaŭ ĝi, malmulte da finacistoj kaj aliaj, malbonaj sonĝoj. Sed el tio ne estos problemo, ĉar Theo liberigos min por la solenaĵo. Ĉar li liberigas min de ĉie. Mi ekmoviĝis, sed tiam du-tri revolvertuboj direktiĝis al mi, kaj jam ankaŭ mi vidis…

Sur la lignokeston estis skribite per grandaj literoj:

V A P O R Ŝ I P O   B R I G I T A

A T E N T O N!   P E S T O!   F O R B R U L I G I!

Nun sekvos kvaranteno! Oni tuj izolis tiun parton de la haveno kaj ŝprucigis min per karbolo kontraŭ pesto. Oni forportis min, kaj parolante kun miaj kelkaj agoniantaj kunloĝantoj, mi aŭdis la radiprogramon el la felgista ĉambro, kie la okuloj de la mondo parolis sur la ĉefplaco al la ekspecidio, dum kiu Fred la Malpura superruzis min. Mi estis ĉi tie kun la belega ĉapo, pri ĝi venas en mian kapon, kion signifas la ŝraŭboturnilo:

## NIN ĈIUJN POVAS TRAFI AKCIDENTO

Nun mi finas mian leteron, kiun mi subskribis kun estimo. Datita nun sube, propra-kadavre, kiel miaj kolegoj diras en Londono: Mortis la reĝo vive la reĝo! Senkulpigante mian silenton, nur nun post mia morto mi ekshumas min. Malgaja kolego de via Reĝa moŝto.

Eks-, eĉ mortinta reganto:

don St. James di Ĝisorela.

## TRIDEKKVARA ĈAPITRO

Sinjoro Theo partoprenis nenian solenaĵon. Li sidis hejme, kiel homo anime rompiĝinta. Sed posttagmeze virina voĉo telefonvokis lin:

– Alo! Spirita frato! Ĉu vi ne intencas viziti kvina-horan tekunvenon kun fia spionino?

– Bedaŭrinde mi ne konas vin!

– Tiel estas eĉ pli bone. Mi atendos vin post duonhoro antaŭ la Operdomo! – Kaj ŝi demetis la aŭdilon. Nu, li tamen ne iros. Li montros tion…

Li alvenis kelkajn minutojn pli frue, ol la virino. Li atendis ŝin kun solena kaj severa vizaĝo, sed bedaŭrinde lia tiu provado vaniĝis, ĉar Lilian brakumis lin kaj kuntrenis lin kun tempesta rapideco, ke liaj ĉapelo kaj cigaro falis… Tia frenezulino ŝi estas.

Kion diri? Ankaŭ la leganto estas ĝuste tiel klarvida pri la venonta sorto de tiu junulo, kiel mi. Post nelonge Lilian tiregadis lin en vilaon kaj venigis mararmean oficiron de ie:

– Li estas korvet-kapitano Milton Winter, mia frato. Bonan tagon. – Kaj ŝi lasis ilin tie.

Ĉi tie okazis ia miskompreno… Vestita per la uniformo de la mararmeo… Jes… li… Li estas Kupro-grafo!

– Mi ĝojas, ke mi povas konatiĝi kun vi, Sinjoro, Linkoln.

– Vi… Vi… – balbutaĉis Theo

– Mi nun alvenis, fininte mian ferion. Mi resaniĝis en Florido el influenco – li diris kaj ridetis.

Poste ili manĝis kolazionon. Oni informis sinjoron Theo, ke la lando bezonas novajn, freŝajn fortoj, rilate la ŝipkonstruadon, estus bone, se li vizitus la ŝtatsekretarion pro tiu afero.

– Morgaŭ mi vizitos la ŝtatsekretarion – diris la korvet-kapitano – por danki la ordenon.

– Estas interese – diris Theo. – Ĉu vi resaniĝis el la influenco tiel heroe, ke oni distingis vin per ordeno?

La korvet-kapitano tre ruĝiĝis kaj diris nenion.

…La ekzekutisto kaj la pordisto malfermis fakvendejon pri ekspediciaj varoj sub la nomo "Gajaj Herooj", kaj ankaŭ ili rakontis multe pri la danĝeroj, penoj de la vojaĝo, aldonante kun amara rideto, ke la ordinaruloj, kiuj en konkretaj situacioj riskante sian vivon alfrontis la danĝeron, ricevis nenion el la gloro, nur aĉajn dolar-milionojn.

– Oni donis dolarojn kaj denove dolarojn – diris Baruch T. Livingstone ironie al sia iu konato. – Ĉar ili pensas, ke la mono feliĉigas.

– Prave – kapjesis Sokrato Schwachta, – la stultuloj pensas tion. Bedaŭrinde ili pravas.

La geedziĝan feston partoprenis mil-are tumultanta homamaso. Alvenis ĉiu, kiu kalkuliĝis iu en San-Francisko. Okazis nur unu ĝena incidento dum la eleganta nuptofesto. Kiam la juna paro aperis antaŭ la preĝejo, kaj sinjoro Theo svingadis sian ĉapelon al la homamaso, aŭdiĝis sertora voĉo:

– Jen vidu! Mi konas bone tiun ruĝan friponeton! Ni estis enkarcerigitaj kune! Li estas bona tipo, je mia honorvorto…